The Australian Esperantist

Numero 265 JANUARO-FEBRUARO 1991

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488



Recenzo: La nova PIV (rec. O. Tupmok) ... p.3
Novaj libroj; Esperanto-horloĝoj ... p.6
Retrokomente (Marcel Leereveld) ... p.7
Citaĵkvizo 2 (Harry) ... p.9
Recenzo: Aŭstralia-Esperanta Vortaro (M. Leereveld) ... p.10
Biblioteko de AEA; Nova gazeto "Enigmo" ... p.17
Semantikaj Eraroj (Bernard Golden) ... p.18
Kantoj kaj muzko por la AEA-kongreso p.20
Indekso de TAE 1989-1990 ... p.23
English Supplement

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

Oficiala organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. Telefono: (09) 574 1307. Fax: (09) 574 1298.

Prov. Prezidanto: Justice K. Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Vicprezidanto: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne Vic 3001.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley WA 6102.

Libro-Servo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

Prov. Prezidanto de la Ekzamen-Komitato: Donald Broadribb (adreso supre).

P.R.O. (Oficisto pri Rilatoj kun la Publiko): Dennis Murphy, 79 Binnalong Rd, Old Toongabbie NSW 2146

Membreco: $25 por individuo, klubo kc.; $30 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso); $15 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto aŭ al la Libro-Servo.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adresslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian adreson aŭ/kaj nomon.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Limdato por alsendo de presotaĵoj por la venonta numero: 1 marto.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST "ni vere bezonas artikolon pri... "? Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercbildon. Ni ĉiuj volos legi ĝin! Preparante la tekston, bonvolu atenti la ĉi-sekvajn postulojn: la teksto devas esti klare tajpita, per nova rubando kaj kun duobla spaco inter la linioj kaj marĝenoj de almenaŭ du centimetroj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netajpitaj tekstoj estos malakceptitaj. Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone ĝi povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temos pri kronologie urĝa teksto.

LA NOVA PLENA ILUSTRITA VORTARO

recenzas **Odlobok Tupmok**

P l e n a I l u s t r i t a V o r t a r o , 6a eldono. Parizo, SAT, 2083. 186gig. Inkludas la 13an Oficialan Aldonon de la Akademio de Esperanto. ANZ$4389.30 de la AEA Libroservo. Por Bankok-IIb-komputilo.

Finfine la delonge atendata nova eldono de PIV aperis. 57 gigabajtojn pli granda ol la kvina eldono, la sesa estas radikale reviziita. La inkludo de la nova 13a Oficiala Aldono (32 meg) estas salutinda. Krome, unuafoje gramatikkontrola programo estas integra parto de la verko. Sed min ĉagrenas la ankoraŭa uzo de la vorto "Ilustrita" en la titolo. Efektive temas pri 46 hologramoj ĉe la fino, kaj la programo inkludas neniun aŭtomatan kodon por surekranigi ilin samtempe kun la artikoletoj pri la koncernaj terminoj. Je tiel alta prezo, oni ja rajtas atendi ion pli ol dudimensiaj grafikoj en la teksto mem.

Dirinte tiun kritikon, mi devas tamen laŭdi la sonarkivon, kiu ĉifoje akompanas la kapvortojn anstataŭ kvazaŭsendepende troviĝi ĉe la kapvorto "muziko". Ekzemple, ĉe Bernstino, Leonardo, oni aŭskultas lian majstran postmorte publikigitan Koncerton por Violonĉelo, kaj preskaŭ modernsonan post la transmeto el antikvaj kompakt-diskoj. Sed plej prifierinda estas la unuafoja prezento de la longe perdita oka simfonio de Sibelio ludita per originaltipaj instrumentoj. Se vi kredas ke antaŭ la estiĝo de elektronika muziko nenio valora estis verkita, nur aŭskultu ĉi tiun redonon. Direktis la orkestron la prafilo de la komponisto mem. Se mi ne eraras, neniu alia vortaro en ajna lingvo inkludas ĉi tiun rarajon.

Mi volas plendi, tamen, pro la daŭranta insisto de SAT ke oni devas diri ko anstataŭ kaj. "Kaj" ja necesigas la utiligon de nur unu plia bajto ol "ko", kaj miaopinie "ko" jam de la komenco estis atenco kontraŭ la Fundamento. Krome, pluraj versoj en la denove popularaj kantoj de la Beatles perdas parton da sia ĉarmo pro tiu arbitra ŝanĝo. Sed eble mi nur grumblas pri SATismo jam de preskaŭ ĉiuj esperantistoj bone konata.

Ĉi tiu eldono enhavas grandan nombron da citoj el la "klasika periodo" de la esperanta literaturo, t.e. inter 1900 kaj 1920, proksimume. Tio helpas kompreni la nun arkaikan sonon de frua Esperanto. La etimologioj provas indiki la originalan, zamenhofan sonon, plej ofte tre trafe. Nur aŭskultu la deklamaĵojn el Hamleto laŭ la (parte hipoteza)

prononco de Zamenhof kaj la komparatan sonon de moderna deklamado de la samaj tekstoj.

Denove la redaktoroj de PIV ne povas interkonsenti kun la Akademio pri landnomoj. Tiu preskaŭ ducentjarlonga batalo komencas enuigi min. Laŭ mi estas klare ke "Usonkanadio" konsistas el nur unu radiko, kaj la -i- estas parto de la radiko. Kie oni trovas homojn nomatajn "usonkanadoj"? La popolo mem de tiu kontinento nomas sin "usonkanadianoj" - kiel konstatas la 12a O.A., kaj mi ne komprenas kial UEA plu insistas defii la Akademion pri tio, ĉar la statuto de UEA klare diras ke ĝi devas akcepti la Fundamenton kaj la decidojn de la Akademio. PIV fariĝis nia preskaŭoficiala leksikono de Esperanto, kaj nepre devus kondamni la misformadon de landnomoj.

Kiel mi anticipis, la redaktoroj de PIV ankaŭ ankoraŭ ne sukcesis interakordi pri la vorto komputero/komputoro/komputilo. Mi scias ke la Akademio ne rajtas arbitre trudi decidon kiam la popularа vortuzado ne pli-malpli unuiĝis pri iu vorto. Sed ke ĝi plu ripetas, laŭ sia 11a O.A., ke "la uzado de kaj komputoro kaj komputilo estas tolerata" anstataŭ definitive fini la konfuzon, tion mi tute ne povas kompreni. Ni uzas komputorojn/komputilojn jam de pli ol cent jaroj, kaj ke tiaj maŝinoj ankoraŭ ne havas oficialan nomon estas skandalo.

Unuafoje la PIV uzas la en la 12a OA oficialigitan genitivon -es por ordinaraj vortoj. "La verkistes tria romano estis plej populara" estas la ekzemplo donita. Mi mem plu preferas la prepozicion "de" ("La tria romano de la verkisto kc." Mi agnoskas ke la Fundamenta formo estas tri bajtojn pli longa, sed ĉu tio vere devus esti la kriterio por akcepto aŭ malakcepto de nova gramatikaĵo?

Neologismoj: miaopinie la redaktoroj de PIV malservas sian uzantaron pro sia decido ne indiki kiuj neologismoj estas akceptindaj kaj kiuj ne. Iom pli ol dudek mil novaj neologismoj aperas en ĉi tiu eldono, kaj preskaŭ senescepte ili estas el la tajlanda lingvo. Mi bone konas la argumenton ke la 15a regulo de la Gramatiko en la Fundamento diras ke vortoj kiujn la plejparto de la lingvoj de la mondo prenis el unusola fontlingvo estas uzeblaj en Esperanto, kondiĉe ke oni ortografiu ilin laŭ la esperanta alfabeto. Sed ni ne tro rapidu akcepti ĉian ajn neologismon nur ĉar ĝi estas taja. Memoru ke iam la latina, poste la franca, kaj poste eĉ la angla estis t.n. "mondlingvo", kaj nuntempe la lingvo de Tajlando foje estas nomata "la internacia lingvo". Kompreneble mi ne

malkonscias ke la plejparto de la tajaj neologismoj estas almenaŭ konsiderinda, ĉar la taja lingvo estas instruata en preskaŭ ĉiuj lernejoj. Ĉu aŭ ne la infanoj efektive lernas paroli ĝin, kaj eĉ skribi ĝian alfabeton ĝuste, nu pri tio mi dubas. Pro la hegemonio de sia elektronika reserĉado kaj industrio, kaj neneebla teknika supereco rilate al spacesplorado, Tajlando estas nuntempe la plej potenca lando en la mondo. Sed ĉu tio daŭros, aŭ ĉu post cent jaroj Tajlando estos nur triamonda lando kia Usonkanadio, kaj ni cerbumados por pravigi la ekziston de tiom da tajvortoj en Esperanto, ĝuste kiel ni nun serĉas pravigon kontraŭ niaj mokantoj por la ekzisto de "mitingo" kaj "diskoteko" kaj "trajno" kaj tiom da aliaj angleoriginaj vortoj?

Multaj personoj dezirantaj posedi la novan PIVon devos resti sen ĝi, ĉar ĝi estas uzebla nur pere de laseriloj. Oni diras, tamen, ke eblas aĉeti konvertilon por povi uzi ĝin per tradiciaj LKD-monitoroj. Mi ne scias ĉu tia solvo tre bone sukcesas. Evidente la hologramverkoj ne estas adekvatkvalite videblaj per LKD-monitoro, eĉ kun modifilo. Kvankam la hologramoj malmultas en la nova PIV, tamen tiuj kiuj ja enestas agnoskende estas nepra privalorigo de la verko. Per kiu alia metodo oni povus prezenti kontentige la ĉiampopularan baleton "La Fajrbirdo" de Stravinskio aŭ "Lago kun Cignoj" de Ĉajkovskio? Jes, ili estas malnovaj, sed multaj el ni plu amas la malnovajn majstrojn.

Se via komputoro/komputilo ne havas sufiĉan ramon por 168gigabajta teksto, eble via Esperanto-klubo povos aĉeti la verkon kaj ricevi permeson de viaurba biblioteko uzi ilian komput--on. Malgraŭ ĉiuj mankoj, kaj konfesende ja enestas multaj, la sesa eldono de PIV estas nia plej valora vortaro. Nepre aĉetu ĝin, aŭ instigu ke via loka Esperanto-klubo ĝin akiru.

o-o-o

Komento de la redaktoro: pro la alta prezo de la nova PIV, la AEA-Libroservo povis enstokigi nur 30 ekzemplerojn, ĉar ĉiu ekzemplero bezonas laserdiskilon speciale modifitan por Esperanto. Se vi jam posedas laserdiskilon tiel modifitan, nepre certiĝu ke ĝi estas kongrua kun la Bankok-IIb. Kelkaj malmultekostaj usonkanadiaj klonoj kapablas legi la Esperantomodifojn, sed mi ne rekomendas uzi ilin pro la eblo ke ili povus fuŝi la tutan programon. Multaj tiaj klonoj ne estas imunigitaj kontraŭ komputvirusoj. La alta kosto de aŭtentika Bankok-IIb vere estas pravigata de la scio ke ĝi estas rigore kontrolita kaj imunigita. □

LIBROSERVO DE AEA

Suplementa listo de verkoj en ĝia vendstoko

149 1887 kaj la Sekvo (Waringhien, reviziita eldono) $25.50
86 Aaron Brazilumas Esperante (kantkasedo) $26.80
746 Adiaŭ, Kuzko (Knichal). Romaneto. $8.90
759 Adolesko (Vaha) $13.40
699 Al Venko (Dimnes). Kantkasedo. $23.00
439 Debuto en Esperantolando (Nataša & Ĵomart). Koncertkasedo. $16.50
625 Mesio (Händel). Diversaj partoj. Muziko de la Hungara Ŝtata Orkestro. Muzikkasedo, $16.50
452 Terra (Nemere). Romano. $13.50
456 Tiu Toskana Septembro (Tavanti & Ertl). Detektivromano. $14.20
652 Vivo kaj Morto de Vladmir Varankin 1902-1938 (Stepanov). Biografio. $6.80

o-o-o

EDMUND HEARNE INTER NIAJ PIONIROJ DE 1918

En 1900 naskiĝis Edmund Hearne. En 1918 Edmund eklernis Esperanton. Nun 91jara, Edmund povas retren rigardi al 72 jaroj da esperantisteco. Vera dojeno de la esperantistoj en Aŭstralio! Al li ni sincere gratulas.

o-o-o

LEGU LA TEMPON PER ESPERANTO!

La novembra (1990) numero de El Popola Ĉinio informas (kun kolorfotoj) ke la Brakhorloĝo-fabriko de Qingdao nun fabrikas kaj vendas tablohorloĝon kaj brakhorloĝon esperantajn. La tablohorloĝo estas tre modernisme piramidforma, kun verda stelo proksima al la supro de la piramido. La brakhorloĝoj (por viroj kaj virinoj) havas desegnon de la terglobo kun la vorto Esperanto kaj malgranda verda stelo. La prezo de la tablohorloĝo estas US$10 kaj la brakhorloĝoj po US$15, inkl. sendkostojn. Oni devas pagi per usonaj dolaroj. Vi povas akiri tiucelan ĉekon ĉe via banko, sendendan al Qingdao Watch Factory, No. 89, Ningxia Lu, Qingdao, Ĉinio; aŭ vi povas peti vian bankon rekte sendi la monon en la konton de tiu fabriko: A/C 008430011, Bank of China Huanghai Branch, Qingdao, Ĉinio. Nepre sendu al la Ĉina Esperanto-Ligo kopion de de viaj mendo kaj pago. (Adreso: P O Kesto 825, CN-100037, Beijing.)

RETROKOMENTE RETROETNEMOK ETNEMOKORTER

de **Marcel Leereveld**

Kompatinda Esperanto! Multaj, kaj nun ankaŭ Vera Payne (TAE Nov. 1990, p.12) ne ŝatas cian aspekton, kaj deziras ŝanĝi cin! Ĉiu el ili volas ŝanĝi nur malgrandan parton de ci, sed pro iliaj diversaj gustoj ili kune malŝatas grandan parton. Kial ili diskriminacias kontraŭ ci, kara Lingvo, dum ili ne kuraĝus, eĉ malkuraĝegus, ŝanĝi sian propran lingvon pro gusto? Kaj kredu min, kara Esperanto, mi trovis multajn malbonaspektajn vortojn en multaj lingvoj, da kiuj mi lernis, kiam juna, kaj el kiuj mi eĉ malŝatis unu, la anglan, pro ĝiaj malbelaj sonoj*, pro ĝia seneco je gramatikaj indikiloj, kaj pro ĝia mikspoto de vortoj el malsimilkarakteraj lingvoj ĝermanaj kaj latinidaj. Feliĉe, kaj parte pro cia mikspota beleco, mi ŝanĝis mian opinion pri la angla, kiam mi eljuneciĝis. Mi dankas cin, Esperanto, pro tiu resaniĝo!

Sed, fakte, mi samsentas kun Vera. Ankaŭ mi ŝatas "trista" pli ol "malgaja". Mi preferus, sendube same kiel ŝi, "liva" al "maldekstra", kaj "ugla, ŝlefita, buŝo, anto, regreti, doktro, spozino, jo, hospitalo*!" kaj multdekojn da aliaj, al "malbela, malbona, malurbo, onklino, bedaŭri, filino, edzino, jes, malsanulejo," ktp. Mi preferas esti "edzo" ol "husband" (=bound to the house), kaj mia edzino preferas esti "virino" ol "woman" (=wife of a man). Konante la fortan justecsenton de Vera mi certas ke ŝi, ree, samopinias. Al "mia patro amas mian patrinon" mi multe preferas anstataŭan sonon de "mia papo amas mian mamon."***

Kio maltrankviligas ("ĵoras"?) min multe estas ke la kompatinda Zamenhof ne samopiniis kun Vera kaj kun mi. Kial li ne komprenis ke multaj nacilingvaj vortoj pli plaĉas ol Esperantaj? Ĉu eble mi devas ŝanĝi mian opinion pri la genio kaj pri la gustosento de nia Majstro?

Kompreneble mi samopinias (kiu malpovus) ankaŭ pri la aliaj "horiblaĵoj" sur tiu paĝo 23 (kaj pro tiu mia samopinieco, bedaŭrinde, la "formikino apenaŭ mordetis la leonon"); feliĉe por ni la saĝa redaktoro presigis nur la duonon de la listo.+ Ankaŭ mi scias ke "malveki" estas la kontraŭo de "veki", "do "igi iun ekdormi" kaj ke "unuseksa" estas "koncernanta nur unu sekson". Ankaŭ min jukas la "juk"vorto "bumranga" por io kio iras kaj revenas, kaj la "Kreego", kiu eble estis nur kreado aŭ eĉ kreiĝo. Scias ankaŭ mi ke "paroleti esperante",

same kiel "paroli esperante" ktp povus signifi "kun espero" kaj tial, sendube kiel Vera, mi senescepte uzas ĉefliteron skiribante pri la lingvo Esperanto (ankaŭ en ĝiaj derivaĵoj), por signi la diferencon. En la parolo mi aldonas, se necese, la vorton "-lingve", sed eĉ tie miskompreno povus okazi, speciale se dezirata.

Konklude: ni lasu ĉiujn gustojn ŝanĝi kaj "impruvi" tiun malmodan Esperanton! ◻

--

*Iu itala lingvisto, kiu ne komprenis la anglan lingvon, komentis ke la plej belsona "vorto" el ĉiuj lingvoj estas la angla "cellar door"! - la red.

**Pardonon sed "hospitalo" estis oficialigita per la unua Oficiala Aldono, kompilita kun la helpo kaj aprobo de Zamenhof. - la red.

***Ĉu ni miru pri la mamo de Marcel, aŭ la stranga gustprefero de la Papo? - Odlo B.

+La mallongigon de la listo necesigis lastmomenta neceso enŝovi nekrologon pri Audrey Childs-Mee. Mi petas pardonon. La ellasitaj listeroj estis:

proponeti (= to suggest, anstataŭ "sugesti")
aldonaj komentoj pri nacilingvumi: elstaraj karaktereroj metaforigeblaj de krokodilo estas ĝiaj larmoj, ĝia dika haŭto, kaj ĝia trompa nemoviĝado kaj nevidebleco antaŭ atako).
ekmalrevi (= to get back to earth, to reality).
fluebla (= "likva"). |Tamen "likvo" estis oficialigita en la Oka Oficiala Aldono - la red.|
malgas(ec)a (= fluebla aŭ solida).
lorosono aŭ loraĵo (= unu el la du tute malsamaj signifoj de "likvido".
uraganeto (= depression).
aldonaj komentoj pri elaĵoj: (= kiuj moviĝas el io, ekz. el vulkano; ne "kiuj estas el io": tio ne eblas per "el").

|Per la ĉi-supra retrorespondo de Marcel mi deziras fini la diskuton de tiu afero en "retrokomente". - la red.|

KIU DIRIS TION?

(citaĵkvizo 2)

de **Ralph Harry**

Jen kelkaj eminentuloj, citaĵoj el kies verkoj, kaj vortoj, pri la temo AMO sekvas. Penu parigi la personon, aŭ fonton, kun la spritaĵo. La solvo aperas sur paĝo 27.

(a) La Nova Testamento
(b) Geoffrey Chaucer
(c) Goeto
(ĉ) Luis de Camoes
(d) Balint Balassa
(e) Mohammed Ikbal
(f) Lordo Byron
(g) Katulo
(ĝ) Dante Alighieri
(h) Robert Burns

1. La vira amo estas flankafer',
   Virina estas ŝia plenekzist'

2. ...l'Amo
   movanta sunon kaj l'aliajn stelojn

3. Nur en mi la amo, infera ĉi flamo
   ne ĉesas, brule brulas

4. Ho kor'! ho Koro! ho mia kor'!
   Vi, mia maro mia boato kaj mia certa rodo!

5. Malfacilege: subite ĉesigi la amon tre longan
   Malfacilege ja, sed jen via dev'

6. Kaj sure pendis ora medaliono
   Sur ĝi gravur': komence krona A
   Kaj poste: Amor vincit omnia.

7. La kara ŝajnas ruĝa roz'
   florinta dum juni'.

8. Restas do nun fido, espero, amo, tiuj tri
   kaj la plej granda el ili estas amo

9. ...se oni povus pagi la amon
   tien kaj ien kiel la monon...

10. Jen kiel freŝe ĝi la florojn lavas
    Ĉar akve larmojn, nome Amon havas

AŬSTRALIA-ESPERANTA VORTARO

recenzas **Marcel Leereveld**

A ŭ s t r a l i a - E s p e r a n t a V o r t a r o / A u s t r a l i a n - E s p e r a n t o D i c t i o n a r y, 3a eldono, de R.L. Harry kaj V. Gueltling. Eld. la AŭStralia Esperanto-Asocio, 1990. 54p. Broŝurita. $6 de la AEA Libroservo.

La dekomenca celo de ĉi tiu vortaro estas utili al la tradukantoj de aŭstralia literaturo. La aŭtoroj aldonis, ĉe la tria eldono, gravan plian utilon: ke la anglalingvaj esperantistoj (kaj eĉ multaj aŭstralianoj) povu uzi ĝin kiam ili anglalingve legas originalajn aŭstraliajn literaturerojn, aŭ eĉ deziras lerneti aŭ lerni la aŭstralian idiomon.

Por trovi aŭstraliajn idiomaĵojn, el la pozicio de iu alia lingvo (Esperanto inkluzivita) ĉi tiu vortaro neniel estas taŭga (escepte la 122 ne-PIV-ajn, plejparte specialistajn, neologismojn ĉe la fino), kaj tio ankaŭ ne estas ĝia celo. Neanglalingvanoj devas uzi, kiam ili legas esperantlingvajn aŭstraliaĵojn, ties ĉefinajn vortaretojn.

Tri rilataĵoj menciindas. Unue: la aŭstralia idiomo havas la tendencon, pli rapide ol la anglia aŭ eĉ la usona, ŝanĝiĝi, precipe sub influo de la entrudiĝanta idiomo usona, kaj la koncerna vortaro bezonas oftan revizion. Due: se la tradukantoj de aŭstraliaj literaturaĵoj estas sufiĉe kleraj por mem trovi la tradukojn, kion oni esperas, la verko devus esti uzata nur por kompari ĝiajn kun la memtrovitaj proponetoj; sed la posedo de tia vortaro ofte igas la tradukanton ŝafe kaj tempŝpare akcepti la vortaraĵojn. Trie: ĉu vere anglalingvanoj, por kompreni aŭstraliaĵojn, preferus uzi la esperantajn klarigojn anstataŭ la jam ekzistantaj detalaj anglalingvaj klarigoj en aliaj libroj? Ĉar ĉilastaj estas pli pezaj, mi vidas utilon nur por turistoj.

La konsisto de la vortaro fakte estas parte vortara kaj parte enciklopedia. Tia mikspoto ne necese estas malbona: efektive mi trovas ĝin plej interesa en ĝia enciklopedia parto, kaj krome oni havas ĉion en unu libro. Troige tamen ŝajnas aldoni kuirartajn konsilojn (i.a. "avokadoj estas manĝataj en saladoj": mi kaj aliaj simple manĝas ilin kiel fruktojn). Sed ĝenerale la klarigoj estas edukaj.

La elektmetodo de la esperantaj tradukoj estas la individuaj rezonado, serĉado kaj preferado de la verkisto, kun la granda helpo tamen de

aliaj, precipe aŭstraliaj, esperantistoj. La ĝustigo de la decidaro estas ke kunlaboris pri la verko la plej eminenta parto de la ĉilanda samideanaro. Nu, ekzistas eblo ke ili tamen ankoraŭ ne estas sufiĉe eminentaj laŭ lingvistika vidpunkto, por prezenti la rezultojn kiel akceptindajn aŭ eĉ akceptendajn. Ĉar tion la Enkonduko sugeste faras malgraŭ la modestema mencio (ĉe la dua eldono, ne ĉe la tria!) pri "multaj neperfektaĵoj" kaj "inviti komentojn kaj sugestojn". Pli grava, eĉ tre grava, sugesto estas ke, ĉar iu neologisma vorto aperis en PIV, ĝi estas ĝusta kaj akceptenda. Ĉiuj neologismoj, inkluzive la multegajn en PIV, estas nur proponoj, kaj ne necese akceptindaj kaj uzindaj. Kontraŭe: ju malpli ni kapablas uzi, anstataŭigante neneologismajn esprimojn, des pli bone por la lingvo, se ĝi deziras esti lernebla kaj praktika interkomunikilo. la aŭtomata, blinda akceptado de en PIV aperantaj proponoj malpliseriozigas iun ajn esperantan verkon.

Tradukante nomojn konsistantajn el kunmetaĵoj aŭ el pluraj vortoj, oni alfrontas du tipojn: Tiujn kies partoj efektive indikas realaĵojn, ekz. "ruĝkapa robeno", kiu vere havas ruĝan kapon (kaj tiaj akcepteblas internacie), kaj tiujn kies partoj estas neveroj aŭ metaforaĵoj (vorto ne povas esti metaforo, nur la uzo povas), ekz. "kangurupiedo" ne estas piedo nek rilatas al kanguruo. Same "Blinda Frečjo" ne nomiĝas Frederiko, kaj "brasikarba ĉapelo" ne havas rilaton al arbo kaj tiu hipoteza arbo (ĝi efektive estas ne arbo) ne havas rilaton al brasiko.

Krome necesas scii ke originalaj adjektivoj povas kiel determinantoj kuniĝi kun substantivoj sen la origina -ec- sufikso (belknabino, ktp.). Sed originalaj substantivoj adjektivigitaj ĝenerale ne povas, ĉar ĉeestus du diversaj signifoj: "ledligna (arbo)" = ligno por ledo, el ledo aŭ apartenanta al ledo; do necesas uzi ledeclignarbo por "leatherwood". Aŭstralianoj, kiuj konas la arbon, aŭ ĝian ekziston, nature emas ne konscii ke alimondpartuloj miskomprenos tiajn vortojn formitajn nefidinde pro misklasifikado.

La mikspotemo de la verko evidentiĝas ankaŭ en la ĝenerala traktmetodo kiu allasas ĉiajn enhavajn kaj lingvistikajn solvmanierojn. Tiel la laŭvorta traduko aperas post la aŭstraliaj idiomaĵoj, sed ne ĉiam, speciale ne ĉe alternativoj (ekz. "love bird" kaj "she oak"). Tiel la prononcado de malfacilaj vortoj ofte donatas, ne ĉiam kontentige ĉar ne fonetike, sed ofte ne (ekz. "bikie" pron. "bajki", sed "bindi"?). Tiel la animaloj ricevas ĝenerale esperantan tradukon, kompreneble, sed kelkaj ne (Balmain bug, grey nurse, ktp.). Tiel preskaŭ ĉiuj plantoj rice-

vas siajn botanikajn nomojn, sed kelkaj ne. Tiel sur kelkaj paĝoj la animalspeco estas "marsupialo", sur aliaj "marsupiulo". Tiel, ĉe uzo en vortgrupoj, iuj nomoj Esperantiĝis (adelia pingveno), aliaj ne (pino Huon). Tiel ankaŭ la anarĥio en la uzado de geografiaj nomoj.

Manko de filologia sento rilate Esperanton montriĝas en monstraj neologismoj kiaj vumero, karrio, vilĉjo svingvostulo, bovara teamo, muskuloza, franĝipano, jarro, vakero, parkejo, haroza, bumerango, dum la plej multaj neologismoj, speciale tiuj faritaj el la latinaj (kaj grekaj) nomoj de bestoj kaj plantoj, estas tre kontentigaj, ekz. makajro", "hamburgro," "dampro", "kazuareno" (ĉu "kazuaro" ne devus esti "kazuario", laŭ la latina?).

La Enkonduko mencias ke ĉe la fino troviĝas listo de 122 en PIV netroveblaj neologismoj "sugestitaj" (ĉu anglalingvanoj uzadas "sugesti" anstataŭ "proponi" ĉar ĉilasta en ilia lingvo ofte uzatas por "proponi edziĝon"?) Ĝi forgesas mencii kiom da ne-PIV-neologismoj situas en la verkaĵo. Mi povis trovi nur tri neologismojn ne troviĝantajn en PIV nek en la listo (aŭsa, joĉjo, bilipoto).

Enestas multeta kvanto da nenecesaj neologismoj ("loza", "lukri", ktp.). Kaj ĉu necesas havi apartajn vortojn por indiĝenoj en diversaj mondpartoj? Kial do "aborigeno"? Alia demando: Ĉu la aŭtoro(j) deziras ke la 125 aŭstraliaj neologismoj estu presitaj en nova PIV? Por alproksimiĝi al la kvin kilogramoj?*

Pri la geografiaj proponoj: Ili estas aŭ neologismoj aŭ kunmetaĵoj. Se neologismoj: la formoj povas <u>simili</u> kunmetaĵojn, sed esence ne estas. Ili estas memstaraj vortoj, kies partoj povas aŭ ne nur <u>simili</u> al aliaj Esperantaj voroj. Ekz. "Bonaero" (=Buenos Aires) similas al kunmetaĵo de "bona" kaj "aero", <u>sed ne estas</u>: ĝi troviĝas sub la bo en vortaro, ĉar ĝi estas sendependa reprezentanto (vorto) por nedividebla nocio pri memstara kaj memrajta afero (=tiu speciala urbo). Ĝia neologisma valoro estas sama al iu alia propono por tiu urbo: "Buenosajreso" aŭ "Ajro" aŭ "Freŝulino" aŭ "Babligumo" aŭ "Bunasaro". Se kunmetaĵoj, ili povas havi du malsamajn signifonuancojn, depende de la karaktero de la determinanto: ĝi povas esti aldona aŭ esti distinga; "la bona patro" povas signifi ke tiu patro krom esti patro ankaŭ estas bona (=aldono) aŭ ke tiu patro distingiĝas de alia(j) patro(j) pro boneco; eĉ en Es-

*Ioma troigo. La aktuala PIV pezas nur tri kilogramojn! - la red.

peranto oni ne kapablas esprimi la diferencon per nur la vorto ("bona") mem. Do Suda Aŭstralio estas aŭ Aŭstralio kiu krome estas en la suda hemisfero (aldono), kiel "la Tropika Indonezio", aŭ ĝi estas distingo disde alia Aŭstralio. En tiu ĉi lasta kazo ree estas du signifoj eblaj: aŭ la determinato signifas "Tiu parto de la tuto distingita disde la aliaj partoj" aŭ ĝi signifas "Tiu tuto distingita disde aliaj tutoj". Tiel Suda Aŭstralio (Sudaŭstralio) estas la suda parto (=Albany, Saŭstralio, Viktorio kaj Tasmanio) de Aŭstralio (la ĝusta sed malmulte uzata formo devus esti "Aŭstralisudo"), dum Suda Kimrio (Sudkimrio) estas tiu Kimrio (el la du) kiu situas sude de la alia, en la suda hemisfero.

Nu, la vortaristoj (kaj la lingvistoj kaj la verkistoj) devus obei tiujn regulojn farante geografiajn nomojn, sed la plejmulto (ĉu la tuto?) ne obeas ilin ĉiam. Pro tio la mallogikaj formoj kiaj "Sudaŭstralio" kaj "Novgvineo"; se tiuj estas kunmetaĵoj, ili estas malĝustaj; se neologismoj, ili estas memstaraj nedivideblaj vortoj anstataŭ kiuj, pro miskomprenebleco, oni samrajte (kaj eble pli precize kaj distinge) povus uzi ekz. "Saŭstralio" kaj "Niugino"* (aŭ "Papuniugino"). Evidentas ke S-roj Harry kaj Gueltling sekvis la malfideble senordan metodon uzatan de la aliaj proponantaj lingvistoj. Ekzemple nedivideblaj vortoj en Esperanto ne povas havi streketon en si: Kvinslando ne estas kunmetaĵo de kvinso kaj lando. Tamen ni legas malĝustajn "Okcident-Aŭstralio" "Nord-Teritorio", "Sud-Kimrio" kaj "Sud-Aŭstralio" (same ĉefliteroj ne povas aperi en la interno de vortoj!). Unu nedivideblа nocio havas en Esperanto nur unu nedivideblan vorton aŭ unu kunmetaĵon; do ne estas streketo nek malligo nek ĉeflitero; tamen ni legas "Nova Sud-Kimrio" kiu ne povas ne esti "Novsudkimrio" aŭ alia senstreketa, senĉeflitera kaj senmalliga vorto. Nomoj ĝenerale ne antaŭatas de "la", do oni ne diras "La Murray", nek "La Vojkruciĝo". Nomoj ĝenerale ne estas en la pluralo, do la aŭtoroj ĝuste uzis "Montaro" anstataŭ "Montoj" por "The Blue Mountains", kvankam ili malĝuste uzis "La" kaj malligon inter "Blu" kaj "montaro". Kreante Esperantan por nacilingva nomo, oni aŭ similigas ĝin laŭ sono aŭ laŭ aspekto (literumo); "Perth" ne imiteblas laŭ sono, ĉar nek "s" nek "t", nek "d", nek "z" sufiĉe similas al la angla sono "th". Do laŭ la aspekto ĝi devus esti "Pertho" (bone prononcebla), sed la aŭtoroj pekis.

Pri la plant- kaj bestvortoj: Estas tri skoloj kiel formi ilin. Oni povas uzi nur la jam internacie akceptitan latin- kaj grek-bazitan

*Efektive, eĉ angle tiel skribas la nomon de sia lando la loĝantoj.-Red

nomenklaturon. La avantaĝo estas ke ekzistas dekoj da miloj da tiaj, kaj ke estas praktike neeble krei tiom da vortoj en ĉiu lingvo. La malavantaĝo estas ke sciencistoj de aliaj fakoj rajte postulus en Esperanto specialajn nomenklaturojn por siaj fakoj, ekz. la angla por aviado, la franca por la poŝto, la itala por muziko, la greka por kristana teologio, la angla por sporto, la franca por fromaĝoj kaj modo, la germana por filozofio, ktp, ktp, ktp. En la alia ekstremo estas tiuj kiuj deziras havi Esperantajn vortojn por ĉiuj. Tio inkluzivas ord-, famili-, genr- kaj specvortojn. Por esti konformemaj ili devus postuli tion ankaŭ por la geografiaj nomoj.

Nu, kompreneble ambaŭ ekstremoj ne sekveblas, pro la grandaj nombroj implikitaj kaj pro la fakto ke certaj, kvankam tre malmultaj, plantoj kaj bestoj estas tiom konataj (kaj uzataj) ke ankaŭ naciaj lingvoj havas specialajn vortojn por ili. La ĝenerale akceptata ideo estas, ke estu miksaĵo en Esperanto, same kiel en aliaj lingvoj. Sed kiom foren el la nuna situacio al la dua ekstremo? Ĉu Esperantigi ĉiujn plant- kaj bestvortojn kiuj nacilingve uzatas eble en limigita areo? Ĉi tiu vortaro certe tendencas al tiu ekstremo, kreante novajn vortojn por aferoj kiujn neniu nefakula eksterlandano konas, aŭ konas sub la aŭstralia nomo, kiaj lamingtono, paŭŝalo, bojango, pomatomo, skvati, pavlovo, dasiuro, bubialo, moloko, vonga, vompua, falanĝero, ekio, boŝo, gengenga, drongo, ktp., speciale ĉar aŭstralianoj mem konas, anglalingve, nur malgrandan parton de la neologismoj proponitaj. Cetere parto da ili estas latinaj vortoj (ĝenerale ĝuste) al Esperanto adaptitaj, kiujn lerni (kaj ĉiu devus!) estas same malfacile. Alia malfortaĵo (por internacia uzo) laŭ mi estas la laŭvortaj tradukaĵoj kiuj povas signifi ankaŭ homojn (ekz. birdo "plains wanderer" = "stepvagulo").

Estas normale kaj dezirinde ke ĉiu Esperantisto lernu la lingvon tiele ke ŝi/li konu parkere ĉiujn Esperantajn vortojn ĉiutagajn. Tiaj estas preskaŭ ĉiuj vortoj kaj vortkombinoj en la nun priskribata vortaro. La kompilinto(j) sendube konsciis pri tio farante la laboron.

En tiu rilato aperas multaj problemetoj, el kiuj mi mencias kelkajn: 1) Kiam ni lernis ke la aŭstralia "cabbage tree" tradukiĝas "brasikarbo", ni poste devos lerni ke la vorto "brasikarbo" reprezentas plurajn aliajn plantojn, laŭ la diversaj specoj kiujn oni tiel indikas en aliaj mondpartoj. Same pri multaj aliaj en la verko menciitaj, ekz. la "silka kverko" (devus esti "silkeckverko": la du ne samas!). Same pri "narango", ĉar sendube ekz. en Sudameriko troviĝas tiaj kun alia, ver-

WINDOW ON THE WORLD

TRANSLATION BY COMPUTER

In July 1990, Tramond KB in Sweden put its first semi-automatic computer translation program on the market. It translates from Swedish into Esperanto. A Swedish speaker must type in the Swedish text, in order to tell the computer which of various possibilities it should choose when the Swedish text is ambiguous. No adjustment of the resulting Esperanto translation is needed. A companion Esperanto to Swedish program was released in October. Corresponding programs for German & Esperanto and Spanish & Esperanto translation are planned for 1991. The programs will also allow two-step translations, e.g. Swedish to German. (The two steps being Swedish to Esperanto, then Esperanto to German.)

AUDIBLE JOURNAL

Esperanta Songazeto is a relatively new quarterly 60-minute tape cassette journal featuring spoken and musical items. The eighth issue, due out this spring (northern autumn) features the rock ensemble "Persone", language discussions, oratory, reviews, cabaret items, and an exclusive world premiere ("Berlino" by Jan Skorupski).

RADIO ESPERANTO

A table giving statistics of radio broadcasts in Esperanto in 1990 indicates that there were 5329 broadcasts totalling 2072 hours broadcast in thirteen countries. Of these broadcasts, 5225, totalling 2002 hours were on short wave. Unfortunately only a small proportion were audible in Australia. The total number of broadcasts and hours was slightly down on 1989 (5462 broadcasts, 2138 hours). Broadcasts were from Vienna Austria, Beijing China, Havana Cuba, Budapest Hungary, Rome Italy, Warsaw Poland, Bern Switzerland, Tallin and Vilnius USSR, The Vatican, and Zagreb Yugoslavia, plus regional broadcasts from Rio de Janeiro and Sorocaba Brazil. Major broadcasters were China (730 hours), Poland (871 hours) and Switzerland (164 hours), which accounted for 85% of the total number of short wave Esperanto broadcast hours.

Purely local, bi-lingual broadcasts are not included in the statistics above. For example, Radio 3ZZZ FM in Melbourne broadcast 77 programs in English & Esperanto totalling 54 hours during the same period.

UNIVERSAL ESPERANTO TIME

Well, nearly. The Qingdao Watch Factory of China has begun sale of an ultra-modernistic four tiered pyramid shaped clock featuring the Esperanto green star and inscription in Esperanto. On the more conventional side, it also sells a line of men's and women's wrist watches with metal bands. Their face boasts an elegant drawing of the globe and the Esperanto star. The clock is priced at US$10, the watches at US$15 each. Orders may be sent by international bank transfer to Account no. 008430011 of the Qingdao Watch Factory, at the Bank of China Huanghai Branch, Qingdao, China. Or send an international cheque in US dollars to the Qingdao Watch Factory no. 89, Ningxia Lu, Qingdao, China. Note that payment must be in US dollars. When sending payment by either method, be sure to send a copy of your payment to the Ĉina Esperanto Ligo, PO Box 825, CN-100037, Beijing, China.

CHINA

1990 marked the 40th year of publication of the monthly magazine El Popola Ĉinio. To commemorate the event a TV film "Verda Stelo - Ligilo de Amikeco" ("Green Star - Tie of Friendship") was telecast on Beijing television July 11, 1990. EPĈ is one of the first foreign language journals published in modern China. Over its forty year history it has reached 142 countries and regions. It receives about two thousand letters a year from readers in seventy countries. A celebration tea was held on May 24, attended by 370 persons, including many prominent Chinese officials - among them the President of the Chinese Academy of Social Sciences and the Deputy Minister of the Ministry of Culture. Also participating were a delegation of Japanese and Korean Esperantists, and of French Esperantists.

TAIWAN AND RUMANIA

An Esperanto Association has been established in Taiwan, which somehow has been overlooked by Esperanto for the past hundred years. An Esperanto course was offered at the Baha'i Centre in Taipei, and on June 17 the Taiwan Esperanto Association was founded with 22 members.

In Rumania, where Esperanto courses were officially forbidden in 1985, permission has been given for Esperanto courses in universities and institutions of higher education. The Rumanian Esperanto Association was re-established in January of last year.

INDEX TO THE ENGLISH SUPPLEMENTS 1989-1990

253 = January-February 1989
254 = March-April 1989
255 = May-June 1989
256 = July-August 1989
257 = September-October 1989
258 = November-December 1989
259 = January-February 1990
260 = March-April 1990
261 = May-June 1990
262 = July-August 1990
263 = September-October 1990
264 = November-December 1990

The page number follows the issue number. E.g. 253/1 means English Supplement, January-February 1989, p.1.

AEA Esperanto Congress in Melbourne Jan. 1990 254/1, 257/2, 258/1, 260/1
Africa 254/3, 258/2, 264/4
Anatomical Dictionary 264/3
Australian-Esperanto Dictionary 264/3
Book marks 259/1
Bulgaria 257/2
Chess champions 254/4
China 254/3, 256/4, 257/3, 258/2, 264/2
Computer courses for teaching Esperanto, in Hungary 285/2
In Australia (for Apple Macintosh) 256/2
Cuba 260/2, 263/2
Ecology 259/4
Education: Attitudes of Australian Student Teachers Towards Learning Esperanto, research thesis by Dianne Lukes 261/1-4
Educational video films 254/4
Educational experiment in first grade, in Hungary 258/4
Einihovici Award 253/3, 256/3, 257/1, 263/3
Esperanto Culture House, Gresillon, France 254/2
Faxed reprint of 1889 first Esperanto magazine 256/3
Harry, Ralph (honorary LLD from University of Tasmania) 262/1
International Esperanto Museum in Vienna 255/4
International Literacy Year, a plan for the UN 253/4
International Literacy discussion in Melbourne 260/3
Japan 260/1
Krishna movement 285/2
"Moscow News" in Esperanto 257/3
Musical video tape (a stroll through Paris) 258/4
Nigeria 256/1

Pakistan, Esperanto in 256/4
Philosophy journal in Esperanto 256/2
Photo exhibition in the Ukraine 253/2
Prizes and scholarships 256/3, 257/1, 263/3
Radio broadcasts in Esperanto in 1988 254/4
in 1989 259/3
Rock music 285/4, 263/4
Scott, Les (Rotary Club Paul Harris Fellowship) 263/1
Spain, high school courses using Esperanto 264/1
Summer Esperanto Workshop, San Francisco State University 255/1, 259/1
Summer School in Adelaide 253/1, 261/3
Sydney, permanent Esperanto exhibition in 257/4
United Nations Association (WA) seminar 258/3
Universal Esperanto Congress in Brighton 258/4
In Cuba 263/2
In Norway 264/4
USSR 255/3, 255/4, 259/4
Youth Group, Australian Esperanto 260/4
Youth Travelling Fund: see Einihovici Award

o-o-o

15th & 16th INTERNATIONAL ESPERANTO WEEKS IN FRANCE

The first to be held August 24-31, in a village in the French Alps, 30 km south-east of Geneva. The second to be held September 7-14 in Sete (30 km west of Montpellier) in a park by the sea. Esperanto courses will be held at three levels: beginners, intermediate, and advanced. For details write: Esperanto, 8 rue du Docteur Roux, 34000 Montpellier, France.

HELP FOR AFRICAN STUDENTS

"We have 340 correspondence students in various parts of Africa. We could easily increase the number if finances permitted. We are collecting postage stamps (new or used) to sell to help raise money. You can help by sending stamps." Remember that Australian stamps are an exotic collector's item in Europe and Africa! Address to which stamps should be sent: Esperanto-Kurso, BP 7073, F-34080 Montpellier, France.

A painless way to help. Try it.

ŝajne hispana, speciala vorto. Same pri "katfiŝo". Aŭ ĉu estas nur ni kiuj uzas tiajn poeziajn sed konfuzajn nomojn kaj pro tio rajtas en Esperanto uzi ilin?

2) Se ni lernis ke "bickie" = "biskviĉjo" (mi, viro, preferus biskvinjojn), ni devos lerni ke "potty" = "poĉjo" aŭ "ponjo", ke "footy" = "pilĉjo" aŭ "pilnjo", ke "urĉji" kaj "urnji" = "to do pee-pee", kaj ke "sickie" = "malsaĉjo" aŭ "malsanjo". La propono estas interesa, sed tute neologisma uzo de tiuj sufiksoj. Kaj la uzo de "Aŭsĉjo" povus kaŭzi militon inter AŭStralio kaj AŭStrio. Cetere la uzo de Aŭsĉjo povus esti agrabla ridindaĵo, sed se ĝi aperas serioza en vortaro, la kara sed ŝafa Esperantistaro baldaŭ uzados ĝin, same kiel ĝi nun uzadas stultaĵojn kiaj "krokodili" kaj "far".

3) Se ni lernis ke "mudskipper" (ne la homo sed la besto) = "kotsaltanto" ("AŭStralia fiŝo" multe pli ofta en Malajzio ktp.), mi tradukus "Balmain Bug" = "Belmejncimo", sed la vortaro ne donas tiun tradukon.

4) Se ni lernis ke "bushfire" = "arbarfajro" (mi uzus almenaŭ "arbarfajrego", sed prefere "arbarbrulego"), "brulanta arbaro", mi uzos por "brulanta tendaro" "tendarfajro", sed la vortaro uzas ĉi tiun lastan esprimon por "campfire" (devus esti "tendumfajro").

5) Lerninte ke "akvopesto" etas ne akvo, sed pesto de la akvo aŭ por la akvo, mi komprenas pro la vortaro ("plantpesto") ke "lantana" estas ne planto sed pesto de aŭ por planto (cetere interesus scii ke lantano originas el la ameriktropikejo).

6) Lerninte ke en kara AŭStralio, en "AŭSo", loĝas karaj "Aŭsĉjoj", mi komprenas ke en Uso loĝas UsĉjoJ ("Yankees"), ke en Iso loĝas IsĉjoJ (islandanoj), ke en Eso loĝas EsĉjoJ (estonianoj), ke en Oso loĝas OsĉjoJ (oslanoj) kaj ke en Aso ("Asio"?) loĝas ŝatataj asturianoj, "AsĉjoJ". Mi nun eĉ uzas en la franca, por Aussi, "Aussien(ne)" kaj en la germana "Auschen" kaj "Auslein".

7) Se "outback" = "forejo", ankaŭ Brisbano estas "outback", ĉar ĝi estas forejo por mi kiu loĝas fore en Melburno (uzatu almenaŭ "forejo enlanden").

8) Se "down under" estas "en la suda hemisfero", loĝus tie multege

da homoj (ja preskaŭ ĉiuj sudamerikanoj, i.a.).

Malmultegas la preseraroj, kaj ni devas gratuli pri tio. Aliflanke enpenetris kelkaj idiotaĵoj: "kristnaskarbo" por (ho, ne la pino, sed) la arbusto "Nuytsia floribunda"; "elofono" por "lagerphone" (abstinuloj eble ne rekonis la elon en tiu nedividebla neologismo!); "gumulo" por (ho, ne la homo, sed) eŭkalipto.

Verko kia ĉi tiu kompreneble ne povas ne enhavi kelkajn misinformojn aŭ erarojn. Krom ĉisupre menciitaj neĝustaĵoj pro mistraduko mi mencias la jenajn: "singlet" ne estas toĉemizo. "Silky Oak" ne estas arbusto sed alta arbo. "Masonite" ne estas "plato el segita ligno" sed el mueliita ligno. Ĉe "scone": "schoon" en ĉi tiu esprimo ne havas sian normalan signifon (=pura, ne "delikata") sed tiun de "senŝeligita". Ĉe "bush" (=malurbo): oni ne povas krei "boŝo" per "boŝmano", ĉar la lasta vorto estas nedividebla, ne signifas "mano de boŝo", kaj cetere elvenis el la nederlanda lingvo ("bosjesman") dum la nederlanda "bosch" (nun "bos") neniam havis la signifon menciitan; parte ĝin havis la afrikansa "bos" (ne "bosch"!). Ŝajnas almenaŭ subjektive, nomi la en pacifikinsularo kaj en sudorientazio tiom faman kaj origine meksikan "plumeria mexicana" (ĝi eĉ ne estas arbo, nur arbusto) "aŭstralia arbo", dum la arbo "Hymenosporum flavum", "Native (=Australian) Frangipanni", mankas en la vortaro.

Sendube preseraro bestama estas la "katoradia tubo" (por TV). Certe estas ke la vortaron faris ne virinoj sed viroj, ĉar ambaŭseksaj "joey's" estas "joĉjoj", ne "jonjoj", ĉar "kavalirino" mankas, ĉar "mozzy" estas "mosĉjo" dum laŭ la sciencistoj nur la "monjoj" pikas onin, kaj ĉar "Aussi" estas ĉie burleske tradukita kiel "aŭsĉjo" dum ni konas multajn "aŭsnjojn". Ĉu pro la sama virgravigemo la kompatinda "grey nurse" ne ricevis, kontraŭe al la aliaj bestoj, la nomon "griza flegistino"?

Konklude, ĉi tiu vortaro, kiu estas duoble pli granda ol la dua eldono kaj havas bildojn, estas kuraĝa entrepreno postulinta multan serĉlaboron, utila pro siaj tre multaj tradukoj bonaj kaj bonegaj (ekz. lavaŭtomato = laundromat, terebenigilo = grader, glitotrabo = slip-rail, vagpako, Nosoko, trompanstataŭanto), kaj tre interesa en sia enciklopedia parto. Mi povas varme rekomendi ĝin al ĉiuj, por utila uzo, por kritikema studo, por ploro, por rido, kaj por kuraĝigi kompletigontojn.

LA BIBLIOTEKO DE AEA

Ralph Harry deziras informi, ke li aranĝis kun la bibliotekisto de la Aŭstralia Instituto por Internaciaj Aferoj prizorgon de la libroj kaj binditaj kolektoj de gazetoj. Ŝi konsultos kun la sekretario de la Kanbera Esperanto-Klubo kaj kun Petro Hai, esperantisto en Kanbero kiu estas profesia bibliotekisto.

Ralph mem prizorgas en Bayview la sekvantajn gazetojn, kiujn li abonis (kelkajn dumvive): Esperanto, Heroldo, Kontakto, Monato, Fonto, Literatura Foiro, Kontakto, Scienca Revuo, kaj Lingvaj Problemoj. Li bindigos la jarajn kompletojn kaj sendos al Kanbero.

Li petas al la redakcioj de esperantaj gazetoj en Aŭstralio sendi siajn eldonaĵojn al li ĉe la sekvanta adreso: D-ro Ralph Harry, Unit 319 Bayview Village, 36-42 Cabbage Tree Road, Bayview NSW 2104. Li sendos la jarajn kompletojn al Kanbero por enmeto en la rilatajn skatolojn. Ralph ankaŭ prizorgos la komunan katalogon de esperantaj bibliotekoj en Aŭstralio.

o-o-o

VIA REDAKTORO ELKORE REKOMENDAS

Aperis la unua numero de nova gazeto Enigmo - Revuo pri spritaj ludoj en Esperanto. 28paĝa, tre zorge kaj bele presita, en ĝi estas krucvortenigmoj multspecaj, ŝakproblemoj solvendaj, anagramoj, kriptaĵoj, kaj specoj de enigmoj kiajn vi neniam imagis! Pri la celo de la gazeto, jen (parto de tio,) kion ĝi diras pri si:

> Estas sufiĉe malfacile trovi ĝustan vorton por respondi la demandon: kial tia revuo? Eble, ĉar...
> ...Ĉar ni volas kunporti en viajn hejmojn la eblecon praktiki ĉiumomente Esperanton...
> ...Ĉar ni volus ankoraŭ unufoje montri al aliuloj kaj al ni mem kiel nature Esperanto povas interne fleksii, kiel facile ĝi povas krei "la ludan movon"...
> ...Ĉar la luda movo de la lingvo ne estas periferia aŭ pli malmulte grava por ĝi: fari spritajn ludojn devas deflui el lingvo, el ĝiaj nekonataj esprimaj fortoj kaj fontoj...
> ...Ĉar ludi kun la lingvo signifas ĝin uzi en ĝiaj plej profundaj ecoj...Temas do pri internaj kapabloj, tute ne pri la traduka ... Abonprezo $A26 ($32 se vi volas aersendon). Mendu de la AEA Liboservo, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

ĈU VI FARAS TIUJN ĈI SEMANTIKAJN ERAROJN EN ESPERANTO?

de **Bernard Golden**

Elementaj lernolibroj de Esperanto, precipe tiu speco kun la magia nombro de dek lecionoj, tradicie okupiĝas pri instruado de la fonetiko kaj gramatiko de Esperanto kaj lasas flanke demandojn pri semantiko kaj stilo. Ĉar la plejmulto da esperantistoj ne daŭrigas sian studadon de la lingvo per lerniloj por progresantoj - se tiaj verkoj ekzistas - kaj ĉar ne ĉiuj vortaroj atentigas konsultantojn pri semantikaj problemoj en Esperanto, eraroj ofte karakterizas la parolan kaj skriban lingvon eĉ de multjaraj uzantoj de Esperanto. La plej gravaj kaŭzoj de malĝustaĵoj rilate la semantikon estas la ekzisto de paronimoj* kaj "falsaj amikoj" en Esperanto. La sekvaj kvin citaĵoj ilustros ambaŭ vorto-tipojn. Leginte ĉiun frazon, decidu, kiu vorto estas erare uzata kaj anstataŭigu ĝin per la ĝusta vorto.

1. "Junaj infanoj kapablas absorbi pli da vortoj kaj frazoj..."
2. "En la sudo de Peruo troviĝas sovaĝa kaj izolita montaro...tre riĉa je alpinecaj belegaj pezjaĝoj."
3. "La cifero 250 000 stadioj (greka mezuro de longeco) estas nur 20% tro larĝa de la vera."
4. "Apude troviĝas la lano-merkato, kie oni vendas ĉefe vestaĵojn de lano."
5. "La planedoj estas aliaj mondoj, iom similaj al la nia, kaj estis nature esplori ilin, miri kaj spekulacii ĉu ekzistas sur ili vivo."

Ĉu vi kontrolis viajn respondojn en vortaro? Vi eĉ ne bezonas Plena Ilustrita Vortaro; malgranda dudirekta etnolingva vortaro taŭgas por forigi ĉiujn dubojn.

1. Io absorb en la angla lingvo estas "falsa amiko", ĉar ĝi estas plursenca, dum "absorbi" en Esperanto havas n u r u n u el la signifoj de absorb. Por ĝustigi la frazon, substituu al "absorbi" la verbon "ensorbi", kies figura signifo laŭ PIV estas "enpreni en sian spiriton kaj asimili".
2. Anstataŭ "alpinecaj pezjaĝoj" oni diru "alpecaj". Ne estas iu ajn kialo uzi la silabon "in" en Esperanto. La nomo de la eŭropa montaro estas "Alpoj", do la adjektivo estas "alpa". Sekve, la sporta montgrimpado estas alpismo kaj la homo, kiu faras tion

*"Vorto preskaŭ samsona kiel alia, sed sence malsama"

estas alpisto. Vortoj kiel "alpinismo" kaj "alpinisto" en Esperanto spegulas influon de etnolingvaj vortoj, ekzemple la anglaj alpinism kaj alpinist kaj la francaj alpinisme kaj alpiniste.

3. Ankoraŭfoje "falsa amiko" inside embuskas kontraŭ anglalingvaj esperantistoj. En la citaĵo temas pri cifero, kiu ne estas 20% tro larĝa (angle wide, broad) sed 20% tro granda (angle great, big, large). En ĉiuj elementaj kursoj kaj lernolibroj estas necese marteladi la punkton, ke la esperanta vorto "larĝa" ne estas la ekvivalento de large en la angla.
4. Ankaŭ en la vendoplaco "falsaj amikoj" atendas por stumbligi nesingardajn esperantistojn. Market en la angla lingvo havas du signifojn: 1. Loko, kien homoj venas por vendi kaj aĉeti diverspecajn varojn; laŭ formo, grando kaj celo ekvivalentaj en Esperanto estas "bazaro", "halo", "vendejo", "vendoplaco", "foiro" kaj "kermeso". 2. En abstrakta senco, ekonomia institucio rilatanta al la aĉetkapablo de homoj kaj la stato de oferto kaj mendo ĉe la borso. "Merkato" en Esperanto havas nur la duan signifon. En la citita frazo la ĝusta vorto estas "vendoplaco".
5. Paronimaj estas "spekul(aci)i" kaj "spekulativi", ambaŭ traduk-eblaj pere speculate en la angla. La unua estas financa termino, dum la dua apartenas al la fako de la filozofio. En la citaĵo oni ne faras financajn operaciojn per aŭ sur planedoj sed hipoteze rezonas pri ilia naturo, tio estas, oni spekulativas.

La ĉi-supra analizo de kvin erarhavaj frazoj ebligas tiron de jena neevitebla konkludo: estas tre danĝere pensi en etnolingvo kaj skribi en Esperanto. Ĉu ankaŭ vi faras tion?

(Multaj aliaj ekzemploj estas doneblaj. Provu vian pensadon per la sekvantaj eraraj frazoj:

6. "Li parolas kun forta franca akcento".

7. "En la dua paragrafo de la paĝo vi misskribis la vorton 'pensi'."

8. "The Australian Esperantist venas en plastika koverto."

Cerbuminte pri 6, 7, kaj 8, legu la komentojn sur p27.

-La Red.) □

LA VERA FRATARO

Vortoj kaj muziko de **Harrison Hill**

TEKSTO DE "LA VERA FRATARO"

Ne ekzistas landlimoj por la vera frataro
La vasta frataro tra tuta la mond';
Nek monto nek valo, nek lando nek maro
Dividos nin longe de frata la rond'.

Ne bezonas armilojn tiu granda frataro,
La amo kaj vero sufiĉas por ĝi,
Per ĉia bonfaro sur monda kamparo
Ĝi venkos, estante fidela al si.

Vekiĝu, homaro! Vi estas frataro,
La suno briladas por tuta la rond';
Agadu vi frate, amante, amate,
La monda frataro por tuta la mond'.

Ho! Forto de l'mondo. Ho! Patro de l'rondo,
La rondo gefrata, la ama ĉenar';
Vastiĝu la rondo tra tuta la mondo,
Ĝis plene fratiĝos la tuta homar'.

La Brisbana Kantogrupo lernas du kantojn kiujn ĝi prezentos dum formala okazo en la venonta 28a aŭstralia kongreso. Ni esperas ke aliaj kantistoj kombiniĝos kun ni por impona ĥoro. Tial la muziko kaj teksto sur ĉi tiuj paĝoj.

Se kantistoj deziras lerni la kantojn sed ne havas pianiston, ili povas skribi aŭ telefoni al mi, kaj mi provizos kasedon de la kantoj.

Kay Andersen
19 Sherley Street
Moorooka Qld 4105
Telefono: (07) 848 4428

→

PAC-KANTO DE LA ESPERANTISTOJ

2. Ne plu batalos en koler'
La bonaj kaj malbonaj,
Ne plu ektremos nia ter'
De l'tondro de kanonoj.

3. Kaj kio estas nun al ni
La kunplektant-rubando?
Ĝin konas ĉiuj, estas ĝi
La kara Esperanto.

INDEKSO: THE AUSTRALIAN ESPERANTIST 1989-1990

Kodo:

253 = januaro 1989
254 = marto 1989
255 = majo 1989
256 = julio 1989
257 = septembro 1989
258 = novembro 1989
259 = januaro 1990
260 = marto 1990
261 = majo 1989
262 = julio 1990
263 = septembro 1990
264 = novembro 1989

Post la kodnumero sekvas la paĝnumero. Ekzemple: 256/5 = julio 1989 p5. Mallongaj notoj estas inkluditaj en la Indekso nur se ili temas pri io grava.

Afriko:
  Alvoko al (sin)helpa agado (Steele) 258/3-7
Akademio de Esperanto, oficialaj informoj:
  La Letero de l'Akademio 264/20
  Listo de normaj landnomoj 254/21-27
  Pri derivaĵoj de komun/a: komunumo, komunaĵo, komuno 264/11
  Rezolucio pri la participoj 257/3
  Rekomendoj pri propraj nomoj 257/4
Amikeca Reto (Wearing) 261/20, 263/26
Biblioteko de AEA 264/22-23
Birdobservejo Eyre: Esperanto-kurso 254/16-20
Citaĵkvizo 1 (Harry) 264/6
Ekumenismo, religia gazeto 262/26
Esperanto-domo en Perto (Payne) 262/23
Esperanto-ekzamenoj de AEA, sukcesintoj:
  David Brewer 255/3
  Stanley Bruton 255/3
  Marjorie Ellyard 255/3
  Dianne Lukes 255/3
  Nick Nicholas 264/3
  Dudley Parkinson 255/3
  Max Wearing 255/3
Esperanto-Federacio de Kvinslando (Ross) 262/25
Eurokka 258/24, 262/24
Fonduso Einihovici: 254/15-16, 260/25-26

Ĝeneralaj artikoloj:
Esperanto kaj kulturo (Harry) 256/5-14
Iom pri sovetia televido (Steele) 264/24-25
Kial Esperanto mortadas en Aŭstralio? (Currie) 262/4-7
Koincido kaj Maoso (Towsey) 263/3-4
Koincido pripensinda? (Hajlero) 262/13-17
Pripensoj pri la ebleco de internacia lingvo (Poulson) 261/6-8
Resumoj de proponitaj juraj principoj pri protektado de la medio (Harry) 257/8-11
Spertoj (1) (Broadribb) 264/15-20
Ŝvarcecaj Analoj de 1989 (Horo) 260/3-6
Harry, Ralph: nova adreso 264/23
Hotelo Herzberg/Harz 262/21
JAGE (Nicholas) 260/8, 261/27, 262/25
Kiu diris tion? (citaĵkvizo 1) (Harry) 264/6
Komputiloj:
Ĉu mi posedas komputeron? (Gates) 264/26-27
De leganto (Mills) 257/19-20
Letero de Marcelo Leereveld 255/17-21
Medicin-programoj por komputiloj (Prjaŝin) 262/26
Por tiu, kiu ne komprenas komputilojn (Broadribb) 255/16-17
"Reviziita Laborplano" (recenzita de Mills) 261/11-12
Kongresoj, AEA:
en Melburno 1990:
Ankoraŭ junular-fonduso (Nicholas) 258/22
Invito al la 27a A.E.A. Kongreso en Melburno 254/3-4
La postkongresa ekskurso 257/24
Raporto: La kongreso en Melburno (Ross) 260/23-26
en Sidnejo, 1992:
Unua anonco 261/24
Unua listo de ĉeestontoj 264/22
Kongresoj: Pacifikaj
5a Pacifika Kongreso en Ĉinio (Songen) 261/26
Kongresoj, Universalaj:
Postkongresa ekskurso en Britio!! 253/21
75a Universala Kongreso en Havano (Einihovici) 263/7
Konkursoj: 253/20, 256/26, 257/16, 258/12, 259/25
Kribaĝo (Harry) 261/15-17, 262/27
Kvizoj kaj prilingvaj demandaroj:
Citaĵkvizo 1 (Harry) 264/6
Provu vian vortoscion (Broadribb) ĉiunumere 253-263

Leah, Bill: Verkoj de 261/27 (vidu ankaŭ Nekrologoj)
Lernejoj:
Esperanta ekspozicio por anoj de kongreso de privataj lernejoj (Wearing & Brewer) 263/25
Esperanto en Perto 262/24
Someraj gimnazi-nivelaj kursoj per Esperanto en Hispanio 264/25
Lingvaj diskutoj:
Krei novajn vortojn (laŭfundamentajn) (Leereveld) (1) 258/14-19; (2) 261/21-24; (3) 263/21-23
La vorto boŝmano (Golden) 259/7-9
Pli da faktoj pri la Aŭstraloj kaj aliaj pseŭdogentoj (Golden) 261/18-20
Prepozicio aŭ akuzativo? 253/11-12
Rimanta slango (Harry) 259/3
Skvizo (Harry) 258/23-24
Monda Merkato (gazeto) 262/21
Muziko (gazeto) 263/20
Nekrologoj:
Thea van den Boogaard (Felby) 254/4-5; (Wearing) 264/13-14
Audrey Childs-Mee (Ross) 263/24
Arthur James Cocking (Robertson) 259/4
Noel Frederick Gamble (Harry) 258/20-21
Millicent Harry (Harry) 264/3
Bill Leah (Robertson) 260/7
Tibor Sekelj 255/13
Odlo Bokserp:
Dudekmonata jarraporto 262/87
Niaj kunlaborantoj (1): Odlo Bokserp 253/23
Rubriko 262/24, 263/26
Partio Radikala (Leereveld) 257/27
Pasporta servo (Wearing) 258/26-27
Poemoj:
Alarmo (Nicholas) 255/8
Al giganto: omaĝe al Gustav Mahler (Nicholas) 264/4-5
Ek de l' buŝo (Nicholas) 255/8
Foliume de astronomia maparo (Nicholas) 261/13-14
Greka balo, kiel fenomeno metafizika (Nicholas) 257/6-7
Kien ni iras (Angelova) 261/17
Kiu klare aludas (Nicholas) 256/3-4
Plendokanto al Folio Blanka (Nicholas) 255/10
Radio 3ZZZ en Melburno: 256/26, 257/21, 258/21, 261/8, 262/23

Rakontoj:
Gurukmun, la rano (folkloro, tr. Poulson) 256/17-20
Kaj la Miserere. Lasta graco. (Broadribb) 263/8-17
La bananoj putris (Broadribb) 259/15-24
La bofilo (folkloro, tr. Golden) 262/8-10
La koro de poeto (Nedelĉeva) 257/5
La sciuro (Nedelĉeva) 258/8-9
La turisto (Steele) 255/24-26
La unua sunleviĝo (folkloro, tr. Poulson) 255/23-24
Patrino (Nedelĉeva) 261/3-5
Recenzoj:
Akademiaj Studoj 1988-1990 (red. Eicholz, rec. Broadribb) 263/18-19
An Introduction to the International Language Esperanto: a Hypercard Text for the Macintosh (Urban, rec. Nicholas) 256/23-24
Antikvaj Filozofoj de Ĉinio (Ĝjŭeljang, rec. Broadribb) 260/10-12
Aŭstralia Antologio (red. Towsey, rec. Poulson) 253/13-16
Bovino kaj teksistino (Ĝjiĉing, rec. Broadribb) 260/14
Bulgaraj poezilibroj (rec. Nicholas) 262/18-19, 263/20
Ĉina Antologio (red. Munying, rec. Broadribb) 264/8-9
Enkonduko al Problemsolva Originala KJ-Metodo (Jiro, rec. Broadribb) 259/26
Esperantaj Paroligaj Ludoj (Ellyard, rec. Chaldecott) 258/12-13
Esperanto * Learning and Using the International Language (Richardson, rec. Broadribb) 253/9-11
Europäische Hochsprache Oder Sprachimperalismus (Schulz, rec. Steele) 258/13-14 (erare ripetita en 260/18)
Infoduktoj (Brabandere + Mikolajczak, rec.Broadribb) 255/21-22
Itala Antologio (red. Azzi, rec. Harry) 255/4-7
Jubileo, Jarcento de Esperanto (red. Fettes, rec. Broadribb) 254/12-13
Kamelo Shjangzi (Ŝe, rec. Broadribb) 260/9-10
Kritiko pri la Vortaro de J. C. Wells (Golden) 256/21-22
5000 Jaroj de Ĉinio (Bajlong, rec. Broadribb) 257/14-16
Kuriozaj Floroj kaj Arboj (rec. N. Broadribb) 260/16
La Nov-Zelanda Esperantisto (rec. Broadribb) 260/19
Laŭdo de l' Stulteco (Erasmo, rec. Broadribb) 254/10-12
Mi Juna (Das Gupta, rec. Broadribb) 260/13-14
NePIVaj Vortoj (Cherpillod, rec. Towsey) 257/17-18
Patrina Koro (Nedelĉeva, rec. Broadribb) 254/9-10
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto: Suplemento (Waringhien, rec. Broadribb) 253/17-19

Sed nur Fragmento (Steele, rec. McGrath) 259/11-14
Ŝanco por Feliĉo (Bosmans, rec. Broadribb) 260/15
Vere aŭ Fantazie (Pirón, rec. Murphy) 260/20
Vivi Estas Danĝere (Nemere, rec. Harry) 264/7
Vojaĝoj Finiĝas, Amantoj Kuniĝas (Austin, rec. Harry) 260/16-17
Reklamoj pri Esperanto 263/27
Retrokomente:
Ĝenerala komento (Broadribb) 262/7
Pri la marta numero (Nicholas) 261/20
Reage al la artikolo de Brian Currie (Elliott) 263/27
Reago al artikoloj de Marcel Leereveld (Payne) 264/12
Robineau, Maryvonne kaj Bruno 261/25
Somerlernejo, ekskursoj (Felby) 264/10
Werden, Joachin (Ross + Kanački) 257/22-23

Bonvolu atenti ke oni povas akiri indekson de The Australian Esperantist 1986-1989 de Ralph Harry, Ĉe Unit 319 Bayview Garden Village, 36-42 Cabbage Tree Road, Bayview NSW 2104.

RESPONDOJ POR "SEMANTIKAJ ERAROJ"

6. akcento estas plifortigo de la prononco de silabo. Ekzemple, en Esperanto oni akcentas ĉiam la antaŭlastan silabon de ĉiu vorto. Por la signifo "influo de etna lingvo sur la prononco de Esperanto" la ĝusta vorto estas akĉento.

7. paragrafo estas "section of a legal document" aŭ "section in a textbook". Oni kutime uzas la signojn § kaj ¶ por indiki paragrafnumeron. Ekzemple: "§143 en Plena Analiza Gramatiko temas pri adverbaj suplementoj." Por la angla vorto "paragraph" la esperanta termino estas alineo.

8. plastiko estas termino de artistoj = reliefa bildo. La substanco el kiu oni fabrikas kovertojn, sakojn, horloĝojn, televidilojn kc estas plasto.

o-o-o

RESPONDOJ POR LA CITAĴKVIZO

1.f; 2.ĝ; 3.d; 4.e; 5.g; 6.b; 7.h; 8.a; 9.c; 10.ĉ

The Australian Esperantist

Numero 266 MARTO-APRILO 1991

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488



Klubraportoj bezonataj (D. Broadribb) ... p.3
Nekrologo: Harry Roydon Torr ... p.4
Provu vian vortoscion (D. Broadribb) ... p.5
USSR: ĉu ankoraŭ lando? (Trevor Steele) ... p.7
Kiu diris tion?: Citaĵkvizo 3 (Ralph Harry) ... p.9
Raporto pri Esperanto en Radio 3ZZZ (S. Kanački) ... p.11
Ĉu Zamenhof estis pola kuracisto? (B. Golden) ... p.13
Aŭstralia-Esperanta Vortaro: Respondo (Ralph Harry) p.15
English Supplement

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

Oficiala organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. Telefono: (09) 574 1307. Fax: (09) 574 1298.

Prov. Prezidanto: Justice K. Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Vicprezidanto: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne Vic 3001.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley WA 6102.

Libro-Servo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

Prov. Prezidanto de la Ekzamen-Komitato: Donald Broadribb (adreso supre).

P.R.O. (Oficisto pri Rilatoj kun la Publiko): Dennis Murphy, 79 Binnalong Rd, Old Toongabbie NSW 2146

Membreco: $25 por individuo, klubo kc.; $30 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso); $15 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto aŭ al la Libro-Servo.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adresslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian adreson aŭ/kaj nomon.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Limdato por alsendo de presotaĵoj por la venonta numero: 1 majo.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST "ni vere bezonas artikolon pri... "? Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercbildon. Ni ĉiuj volos legi ĝin! Preparante la tekston, bonvolu atenti la ĉi-sekvajn postulojn: la teksto devas esti klare tajpita, per nova rubando kaj kun duobla spaco inter la linioj kaj marĝenoj de almenaŭ du centimetroj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netajpitaj tekstoj estos malakceptitaj. Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone ĝi povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa.

KLUBRAPORTOJ BEZONATAJ

Ni volonte regule inkludus rubrikon de klubraportoj en TAE. Ĉu povas esti ke nia postulo ke oni tajpu ĉiun kontribuaĵon por TAE fortimigas "raportuntojn"? (Tiun postulon kaŭzis sperto ke neeviteble multaj permane skribitaj nomoj kaj vortoj estas nedeĉifreblaj, parte ĉar multaj skribantoj ne scias kiel neklare legebla estas ilia skribmaniero.)

Sed pli granda problemo estas kronologia: plejofte kiam oni sendas al ni klubraportojn ili trafas nin post la finpretigo de TAE, tiel ke ili estus jam almenaŭ du monatojn malaktualaj se ni inkludus ilin en la posta numero. Tia malaktualeco ofte senvalorigas informon, ekzemple ke iu vizitanto aŭ eminentulo ĉeestos tie aŭ aliloke, kaj la informo aperus nur post la foriro de la koncerna persono. Estas klare ke ofte tia okazo estas neevitebla - ofte oni ne scias pri la alveno de notindulo ĝis tuj antaŭ ties ekapero. Sed malofte oni sendas al ni raportojn pri la naturo kaj rezulto de la estinta vizito. Rilate al la tempoproblemo, bonvolu zorge atenti ke la limdato anoncata en TAE ĉiunumere estas tre rigore observenda, ĉar je tiu tago ni liveras la pretajn foliojn por profesia presigo, tiel ke eĉ unu tagon post la limdato ne eblas ion pli inkludi.

La solvo estas simpla: ke ĉiu grupo nomu iun sian membron raportisto por TAE, preta sendi al ni lokajn raportojn ĉiun duan monaton tiel ke la raporto(j) nin atingas tuj antaŭ la limdato. Do, ekz., oni enpoŝtigu raporton je la 26a de aprilo, por ke la teksto estu kiel eble plej aktuala, kaj ankaŭ atingu nin sufiĉatempe por eniri la majan numeron. - Oni kalkulu tri labortagojn por la tempo bezonata por ke raporto nin atingu, ĉar la redaktoro loĝas en la kamparo (ne en Perto) kaj leteroj regule bezonas ekstran tagon por atingi nin. La poŝto ne emas dum nelabortagoj prizorgi poŝtaĵojn por adresoj en la kamparo.

La tajp-postulo nepre devos resti. Sed ĉiu grupo inkludas membrojn kiuj scias tajpi (kaj multaj posedas komputilojn), tiel ke se la raportanto ne scias tajpi ŝ/li povas transdoni sian raporton al tajpipova membro por posta transsendo al ni.

Kompreneble, por aperigo ni selektos el la raportoj informojn kiuj ĝenerale interesos la legantaron. Kaj ne forgesu ke kelkaj raportoj estus aperigindaj en la anglalingva suplemento pro sia pli vasta graveco.

HARRY ROYDON TORR 1907-1990
nekrologo

Harry Roydon Torr naskiĝis la duan de decembro, 1907, en Summer Hill NSW kaj mortis 83jara, la 10an de decembro, 1990, en Gosford (Point Clare) NSW. Kiam deksesjara, li komencis lerni Esperanton kaj rapide fariĝis kapabla, bona parolanto, kaj dum pluraj jaroj li interpretadis por vizitantoj eleksterlandaj.

Harry estis aktiva esperantisto unue en Sidnejo kaj poste en Kanbero kie li estis fondanto de la Kanbera Esperanto-Klubo kun sia edzino Joyce kaj Ralph Harry en 1952. Inter 1953 kaj 1957 li estis prezidanto. Kun Joyce, kiu estis la sekretario, li organizis, instruis, kaj eldonis KEK KURIERO-n, kiu ankoraŭ respegulas la esperantan vivon en Kanbero. Kune ili organizis la 10an tutaŭstralian Esperanto-Kongreson en Kanbero en 1956, kaj la 15an en 1966.

En 1987 Harry kaj Joyce donacis al AEA oran medalionon kun portreto de D-ro Zamenhof. Ĝi fariĝis trofeo, aljuĝata ĉiun duan jaron al la instruisto kiu instruis la plej grandan nombron da novaj lernantoj en Aŭstralio. Ĝi daŭre rememorigos al ni afablan personon, gravan pioniron kaj sindoneman instruiston.

Ni kondolencas lian vidvinon, Joyce, kaj liajn filon kaj filinon.

(Kompilita laŭ informoj de
Joyce Torr kaj Ralph Harry.)

o-o-o

INTERNACIA KULTURA LABOREJO (IKL)
Adreso: I.P.O.B. 5458, Tokyo 100-31, Japanio

Por eksplutati la praktikan potencialon de Esperanto kiel gravan ponton de interhoma kaj interkultura kunfluado necesa en la 21a jarcento ni fondis la supran entreprenon registritan kiel jure komercan personon. Ni atendas viajn varmajn kaj aktualajn subtenon kaj kunlaboron.

Senjo Umeda, prezidanto; Yosimi Umeda, direktoro.

PROVU VIAN VORTOSCION

1. Ĉu prikli* estas
   (a) vundeti per akraj folioj, dornoj, kc.
   (b) konservi cepon en vinagro
   (c) transplanti junan planton

2. Ĉu manufakturo estas
   (a) objekto manfarita
   (b) speco de fabriko
   (c) oficiala, skriba deklaro pri ŝuldo

3. Ĉu sordida* estas
   (a) malpura
   (b) fiverkita
   (c) heredonta multan monon

4. Ĉu kuliso estas
   (a) per ĉevaloj tirata veturilo
   (b) dormvagono de trajno
   (c) ejo malantaŭ scenejo en teatro

5. Ĉu vic' al estas
   (a) anstataŭ
   (b) rigardante alian personon
   (c) tuj apud

6. Ĉu timida* signifas
   (a) malvarmeta
   (b) facile perdanta la kuraĝon
   (c) iomete malseka

7. Ĉu laŭreato signifas
   (a) honora krono el folioj
   (b) ricevinto de premio
   (c) speco de eŭropa arbo

8. Ĉu fola* estas
   (a) gaje frenezeta
   (b) stulta, malinteligenta
   (c) aganta kiel klaŭno

9. Ĉu parafo estas
   (a) aro da tekstlinioj sence kunligitaj
   (b) vaksosimila oleo
   (c) mallongigita subskribo

10. Ĉu trista* sifnifas
   (a) malgaja
   (b) nomo de itala urbo
   (c) mensoge promesanta

11. Ĉu paragrafo signifas
   (a) nova sekcio en instrulibro
   (b) kungrupigo de linioj esprimanta unu ĉefkoncepton
   (c) arkaika titolo de nobelo

12. Ĉu merdo* estas
   (a) proponita mallongigo de la vorto "merkredo"
   (b) fekaĵo (malĝentila insultvorto)
   (c) malfacila spirado

13. Ĉu ĉantaĝi* estas
   (a) postuli monon per minaco diskonigi ian skandalon
   (b) postuli grandegan interezon
   (ĉ) pilgrimi al Mekko

14. Ĉu revizii estas
   (a) esplorkontroli por trovi misojn
   (b) restudi lernaĵojn por ekzameno
   (c) fari bildon en la menso pri io vidita

15. Ĉu morbo* estas
   (a) malsano precipe suferata de infanoj
   (b) arkaika vorto signifanta "mikrobo"
   (c) iu ajn science difinita malsano

16. Ĉu gvati* estas
   (a) pretigi ebriigan drinkaĵon
   (b) kaŝe observi
   (c) trankviligi

kompilita de Donald Broadribb
*neoficiala vorto
respondoj sur p27

USSR: ĈU ANKORAŬ LANDO?

de **Trevor Steele**

Ĉu oni ankoraŭ povas paroli pri Sovetunio kiel "unuo", integra politik-kultura unuo? El mia vidpunkto en Ukrainio ŝajnas, ke la disiĝo en apartajn ŝtatojn estas jam fakta, eĉ se oficiale la moskva centro ne agnoskas tion.

Ĉiuj scias pri la situacio de la baltaj respublikoj. Kvankam la cirkonstancoj varias en la diversaj partoj, preskaŭ ĉie estas kampanjoj eksiĝi el SU. Ni iom pripensu la situacion en Ukrainio.

Surpapere Ukrainio estas tre granda teritorio kun 55 milionoj da enloĝantoj. Historie ĝi estis premata de poloj (okcidente) kaj azianoj (sude), sed ĉefe de rusoj (oriente kaj norde). La nunaj apartistoj atentigas pri longa periodo de carisma subpremado, kiu iĝis eĉ multe pli terura sub Stalin: en la brutala "kolektivigo" de bienoj en la fruaj 1930-aj jaroj mortis laŭtakse sep milionoj da ukrainoj. La ukraina lingvo, kiu ja tre parencas al la rusa, estis subpremata, precipe en edukinstitucioj, kaj ĉi tie, samkiel en la tuta SU, la reĝimo penis ekstermi ĉiujn religiajn kredojn. Ankoraŭ ekonomie la iam riĉa Ukrainio devas liveri al Moskvo multe pli, ol ĝi rekompence ricevas. Ukrainaj soldatoj devis kutime militservi en danĝeraj lokoj for de la hejmteritorio. La elektron el Ĉernobil kaj aliaj tiaj centraloj oni vendas eksterlanden, sed la tutan enspezon enkasigas ne Ukrainio, sed Moskvo ...

Tiaj argumentoj de la apartistoj povas etendiĝi senfine kaj certe prezentas fortan pledon por sendependiĝo. Logika ŝajnas al mi ankaŭ la ekologia argumento: nur la ukrainoj mem, kiuj amas la propran teron, kapablos kuraci la poluciatan medion, ne moskvaj burokratoj, kiuj pretendas prizorgi sesonon de la tergloba surfaco.

Ofte oni demandas min, ĉu mi subtenas ukrainian sendependecon. Nu, devus esti egale, ĉu oni vivas en grandega landunio aŭ aparta ŝtato, kondiĉe ke la homoj povu digne vivi harmonie kun la biosfero kaj aliaj homoj. Sed tia respondo ŝajnas al kelkaj nur evito de la demando. Do kion mi opinias?

Bedaŭrinde simpla jeso aŭ neo ne eblas. Ukrainio estas mem komplekso el multaj elementoj. Mi ĉeestis Esperanto-renkontiĝon en Ternopil (ruse

Ternopol) en la okcidenta parto. Tie oni forigis ruslingvajn strat§ildojn (kvankam preskaŭ certe ĉiuj konas la rusan), oni faligis monumentojn al Lenin kaj redonas antaŭrevoluciajn nomojn al stratoj, domoj ktp. kun bol§evikaj signifoj. Oni malhisis la ruĝan standardon super la Placo de la Oktobra Revolucio kaj anstataŭigis ĝin per la Ruña (Ruĥ ukraine = movado) or-blua flago nun flirtanta super la Placo de Ukrainia Sendependeco. En Ternopil, Lvov kaj onidire en la tuta okcidenta Ukrainio estas grandega plimulto, kiu jam vivas, kvazaŭ la eksiĝo el SU jam delonge estus okazinta.

Sed mi ripetfoje vizitis Ĥarkov, urbegon en orienta Ukrainio, tre proksime al Rusio. Tie la ukraina estas nur malplimulta lingvo pro la longa "rusiga" politiko kaj enmigrado de rusoj kaj homoj el aliaj respublikoj. En Ĥarkov la plimulto sentas sin rusoj kaj malaprobas la "ekstremistojn" de la okcidento.

En la sudo estas tiaj regionoj, kiaj Odessa kaj Krimeo, kiuj "iĝis" partoj de Ukrainio nur pro administraj decidoj el Moskvo. Se Ukrainio oficiale sendependiĝos, la sudo eksiĝos el Ukrainio. Alia iom granda homgrupo estas la judoj (ĉi tie oni diras hebreoj), kiuj suferis pro tiu antisemitismo ofte manifestiĝinta en ukrainiaj tradicioj. Ĉu la jam granda elmigrado al Israelo akceliĝos?

Ĉu eblus trovi kontentigajn dividliniojn inter tiuj, kiuj volus aparteni al sendependa Ukrainio, kaj la nedezirantoj? Mi timas, ke sango markus tian mapon. Kaj tamen SU §ajne neeviteble disfalas. Eble Kiev, ĉiurilate la mezo de Ukrainio, decidos ĝian sorton, kaj al mi §ajnas, ke la apartistoj gajnos.

En Ukrainio la pafiloj ankoraŭ silentas. En aliaj respublikoj estas jam centoj da kadavroj.

Kia solvo?

Armea puĉo eble restarigus provizore "leĝon kaj ordon". Konstante aŭdiĝas voĉoj postulantaj tian "solvon". ◻

.....

KION KONSILAS LA AKADEMIO DE ESPERANTO?

Abonu "La Letero de l'Akademio de Esperanto"! FRF120 (ĉ.A$32). Adreso: 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio.

KIU DIRIS TION?

(citaĵkvizo 3)

de **Ralph Harry**

Jen kelkaj eminentuloj, citaĵoj el kies verkoj, kaj vortoj, pri la temoj PACO kaj MILITO sekvas. Penu parigi la personon, aŭ fonton, kun la spritaĵo. La solvo aperas sur paĝo 27.

(a) Cicerono
(b) Miltono
(c) Ŝekspiro
(ĉ) Douglas Jerrold (1803-1857)
(d) Senatoro Hiram Johnson
(e) Karl von Clausewitz (1780-1831)
(f) Flavius Renatus Vegetius
(g) Maxim Litvinov (1876-1951)
(ĝ) William Cowper (1731-1800)
(h) Benjamin Franklin (1706-1790)

1. En paco estas nenio tiel taŭga por viro
   Kiel modesta trankvilec' kaj humileco
   Sed kiam bruego de milito al ni sonas
   Tiam imitu la agadon de la tigro ...

2. Tiu, kiu deziras pacon, preparu por la milito.

3. La paco havas siajn venkojn
   Ne malpli famajn ol la milito.

4. Ni amas la pacon, same kiel ni abomenas malkuraĝon,
   Sed ne paco je kia ajn prezo.

5. La paco estas nedividebla.

6. Ĉar la leĝoj silentas inter armiloj.

7. La unua viktimo, kiam venas milito, estas la vero,
   (kaj la unua rekruto estas Dio)

8. Neniam estis bona milito aŭ malbona paco.

9. La milito estas nur la daŭrigo de la politiko per aliaj metodoj.

10. Milito estas ludo, kiun, se regatoj saĝus,
    La reĝoj ne ludus.

INSTRUISTOJ

Ĉu vi scias ke ekzistas aparta fakgrupo kiu laboras por vi? Ĝi celas helpi instruistojn ĉie en la mondo aŭ instrui la Internacian Lingvon aŭ uzi ĝin por interŝanĝi profesiajn spertojn. Ĝiaj anoj ne devas instrui Esperanton - sed devas interesiĝi pri sia profesia laboro, instruante kiun ajn studobjekton, kaj deziri informi kaj informiĝi pri instruado ĝenerale kaj tutmonde.

Kontaktoj inter la anoj okazas pere de la Internacia Pedagogia Revuo kaj pere de naciaj kaj internaciaj seminarioj kaj ĉiujaraj konferencoj.

Ju pli da membroj, des pli da spertoj, des pli da valoro en tiaj kontaktoj kaj da influo internacia por nia profesio.

La venonta Jubilea 25a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazos en Voss, Norvegio, tuj post la U.K. Aliĝiloj, kaj pliaj informoj pri ILEI haveblas de Malcolm Jones, 41 Causeway, GB-CHIPPENHAM, Wiltshire SN15 3DD, Britio.

o-o-o

SKOLTO '91

Internacia esperanta skolta tendaro en suda Pollando 2-11 julio 1991

La Skolta Esperanto-Ligo aranĝas tendaron Skolto '91 ĉe Beskidy Montaro en suda Pollando, 2-11 julio 1991. Dum ĝi okazos krom la ordinara skolta programo ankaŭ dunivelaj kursoj de Esperanto, kompreneble ankaŭ laŭ skolta stilo. Por la internacia kurso por komencantoj ni postulas aĝon de 15 jaroj por ebligi kiel eble plej efikan instruadon.

Jen ŝanco por esperantaj kaj esperantemaj geskoltoj ĝui internacian skoltan etoson kaj sperti Pollandon. Dum la tendaro ni ankaŭ ekskursos interalie al Krakovo, Ĉenstohovo kaj Auschwitz.

La tendaro estos ĉefe rezulto de jam funkcianta Pol-Finna kunlaboro en aranĝado de esperantskoltaj aranĝoj. Geskoltoj kaj geskoltestroj kore bonvenaj! Pliajn informojn kaj multlingvan informilon donas: Carole Antskog, Källkullen, SF-25700 Kimito, Finnlando; kaj Georgo Handzlik, u. Braterska 41, PL-43-346 Bielsko-Biala, Pollando.

RAPORTO PRI ESPERANTO EN RADIO 3ZZZ

raportas **S. Kanački**

(la 15an de decembro, 1990)

Estas jam unu jaro kaj duono de kiam ni komencis la Esperanto-radio-programon en Radio 3ZZZ, 92.3 FM. Mi volas esprimi mian dankon al ĉiuj kiuj estas membroj de nia Esperanto-amikaro en la radio, kaj ĉiuj kiuj kontribuis al tiu celo. Ni havas 49 pagintajn membrojn. Ni certe volas ke tiu numero kresku en la estonteco.

Nun mi donu al vi iom da detaloj. Dum tiu tempo ni elsendis 77-foje.
Horoj entute: 54.15

Dum la periodo julio-decembro 1990 ni elsendis
Kantoj: 215
lecionojn: 12
skeĉojn: 13
novaĵojn: 15
poemojn: 9
intervjuojn: 14

Al "Radiothon" donacis 33 personoj entute $580.

Dum la lastaj ses monatoj partoprenis ĉu persone, ĉu pere de kasedoj intervjuitoj: Vera Payne, Kep Enderby, Dennis Murphy, Max Wearing, David Featherstone, Darja Bah, John MacLeod.

Krom tio sonis la voĉoj de: Harry Beechy, Herbert Koppel, Marcel Leereveld, Ruth Tumman, Valeria Fotheringham, Margaret Warr, Margaret Young, Margaret Sanders, Niĉjo Nicholas, Geoff Cutter, Sergio Stepanov, Zeljko Pehar, D. Broadribb, Vera Payne, Terry Bruce, Giordana Bruce.

Ĉar estas fino de la jaro, 3ZZZ reekzamenas ĉiujn grupojn kaj iliajn sukcesojn kaj la respondojn de aŭskultantoj dum la jaro, por rearanĝi radiohorarojn kaj enkonduki novajn. 3ZZZ devas raporti al la registaro de Viktorio pri ricevitaj respondoj de siaj aŭskultantoj, do pri la popularеco de la radio. En la lasta kunveno de la kunvokantoj oni komentis pri Esperanto kaj ĉu ĝi estas laŭleĝe dissendebla per tiu radiostacio, kaj pri ĝia popularеco, kiu estas rekonsiderenda.

Miaj alvokoj al niaj membroj kaj aŭskultantoj ne donis rezultojn, ĉar ni ricevis nek leterojn nek pertelefonkomentojn. Do, karaj samide-

anoj, se ni perdos nian radioprogramon, tio okazos ĉar vi ne respondis mian urĝan alvokon je via subteno, por ke mi povu pruvi al la estraro de 3ZZZ ke ni havas aŭskultantojn, ne nur membrojn.

Karaj gesamideanoj, ni sukcesis trafi oportunon kaj malfermi la pordon de la radiostacio kaj eniri. Ni ankaŭ sukcesis konvinki la estraron pri nia kontribuo al tiu radiostacio. Ni eniris kvinope kun plena entuziasmo kaj planoj por diskonigi Esperanton, kaj ĝiajn historion, kulturon, komunikadon kaj kontakton inter parolantoj de multaj lingvoj kaj el multaj nacioj, eĉ la plej malproksimaj landoj.

Ni sukcesis eniri tra tiun pordon, sed ni ne sukcesis devigi tiun pordon resti malfermita por ni. De tempo al tempo mi devas uzi mian forton por restigi ĝin malfermita. Kvinopo ne plu ekzistas, iom post iom nia solidareco degelis kaj nun restas nur unu persono por plenforte teni tiun pordon por ke ĝi ne fermiĝu por ĉiam.

Karaj amikoj, neniu radiostacio permesas daŭrigi programon kiu ne estas sukcesa aŭ ne ricevas bonan respondon de aŭskultantoj. Ni esperantistoj sukcesis disaŭdigi Esperanton en etna radio, kie ni ne estas akceptataj kiel la resto de la nacianoj. Pro tio ni devas duoble pli forte labori kaj pruvi ke ni estas seriozaj pri nia celo. Ĉis nun ni ne faris tion, ĉar vi, kiel tuto, ne donis tiun subtenon, nek al mi, nek al la estraro de 3ZZZ. Pro tio nia estonteco ne plu dependas de mi, kiu senripoze kaj persiste regule prezentadas Esperanto-elsendojn. Mi mem ne estas kontenta pri la kvalito de nia programo. Mi faras nur tion, kion mi sola povas. Mi petis multajn el vi helpe al mi sendi aŭ veni kaj prezenti parton de la programo. La respondo estas aŭ "mi ne povas", aŭ "mi ne havas tempon" aŭ "jes, mi faros" sed mi ricevis nenion.

Mia konkludo estas ke ni Esperantistoj ne estas maturaj. Bedaŭrinde estas ke ni restas kontentaj en nia fermita kokono, vivante en nia soleco, eĉ kiam la oportuno estas donita al ni ke ni montru nin ekster niaj fermitaj kokonoj. Mi mem petis vian helpon, sed niaj intelektuloj, kapabluloj, aktivuloj ne volis interesiĝi. Mi eĉ aĉetis sonmiksilon por plifaciligi la kompiladon de la programo: anstataŭ iri en la Urbon oni povas veni ĉe min iutage kaj iutempe. Sed eĉ tio ne helpis. Se vi ne intencas helpi aŭ per leteroj aŭ per programeroj, estos plej bone forgesi kaj fermi la pordon post ni. Mi faris mian plejeblon, sed ne ricevis vian helpon. La estonteco povos dependi nur de vi. ■

ĈU ZAMENHOF ESTIS POLA KURACISTO?

de **Bernard Golden**

En la programo de la Londona Esperanto-Klubo por januaro/februaro 1988, klub-prezidanto John C. Wells karakterizis Esperanton kiel la "projekton de la pola okulisto ..." Nu, ĉu Zamenhof vere estis pola okulisto? La demando havas du partojn kaj du malsamajn respondojn. Okulisto? Jes! Pola? Ne!

Pri la profesio de Zamenhof ne ekzistas eĉ ombro da dubo. Jam estis publikigitaj transskriboj de kurs-titoloj kaj notoj de la medicina fakultato de la Universitato de Moskvo, kaj ekzistas fotografaĵo de la kuracista diplomo, kiun Zamenhof ricevis de la Universitato de Varsovio en 1885. Estas sciate, ankaŭ, ke li specialistiĝis pri okulmedicino en varsovia hospitalo kaj vienaj klinikoj, antaŭ ol komenci sian okulistan praktikadon en Varsovio fine de 1886.

Nun venas la tikla punkto. Ĉu eblas dokumenti la apartenecon de Zamenhof al la pola gento? Kial tiom da aŭtoroj insistas pri lia poleco? Nu, ne ĉiuj faras tion. Estas interese kompari kelkajn citaĵojn el anglalingvaj lerniloj - se la verkinto degnas diri ion pri la deveno de la aŭtoro de Esperanto. Cresswell kaj Hartley en Teach Yourself Esperanto (1968) efas la vortojn de Wells: "created by a Polish oculist" (kreita de pola okulisto). Male, en tre malnova propagandilo, The Whole of Esperanto, eldonita kiam Zamenhof ankoraŭ vivis, oni legas "created by the Russian doctor" (kreita de la rusa kuracisto). En la Antaŭparolo de Nelson's Esperanto Course (1946) Prof. Collinson pli precize informas, ke Zamenhof estis "a Jewish oculist of Byalistok, Poland" (juda okulisto de Bjalistoko, Pollando). Reliefigas tiun identigon la brita sociologo Peter G. Forster en The Esperanto Movement (1982): Zamenhof estis la plej aĝa filo en juda familio en la urbo Bjalistoko, kiu situis en la iama teritorio de Pollando. Post la dispartigo, tiu regiono fariĝis en 1807 administra unuo de Rusujo. Estas evidente, do, ke Zamenhof naskiĝis judo (fotografaĵo de la originala naskiĝatesto pruvas tion). Kiel loĝanto de la urbo Bjalistoko kaj poste Varsovio, li fariĝis pollandano sed oficiale li estis regato de la cara registaro de la Rusa Imperio. Por ke ne estu ia ajn demando pri la genta aparteneco de Zamenhof, oni legu la publikigitajn transskribojn kaj tradukojn de oficialaj ruslingvaj dokumentoj kaj leteroj, indentigantaj Zamenof kiel judon.

→

Sed la plej konvinka negado de poleco venas de Zamenhof mem. En letero sendita al la Loka Kongresa Komitato en Krakovo la 14-an de februaro 1912, Zamenhof skribis: " ... ne nomu min 'polo' por ke oni ne diru ke mi - por akcepti honorojn - metis sur min maskon de popolo, al kiu mi ne apartenas ... laŭ mia deveno mi alkalkulas min al la gento hebrea."

Kial, do, oni senĉese insistas, ke Zamenhof estis polo? Mi ne povas trovi alian kialon ol tiun ĉi: ĝi estas artifiko por kaŝi la veron, por prisilenti lian judecon. Ne temas pri imagita aŭ hazarda agado. En la Enkonduko de La Kaŝita Vivo de Zamenhof de N.Z. Maimon, Prof. Waringhien tuŝas ĝuste tiun demandon, menciante ekzemplojn de cenzurado de faktoj pri la genta origino de Zamenhof en publikigaĵoj, ekzemple la Enciklopedio de Esperanto. Antaŭ kelkaj jaroj mi ricevis leteron de la redaktoro de landa organizaĵo, kiu informis min, ke li intence ne parolas pri "la juda okulkuracisto" aŭ "la juddevena aŭtoro de Esperanto", kaj kiam li instruas Esperanton, li tute forlasas la fakton, ke Zamenhof naskiĝis judo.*

Bonŝance kaj saĝe Zamenhof inkludis en sia Proverbaro jenan diraĵon: "Eĉ el sub la tero aperas la vero." Nerefutebla, do, estas la konkludo ke Zamenhof estis juda, ne pola, okulisto.

*Noto: Mi ricevis du perleterajn reagojn al mia artikolo "Antisemitismo en la Esperanto-movado" (Israela Esperantisto, feb. 1987, n-ro 95, p3-7). La unuan skribis ne-judo el fora lando, kiu favore pritaksis la verkon. La alia letero venis de eĉ pli fora lando, tiu de la ĉisupre menciita redaktoro, eks-judo, kies reago estis emocia kaj neracia. Por montri, ke mi ne troigis en mia prezento de la temo, mi citos ĉi-sube du bibliografiajn referencojn pri publikigitaj artikoloj priskribantaj prisilentadon de la judeco de Zamenhof. Estontece certe sekvos pli da dokumentado.

a. Walter Zelazny, "La kaŝita vivo de Zamenhof" de N.Z. Maimon. La Gazeto, 1986, marto 15; 3:18-20.
b. Enko (kaŝnomo), "La kaŝita vivo de Zamenhof kaj daŭra judofobio". La Gazeto, 1987 decembro 15; 13:12-14. □

Noto de la redaktoro:
Zamenhof, kiel Einstein kaj Freud, fieris pri sia judeco. Oni trovas belan priskribon en Edmond Privat, La Vivo de Zamenhof, ĉapitroj 1-2.

WHO'S WHO IN AUSTRALIA, 1991

Four Esperantists included

"Who's Who in Australia, 1991", recently published by the Information Australia Group, includes four "notable Australians" or "prominent people" who are active Esperantists.

Peter Wake Ellyard, Director, Commission of the Future, formerly Dir. Min. of Technology, S.A., 1982-1987, includes Esperanto among his recreations.

The entry for Hon. Mr. Justice Keppel Earl Enderby, a judge of the Supreme Court of New South Wales, includes: "Nat. V-Pres. Aust. Esperanto Assn. since 1988, Pres. Sydney Esperanto Club since 1990" and among his recreations is "Esperanto".

The entry for Ronald Cecil Gates, A.O., Emeritus Professor Universities of Queensland and New England also mentions, among his recreations, "Esperanto".

Ralph Lindsay Harry, A.C., C.B.E., is shown as "Pres. Aust. Esperanto Assn. 1986-1988" and his publications include: "Vortoj kun Flugiloj, Esperanto - Lingvo de la Sporto, Australian-Esperanto Dictionary" and, of course, among his recreations "Esperanto".*

Perhaps there are others, which have not yet been spotted.

Esperanto is not yet as frequent a recreation as gardening or golf, but at least it has a respectable following among Australia's leading citizens. Perhaps, soon, there will be some Esperantists included because of their importance in the Association, rather than their success in a profession.

---

*Dr Harry has drawn attention to an error in his entry. From 1957-1960 he was **not** "in A.S.I.O.", the Australian Internal Security Organisation. He was, during that period, seconded to the Department of Defence as director of the Australian External Secret Intelligence Service, A.S.I.S. He returned to the Department of Foreign Affairs in 1960.

SUMMER SCHOOL IN ADELAIDE

7-19 January 1991

report by **Idyss Einihovici**

It was a pleasant surprise when a telephone call from Adelaide informed me that the winner of the Tim Einihovici Memorial Prize was Nick Nicholas of Melbourne. I was invited to come to the Esperanto Summer School in Adelaide to take part in a special ceremony in which Nick was to be presented with a certificate for his success in the the Esperanto Proficiency Examination and, as his prize, a return air ticket to Sweden (site of the International Esperanto Youth Congress 1991).

I immediately ordered a plan ticket and on January 14 at 6 a.m. I left on a pleasant flight to Adelaide. On arrival I immediately enrolled for the third-level course. The classes and courses, held at Aquinas College, were well prepared. Congratulations to the director of the Summer School, Max Wearing, an expert Esperantist.

I enjoyed Vera Payne's class. Classes began at 9 a.m. and ended at 12:30 p.m. The enthusiasm of the class with twenty participants was great. We read aloud from the Aŭstralia Antologio and also began Trevor Steele's novel Sed Nur Fragmento, a fascinating book of considerable literary value. Trevor is president of the Australian Esperanto Association, at the moment on a tour in the USSR.

It was a real pleasure to hear the voices of the participants. I was particularly impressed by Mr Justice Kep Enderby and Mrs Enderby, whose enthusiasm for and mastery of Esperanto are a model for all. Vera is an extraordinary teacher with great talent. The hours spent in her class were stimulating and pleasurable.

After lunch the program consisted of the study of poetry, and in the evenings a Yugoslavian girl on holidays in Australia entertained us with popular Esperanto songs accompanying herself on the piano accordion. Our group was also graced with the presence of a Hungarian girl, a French Esperantist, and other tourists.

Max Wearing arranged a TV interview on channel 7 with Justice Enderby, and several local papers carried news of the Summer School.

FROM THE QUEENSLAND FEDERATION

by **Peter Keates**

It is a pleasure to announce that we now have a new patron, Mr Jim Fouras. Jim is the president of the Legislative Assembly in the Queensland Parliament. After accepting the position of patron voluntarily and unconditionally, he insisted that Ray [Ross, secretary of the Australian Esperanto Association] and I visit him at Parliament House one evening for a private meeting and to discuss aspects of the Esperanto movement over dinner. We agreed. When we arrived he arranged for us to meet some of his staff for pre-dinner drinks. Then we enjoyed dinner while we discussed many subjects including Esperanto. Afterwards, Jim guided us around Parliament House, a particularly interesting place, especially the old building. It has a long history and considerable architectural significance. Jim also took part in our Zamenhof Memorial Meeting [Dec. 1990]. Jim obviously enjoyed the entertainment and spoke with participants, particularly those of ethnic origins. So our first contact with our new patron was certainly positive. Even better is the feeling that we have an "active" patron who intends to promote Esperanto.

[Adapted from La Voĉo, Queensland, March 1991]

NEW ESPERANTO ASSOCIATION IN NEPAL

report by **Joachim Werdin**

After some problems with connecting flights between Deli and Kathmandu, I reached my first destination on October 5 [1990]. My host was Masahiro Marc Ono, who had suggested I come to Nepal. About 30 years ago there was a vigorous though small Esperanto movement in Kathmandu, but it had died out ... Mr Mukunda Raj Pathik, director of the Quest Language School donated the use of the premises of the Institute. Only later did he admit that for years he had been longing to learn Esperanto.

The Institute placed two advertisements in local newspapers ... and by mid November over 60 persons had begun learning Esperanto. At the end of the six week course I gave out 50 diplomas. I was surprised and gratified that a large percentage of the students were both willing and able to converse in Esperanto. On November 3 they founded the Esperanto Association of Nepal.

[From a report in Esperanto, Rotterdam, Jan. 1991]

NEW HEBREW ANTHOLOGY IN ESPERANTO

Antologio de la Hebrea Poezio, tr. and ed. J. Kohen-Cedek. Tel Aviv: Esperanto League of Israel. 268pp.
reviwed by **Anna Lowenstein** and **Renato Corsetti**

Considering the fact that Zamenhof [originator of Esperanto] was himself Jewish, it seems strange that Judaism has no representation of its own in the Esperanto movement - although there are certainly many Jewish Esperantists. There are special-purpose associations for a number of religions* but not for Judaism. Similarly, only a few Jewish works of literature have been translated into Esperanto, except, of course, for that monumental Jewish contribution to world culture, The Old Testament.

This book is, therefore, the first step to fill the gap. As the introduction says, it does not aim to be complete: it contains the collected translations made by one person, chosen according to his personal taste ... [It] is concerned only with Jewish poetry written in Hebrew, and omits the large amount of Jewish literature in other languages.

Within these boundaries the translator during his half-century of activity has been able to cover a very large gamut from the Bible and Talmud through the "Golden Age" within the medieval Islamic world up to the foundation of Israel. Each section begins with a small, helpful introduction. The modern period is disproportionately large. For it the translator has, quite rightly, broadened the concept of "poetry" to include also successful Israeli songs, complete with music.
[Adapted from a review in Esperanto, Rotterdam, Jan. 1991.]

*The 1990 Yearbook of the Universal Esperanto Association lists the following Esperantist religious organisations: The Baha'i Esperanto League, International Esperantist Christian League, International Esperantist Catholic Union, Esperantist Quaker Society, Mormons for Esperanto, Oomoto [an indigenous Japanese religion], Spiritists Publication Society, World Esperantist Atheist Organisation, International Association of Biblical Scholars and Orientalists, World Ecumenical League. The one-time international Esperantist Buddhist Society appears to be no longer active, as well as the Danish Martinus Institute and the Islamic Society. The Ed.

AŬSTRALIA-ESPERANTA VORTARO

respondas **Ralph Harry**

Mi legis atente la recenzon de la 3a eldono de la Aŭstralia-Esperanta Vortaro, en TAE 265, verkitan de Marcel Leereveld. S-ro Leereveld estas bone konata pro sincera kaj konstanta defendado de la zamenhofa lingvo kontraŭ neologismemo kaj kontraŭ vortaroj, kiaj Plena Ilustrita Vortaro, kiuj enhavas neoficialajn radikojn, tio estas, laŭ lia vidpunkto, neologismojn.

Mi ege bedaŭras, ke via recenzinto ne partoprenis en la konstrua komuna laborado por traduki kaj eldonigi Aŭstralian Antologion. Ni ja ŝatis la helpon de kelkaj lingvistoj, kaj ili lernis multon pri la aŭstralia lingvo. Same pri la A-E Vortaro mi petis la komentojn de ĉiuj, kaj ricevis malavaran helpon de kelkaj akademianoj. Bedaŭrinde, laŭ mia memoro, ni ricevis de Marcel nek kritikon nek konstruajn proponojn, kiujn ni povus diskuti, preparante la 3an eldonon, kvankam li ja verkis artikolon por TAE pri geografiaj nomoj.

Nun, post la publikigo de la 3a eldono, li informas nin, ke "Por trovi aŭstraliajn idiomaĵojn, el la pozicio de iu alia lingvo (Esperanto inkluzivita) ĉi tiu vortaro neniel estas taŭga ... kaj tio ankaŭ ne estas ĝia celo." Tamen unuflanka dulingva vortaro ja havas utilon por la lernado de la "ela" lingvo. Ĉiu Esperantisto, kiu scipovas la anglan lingvon, konstante uzas la Esperanto-English Dictionary de Montagu Butler, por kontroli kaj eĉ por trovi la ĝustan vorton. Ĝi avertas kontraŭ "falsaj amikoj", esperantaj vortoj, kiuj nur ŝajne similas al iu anglismo. Ĝi enlistigas preskaŭ-sinonimojn. Ĝi donas ekzemplojn de uzado. Mi ne pretendas, ke (ni imagegu) nia modesta verko ebligus al ruso traduki romanon en la aŭstralian idiomon. Ne! Sed kelkaj eksterlandanoj jam informis min, jes, kaj ankaŭ enmigrintoj el eksterlando al Aŭstralio, ke ili lernis el AEV multajn esprimojn. Eĉ tiuj Esperantistoj, kiuj naskiĝis en Aŭstralio eble lernos la precizan signifon, aŭ la etimon, de kelkaj vortoj per la Esperanta ekvivalento aŭ klarigo, aŭ per la 203 bildoj. Esperantistoj, kiuj komprenas la ĝeneralan anglan, sed ne la aŭstralian ja povus aĉeti ekzempleron de la Australian National Dictionary, sed tio kostus $75 aŭ eĉ pli!

Mi ne estas certa, ke la aŭstralia idiomo havas tendencon ŝanĝiĝi pli rapide ol la anglia (!) aŭ eĉ la usona. Mi ne vidis sciencan studon

pri tio, kvankam estis interesa artikolo en The Bulletin: "Stress and Strine", de G.A. Wilkes (12 Feb 1991). Sed mi devas substreki, ke mi ne reviziis AEV pro ŝanĝoj de la aŭstralia idiomo, sed por ĝin plikompletigi kaj plibonigi, kaj super ĉio por aldoni la bildojn, pri kiuj mi ricevis permeson ĉar mi estas kunlaboranto kaj honora dumviva membro de la Asocio por la Vortaro Macquarie. Jes, ni certe bezonos 4an eldonon, espereble pli profesie kaj komputile kompostitan. Ĉar miaj aĝo kaj sanstato ne permesas tian entreprenon, mi jam, antaŭ la apero de la recenzo, invitis la redaktoron de TAE transpreni la taskon organizi "definitivan" eldonon, kvankam ni scias, ke vortaro neniam povas esti vere definitiva. Li afable konsentis, kaj sendube bonvenigos sugestojn. Samtempe, por helpi pri la preso de la 4a eldono, mi donacis al la Fonduso Banham-Matasin la preskoston de la nuna, rilate kiun ne mi sed AEA per la Libro-Servo profitos el vendoj.

Dume, AEV estos utila por tradukantoj kaj verkantoj, ĉu de libroj ĉu de artikoloj kaj leteroj. Mi ne povas rigardi kiel seriozan la aserton, ke la posedo de du-lingva vortaro "ofte igas la tradukanton ŝafe kaj tempŝpare akcepti la vortarajojn". Mi sugestas ("proponas kiel hipotezon" PIV) ke, se la tradukantoj de aŭstraliaj literaturajoj estas sufiĉe kleraj por mem trovi la tradukojn, ili bone komprenos la metodon uzi vortaron. Ili elektos, el la gamo de eblecoj, en la vortaro aŭ elpensitaj de ili mem, la vorton aŭ esprimon kiu plej taŭgas en la kunteksto. La ekzisto de dulingva vortaro ŝparas tempon kaj helpas certigi, ke tradukanto ne maltrafu aŭ forgesu la fakte plej ĝustan esprimon. Vortaro estas utila, ne nur por lernantoj, kaj tiuj, kiuj komencas verki kaj traduki, sed eĉ por erudiciuloj. La plej bonaj aŭtoroj, majstroj de siaj lingvoj, tamen de tempo al tempo serĉas la ĝustan vorton en vortaroj, inkluzive en laŭtema vortaro (angle: "thesaurus"). Ili ankaŭ studas la lingvouzadon de aliaj aŭtoroj. Mi esperas, ke la venonta eldono de AEV enhavos citajojn el Esperantaj tradukoj de aŭstraliaj verkoj, super ĉio el Aŭstralia Antologio sed ankaŭ el Aŭstralio, Lando kaj Popolo kaj Sur la Bordo. Mi antaŭvidas Esperantistojn, kiuj uzos la vortaron ne ŝafe sed emue, zorge elektante ĉiun vorton.

Mi ĝojas, ke S-ro Leereveld trovis la "enciklopedian" aspekton interesa, kaj mi dankas lin pro liaj notoj. Kompreneble en la vortaro ne estas mencio de "saladoj" sed de "saladoj ktp." La preskoboldo ĉie aktivas. Li tute pravas pri "masonite" (p16), kaj lia noto pri la arbo "Hymenosporum flavus" povus helpi pri la difino de "frangipanni".

"Silky oak" ja estas arbo. Sed la traduko de "singlet" dependas de la kunteksto. Antaŭ kelkaj jaroj oni uzis la vorton "singlet" por priskribi ne nur subĉemizon senmanikan, sed ankaŭ la subĉemizon kun maniketoj, kiun oni hodiaŭ nomas "T-ĉemizo". Estus utile, se Marcel povus verki noton pri la deveno de "scone". La skota, la dana kaj la nederlanda ŝajne ĉiuj influis la anglan.* Kio estas la rilato inter "scone" kaj "senŝeligita"?

Mi esperas, ke li ankaŭ verkos noton pri la etimologio de la afrikansa vorto "bos" kaj ĝia rilato kun la nederlanda "bosch" (kiu laŭ mia informo signifas "woodland"). En Aŭstralio "bush" havas multajn diversajn nuancojn. Estas 6 paĝoj pri "bush" en la National Dictionary. Oni ne povas - kiel proponis Joseph Major en Nov-Zelando - ĉiam uzi "veprejo" aŭ "arbaro". Oni ja bezonas mallongan radikon por esprimi la nocion "la regiono ekster la urboj, precipe en parto kun arboj kaj maldense loĝata". Oni ne povas uzi "buŝon"! Kaj mi ne tre ŝatas la neklaran vorton "malurbo" kiun proponas S-ro Leereveld. Kelkfoje oni uzas "bush" kontraste al "city", sed kontrasto ne ĉiam identas kun antonimo. Post multe da diskutado oni proponis "boŝ". Oni ne kreis "boŝo" el "boŝmano". Ni nur atentigis, ke parto de tiu nomo, deveninta el la nederlanda bosch, aŭ sudafrika "bos" kaj parenca al la angla "bush" jam fariĝis en Esperanto "boŝ-", kiel registris PIV. Mi restas konvinkita, ke tiu estus taŭga kaj konvena radiko.

Rilate la elektmetodon de la esperantaj tradukoj en AEV, kompreneble la kompilintoj bonvenigis helpon de la ornitologoj kaj aliaj fakuloj, inter ili spertulo pri geografiaj nomoj. Sed fine la "aŭtoroj" devas akcepti la respondecon. En unu afero mi sola respondecas, ĉar, kiel mi atentigis legantojn de la 3a eldono, mia kolego Volo Gueltling malaprobas la formon "aŭsano", kaj kelkajn rilatajn derivaĵojn. Ankaŭ Marcel Leereveld malakceptas tion. Tamen mi trovas ĝin tute laŭ la spirito de Esperanto. En teksto kie aperas "Aussie" kaj "Oz"** tradukanto ne povas uzi la longajn, formalajn, senkolorajn formojn "aŭstralia" kaj "aŭstraliano". Oni nepre devas klopodi por esprimi la koncizecon kaj hipokor-

---

*La Oxford Dictionary of English Etymology, Macquarie Dictionary, kaj Random House Dictionary of the English Language ĉiuj derivas "scone" el "Middle Dutch schoon = fine". Sed eble ĉiuj kopiis el sama fonto.--Red.

**"Oz" por "Aŭstralio" estis inventita de la usona teatrokritika gazeto Variety, alude al la romano de L. Frank Baum "The Wonderful Wizard of Oz" (la maro ĉirkaŭ Aŭstralio = la dezerto ĉirkaŭ Oz). Kial do ne "Ozo" por tiu uson-aŭstrali-brita aludnomo? -- Red.

isman (angle hypocoristic*) aŭ karesan nuancon. Oni povas tion fari per mallongigo, kune kune la diminutiva sufikso "-et", kiu kelkfoje uzatas karese en Esperanto, aŭ per unu el la du karesaj hipokorismaj sufiksoj "-ĉjo" kaj "-njo".

Estas tute normale en Esperanto aldoni sufikson al mallongigo, ekzemple usonano, SATano (satano!), TEJano, UNOano, nosokano (NSWman). En tiuj ekzemploj oni uzas la parolformojn de la unuaj literoj de multvorta nomo. Kiam oni komencis paroli pri "usonano" oni eble trovis la formon stranga, sed ĝi enradikiĝis. Oni ankaŭ mallongigas geografiajn nomojn alimaniere - per la uzo de kelkaj fruaj literoj de la nomo, ekzemple "EŭR" prefikse en eŭrodolaroj, "EŭRovideo" ktp. PIV (1970) kaj "La Jaro" (la almanako de Monato) ambaŭ enhavas liston de la internaciaj mallongigoj de landnomoj. (PIV p1218: Simboloj de aŭtomobila nacieco; La Jaro, 1991, "Landoj de l'Tero", kaj grandlitere sur la mapoj.) En internaciaj ludoj, ekzemple la Olimpiaj Ludoj Aŭstralio estas AUS, Aŭstrio AUT. Do, en artikolo pri Aŭstralio, sen risko de miskompreno, oni certe rajtas uzi la formon "aŭsano"!

La traduko de hipokorismaj formoj (Aussie, bunny, footie ktp) uzataj en Aŭstralio ne nur de infanoj sed ankaŭ de adoltoj ne estas facila. Fundamente oni uzas "-ĉjo" kiel sufikson post la unua aŭ dua silabo de vira propra nomo aŭ nomo de parenceco. "-njo" estas almetebla post mallongigo de virina nomo. Sed oni ankaŭ salutas personon, kiu ne estas parenco, per parenca karesnomo. "Oĉjo", do, povas signifi kaj "kara onklo", kaj "Old chap, old man" (Butler), kaj oni salutas kiel "Avĉjo" aŭ "Paĉjo" personojn, kiuj tute ne estas avoj aŭ patroj. Oni iam nomis Julion Baghy "Paĉjo". Mi jam uzis, de tempo al tempo, la sufikson "-ĉjo" por doni karesan efikon al nomoj neparencaj, ekzemple "amiĉjo" (mate), "edzinjo" ("wifey"). En la vortaro mi aŭdacis uzi ĝin por ŝerce karaj insektoj (mosĉjoj - mosquitoes, mossies). Sed Marcel prave elmontras la eblecon, ke oni povus fari entomologiajn erarojn, aŭ esti akuzata pri seksismo, se oni uzus "-ĉjo" pli ofte ol "-njo"! Eble la solvo de tiu problemo estas etendi uzadon de "-et", kiun oni ja uzas karese (patreto, patrineto^{z}, maneto^{z}). La moskvitetoj pikas hodiaŭ. Mi tre ŝatas la biskvitetojn de panjo ... ktp.

S-ro Leereveld asertas, ke ie (eble en la fakto, ke ni enmetis list-

---

*"hypocoristic": "endearing, as a pet name" (Macquarie Dictionary) -Red

on de la vortoj en AEV ne troveblaj en PIV) troviĝas sugesto, "ke, ĉar iu neologisma vorto aperis en PIV, ĝi estas ĝusta kaj akceptenda". Kun respekto, tion ni nek diris nek implicis. Kiel S-ro Leereveld devas bone scii, estas saĝa kutimo de Esperantaj aŭtoroj enmeti, je la fino de siaj verkoj, liston da vortoj ne enhavataj en la aktuale plej plena Esperanto-vortaro. La fakto, ke oni uzas neoficialan vorton aŭ nomon, kiu jam aperis en PIV tute ne implicas, ke oni aprobas ĉiujn neologismojn. Ĝi signifas nur, ke oni trovis necesa kaj sufiĉe bona la ununuran koncernan vorton, kun la difino, kiu jam troviĝas en PIV.

Ni prenu konkretan ekzemplon. Necesas proponi tradukon por la vorto "boomerang", tiu unika ĉasilo kaj armilo de la aŭstraliaj indiĝenoj, inventita de iliaj prapatroj en la nuna Sudano, kaj uzita kiel ludilo tie kaj en prahistoria Pollando sed evoluigita en Aŭstralio kaj iasence simbolo de ĉi tiu lando. Oni ne povas resti kontenta kun kruda proksimuma kunmetaĵo de fundamentaj radikoj kia "ĵetbastono". Per serĉeto en la vortaroj oni ekscias, ke antaŭ 38 jaroj Fleming Fulcher kaj Bernard Long, en la 3a eldono de sia English-Esperanto Dictionary (en la vortaro mem, ne en listo da neologismoj) inkludis "boomerang, bumerango". Eble en ilia 1a eldono de 1921 tio aperis. En 1967 Montagu C. Butler inkludis en sia Esperanto-English Dictionary "Bumerango", kiel neoficialan vorton, t.e. vorto "not officialized" sed kiu "can be used with discretion". En 1970 PIV inkludis "bumerang/o. Ĵetilo, uzata de aŭstraliaj indiĝenoj, kiu povas reveni al la ĵetinto, se ĝi ne trafis la celon". PIV ankaŭ donas ekzemplon de la metafora uzado de "bumerango": "Ĉu tiu propagando ne povos efiki kiel ~O k malutili al la propagandistoj mem?" El noto en mia vortaro mi observas, ke Marjorie Boulton uzis "bumerango" en sia libro Eroj (1959). Kion faru la leksikografo? La radiko, jam uzita de lingvistike eminenta Esperantisto, kaj registrita de tri vortaroj, estas klara kaj sufiĉe respegulas sian etimon en indiĝena lingvo, adaptita al la aŭstralia. Ĝi estas internacia (Fr. boumerang, ktp). La difino en PIV estas ĝusta, kaj la metafora uzo estas jam notita. En 1983 mi metis en la unuan eldonon de Aŭstralia-Esperanta Vortaro: "boomerang bumerango". Neniu protestis. Hazarde ĝi ne aperis en la 2a eldono, sed ni decidis reenmeti ĝin en la 3an, kun la difino el PIV, klarigo de la metafora uzo, ekzemplo de uzo en la aŭstralia esprimo "It's a boomerang", kaj kun bildo de du bumerangoj. Nun, en 1991, S-ro Leereveld skribas pri "monstraj neologismoj kiaj ... bumerango" (265/12). Ŝajnas, ke Marcel en 1990 havis ekfulmon de la penso, kaj decidis (263/22) ke li "ellasis la 'e' de la PIV-vorto 'bumeran-

go'"!! La sola kialo, kiun li donas, por sia propono ŝanĝi vorton, kiu estis respektinda radiko, eĉ se ankoraŭ ne oficialigita, ekde duonjarcento, estis, ke "ju pli mallonga la Esperanta vorto, des pli bona". Ni daŭre uzu "bumerango".

Antaŭ ol diskuti aliajn tielnomitajn "monstrojn", mi volonte konfesas, ke eĉ la 3a eldono ne estas tute konsekvenca. Ni penis doni, en ordo, 1. la aŭstralian vorton aŭ esprimon; 2. la kategorion, mallongigitan (inter krampoj); 3. la sciencan nomon, se tia ekzistas; 4. Esperantan ekvivalento(j)n, kun indiko (N) se la tradukradiko ne troviĝas en PIV; 5. (inter krampoj) klarigan informon, ekzemple historian aŭ etimologian. S-ro Leereveld pravas, kiam li atentigas, ke ni uzis "marsupiala talpo" sed "marsupiula muso" kaj ke ni ne priskribis "numbat" kiel "marsupialo". En la 1a kaj 2a eldonoj ni uzis "marsupial/o,/a" sekvante Butler, sed en la tria ni ŝanĝis (sed ne konsekvence) la formon al "marsupiulo" (laŭ PIV).

Ĉirilate, mi esperas ke S-ro Leereveld permesos la uzon de la sufikso "-ulo" ne nur por homoj, sed ankaŭ por besto de iu ordo, ekzemple de mamuloj. Kaj li troigas, kiam li nomas la vorton "gumulo" (eŭkalipto) "idiotaĵo". Kvankam mi markis tiun vorton (N), ĝi ne aperis en la listo de la vortoj ne troveblaj en PIV. Ĝi estas tute konforma al la praktiko de nia lingvo. PIV informas, ke "Kiam besto aŭ eĉ konstruaĵo akiras en la uzado ian metaforan individuecon, oni tute nature emas uzi ankaŭ **ul**, por ĝin montri" kaj donas, kiel ekzemplojn "sur$_{R}$rapiduloj (=kurĉevaloj) ni forrajdos^{X}; la glutulo^{B} (=vulpo); la grizulo^{G} (=azeno) trimastulo, triferdekulo^{Z}, nubskrapulo" ks. Eĉ por floroj Zamenhof ĝin uzis: "Neĝborulo" troviĝas en iFA 23/26 (Butler 423). PIV ankaŭ enlistigas "konkurenculo" ne rilate personon, sed por firmo kiu konkurencas! Nu, en Aŭstralio la "gumuloj" ja havas personecon, en la literaturo kaj en la arto. Hans Heysson hantis ne "eŭkaliptojn" sed gumulojn!

Kiel diras S-ro Leereveld, estas malfacile fari rigidajn regulojn pri la Esperantigo de "sciencaj vortoj". Ĉu oni nur Esperantigu la modernajn sciencajn terminojn de birdoj, bestoj kaj plantoj? Kiam oni rajtas adopti vorton el la ordinara lingvo, ofte indiĝenan nomon uzatan dum jarmiloj? Rilate la birdojn ni sekvis la praktikon kaj konsilon de la ornitologoj, kiuj jam eldonis terminaron de la ĉirkaŭ 750 aŭstraliaj birdoj. Mi menciu, ke mi elektis por la AEV nur tiujn (ĉ. 66) birdojn, kies bildoj aperas en la 1a eldono de la Vortaro Macquarie, kun la al-

dono de kelkaj malpli famaj sed de mi ŝatataj birdoj. Ne malmultaj eŭropaj kaj aziaj birdoj havas nesciencajn nomojn, ekzemple la najtingalo (Luscinia megarhyncha) kaj la ruĝgorĝulo (rubekolo). Same la emuo (dromideceo) kiu staras sur nia blazono, kaj la kukaburo (dacelo) kiu enkondukis filmojn kaj la dissendojn de Radio Aŭstralio estas internacie konataj. Rilate la bestojn kaj plantojn mi ne trovis Esperantiston, kiu estas profesia spertulo pri botaniko aŭ zoologio aŭstraliaj, kaj mi devis serĉi modelojn en la praktiko de eŭropaj spertuloj. Unu metodo estas, se eble, traduki laŭvorte la nacian vorton kaj tuj aldoni la sciencan nomon. Ĉar mi loĝas apud "Cabbage Tree Road" kaj ĉar la unua faŭnrezervejo en Aŭstralio estis Cabbage Tree Island ĉe Haveno Stephens, oni ofte demandas al mi: "Kio estas 'cabbage tree'?" Mi respondas: "en la angla tio signifas 'brasikarbo', sed fakte ĝi estas alta palmo, kies scienca nomo estas Livistono. Mi povus aldoni, ke oni nomis ĝin "brasikarbo" ne nur ĉar la frondoj similas al brasiktigoj sed ankaŭ ĉar oni povas manĝi la junajn folioŝosojn kiel legomon. La "kristnaskarbo" (Nuytsia floribunda) de Okcident-Aŭstralio certe ne estas abio, sed ĝi ja floras dum la kristnaska sezono. Eble S-ro Leereveld povus proponi Esperantigon de "Nuytsia". Kaj certe oni povas diri "anigozanto" por "kangaroo paw" sed en taŭga kunteksto, kiam klare rilatas al floro, oni povas uzi la imagoriĉan "kangarupiedo", ĉu ne?

Mi respektas la erudicion de Marcel rilate determinantajn adjektivojn, sed oni devas atenti ne nur al teoriaj reguloj sed al fakta komprenebleco de kunmetitaj vortoj. Se ĉiu scias, ke la ligno de arbo ne estas, kaj ne povas esti ledo, sed ja povas ŝajni ledeca laŭ la aspekto aŭ palpe, tiam praktikemaj Esperantistoj komprenos "ledlignan arbon", same kiel ili komprenas "birdherbo" (stelario), "katherbo" (katario), "lupherbo" (akonito), pulherbo (pulikario) aŭ hepatherbo (hepatiko) aŭ sangoherbo (akteo) ktp ktp.

Mi ĝojas, ke tamen S-ro Leereveld trovis tre kontentigaj la plej multajn neologismojn. Jes, mi forgesis la faman bilipoton. Kaj eble oni povus demandi la ornitologojn, kial oni ne esperantigu "Casuarius" per kazuario anstataŭ kazuaro (PIV). Bedaŭrinde en la sama alineo li asertas, ke "Manko de filologia sento rilate Esperanton montriĝas en monstraj neologismoj", de kiuj li donis kelkajn ekzemplojn. Li ne klarigas kial li opinias, ke tiuj vortoj prezentas nenormalan formon aŭ strukturon (PIV 1). (Mi esperas, ke ili ne timigis lin! (PIV 2)). Sed mi ne povas ignori tian kondamnon. Do mi klopodos diveni, kial Marcel malŝat-

egas ilin, kaj klarigi mallonge kial mi konsideris ilin ne nur normalaj sed eĉ dezirindaj.

Mi jam detale analizis unu el la monstroj - bumerango - por ilustri kiel zorge mi studis la historion de ĉiuj radikoj antaŭ ol ilin akcepti. Mi povos paroli pli koncize pri la aliaj.

Vumero La "woomera" estas unika inventaĵo de la aŭstraliaj indiĝenoj, artefarita ligna levilo por plilongigi la brakon de lancĵetanto. Oni donis la nomon "Woomera" al la loko en centra Aŭstralio, kie oni lanĉas raketojn. Oni ne povis sugesti nur sengustan vorton kunmetitan el oficialaj radikoj, ekzemple "lancĵetilo". Se oni enkondukus novan radikon la indiĝena vorto trafe taŭgus. Kiel oni Esperantigu ĝin? La sono "w" je la komenco de vorto kutime fariĝas "v" (valabio, vombato ktp). Oni rare uzas "ŭ" je la komenco de vorto (mi ne aprobas "ŭesto" por anstataŭi "okcidento"). Do la ekvivalento en Esperanto estus "vumero". Ĉu la finaj literoj "ero" povus konduki al la impreso, ke la vorto estas "vum-ero"? Ne, ĉar ne ekzistas radiko "vum". Jam ekzistas en Esperanto 184 radikoj kiuj finiĝas per "er" (Klaus Schlueter: Inversa Vortaro, Nürnberg, 1972). Ĉu estus konfuzo kun "vomero"? Vere, ne, kiam oni parolas pri ĉasado, milito inter triboj ktp. Eble S-ro Leereveld preferus "vumro". Sed tio estus la unua Esperanta radiko, kiu finiĝus per "mro". Mi preferas "vumer/o".

Karrio, ĵarro La arboj "karri" (Eucalyptus diversicolor) kaj "jarrah" (Eucalyptus marginata) estas specialaj en aŭstraliaj historio kaj socio. Ili havas malhelan ruĝan lignon, tre rezistan al putriĝo, kaj el ili oni faris la trabojn kiuj portis la relojn de la transkontinenta fervojo. Aktuale oni konstruas kopion de la ŝipo en kiu navigis la fama Kapitano Cook - el "jarrah". Do traduki ambaŭ per "eŭkalipto" ne sufiĉas. La fruaj kolonianoj en Okcident-Aŭstralio nomis la lignon de "jarrah" (Kolonia) mahogano, laŭ la malmola ligno de la sudamerika arbo ruĝbruna (Swietenia mahogani). Sed poste oni akceptis la belan indiĝenan nomon "jarrale" aŭ "jarrah". Esperantiganto alfrontas du problemojn. Ĉu la komenclitero estu j, ĵ, aŭ ĝ? Ni proponis ĵ, kio konservas la aspekton, kaj proksimume respegulas la indiĝenan sonon. Due, ĉu oni uzu unu "r" aŭ du? Jam ekzistas neoficiala radiko ĵaro (granda tekruĉo, PIV). Por distingi la arbon ni proponis "ĵarro". Ne estas multaj radikoj en Esperanto kun duobla litero, ĉar la prononco ne estas facila. Sed oni ja kreis kelkajn, precipe por eviti konfuzon kun aliaj radikoj:

Buddo^{z} (budo), Bonno (bono), finno (fino), karoo^{z}, heroo, poloo, vetoo (veto), regatt/o^{z} (regato), kontribuu, ktp.* Do ni elektis "ĵarro" kaj same "karrio", ĉar "kario" konfuziĝus kun la neoficiala radiko "kario", uzata fake kun la signifo "putra difektiĝo de osto, precipe dento". Eble oni povus ŝanĝeti "ĵarro" al "ĵaralo" kiu pli proksimus al la originala indiĝena vorto, aŭ al "ĵarao" (kp. "vilao"). Sed ni ne hontu pri "karrio" kaj "ĵarro", kiuj estas famaj nomoj en la batalo por konservi la pluvarbaron de Okcident-Aŭstralio.

Vilĉjo svingvostulo (Willy wagtail). Oni povus proponi la Esperantigon de la scienca nomo, ekzemple "ripiduro", kaj aldoni nur laŭvortan tradukon de la aŭstralia nomo. Laŭ mia lingvosento Vilĉjo estas laŭregula traduko de Willy, kaj "svingvostulo" estas tute konforma al la praktiko, same kiel mamulo aŭ marsupiulo (vidu supre ĉe "gumulo").

Bovara teamo Por bullock team ni proponis alternativojn: tirbovaro aŭ bovara teamo. Io mankas en simpla "tirbovaro", la ideo de kuna laborado. Alia alternativo estus "jungitaro", kiun proponis Fulcher kaj Long por tirbestoj kune jungitaj. Sed tio ne estis tute kontentiga. La radiko "team", neologismo de Fulcher kaj Long, estis difinita de ili "Aro da ludantoj por sporta konkurso". La vorto estas uzata konstante en la sporta fako, kaj aperis kiel neoficiala radiko en la vortaro de Butler kaj en PIV. Sed ĝi estas ankaŭ uzata por grupo da laborantoj, kiuj alternas pri tasko. Oni kompare menciis "skipo", kies difino en PIV estas: "Grupo da laboristoj, kune laborantaj en difinita nombro super unu sama tasko, k eventuale alternanta kun alia simila grupo". Mi preferis etendeti la signifon de "teamo". La bovoj certe estas grupo, kiu laboras kune, kompreneble ne sub la komando de kapitano, sed sub la brutvipo de la bovpelisto. Oni diras, ke estas, kelkfoje steluloj inter la bovoj, kiuj fiere tiregas kaj stimulas la aliajn, kiel en sporta teamo. Kaj ja estas konkurenco inter la teamoj de tempo al tempo!

Muskuloza Tio ja estus monstro! Sed mi ne uzis ĝin.** Mi uzis "muskoloza" (nuggety). "Muskolo" estas Fundamenta radiko, do mi supozas, ke estas la neoficiala sufikso "-oza", kiun S-ro Leereveld ne akceptas.

---

*En la Fundamento mem troviĝas la nomo Anna, do oficiala vorto kun duobligita konsonanto. - la Red.

**Kulpas via redaktoro, kiu miskopiis la manuskripton de Marcel, kiu skribis "muskoloza". - la Red.

Rekontrolinte, mi trovas, ke PIV ja diras, ke "oni nun uzas aŭ simple la a-formon, aŭ kunmetaĵojn kun **-abunda, -dona, -hava, -plena, -riĉa**". Tio estis en 1970. Sed mi studis (por la Klereca ekzameno) la romanon Metropoliteno de Vladimir Varankin, reeldonita en Kopenhago en 1977, kaj notis la vortojn: bukloza, haroza (!), polvoza, ŝtonoza kaj ... muskoloza (!) (p12). Mi ankaŭ notis en Devjatin (EAP p25) "ŝtonoza", kaj en verko de John Francis (Vitralo, p20) "vortoza". Do mi supozis, ke tiu Ido-ismo ankoraŭ vivas, kaj estas uzebla. Sed mi volonte akceptus "muskola", kiu havas la meriton esti pli mallonga. Mi akceptas ĝin pli volonte, ĉar ja povus esti konfuzo inter "muskoloza" (muscly) kaj "muskolozo", kiu estas faka anatomia termino (muskola parieto de la visceroj). Mi ankaŭ akceptus, sed malpli volonte, "harориĉa" aŭ simple "vila".

Franĝipano Mi jam agnoskis la kontribuon de S-ro Leereveld per lia atentigo pri la manko en la vortaro de "Hymenosporum flavum" (native frangipanni). Bedaŭrinde, ĝis nun mi ne trovis ĝin en la ĝeneralaj aŭstraliaj vortaroj. Oni devos serĉi ĝin en faka libro, kaj serĉi ankaŭ spertulon, kiu povos konsili pri la plej bona esperanta formo, se ĝi meritas enkondukon. La historio estas interesa.*

Vakero (stockman) Fulcher kaj Long proponis ĉi tiun radikon en sia vortaro, kun la difino: "El hispana lingvo; angle cowboy. Gardisto de bovoj precipe sur granda bieno en Ameriko". Ĝin akceptis Butler en 1967 kun la noto "Cp gaŭĉo" (S.Am. mounted herdsman). Ĝi aperis en la Suplemento de Plena Vortaro kaj en PIV ("Rajdanta gardisto de brutoj en Norda |!| Ameriko" kun atentigo pri gaŭĉo). Bernard Golden (La Letero de l'Akademio de Esperanto n-ro 13) citas la Esperantigon vaquero-vakero por ilustri la regulon: "hispana que devas esti transskribita kiel 'ke' en Esperanto". Li ŝajne trovas ĝin akceptebla radiko. Do, mi ne komprenas la problemon de S-ro Leereveld. Ĉu li proponus, ke oni enkonduku nek vakero, nek gaŭĉo? Gaŭĉo havas kromtonojn de raso: "Ano de miksita, eŭropan-indiana raso de Sud-Ameriko, kies metio estas ordinare rajde gardi la brutojn". Ŝajnas al mi, ke vakero estas bona, klara termino, uzebla ankaŭ por aŭstralia brutgardisto.

---

*Laŭ Burke's Backyard vol.2, de Don Burke, p13: "La kutima nomo franĝipano estas pro la Markizo Franĝipani de Romo, kiu originigis parfumon en la 16a jarcento. Kvarcent jarojn poste kiam oni trovis la planton, oni rimarkis ke ĝi havas similan parfumon. Tial la nomo." - la Red.

Parkejo Mi forgesas en kiu kunteksto mi uzis "parkejo". Eble "parko" sufiĉus. PIV registras: ***parko** ... 5 Loko, rezervita por provizore restigi aŭtomobilojn". Ĉe "No Standing" mi notis ("eĉ mallonga parkado de aŭtomobilo malpermesata"). La problemo kiam oni uzas "parko" estas distingi la parkon kun arboj kaj gazonoj de la ejo kie oni parkas aŭtojn. D-ro Ron Gates antaŭnelonge serĉis vorton por esprimi "parking lot" aŭ "car park". Oni konsilis lin uzi "parkumejo", kiu estas ne tre konciza vorto. Se parko ne estas klara, kaj "parkejo" malplaĉas (kvankam mi trovas ĝin sufiĉe bona) oni eble povus diri "aŭtoparko".

Antaŭ ol veni al la tikla problemo de geografiaj nomoj, mi devas respondi al la demando: "Kial 'aborigeno'?" Kiam oni tradukas "aboriginal" kaj "aborigine" aŭstraliano tute nature uzas "aborigeno". La vorto "native" ("indiĝeno") havas iomete malestiman nuancon. Supozeble pro tio la indiĝenoj de Nov-Zelando preferus la nomon "Maorio" kaj Hurono preferus (se oni ne donas al li lian triban nomon) esti nomata "indiano" ol nur "indiĝeno". Eble oni povus konsulti iun el la gento/tribo Arunta?

Ĝenerale, rilate la uzon de neologismoj, mi kaj miaj kunlaborantoj estis, miaopinie, tre konservativaj. Se oni uzis "lukri" sendube estis, ĉar en la kunteksto la alternativo, ekzemple "perlabori" estis konsiderata malpreciza aŭ monstro peza. Ankaŭ ĝenerale, ĉar tempo mankas, se ĉi tiu respondo estos presebla en la marta numero de TAE, mi petas S-ron Leereveld ne nur maketi (rubbish) niajn proponojn per listo de "problemetoj", sed proponi solvojn, aŭ kompreneble proponi alternativojn, kiuj ne prezentus eĉ pli seriozajn problemojn.

Geografiaj Nomoj

Antaŭ ĉ. dek jaroj, ĉar la tiama konfuzo pri geografiaj nomoj povus esti obstaklo, kiam mi penis persvadi la aŭstralian registaron uzi Esperanton, mi proponis, ke nia Asocio petu la Akademion de Esperanto rekomendi liston de la nomoj de membroj de Unuiĝintaj Nacioj, kune kun la ĉefurboj kaj lingvoj. Nun ni havas tian normigan liston, kaj estas grave, ke ni sekvu ĝin.

Landaj nomoj ne estas tute samaj kiel nomoj de birdoj kaj bestoj. Oni ne povas sekvi sciencan nomon, kaj devas Esperantigi ilin, atentante kaj pri la sono kaj pri la internacia aspekto. La listo de la Aka-

demio donas bonajn modelojn por la kontrolo de niaj ŝtatnomoj kaj ĉefurboj de ŝtatoj. Mi mencios nur kelkajn punktojn:

(1) La nomo "Aŭstralio" estas oficiala radiko ekde 1974.

(2) Anglaj nomoj en "-ia" kutime fariĝas "-io", ekzemple Albanio, Ĉekoslovakio, Tasmanio, Viktorio.

(3) Nomoj kiuj finiĝas per "land" konservas tiun finaĵon, ekzemple Finnlando, Irlando, Kvinslando (dum kelkaj jaroj oni uzis "Kvinzlando" por imiti la sonon, sed oni reiris al la pli frua nomo "Kvinslando" kiu estas iomete pli simila al la skriba formo de la angla).

(4) Oni uzas streketon por du-partaj nomoj kiaj Grand-Britio, Ebur-Bordo, Kabo-Verdo, Sri-Lanko, El-Salvadoro, San-Marino, Nov-Gvineo, Nov-Zelando, Okcident-Samoo, Siera-Leono, Sud-Afriko, Sud-Aŭstralio, Okcident-Aŭstralio, Nord-Teritorio, kaj Sud-Kimrio. Antaŭ 25 jaroj Montagu C. Butler pledis por Nordirlando kaj Novzelando kaj Sieraleono, sed la Akademio preferis la pli "internaciajn" formojn.

(5) Kompreneble ĉiu Esperantigita nomo uzas nur Esperantajn literojn kaj litergrupojn kaj finiĝas per -o. Ekzemple Kameruno, Singapuro, Melburno, Jamajko, Malajzio, Adelajdo (pli frue D-ro André Albault proponis "Adelaido" laŭ la franca formo, sed la surloka prononco pli similas al "aj" ol al "a-i" aŭ al "ej", kaj la formo "aj" sufiĉe similas al "ai"), Barejno, Brunejo, Sidnejo, Lesoto, Perto (Perto ne havas grekan etimon, sed same kiel en Esperanto la ĉefurbo de Grekio estas Ateno, kaj oni ne parolas pri theatro sed pri teatro, la tradicia formo "Perto" ŝajnas al mi bonega).

(6) Kompreneble, se oni donas sian adreson al eksterlandano, oni donas la aŭstralian nomon! Kaj oni ne kutime Esperantigas la nomojn de urboj, kiuj ne estas ĉefurboj, kvankam se okazas tutaŭstralia kongreso en alia urbo, estas tiam konvene uzi Esperantan formon, ekzemple "Laŭncestono"!

Mi volonte konfesas mian pekon, skribinte "La Blua Montaro", kaj eble "La Rivero, nomita Murray" estas en la sama kategorio, kaj oni povus diskuti "La Vojkruciĝo" (The Cross). La mapo sur paĝo 2 de AEV, kiun mi adaptis el la mapo en Aŭstralio, Lando kaj Popolo ja havas Blua Montaro, kaj Murray-r., Pacifika Oceano, Koral-Maro, kaj aliajn utilajn modelojn, sed bedaŭrinde mi ne aranĝis sur la mapo la Esperantigon de la ĉefurboj, eĉ de Darvino kaj Kanbero, kiuj ŝajne estas akcepteblaj.

Miaopinie, ne multe gravas, ĉu ĉiuj fakaj neologismoj aperu en PIV.

Mi esperas, ke kelkaj indiĝenaj vortoj, kiaj bandikuto, bilabongo, diĝeriduo, koroborio, kukaburo, valaruo kaj vumero, estos enmetitaj, kaj ankaŭ ĵarro aŭ ĵaralo, rozelo, kaj telopeo (pro la fakto, ke ĝi estas la nomo de fama gazeto!). PIV ne estas senerara - la listo de kontribuintoj al la Suplemento nomas min akademiano! - Sed ĝi estas grava konsultlibro por la Esperantistaro kaj mi ja esperas, ke en la 2a eldono, aŭ suplemento aperos la ŝtatoj de Aŭstralio, kune kun iliaj ĉefurboj, en la formo en kiu ili nun aperas en AEV. ◙

|Postkomento de la Redaktoro: Kvankam la ĉisupra "respondo" estas tre longa, mi opinias ke ĝi meritas nemallongigitan presiĝon pro sia kontribuo al la esperanta filologio. Mi devas tamen pro spacomanko prokrasti la planitan aperon de komentoj de Alan Tousey pri la recenzo de AEV, kiu kelkrilate diskutas aliajn aspektojn, kaj foje malakordas kaj kun D-ro Harry kaj kun Marcel Leereveld. Ĉar estas malverŝajne ke detalaj ekzameno kaj diskuto de AEV aperos aliloke, mi opinias ke TAE estas la taŭga loko por tia diskutado, kaj mi petas pardonon de legantoj kiujn ne interesas la temo. Kiel kvazaŭmildigilon por ili ni dissendas kun ĉi tiu numero de TAE la biografion de nia nun morta tamen ankoraŭ tre honorinda eksredaktoro F.R. Banham.|

o-o-o

RESPONDOJ POR LA CITAĴKVIZO

1.c; 2.f; 3.b; 4.ĉ; 5.g; 6.a; 7.d; 8.h; 9.e; 10.ĝ

RESPONDOJ POR "PROVU VIAN VORTOSCION"

1.c; 2.b; 3.a; 4.c; 5.1; 6.b; 7.b; 8.1; 9.c; 10.a; 11.a; 12.b; 13.b; 14.a; 15.c; 16.b.

o-o-o

DEZIRAS KORESPONDI

27-jara impostisto kolektas nestampitajn kaj komplet-seriajn poŝtmarkojn kaj ceterajn poŝtaĵojn pri Esperanto, internacia jaro, monda tago, hundoj, ktp. Mi preferas poŝtmarkblokojn kun birdoj kaj mondfamaj pentraĵoj. Mi povos interŝanĝi ilin kontraŭ ĉinaj filatelaĵoj laŭ via deziro. Adreso: Shan Xianhuay, 130300 Dehui Xianwei Dangxiao, Jilin, Ĉinio/Zhongguo.

The Australian Esperantist

Numero 267 MAJO-JUNIO 1991

Registered by Australia Post
Publication no. UBG 2488



Spertoj: II (Donald Broadribb) ... p.3
Dek Sturmoj (Niĉjo Nicholas) ... p.9
Kiu Diris Tion? (Ralph Harry) ... p.10
Recenzo: Profilo de Zhou Enlai (rec. Harry) ... p.11
"La Boŝo" - etimologio (Brian Fox) ... p.13
Recenzo: Aspektismaj Reguloj + Komentoj pri Aŭstralia-Esperanta Vortaro (Alan Towsey) ... p.15
Nekrologo: Edward Carson Thomas ... p.21
Diversaj Informoj ... p.22
English Supplement

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

Oficiala organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. Telefono: (09) 574 1307. Fax: (09) 574 1298.

Prov. Prezidanto: Justice K. Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Vicprezidanto: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne Vic 3001.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley WA 6102.

Libro-Servo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

Prov. Prezidanto de la Ekzamen-Komitato: Donald Broadribb (adreso supre).

P.R.O. (Oficisto pri Rilatoj kun la Publiko): Dennis Murphy, 79 Binnalong Rd, Old Toongabbie NSW 2146

Membreco: $25 por individuo, klubo kc.; $30 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso); $15 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto aŭ al la Libro-Servo.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adresslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian adreson aŭ/kaj nomon.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Limdato por ricevo de presotaĵoj por la venonta numero: 1 julio.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST "ni vere bezonas artikolon pri... "? Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, Sercbildon. Ni ĉiuj volos legi ĝin! Preparante la tekston, bonvolu atenti la ĉi-sekvajn postulojn: la teksto devas esti klare tajpita, per nova rubando kaj kun duobla spaco inter la linioj kaj marĝenoj de almenaŭ du centimetroj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netajpitaj tekstoj estos malakceptitaj. Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone ĝi povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa.

SPERTOJ
(2)
de **Donald Broadribb**

La sekvanta historieto okazis frue en la 1960oj. Mi decidis reprodukti la tekston de la kvin leteroj (kiuj estas plene aŭtentikaj) sen modifo, kun unusola ŝanĝeto, nome ke mi ŝanĝis la nomojn de la verkinto kaj de la lokoj. La leteroj estis originale parte en Esperanto, sed plejparte en Geoglosa, lingvo inventita de la aŭtoro de la leteroj. Mi reproduktas la tuton en Esperanto, do grandparte tradukis la leterojn.

1

Mezdezerta Aerarmea Bazo
Arizono, Usono
La 19an de julio, 195–

Kara Don,

Nu, eventoj ja okazas rapide! La pasintan sabaton mi trovis perfektan situon por hidroponika* kultivejo. La loko estas proksimume kvin mejlojn de la Bazo. Oni vendis ĝin malkare ĉar efektive ĝi estas nur peco de la dezerto. El la biblioteko mi prunteprenis librojn pri hidroponiko, kaj laŭ ili jen precize la kondiĉoj plej favoraj por tia kultivado. Sed tio estas nur la unua parto de mia sciigo. La grava parto estas ke mi retiriĝos el la aerarmeo kiam ĉi tiu periodo de servo estos finita en januaro. Tio donos al mi sufiĉan tempon por plenpretigi la hidroponikejon kaj mi povos fondi mian unuan kibucforman komunumon. Ĝi estos plene memsufiĉa kaj per la mono gajnota per vendo de la legomoj ni povos aĉeti konstrumaterialon por pligrandigi la komunumon.

Kio inspiris min estis miaj spertoj en Teksaso. Mi jam skribis al vi ke dumpaske mi vizitis Dalason esperante konvinki la eklezioju tie ke ili subtenu komunumon. Mi kredis povi konvinki la Metodistojn kaj eble kelkajn aliajn grupojn. Sed ĉiuj timas ion ajn novan. La malnovaj eklezioj estas tute ne inspiritaj. Mi decidis ke mi devos fondi novan eklezion. Ĝi estos nomata la Nova Apostola Ordeno, kaj la komunumo estos esenca parto. Unu el la ĉefaj mankoj en la aktualaj eklezioj estas ke ili ne penetras la tutan vivon, male al la originala intenco. Mi volas diri: oni ne scias kiam ellitiĝi matene, kiam preĝi, kiujn

*Hidroponiko = kultivado de plantoj kies radikoj ne estas en la tero sed en speciala nutra likvo.

vestojn porti. Vi memoras kial mi unuafoje aliĝis al la Aerarmeo antaŭ dekkvin jaroj, ĉu ne? Mi vidis grandegan afiŝon dirantan "Vi neniam devos denove fari eĉ unu decidon sola! En la Aerarmeo NI PRIZORGAS VIN!" Sed mi ne intencas re-aliĝi al la aerarmeo. Mi komprenas nun ke devas esti ankaŭ spirita kvalito.

La Bruderhofanoj* havas la ĝustan celon. Ili unuigas laboron kaj adoradon, kaj ĉiutage listo diras precize kion ĉiu persono devas fari tiutage. Mi multon esperis en la Bruderhof-komunumo proksima al Filadelfio. Sed ilia kontraŭintelektismo seniluziigis min. Ili tute ne havas bibliotekon kaj malpermesis ke mi legu librojn. Mi kredas ke menslaboro estas egale valora kiel korpa laboro, oni devas fari ambaŭ. La celoj de la Bruderhofanoj estas ĝustaj. Ĉiu laboras sur la kampoj, faras brikajn murojn por novaj konstruaĵoj, laboras en la kuirejo, komune adoras, kaj tiel plu. En mia komunumo ankaŭ estos spefica tempo kiam la anoj devos studi. Mi intervjuos ĉiun membron antaŭ lia aniĝo kaj mi decidos kion li devos studi, kaj mi certigos ke estas taŭgaj libroj por tio en la biblioteko. Jam estas ligna kabaneto sur la parcelo kiun mi aĉetis kaj mi ennajlis kelkajn bretojn por komenci la bibliotekon. La unua korpa laboro de la komunumanoj estos konstrui dormejon kaj kuirejon.

Mi povos prizorgi la hidroponikejon nur dum la semajnfinoj dum mi restos en la Aerarmeo, do por ne perdi tempon mi jam komencis prepari liturgion por la Nova Apostola Ordeno. Mi preparas universalan lingvon kiun ni uzos en la Ordeno ĉar mi establos komunumojn tra la tuta mondo. Mi instruos ĝin en la komunumo, ĉiu devos lerni ĝin. La lingvo estas nomita Geoglosa. La Liturgio estos presita en paralelaj Geoglosa kaj Angla kolumnoj, tiel ek de la komenco oni povos kompreni la liturgion. Sed ĉiu volos lerni Geoglosan ĉar nur tiel ili povos plenumi siajn devojn en la Ordeno. Mi establos la unuajn alilandajn komunumojn en Peruo kaj Maroko kaj poste en aliaj landoj. Ĉiu ano devos loĝi dum du jaroj en ĉiu komunumo do ili devos scipovi Geoglosan por interparoli.

Mi anticipas ke la komunumo ĉe Mezdezerto estos plena establita post ĉirkaŭ unu jaro kaj duono. Mi komencos la komunumon en Peruo tuj poste, do la unuaj membroj povos tien iri post siaj du jaroj ĉi tie. La komunumoj estos vera monda komunumo, kun unu lingvo, unu religio, unu vivmaniero.

Pacon!

Johano.

---

*Kibucecaj komunumoj fonditaj de kristanoj en Usono kaj aliloke.

2

La 3an de septembro, 196-

Kara Don,

Mi sukcesas multe pli rapide prilabori la Universalan Apostolan Ordenon ol mi anticipis. Mi decidis ke "Universala" estas pli taŭga ol "Nova" ĉar mi repretigas la Ordenon fonditan de la Apostoloj, mi ne komencas novan religion.

Mi kredis ke estus malfacile akiri solenajn episkopajn vestojn sed mi trovis tajloron en Mezdezerto kiun tre interesas la Universala Apostola Ordeno kaj li faros ilin por mi je tre modera prezo. La vestoj estos pretaj por mi morgaŭ kaj mi celebros la Meson jam dimanĉe. Post longa diskutado ni decidis ke mi portos blankan robon kun ora bordero kaj purpura stolo. Ankaŭ estos speciala purpura zono. Mi volis mitron sed la juvelisto diris ke li ne kapablas fari ion tian kaj kiam li telefonis Vestbutikon por Ekleziuloj en Novjorko li trovis ke bona mitro kostas ĉirkaŭ mil dolarojn. La vestoj mem kostos pli ol okcent dolarojn, do mi prokrastos aĉeti mitron ĝis la komunumo estos plene establita kaj ni publike inaŭguros ĝin.

Mi aperigis reklamojn por la unuaj Mesoj en la Mezdezerta Vespera Tagĵurnalo dum la du pasintaj semajnfinoj. Mi esperis povi uzi la Anglikanan preĝejon sed la pastro tie tute rifuzis permeson. Nu, ankaŭ Jesuon oni malpermesis uzi la sinagogojn kiam li komencis predikadi.

Post longa serĉo mi trovis vakan butiketon kaj mi luas ĝin por du monatoj. La lastan semajnfinon anstataŭ prizorgi la kultivejon mi perfarbe skribis UNIVERSALA APOSTOLA ORDENO grandlitere super la pordo. Sur unu fenestron mi gluis afiŝon kiu diras la horojn de la Mesoj. Mi decidis celebri tri Mesojn ĉiudimanĉe, je 8.30, 9.45 kaj 11.00 atm. La Aerarmeo rifuzis permesi min uzi la Bazon kiel kontaktadreson do mi devos atendi ke individuoj vizaĝ-al-vizaĝe kontaktu min dimanĉe. Mi metis keston antaŭ unu fenestron, en kiu estas 500 ekzempleroj de la Liturgio de la Meso en Geoglosa kaj la Angla. Mi kunsendas al vi ekzempleron. Kiam vi ricevos ĉi tiun leteron la unuaj Mesoj estos jam celebritaj!

Pacon,

3

La 17an de septembro, 196-

Kara Don,

La Universala Apostola Ordeno nur tre malrapide disvastiĝas. Mi ne supozis ke estos tiel malfacile interesi la publikon pri ĝi, kaj min

kuraĝigis mia trovo ke ĉiuj 500 ekzempleroj de la Liturgio estis forprenitaj. Mi anticipis grandan homamason ĉe la Mesoj. Domaĝe, kiam venis la horo por la unua Meso, neniu persono alvenis. Tamen mi celebris la Meson malgraŭ tio.

Al la dua Meso venis nur unu maljunulo. Li estis iomete ebria, sed mi pensis, nu, el tiaj personoj Jesuo faris siajn disĉiplojn: ne el la riĉuloj sed el la personoj kiujn la socio ne volis agnoski. Do mi recelebris la Meson kaj eĉ inkludis specialan preĝon por lia spirta bonfarto. Estis tre ĝojige trovi ke mi povas improvize paroli en Geoglosa. Mi estis tre malcerta pri la komunio, ĉar mi rapide trovis ke la viro estis pli ol "iomete" ebria. Mi decidis doni al li nur la hostion kaj nur mi mem trinkos la vinon. Domaĝe, ĉar mi aĉetis plurajn botelojn da "Mogen David"-vino.* Rabeno informis min ke tiutipan vinon oni uzis en la Paskmanĝo dum la epoko de Jesuo. Sed mi ne bezonis dubi, ĉar la viro stariĝis kaj elstumblis kiam mi estis fininta nur la komencon de la Meso.

Kiam estis la horo por la tria Meso neniu alvenis, do mi decidis ne celebri ĝin kaj anstataŭe iris al mia hidroponikejo por prizorgi la plantojn kiujn mi devis iom neglekti dum mi fondis la Ordenon.

Merkrede vesperon mi vizitis domluigiston kaj luis malnovan domon kiu estos rifuĝejo por senhejmaj viroj. Ili estos la grupo el kiu mi rekrutos miajn unuajn komunumanojn. Mi loĝos tie sabatnoktojn anstataŭ ĉe la hidroponikejo. Dio favoris min! Tuj kiam mi foriris de la oficejo de la domluigisto junulo sur la strato petis de mi dolaron. Mi komencis doni al li la petitan dolaron, sed tuj mi rimarkis liajn nekutimaspektajn okulojn. Do mi pensis, nu, jen jam la unua rekrutoto! Do mi komencis konversacii kun li kaj li diris ke li nomiĝas Joĉjo kaj estas orfo kaj estas senhejma. Mi diris ke li povos senpage loĝi en mia rifuĝejo, kaj mi porpagos manĝaĵojn por li se li prizorgos la domon dum semajntagoj. Li diris ke li preferas monon, sed mi diris ne, mi donos al li nur manĝaĵojn ĉar li eble elspezus monon por toksikoj** aŭ biero. Ni haltis ĉe manĝbutikego survoje al la rifuĝejo kaj aĉetis sufiĉon por li ĝis la venonta semajnfino.

Joĉjo montriĝis ĝuste tia homo, kian mi bezonas por la rifuĝejo. Li diris al mi la nomon de advokato kiun li konas kaj kiu ofte defendas gejunulojn kiujn la polico akuzas pri toksikuzado, kaj la advokato siavice helpis min eniri la homoseksualan subkulturon. Sabatvesperojn mi

---

*Tre dolĉa koŝera vino populara en Usono.

**(PIV-Sup.) = opio, heroino, kokaino, kc.

uzos ĉe la drinkejoj kiujn tiaj homoj frekventas, por rekruti rifuĝejanojn.

Pacon!

4

UNIVERSALA APOSTOLA ORDENO

Ĉefepiskopo Johano T. Robertson
Poŝtkesto 307
Mezdezerto, Arizono

La 15an de oktobro, 196-

Kara Don,

Mi kunsendas reviziitan tekston de la Liturgio. Vi trovos en ĝi plurajn tekstŝanĝojn kaj ankaŭ la plejnovan formon de Geoglosa. Mi devos ankoraŭ pliajn ŝanĝojn fari sed mankas al mi tempo nurmomente ĉar mi devas uzi mian tutan libertempon ĉe la Rifuĝejo kaj serĉante rekrutotojn. La domo estas sufiĉe granda por nur ok personoj, sed enloĝintoj forlasas ĝin neatendite rapide. Sekve mi devas konstante trovi novajn rekrutojn.

La reĝimo en la rifuĝejo estas tre rigora. Bildo de Jesuo ridetanta estas sur la orienta muro de ĉiu ĉambro. Trifoje dum ĉiu tago la viroj devas surgenuiĝi antaŭ la bildo kaj preĝi en Geoglosa. Mi kredas ke per tio ili transmetas sian homoseksualan amoron al Jesuo anstataŭ al aliaj viroj. Kompreneble mi mem same agas, por kuraĝigi la virojn. Vi ne povas imagi kiom ekstaza estas la sperto!

Kelkaj neanticipitaj problemoj ekaperis. Mi ne sciis ke Joĉjo fugas de la polico. La polico trovis ke li logas en la rifuĝejo kaj venis por aresti lin, hieraŭ. Ili ankaŭ traserĉis la ĉambrojn kaj trovis grandan kvanton da marifuano kaŝita en tirkesto en unu ĉambro. Mi severe ordonis la virojn nepre neniam porti narkotikojn en la domon, sed iel mi ne rimarkis tiun kaŝitan kvanton kiam mi lastafoje kontrolis la tirkestojn en la dormĉambroj. Hodiaŭmatene policanoj revenis kaj informis min ke mi devos stari antaŭ la juĝisto en la distrikta tribunalo la venontan lundon. Oni pretendas ke mi seksatencis junulon (Joĉjon), kaŝis de la polico krimulon serĉatan de la polico (Joĉjon), & posedas narkotikojn.

Mi intencis korporaciigi la Ordenon, ĉar tiukaze mi ne sola respondecus pri kio okazas en la rifuĝejo. Mi petis amikon de Joĉjo, advokaton, tuj prepari korporaciigon de la Ordeno. En Arizono eklezio devas havi almenaŭ du legitimitajn pastrojn por fariĝi korporacio. Mi do petas vin fariĝi Episkopo en la Ordeno. Kiel vi vidis surkape de ĉi tiu paĝo mi jam estas Ĉefepiskopo por ebligi ke estu ankaŭ ordinara epis-

kopo. Vi estos Episkopo por Aŭstralio kaj Joĉjo estos ordinara episkopo por Nordameriko tuj kiam li lernos reciti la liturgion en Geoglosa.

Ne ĝenu vin mia arestiĝo. La juĝisto senkulpigos min kiam li sciiĝos ke mi agas laŭ instrukcioj de la Sankta Spirito. De nun mi devos pli zorge kontroli la dormĉambrojn. Mi kredas ke la juĝisto liberigos Joĉjon se la advokato garantios prizorgi lin. Mi intencas mem adopti Joĉjon tuj post la fino de ĉi tiu fiaskonta proceso.

Pacon!

5

La 8an de novembro, 196-

Kara Don,

Mi denove estas ĉe la Bazo. Kiam mi iris al la tribunalejo mi sciiĝis ke la juĝisto jam estis kontaktinta la Komandanton de la Aerbazo kaj aranĝis resendi min al li por armea proceso. Tuj kiam eble mi telefonis la advokaton, kiu akceptis defendi min en la proceso. La unua parto de la proceso daŭris nur 20 minutojn. Oni postulos raporton de psikiatro kiu ekzamenos min ĉiposttagmeze.

La advokato diras ke ili havas nenian pruvon por validigi la akuzojn. Se la psikiatro raportos favore, la advokato diras ke li povos peti por mi simplan eksigon el la Aerarmeo. Ekzistos neniu konvikto. Tio estas tre grava, ĉar en Arizono neniu konviktito rajtas adopti, kaj mi fervoregas adopti Joĉjon. Mi kredas ke mia plano inaŭguri la komunumon jam la venontan januaron estis tro nematura. Post la proceso mi kaj Joĉjo loĝos ĉe la hidroponikejo kaj ni prizorgos ĝin ĝis ni regule rikoltos sufiĉon por nutri komunumon. Tiam mi povos denove komenci serĉi membrojn por la komunumo, kaj mi tre zorge ekzamenos ĉiun rekruton antaŭ ol permesi lian eniron.

Venas nun la psikiatro.

Pacon!

.....

Post la ĉisupra letero mi neniam ricevis plian komunikaĵon de Johano.

DB

du strofoj el

DEK STURMOJ

de **Niĉjo Nicholas**

(Inspirita de la milito kontraŭ Irako)

6
Ho Dio ŝiru mian koron,
Ho Dio disponardu mian sternon,
bot-al-pulme. Se mi ne ploros,
Ho Dio eltranĉu larmojn per razilo.

Ie iu funebras
je sia ekflama mondofino.
Se mi arogas homecon,
Ho Dio min kunplorigu.

7
Ŝtormo ŝtormŝtorme
Arboj disdisŝiritaj
Perfajroforne

Sturme ŝtormsturme
Homostoj krevbatataj
Sangŝprucas ĉure

Hak kverko falu
Hak kruro Hak brak manplen-
-i da viscere

viskoz kaj viŝ kaj
vind post vund kaj vol vom vor
vevoĉ kaj vaku

KIU DIRIS TION?
(citaĵkvizo 4)
de **Ralph Harry**

Jen kelkaj eminentuloj, citaĵoj el kies verkoj, kaj vortoj, pri Aŭstralio kaj aŭstralianoj sekvas. Penu parigi la personon kun la spritaĵo. La solvo aperas sur p27.

(a) D.H. Lawrence
(b) Sir Henry Parkes
(c) J.B. Priestley
(ĉ) George Bernard Shaw
(d) Anthony Trollope
(e) Mark Twain
(f) Jules Verne
(g) Patrick White
(ĝ) P.G. Wodehouse
(h) Oscar Wilde

1. Cusins estas bonegulo - neniu divenus, ke li naskiĝis en Aŭstralio.

2. Ĉi tiu lando, laŭsupoze altkultura, estas ankoraŭ, ho ve, kolonia ŝafbieno.

3. La karmezina fadeno de parenceco kunligas nin ĉiujn.

4. Ĉi tiu estas la plej stranga lando de la mondo.

5. Mi kredas, ke tiu lando kun absurda formo situas precize sub la planko de onia karbkelo.

6. Estas preskaŭ neniu urbo meritanta la nomon urbo, kiu ne havas sian propran ĉevalkurejon, kaj estas multaj kurejoj kie ne estas urboj.

7. Tiuj bravaj vervaj konstruantoj de la imperio estis ĉiam malavaraj, donacemaj, gaje senpensaj pri elspezoj.

8. Iliaj urbegoj memorigis min pri Wolverhampton post longa seka periodo.

9. La historio de Aŭstralio ne ŝajnas, legate, historio sed kvazaŭ la plej belaj mensogoj.

10. Neniu en Aŭstralio sin sentis pli bona ol iu alia persono, aŭ pli alta; nur pli bone pagata.

PROFILO DE ZHOU ENLAI

recenzas **Ralph Harry**

P r o f i l o d e Z h o u E n l a i, de Percy Jucheng Fang kaj Lucy Guinong J. Fang, tr. Wang Chongfang. Beijing, Ĉina Esperanto Eldonejo, 1989. 254p, 36p da fotografaĵoj. Prezo: $10 de la AEA Libroservo.

Ĉi tiu estas notinda aldono al la jam aperintaj biografioj en Esperanto de eminentaj personoj - Esperantistoj, filozofoj, bonfarintoj kaj politikistoj diversspecaj. Kelkaj estis verkitaj en la internacia lingvo kaj poste tradukitaj en aliajn lingvojn, ekzemple Vivo de Gandhi de Privat, kiun angligis Dorothy Threlfall de Aŭstralio. Kelkaj eldoniĝis unue en nacia lingvo kaj estis tradukitaj en Esperanton, ekzemple Tito de Dedijer.

Profilo de Zhou Enlai estis verkita en la angla lingvo kiel kontribuo al la deka datreveno de lia forpaso en 1976. La aŭtoroj, Percy kaj Lucy Fang bone konas kaj ĉinan kaj "okcidentan" kulturojn. Percy naskiĝis en Fiĝioj en 1914, kaj studis en Quinghua-Universitato kaj Londona Ekonomika Kolegio. Lucy naskiĝis en Jiangsu-provinco kaj ankaŭ studis en Quinghua. Ili pasigis la plejparton de la militaj jaroj en Hindio, kaj post 1945 studis kaj laboris por Brita Brodkasta Korporacio en Londono sed reiris al Pekino en 1949 kiel ĵurnalistoj de Pekina Revuo kaj Radio Pekino.

La Profilo estas malpli analiza biografio ol panegiro de heroo, en la formo de aro da legendoj kaj anekdotoj pri lia vivo, kiel junulo, edzo, partiano kaj amiko-protektanto de la viktimoj de la Kultura Revolucio.

Ja estas dupaĝa kroniko, kie troviĝas listo de la ĉefaj eventoj en la vivo de Zhou Enlai - kiel li gvidis la armitan leviĝon de Ŝanhajaj laboristoj en 1927, kiel li faris subteran revolucian laboron en Ŝanhajo kaj aliaj lokoj, kiel li helpis organizi kaj gvidi la famaN Longan MarŝadoN al Yan'an (1934-1935), kaj kiel li reprezentis la komunistan flankon en intertraktado kun Ĉjang-KajŝekkaJ estis ĉefa intertraktanto de la Partio dum la tempo de la Komunist-Kuomintanga Unuecfronto kontraŭ la japana agreso. La profilo enhavas andekdotojn de tiuj periodoj.

→

Pli detalan bildon ĝi donas de liaj rilatoj kun siaj kolegoj, kaj malamikoj, kaj la ĝenerala publiko, kiel ĉefministro de la Popola Respubliko kaj kiel la ministro respondeca pri eksterlandaj rilatoj. La plej detala, kaj certe tre interesa ĉapitro rakontas kiel, dum la sovaĝeco de la "Kultura Revolucio" (1966-1976) Zhou faris sian plejeblon por teni la registaron kaj ekonomion funkciantaj kaj samtempe penis protekti tiujn, kiuj estis maljuste persekutataj de Lin Biao kaj la "Kvarpersona Bando".

Aparte interesa estas la rakonto de la "Ĝeneva Konferenco" pri Koreo kaj Hindoĉinio en 1954. Mi estis tiam la Aŭstralia Ĝeneral-Konsulo en Ĝenevo kaj povas atesti, ke la problemo de manpremoj kun Zhou Enlai, kiujn rifuzis John Foster Dulles kaj Generalo Walter Bedell Smith ne estas troigita. Mi mem devis atentigi Kavaliron Douglas Copland, kiu estis Ambasadoro en Ĉinio antaŭ 1949, ke vizito al Zhou, kun kiu li deziris konversacii, povus esti rigardata kiel rekono de la Popola Respubliko, eĉ kvankam Copland estis en Ĝenevo ne kiel partoprenanto en la Konferenco sed por kunveno de la Internacia Labor-Organizo.

Tiu afero ankaŭ ebligis al mi kontroli la tradukon de Profilo, ĉar la aŭtoroj citas memorajojn de Henry Kissinger, kiu dum sia sekreta vizito al Pekino trovis, ke oni plurfoje aludis la "slight" (ofendon) de tiu rifuzo de Dulles en Ĝenevo. Estas de tempo al tempo restajoj de la originala angla, sed la stilo estas bona kaj la esprimoj zorge elektitaj: kun vizaĝo veterskulptita; tuj kaj tute arestitaj; la taskoj, kiujn la lando alvizaĝis; refutanto en la debat-teamo; eburtura tipo; partio-purigadon; legendeca heroo; kio estis al li taskita; la komforto al kiu li kutimis; zorgemeco estis patrico (hall mark) de Zhou Enlai; ektondro el blua ĉielo; veprej brovoj; malgloran rolon; murskribaĉo; rigora insistanto; socioskorio (scum); protektato (protégé); transturni novan paĝon; liaj vortoj pravis kaj trafis; kostuma provludo; prifajfis kaj malaklamis la vizitantojn; preturkuran (fleeting) ridegon; ripozĉambro (lounge!); ĉesigo de militagoj (ceasefire); paŝoteni kun la revolucio; meti dampilon sur la fajran bombaston - kaj multaj aliaj.

Mi vizitis Pekinon dum la Kultura Revolucio kaj vidis la kontraŭkonfuceajn afiŝojn kaj la polvon sur la jurlibroj en la universitata biblioteko, sed Profilo de Jhou Enlai donis al mi multe pli klaran komprenon de tiu periodo, kaj de la signifo de Tian'anmen-placo en la historio de Ĉinio. Mi tutkore rekomendas ĝin.

LA BOŜO THE BUSH DIE BOS HET BOSCH

Etimologio kaj historio de la Sud-Afrika, Aŭstralia, Nov-Zelanda vorto "bush" kaj ĝia Esperantigo

de **Brian Fox**

Nederlandanoj establis Kab-Kolonion ĉe la suda kabo de Afriko en la jaro 1652 kiam Anglio ankoraŭ parolis kiel Ŝekspiro. En Nederlando ekzistis nur du regionoj: urboj kaj kamparo. Tamen en Kab-Kolonio ekzistis kvar regionoj: urbetoj, kamparo, montoj, kaj la nekultivata nesenveprigita regiono. Tiun kvaran regionon oni nomis "het bosch" kiu tiam tradukiĝus en la anglan kiel "the woods". Oni ankaŭ nomis la indiĝenan popolon, kiu tiutempe loĝis tie, "boschman", vorto kiu jam Esperantiĝis per "boŝmano".

Britio prenis Kap-Kolonion en 1795 kaj tradukis "bosch" per "bush" ĉar ĝi simile sonis kaj la regiono ne vere similis al la "woodlands" de Anglio aŭ la "heath" de Skotio. Plue, en la angla lingvo oni diferencigas inter la nenombrebla substantivo "the bush" (the woods) kaj la nombrebla substantivo "two bushes" (two shrubs).

En la tiama nederlanda lingvo de Sud-Afriko oni literumis "bosch" kaj prononcis "boŝ", sed en la nuna afrikansa lingvo oni skribas kaj prononcas ĝin "bos". Kiam la eŭropidaj koloniantoj migris norden ili nomis la malaltan kampejon "laeveld/lowveld", kaj la altan kampejon "hoëveld/highveld". La regionon nekultivatan pro dormomalsano kaj malario ili nomis "bosveld/bushveld" aŭ simple "die bos" "the bush".

Ĉi tiu vorto "bush" ankaŭ migris norden al Rodezio kaj orienten al Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Dum la libera milito en Zimbabvo la gerilanoj nomiĝis "bush soldiers". La vorto bush eĉ foje uziĝas en Usono kaj Kanado kun la sama signifo: eksterurba kaj nekultivata regiono. Por mi la vorto "boŝo" tute taŭgas por tia regiono.

En Afriko la boŝo estas kovrita de herbaro, dornarbustoj, veproj, arboj kaj hufuloj. En Aŭstralio per herboj, arboj, veproj kaj marsupiuloj. En Nov-Zelando per arbaroj, veproj, kaj birdoj. Foje ŝajnas ke oni malsame uzas la anglan vorton "bush" en la tri landoj: en Afriko "sovaĝejo", en Aŭstralio "eksterurba", en Nov-Zelando "arbaro", sed ili samas en tiu kvara regiono: eksterurba nekultivata.

NB: Brian Fox estas nov-zelanda ekssudafrikano. - la Red.

BIBLIOTEKO DE AEA

de **Ralph Harry**

Kiel sciate, la Biblioteko celas ĉiam havi du kompletojn de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST, unu bindita kaj la alian kun apartaj numeroj por faciligi kopiadon, se necese, por provizi informon. Por similaj celoj ni kolektas duoblan kompleton de MONATO. Sed mankas en la dua kompleto de MONATO la sekvantaj numeroj:

1988, numero 1 (januaro)
6 (junio)
7 (julio)
8 (aŭgusto)
1989, numero 1 (januaro)
2 (februaro)
5 (majo)
6 (junio)

Eble iu leganto povus donaci tiujn numerojn al la Biblioteko. Aŭ oni povus pruntedoni ilin al la bibliotekisto, kiu povus fari kopiojn. Pli bone estus, ke oni unue informu min, antaŭ ol sendi la numerojn.

La estonteco

Mi esperas, ke mi povos daŭrigi mian laboron por la biblioteko dum unu-du jaroj, sed ni bezonas personon, prefere en Kanbero, kiu pretus prizorgi la bibliotekon, kompletigi la katalogon kaj katalogi kaj indeksi la novajn librojn kaj periodaĵojn. Se iu pretus helpi nin kaj poste transpreni la respondecon, tiu bonvolu anonci sin. La Biblioteko estas esenca ilo por aŭstraliaj Esperantistoj, kaj ni nepre devas konservi, pligrandigi kaj pliboniĝi ĝin.

Ralph Harry, komisiito por la Biblioteko
319 Bayview Village
Bayview NSW 2104

o-o-o

EKSPLIKETO

En la satira recenzo pri la "6a eldono de PIV" eldonota en 2083, en nia januara numero, "gigabajto" = miliardo da bajtoj, "megabajto" = miliono da bajtoj.

WINDOW ON THE WORLD

In unexpected places

A reader discovered in Isabel Allende's The House of the Spirits the following unexpected passages:

> The pendulum's autonomous movement pointed to the letters, forming messages in Spanish and Esperanto, which proved that these, and not English, were the only languages of interest to beings from other dimensions, as Clara wrote in letters to the ambassadors of the English-speaking powers. They never answered her, and neither did the various ministers of education whom she wrote in order to explain her theory that instead of teaching English and French, which were languages for sailors, peddlars, and money lenders, the schools should insist that all the children in the country study Esperanto.
>
> (p.307).

> ... during recess she would sit in the farthest corner of the courtyard so no one could see her, trembling with the hope that someone would invite her to play and simultaneously praying that no one would notice her. Her mother had warned her not to try to explain her Uncle Jaime's medical texts, and not to tell the teachers about the advantages of Esperanto over English. Despite these precautions, from the very first day, the headmistress had no trouble discerning the eccentricities of her new pupil ... and when she was certain of the diagnosis she summoned Blanca Trueba to her office and explained as politely as she could that the child was simply not cut out for a British education ...
>
> (p.344)

MONTREAL

Candidates are being sought for the Tim Einihovici Memorial Prize to be awarded in July 1992. It consists of an all expenses paid trip to Montreal, Canada, to participate in the World Esperantist Youth Organisation's (T.E.J.O.) annual congress. The competition is open to all young men and women aged 17-29 who have begun the study of Esperanto this year and obtain a pass with honours in at least the Elementary Examination conducted by the Australian Esperanto Association. Interested persons please contact Idyss Einihovici at 88 Newry St, Floreat Park WA 6014. (By the way, Montreal is in French Canada, so don't count on English to help you out!)

NON-ROCK MUSIC

(Esperantists are not always staid and stodgy. The following article is nearly a year old but only recently arrived on your editor's desk. It is a report by Andrzej Broda of Poland, and was originally published in Esperanto in Rok-Gazet' issue no. 1 for 1991.)

INTERNATIONAL FESTIVAL OF ESPERANTO CULTURE

From July 4-9, 1990, the International Festival of Esperanto Culture was held in Budapest, organised by the Hungarian Esperanto Association in the Làng House of Culture. According to the official announcements the festival was to include a conference on "Aims and strategy of the Esperanto movement", and was intended as an alternative to the 75th International Esperanto Congress being held in Cuba which many people could not attend.

By invitation of the HEA a nine-person delegation from the Esperanto Youth Club of Koszalin (Poland), which in turn was mostly composed of the Young Esperantists' Singing Ensemble "Espero", was able to attend and to actively contribute to the arts program... I will limit my impressions to the musical part of the program. The evening of July 6 musicians and magicians gave their presentation on the stage of the House of Culture. The program began with a professional Hungarian opera singer whose repertoire consisted of songs by F. Schubert in Esperanto.

Though not being especially interested in this branch of the arts I nevertheless attended her recital and found it rather interesting. There is certainly an advantage in having a variety of musical styles in Esperanto. It is worthwhile supporting any attempt to make our culture more colourful but that does not imply any let up in the attempt to raise its level.

This was followed by the Young Esperantists' Singing Ensemble "Espero" which appeared on stage twice as if forming the framework for the the evening program. It presented its Esperanto pop music... Its intent was to entertain, and to some extent amuse, the public, but not to let the listeners forget some values that cannot be bought.

Because of the prolonged absence of Anita Nowakowiska, our "master

of the synthesiser", the ensemble had to be accompanied by a tape. Two magicians from Hungary and Czechoslovakia shared the program with "Espero", a rather novel idea.

After the second and third parts featuring "Espero" a pleasant Hungarian chorus took the stage, directed by Wieskaw Tomaszewski though he is not from Budapest. The last item on the program was felt by some to be the most exciting. A Hungarian singer sang, among other songs, "Ino en am'" ("Woman in Love") by Barbara Streisand, which aroused special interest because of her emotion filled version. It was very much worth waiting for this item.

Sunday evening was devoted to puppet theatre...

ESPERANTO RECORD ALREADY A COLLECTORS' ITEM!

In the USSR last summer (=July-September, there) a new LP in Esperanto was released by Melodiya, The USSR's record manufacturer and distributor. It had been intended to be ready in 1987 but for reasons unknown its release was held up for three years. Pre-release sales (4000 in the USSR and 1000 foreign) meant that none found their way to the open market, it is already a rare, collectors' item.

INTERNATIONAL BANKING VIA ESPERANTO

One of the most perplexing problems of our century has been to enable private individuals to send money between countries in relatively small amounts, e.g. to purchase books, pay fees etc. Many countries prohibit private individual international transactions. Others, such as Australia, allow such transactions but at a very high cost. For example an international cheque purchased at a bank, or an international money order from a post office commonly attracts a fee of $5-$10 as well as, usually, a relatively unfavourable rate of exchange. For many decades it has been asked whether Esperanto, which is used in most countries of the world, might be of use in solving this problem for the small purchaser.

The first formal attempt at an Esperanto based system of international currency exchange was developed by Herbert F. Höveler (better known under his pseudonym of E. Ĉefeĉ) who opened an international bank

in 1907, in conjunction with a German and a Russian bank. Cheques were issued in a currency system of "spesmiloj", 1 spesmilo = 0.733 grams of pure gold = about $0.50 U.S. at that time. This international bank operated until 1918, when Höveler's death and the First World War made its continuance impossible.

After the Second World War, the Universala Ligo (an Esperanto organisation with its seat in the Netherlands) in 1959 arranged with the Netherlands Mint in Utrecht to mint coins with values of 1, 5, 10, and 25 "Stars", most in quantities of 10 000, some made of copper (for general use) and some of silver (for collectors). However no arrangements were made for general purposes usage.

At present still another attempt at an international system of banking arrangements for ordinary individual accounts is under trial by the international Universala Esperanto-Asocio, also with its seat in the Netherlands. Every ordinary member of the UEA automatically has an account with the UEA, as do most national Esperanto organisations, publishers and commercial enterprises. Sums can be credited to your UEA account by payment in local currency to the local UEA agent (in Australia this is the AEA Libroservo, PO Box 230, Matraville NSW 2036) which is then credited (in Dutch guldens) to your UEA account. The UEA sends regular statements of account to those with a balance in an account with them. It remains to be seen how effective this new attempt at international banking for ordinary individuals will be. At present the UEA levies no bank charges.

(Based on an article by William Harmon published in the UEA's magazine Esperanto February 1991.)

THE CATHOLIC MASS

Although Mass has been celebrated in Esperanto for many years, until now there has never been an officially authorised text of the Mass. In November, 1990, final approval was given by the Vatican to the proposed Roma Meslibro, Roma Legaĵaro, and Ritaro por la Meso, subject to the "Norms for the Celebration of Holy Mass in Esperanto" - which, however, exclude the sacraments of confession, marriage, and baptism.

(From a news note in Esperanto, February 1991.)

ASPEKTISMAJ REGULOJ

recenzas **Alan Towsey**

Aspektismaj Reguloj pri la Uzo de Verbaj Formoj en Esperanto, de Olav Reiersøl. 74 A4-paĝoj. Eldono de la aŭtoro, Olav Reiersøl, Torødveien 109, N-3135 Torød, Norvegio.

Kiam mi ricevis de la Redaktoro de TAE ĉi tiun libreton por recenzo, mi pensis: "Ho, hm, ankoraŭ unu libro pri la pasivaj participoj -ata, -ita, plua aldono al tiu jam vasta biblioteko da verkoj pri la ĝusta uzo de tiuj participoj."

Preskaŭ certe la plej multaj ordinaraj Esperantistoj scias nenion aŭ malmulton pri tiu multego da skribaĵoj pri problemo kiu ne ekzistus se oni zorge studus kaj logike interpretus la klarigojn en la Fundamenta Gramatiko de Esperanto kaj la ekzemplojn en la Ekzercaro - kaj eĉ se ili scius, ili egale preskaŭ certe restus indiferentaj antaŭ ĝi.

Kaj se la ekstermovaduloj scius pri ĝi, preskaŭ neniu el ili entreprenus la lernadon de tiel malfacila lingvo! Sed la fakto estas, ke Zamenhof kreis tre simplan lingvon ...

Mi supozas, ke la moralaĵo tirota el ĉio tio estas: neniam lasu (pretendantajn) akademiulojn meti la avidajn manojn sur bonan kaj simplan ideon - ili baldaŭ komplikos kaj ruinigos ĝin! (Same kiel kamelo estas ĉevalo planita de komitato!)

Ĉi tiu libro estas zorga analizo de la nekonsekvenco kaj kontraŭdiroj ne nur inter la "spertuloj" (Kalocsay, Waringhien, Plena Analiza Gramatiko, la Akademio, Lapenna, ktp.), sed ankaŭ ofte inter la propraj asertoj de preskaŭ ĉiu el ili, pri verbaj formoj kaj kategorioj, signifo de verbaj radikoj, kaj (plejparte) la "ĝusta" uzo de la pasivaj participoj.

Multaj el la kritikoj de la aŭtoro estas trafaj, sed kelkaj el ili estas ja harfendemaj, ekzemple lia teda ripetado de "Je kiu tempo?" post asertoj pri "kompletigo". Li ŝajnas preteratenti la malfacilegon formuli nekontesteblajn regulojn pri ajna lingvo.

La libro multe parolas pri "aspektismo", "tempismo" kaj "simpozi-

ismo" - terminoj sensignifaj kaj esoteraj por la plej multaj Esperantistoj, kaj miacopinie neaplikeblaj al Esperanto - kaj kiuj certe neniam eniris la kapon de Zamenhof kiam li kreis la lingvon! Ĝi atakas la "Aspektismon" de la Akademio kaj ties regulojn pri -ata, -ita, kiel malakordajn kaj malklarajn.

Povas esti ... sed la 25an de novembro 1967 aperis Oficiala Komunikaĵo de la Akademio, kiu lasas nenian dubon pri la senco de (ekzemple) frazo citita sur p.27 de ĉi tiu libro el Aktoj de la Akademio I (p.29): "Oni transportis lin en hospitalon, en kiu li estis operaciita" = "They took him to a hospital, where he was operated on". Por esprimi la plus-kvamperfekton (= "... where he had been operated on"), oni do diru (laŭ la supre menciitaj Aktoj, p.29) " ... en kiu li jam antaŭe estis operaciita." Laŭ mia sperto tio ja estas la normala uzado. (Kaj por: "The door was opened when we arrived" oni diru: "La pordo estis malfermita" (aŭ: oni malfermis la pordon) kiam ni alvenis." "The door was open when we arrived" = "La pordo estis nefermita/estis jam malfermita/staris malfermita ... ")

Certe mi ne konsentas kun Gregor (citita sur p.50: 20.10) ke "En Esperanto distingo inter -ata kaj -ita estas afero de stilo, ne de gramatiko", sed laŭ mi Schwartz (citita sur p.19: 6.16) pli pravas dirante: "En multaj" (mi mem dirus: kelkaj) "okazoj oni povas uzi same korekte -ata aŭ -ita. Tiam la elekto estas nur subjektiva afero kaj dependas de la persona vidpunkto."**

Rimarkinde estas tamen, ke la aŭtoro mem ne proponas klarajn regulojn por finfine decidi la aferon! Sed almenaŭ mi ne rimarkis iajn preseraroj ...

Resume: se vi - ordinara, mezklera Esperantisto - volas esti tute konfuzita pri la uzo de -ata, -ita, provu legi ĉi tiun libron! Se aliflanke vi volas uzi la pasivajn participojn ĝuste, simple sekvu la regulon, ke -ata esprimas daŭron (longan aŭ mallongan!) aŭ ripetadon (same kiel la sufikso -ad): "La infano kriegis dum ŝi estis atakata de hundo", kaj ke -ita esprimas kompletigitan, finitan agon ("Ŝi estis atakita de hundo hieraŭ"). Ekzemplo de la Schwartz-a opinio: "La infano kriegis, kiam ŝi estis atakita/atakata de hundo hieraŭ".** Analizu vian penson, kaj skribu aŭ parolu laŭ via propra vidpunkto. Tiam vi malofte eraros, kaj ĉiu vin bone komprenos! →

*Mi memoras, ke, tuj antaŭ la Dua Mondmilito, mi, juna instruisto, provis kiel denaska parolanto de la angla instrui tiun lingvon al grupo da Germanoj ĵus enmigrintaj Aŭstralion. Iun vesperon, iu Germano demandis: "Kia estas la diferento inter: 'I go', 'I am going' kaj 'I do go'?" (La tri formoj de la prezenco de iri en la angla). Mi respondis memfide: "Tio estas tre simpla. Oni uzas 'I go' kiam oni parolas pri ĉiutaga, kutima afero: 'I go to school every day'" ("Mi iras ĉiutage al la lernejo"). "'I am going' kiam la ago daŭras je la momento de parolado: 'I am going to the door now'" ("Mi estas iranta al la pordo nun" t.e. "iranta al la pordo dum mi parolas"). "'I do go' por emfazo: 'I do go to school every day'." La virino pripensis momenton, tiam diris malrapide: "Je-e-es, sed hieraŭ mi aŭdis iun diri: 'I am going to the pictures tomorrow' ('Morgaŭ mi intencas iri al la kinejo')". Mi gratis la kapon, kaj diris iom konfuzite: "Mi plu pripensos la aferon kaj klarigos morgaŭ!" - kaj hejme mi konsultis la regulojn kiel uzi la prezencon en mia gepatra lingvo ... en germanlingva gramatiko de la angla!

Provu ankaŭ difini la diferencon inter little kaj small: a pretty little house; a pretty small house; Poor little boy! (ne small!)

**Komento de la Red.: Eble helpos legantojn legi la tutan ekzemplon donitan de Schwartz: En multaj okazoj oni povas uzi same korekte -ata aŭ -ita. Tiam la elekto estas nur subjektiva afero kaj dependas de la persona vidpunkto. Ekz.: "Dum la foiro la vizitantoj estis transportataj per specialaj verturiloj". Ni vidas la vizitantojn kiel unu tutaĵon, ĉiam renoviĝantan, ĉiutage re-kaj-retransportatan. Mi nomas tion "kolektiva -ata" ... Sed se ni rigardas la vizitantojn kiel unuopulojn, ni diros "estis transportitaj", ĉar por unuopuloj la transportado estis unufoja kaj havis finon. □

o-o-o

AŬSTRALIA-ESPERANTA VORTARO

komentoj de **Alan Towsey**

Kun granda interso mi legis la recenzon de la AEV de S-ro Leereveld en TAE Jan.-Feb. 1991.

Kelkaj el liaj kritikoj estas ja trafaj, kaj mi konsentas, ekzemple, ke eble ledeclignarbo estas pli bona traduko por "leatherwood tree",

aŭ arbarbrulego por "bushfire", kaj tendumfajro por "campfire". Ankaŭ ke mankas veraj tradukoj por kelkaj vortoj, kiaj grey nurse, Balmain bug ktp. (Efektive, tion ĉi mi mem ne rimarkis. Ĉu griza ŝarko, ikako (N)?)

Pri marsupialo, marsupiulo: ne plaĉas al mi la uzo de -ulo por nehomaj estaĵoj (kvankam ĝi ja estas tiel uzata, kaj eĉ Zamenhof uzis tridekferulo por ŝipo kun tri ferdekoj), speciale tie, kie povas estiĝi ia duba senco - por mi, ekzemple, mamulo estas virino! Por "mammal" mi preferus mambesto.

Sed kial S-ro Leereveld nomas "monstraj neologismoj" bumerango, vakero, vumero ktp.? Bumerango kaj vakero jam antaŭ longe eniris la lingvon, kaj se tiuj, kial ne vumero ktp.? Same aborigeno ne nur troviĝas en PIV kaj Fulcher & Long, sed ankaŭ en la Dictionnaire Espéranto-Français de Grosjean-Maupin, eldonita en 1910! (Parenteze, hamburgro-n mi pruntepreni el MONATO por la Aŭstralia Antologio!)

Ĉu la uzo de -ĉj por aĵoj vere estas neologismo propra al AEV? Laŭ piednoto sur p.14 de ESPERO EL KOREIO, Nov.-Dec. 1990: "Estas eble uzi tiujn sufiksojn ankaŭ kun nomoj de familianoj, aliaj personoj kaj eĉ kun objektoj" (mia emfazo).

S-ro Leereveld pontifike asertas, ke "ĉefliteroj ne povas aperi en la interno de vortoj". Kial ne? Kiu malpermesis tion, kaj kun kia rajto? En la oficiala listo de normaj landnomoj antaŭ nelonge publikigita de la Akademio (vidu TAE Marto-Aprilo 1989) troviĝas, ekzemple, Papuo-Nov-Gvineo, Aŭstro-Hungario, Indo-Eŭropa, Sent-Kristofo, ktp.! Kiel ie diris Zamenhof, "Propra opinio ne estas leĝo por alia" ...

S-ro Leereveld ne mencias en siaj kritikoj de, ekzemple, brasikarbo, ke ĝi estas signita "ordinara lingvo", kaj ke la proponita neologismo estas livistono. Per vortoj kia brasikarba ĉapelo la kompilintoj de AEV evidente volis redoni iom de la aŭstralia etoso, kaj certe ĉiu tradukonto aldonos klarigon de tiaj vortoj en glosaro ĉe la fino de sia tradukaĵo, kiel ni faris en Aŭstralia Antologio. S-ro Leereveld preteratentas la fakton, ke ĉiu lingvo bezonas pitoreskajn esprimojn aŭ idiotismojn, eĉ internacia lingvo kia Esperanto (ekz., Li sidas en la kaĉo; ruĝliteraj minutoj). La vortfara metodo uzita en la AEV konformas do preskaŭ ĉie kun tiu ĝenerale uzata ĉie de ordinaraj Esperantistoj.

Mi ne tute samopinias kun S-ro Leereveld pri liaj ideoj koncerne la tradukon de anglaj/aŭstraliaj vortoj en Esperanton, kiel li klarigis ilin ankaŭ en siaj artikoloj en TAE Nov.-Dec. 89 kaj Majo-Junio 90. Li ŝajnas voli apelacii al la logiko por subteni siajn argumentojn. Sed en lingvo, la logiko ne ĉiam estas fidinda arbitracianto - plej ofte la uzado regas. Por citi nur unu ekzemplon: mother tongue - la lingvo, kiun infano lernas de sia patrino. Franca langue maternelle, itala lingua materna, hispana idioma materno, germana Muttersprache, nederlanda moedertaal, norvega morsmal, indonezia bahasa ibu, ĉiuj signifas "patrina lingvo". Japana bokokugo = patrinlanda lingvo. Rusa kaj pola uzas vortojn kiuj signifas "patra lingvo". Ĉiuj do enhavas la saman ideon. Sed kion uzas Esperanto? - "gepatra lingvo" = la lingvo de la gepatroj. Nu, ĉar ofte ĉiu el la du gepatroj parolas malsaman lingvon ol la alia, kiu lingvo en tia kazo estas la gepatra lingvo de la infano?! Longe mi luktis kontraŭ gepatra lingvo, pledante por patrinlingvo, sed vane - fine mi rezignis, venkite de la uzado!

Tamen, malgraŭ ĉio tio, mi respektas la opiniojn de S-ro Leereveld, ĉar li ja estas sperta kaj tre kompetenta Esperantisto, kun preciza kaj logika menso. Eble oni povus inviti lin kunlabori je eventuala kvara eldono de AEV.

o-o-o

RAPORTETO EL SOVETUNIO

De **Trevor Steele**

10 marto 1991

Karaj amikoj, ĉu Aŭstralio ankoraŭ ekzistas? Ĉi tie mi neniam aŭdas pri ĝi.

Post kvin monatoj mi nun foriros de Kievo, kie mi renkontis multajn geamikojn. Dum la lastaj ok-dek semajnoj mi ĉiam vekiĝas kun raŭka gorĝo, kaj dumtage mi foje sentas pezan lacecon. Jes, oni diras al mi, jen la unuaj simptomoj de radioaktiveco: ĉu vi jam suferas kapdolorojn? Bonŝance mi ankoraŭ ne spertis tiun trian simptomon. Kievanoj ŝajne kutimiĝis al tiuj ĝenoj kaj provas ignori ilin - kaj krome, kion ili faru? - Ĉernobil situas nur 90km norde.

Ĉiufoje, kiam mi vojaĝis sufiĉe foren la simptomoj malaperis, sed revenis, kiam mi ree atingis Kievon: do ne nura hazardo. →

Mi supozas, ke la vivo en Kievo estos eterne influata de Ĉernobil. La grundo la aero, la rivero, la neĝo kaj pluvo - kaj probable la vegetaĵoj kaj bestoj de la regiono - infektiĝas. Antaŭ unu monato estiĝis onidiro, ke la rivereto Pripjat (kiu ricevas la elfluaĵojn de la reaktoro) leviĝis super ĉiujn barojn kaj ĵetis radioaktivajn rubaĵojn en la Dnepr, kiu provizas akvon al Kievo kaj milionoj da aliaj homoj. Tuj alarmis telefonoj milionope: oni avertis parencojn kaj amikojn tuj plenigi pelvojn kaj poste fermi akvotubojn. La postan tagon la registaro oficiale informis, ke la onidiro estas falsa. Sed oni memoras la silentojn kaj mensogojn de registaroj: eble kelkaj homoj ankoraŭ uzas akvon nur el siaj pelvoj...

Cetere la politika etoso estas aktuale pesimisma. La provoj plibonigi la ekonomion ĝis nun fiaskis, kaj la "aparato" iom post iom provas strangoli ankaŭ "glasnostj". Miĥail Gorbaĉov ŝajnas esti aŭ senpova aŭ libervola alianculo de tiu "aparato".

Dum la venontaj tri monatoj mi instruos en Tallinn, Estonio. Mi jam vidis gigantajn barikadojn sur la stratoj de tiu balta urbo: oni timas, ke ankaŭ tie povus baldaŭ ruliĝi tankoj, ke soldatoj mortigos senarmilajn civilulojn por konservi ordon kaj pacon.

Tre interesaj estis miaj vizitoj al Esperanto-grupoj. Kompreneble la esperantistoj estas ĉi tie, samkiel en ĉiuj landoj, nur oneto de la loĝantaro, sed nia lingvo vere vivas en SU. Ĉar samideanoj en SU ne povis vojaĝi eksterlanden, ili organizis multajn diversajn renkontiĝojn en la propra kaj ja multlingva lando. Estas amaso da talentuloj en la movado, kaj plej kuraĝige, abundas junuloj.

Mi skribos pli detale en posta raporto. ◻

.....

DEZIRAS KORESPONDI

15jara knabo en Sovetio:

SU-618120 Permskaja obl., OSA
St. Razina 85-21
Braĵnikov Petro
USSR

INDONEZIA ESPERANTO-SOCIETO

fondita 1976 en Semarang, disiĝis en 1980 sed nun reaktiviĝis. Mankas Esperanto-legaĵoj ĉar en Indonezio estas tre malfacile aĉeti librojn kaj gazetojn en Esperanto. La biblioteko de la Societo petas Esperanto-librojn kaj gazetojn (ĉu novajn, ĉu nenovajn) por utiligo en instruado. Adreso: Indonezia Esperanto-Societo, Jl. Tm Pringgodani dalam II No. 11, Semarang 50141, Indonezio.

NEKROLOGO

EDWARD CARSON THOMAS - 1914-1991

Edward Carson Thomas naskiĝis la 5an de aprilo 1914 en Londono, la plej juna el dek infanoj. Li venis al Aŭstralio en 1955, loĝis en Melburno kaj Geelong kaj laboris ĉe la Shell Petrolkompanio. En 1976 li emeritiĝis kaj translokiĝis al Toowoomba. Bedaŭrinde S-ino Jessie Thomas mortis antaŭ ol ili bone alkutimiĝis al la nova vivado.

Carson aliĝis al klaso pri Esperanto ĉe la Eduka Centro por Plenaĝuloj dum 1976, kaj daŭre studis la lingvon ankaŭ post kiam studado sub la aŭspicioj de la Eduka Centro por Plenaĝuloj ĉesis. En 1982 estis decidite ke la 4a Somerlernejo okazu ĉe la Universitato de Nov-Anglio, en Armidale, NSW, en januaro 1983. Carson multe laboris pri detaloj kun aliaj komitatanoj kaj same faris por la 5a Somerlernejo en januaro '85. En 1985 Ray Ross preparis historion de AEA. Carson kompostis la tutan enhavon per aparato sia.

Ĝis la 2a de aprilo 1991 li restis entuziasma kaj afabla ano de Toowoomba Esperanto-Societo kaj AEA. Tiun matenon arterio rompiĝis kaj kuracistoj en Toowoomba kaj en Hospitalo Prince Charles en Brisbano ne povis evitigi lian morton.

Samideanoj kiuj ĝuis la amikecon de Carson memoros perfektan ĝentlemanon. Ni kondolencas liajn nevinon kaj familion, S-inon Patricia Dunn kaj forajn parencojn anglajn.

Jean Lehane

DEZIRAS KORESPONDI

Bidur Raj Badal
P.O. Box 2231
Kathmandu
Nepalo

.....

JAGE

Motoj: JAGE, JAGE against the dying of the light
Pense globaj, JAGE lokaj

Por kompreni la unuan moton, necesas prononci la vorton JAGE angle, kaj havi iometon da kono de angla poezio. Por kompreni la titolon de la oficiala organo de JAGE, Luka Bulteno necesas koni la oficialan vorton "luko". La unua moto kaj la nomo de la bulteno estas ŝercaj - kun serioza celo. Tiu celo estis porti kaj freŝan aeron kaj freŝan lumon en la Esperanto-movadon aŭstralian. J.A.G.E. = Junulara Aŭstralia Grupo Esperantista. Sed JAGEn konas nur malmultaj personoj. Ĉu ankaŭ vi renkontis ĝin? Temas pri luko per kiu sunbrilo kaj ĝojo povos plenigi esperantan Aŭstralion, kaj nur el tio povos konsisti nia futuro.

Adreso de la JAGE-sekretario: Niĉjo Nicholas, 17 Renouden St., Cheltenham Vic 3912.

28-AJ BALTAJ ESPERANTO-TAGOJ
Tartu (Estonio) 8-15 julio 1991

Ĝenerala temo: Humanismaj edukado kaj kulturo - bazoj por la demokratia sociordo. La semajno inkludas Someran Universitaton, amatorartan konkurson, fakkunvenojn de "Esperanto kaj la naturo", ekskursojn, kaj multon pli. Kosto: US$40, plus malaltaj loĝ-kaj-manĝ-kostoj. Necesas sendi aliĝojn kun partoprenpago antaŭ 1 junio. Grave: Aliĝantoj el aliaj landoj (do ankaŭ »aùstralianoj) ricevos oficialan inviton de la urbestro de Tartu por faciligi vizajn formalaĵojn en sovetuniaj konsulejoj. Adreso por aliĝiloj: Estona Esperanto-Asocio, Olevimägi 12, 200101 Tallinn, Estonio. ◻

RETROKOMENTE RETROETNEMOK ETNEMOKORTER

En la januara numero de TAE aperis mia seppaĝa recenzo de la "Aŭstralia-Esperanta Vortaro". Spite la longecon de la recenzo, ĉiu el la kritikeroj kaj prijuĝoj miaj povas bezoni (kaj ricevi) miajn pliklarigon kaj defendon. Sed tio estus aldoninta plian dudekon da paĝoj. Mi kompreneble ne povis nek povos foruzi TAEn por tiu pli-malpli scienca celo, eĉ se la redaktoro permesus tion. Tamen kelkaj interesatoj ŝatos eble legi tiujn pliklarigojn pri kelkaj el la multaj juĝoj kaj opiniioj menciitaj en la recenzo.

Se vi mencios la specialajn punktojn ekzamenendajn, mi volonte sendos al vi la bezonatajn Esperantolingvismajn klarigojn (konsiderante ankaŭ eventuale presotajn kritikojn al mia recenzo). Tiamaniere TAE, anstataŭ pleniĝi per tede longaj specialistaĵoj verŝajne ne interesantaj la ĝeneralan legantaron, povos uzati por la multaj aliaj interesaj artikoloj kaj informoj haveblaj.

Marcel Leereveld
12 Heather Grove
Belgrave South, Vic. 3160

LA SOMERLERNEJO EN ADELAJDO, JANUARO 1991

informo kontribuita de **Marcel Leereveld**

Bonvolu aldoni al la raporto en TAE numero 266:

En la mateno de la unua tago interrompis nian kurson telefonvoko el Havano, Kubo. La telefonanto, en perfekta Esperanto, menciis ke li legis pri la lernejo kaj sukcesis, post duonhoro da telefona serĉado en Adelajdo el Havano, trovi nin. La celo de lia voko estis ke li deziris telefone ricevi raporton por disaŭdigi ĝin la morgaŭon per radiostacio Havano mallonganda. Unu el la partoprenantoj en la lernejo tuj komunikis al li tiun raporton, kvankam neprepare, kaj la tuta mondo povis aŭdi ĝin (ne sciante tamen pri la altaj telefonkostoj suferitaj de la Kuba alvokanto).

KONFERENCO DE LA U.N. ASOCIO EN MELBURNO

informo kontribuita de **Marcel Leereveld**

Dum la lasta semajno de februaro 50 universitatnivelaj studentoj el diversaj ŝtatoj partoprenis en konferenco organizita sub la aŭspicioj

de U.N. Asocio, en Melburno. Diversaj parolantoj estis invititaj instigi diskutojn pri internacia kunlaborado. Unu posttagmezo estis dedi¢ita al diskutkunveno pri la Internacia Lingvo. La studentoj apartiĝis en malgrandajn grupojn, kaj devis traduki ne-facilajn Esperanto-tekstojn anglen, kun la helpo de reguloj pri la gramatiko kaj vortkonstruado, kaj fojfoja helpo de sia tiucela instruisto, Marcel Leereveld, kiu planis la eksperimenton. La studentoj multe ĝuis la taskon, kaj foje rimarkinde bone sukcesis. Oni sugestas organizi similajn laborkunsidojn en aliaj universitatnivelaj centroj en Aŭstralio.

28A AEA KAJ 57A NZEA ESPERANTO-KONGRESO

11 - 19 januaro 1992

Universitato de Okcidenta Sidnejo

dua listo de partoprenontoj

11. Ray Ross (Qld)
12. Peggy Ross (Qld)
13. Erika Vathis (Usono)
14. Sylvia Burkitt (NSW)
15. Margaret Chaldecott (NSW)
16. Ralph Harry ((NSW)
17. Jack Fallu (Vic)
18. Ivy Fallu (Vic)
19. Marjorie Ellyard (ACT)

NSW:11; VIC:4; QLD:2; USONO:1; ACT:1 = 19

listo ĝisdatigita la 17an de aprilo, 1991

La LKK raportas ke planoj por la kunligitaj Kongresoj progresas favore kaj ili invitas aliĝilojn de tiuj kiuj ĝis nun sin ne registris - tio estas dezirinda por lasi firmigon de la aranĝoj. Ili ankaŭ petas ĉiujn serioze konsideri proponi sin por kontribuo al la programoj. Paroladoj, prelegoj, kantistoj, deklamistoj, muzikistoj ktp estas speciale bonvenaj - ankaŭ dramogrupoj kaj koroj por la konkursoj (ĝis nun nur brisbanaj grupoj nomis sin kiel kandidatojn). Bonvolu kontakti la Sekretarion de la LKK, Les Scott, 34 Ocean Road, Manly NSW 2095. ATENTU KE POST JUNIO LA ALIĜKOSTO POR LA KONGRESO PLIALTIĜOS! ◙

DEZIRAS KORESPONDI

18 jara studentino, kiu ŝatas vojaĝi, kolektas fontoplumojn, bildkartojn, kalendaretojn:

USSR, UKRAJNO 245110
p.k. N50
Sumska obl.
Shostka - 7
Viktoria Savčenko

LIBROSERVO DE AEA

Suplementa librolisto

667 Cigana Romarcaro (Fernand Diego) 110p $8.50
677 La Kialo de l'Vivo (Leon Denis) 50p $8.50
800 Mi Juna (Manashi Das Gupta) Aŭtobiografio 102p $20.40. Recenzita en TAE marto 1990
187 Hamleto (Shakespeare/Zamenhof) reeldono 205p $19.30
817 Akademiaj Studoj 1988-1990 560p $26.00. Recenzita en TAE sept. 1990
760 Dolĉe-Amare (Emile Van Damme) 87p $11.00
78 Esperanto por Ni (H & K Mikula's) 4 vol. porinfana lernolibro. 62p $39.70
485 Internaciaj Ekzamenoj UEA/IKEI 1989 36p $6.50
637 Viktimoj (Julio Baghy) reeldono 204p $19.01
763 Pilgrimo (Julio Baghy) reeldono 132p $16.40
884 Preter la Vivo (Julio Baghy) reeldono 144p $16.40
422 La Septaga Murdenigmo (Ronald C. Gates) 75p $8.40
186 Nia Fundamento sub Lupeo (G.F. Makkink) 128p. $17.80
428 Urd Hadda Murdita! (Deck Dorval) 196p $21.80 ◻

KOREKTO

En nia marta numero la respondo al demando 13 en "Provu vian vortoscon" devas esti (a), ne (b). ◻

NOVA FONDUSO POR AEA

Herta Muller testamentis al AEA $30 000. "Herta-Muller-Fonduso" estas kreota. La celo de la fonduso estas decidota. ◻

EL LA REGIONOJ

Kvinslando: la unua konferenco de EFK en 1991 okazis ĉe la Noosa Lakes Motel, Noosaville, 4-5 majo. Raporto sekvos.

Okcidenta Aŭstralio (el LA NIGRA CIGNO): Postpiknika naĝado en la maro "Tie, ĉiu kiu alportis ban-kostumon naĝis. La vidaĵo de tiuj en la maro estis tro alloga por iu, kiu sin senvestigis rapidege kaj malaperis sub la ondoj. Ŝi ŝajne ne rimarkis la fotografilojn aŭ tro estimas la tri fotografil-portantojn ... Ni promesas presi (la foton) en la sekvonta numero - aŭ sur paĝo 3 aŭ en la mezo - eble ni triobligos la abonantaron?"

Ralph Harry (nu, ne regiono, sed loĝanta en regiono): finpreparas version en Esperanto de sia libro "The Diplomat Who Laughed" (La Diplomato kiu Ridis). (el M/LG 2.91)

Sudaŭstralio: la verko de Charles Stevenson, "Onward Flows the Stream - Towards a History of Esperanto in South Australia" plu estas aĉeteblа ($3, de Europa Books en Adelajdo.)

Komenciĝis en la fino de marto sabat-posttagmezaj kunvenoj de SA familioj kun junaj infanoj lernantaj Esperanton.

(Evento dum la somerlernejo): Ne konante Max (Wearing) Ibi "al mi demandis 'kiom da jaroj havas Makso?' Ĝenite de la manko de dormo, mi aŭdis 'haroj' anstataŭ 'jaroj' kaj diris, 'Ho, li estas preskaŭ kalva.'" (de Peter Bird en TAMEN PLU)

Nova Sud-Kimrujo: NEKROLOGO - Lily Goldsmith (1908-1991)

Lily Goldsmith forpasis en la Leumesh Nursing Home, Castle Hill, la 21an de februaro. Ŝi ne estis tute sana dum pluraj jaroj - oni kredas ke ŝia ekstrema surdeco multe kontribuis al ŝia suferado.

Lily estis flegistino trejnita en Brisbano, kaj laboris dum multaj jaroj kiel obstetrikisto en la Paddington Hospitalo por Virinoj kaj poste kiel ĉefflegisto de la Kliniko por la Sano de Beboj en Wagga. Kiam ŝi emeritiĝis, ŝi transiris al Manly kaj iĝis studanto de Esperanto. Rezulte de tio ŝi renkontis kaj edziniĝis kun "Tiny" Goldsmith, brita esperantisto kiu venis al Aŭstralio por renovigi intereson je la lingvo ĉi tie. Tiny mortis en marto 1972, nur unu jaron post la geedziĝo. Malfonge post la morto de sia edzo Lily translokiĝis al Moull Village. Eble oni ne vaste scias ke Lily estis eksperto pri navetado.

Laŭ artikolo de Les Scott en TELOPEO

NOVA AŬSTRALIA ROMANO ESPERANTISTA APERIS

Nia konata kaj alte respektata membro Profesoro Ronald Gates (NSW) ĵus aperigis novan mister-romanon en Esperanto. Ĝi havas la titolon LA SEPTAGA MURDENIGMO, konsistas el 75 paĝoj, kaj por fruaj mendantoj estas favora prezo: $8.40 de la Libroservo de AEA. Ni esperas baldaŭ aperigi recenzon en TAE. ◻

RESPONDOJ POR LA CITKVIZO

1.ĉ; 2.g; 3.b; 4.f; 5.h; 6.d; 7.ĝ; 8.c; 9.e; 10.a

ESPERANTISTA VEGETARANO

estas la organo de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio, kies unua prezidanto estis L.N. Tolstoj. La revuo aperas kvar fojojn en la jaro. Ĝi estas riĉe ilustrata. Ĝiaj dudek paĝoj estas plenaj de interesaj artikoloj pri reformitaj viv- kaj nutrad-metodoj. Bonvolu legi ĝiajn sanigajn receptojn, ridu pro ĝiaj multaj ŝercoj, kaj miru pro la alta lingvonivelo.

La gazeton eldonas la Slovaka Esperanto-Asocio. Ĝi ne havas fiksitan prezon. Ĉiu pagu laŭ sia kapablo, sed ĉar la ekzisto kaj kvalito de la revuo dependas de via malavareco, ni esperas ke kiom eble plej multaj el vi ĝin abonos. La gazeto estas abonebla en Aŭstralio ĉe Bob Felby, 6 Dorset St, Semaphore Park SA 5019 (telefono |08| 49 9716). Specimena ekzemplero estos sendita al vi kontraŭ pago de la afranko.

DEZIRAS KORESPONDI

Buškevičiute Dagne
Str Filaretu 591-21
SU-232007 Vilnius
USSR

Strumskte Jolanta
Jamybes A-33
SU-234930 Anyksčiai
USSR

La ĉisupraj esperantistinoj loĝas en Litovio kaj speciale deziras korespondi kun geaŭstralazianoj.

ALBANA ESPERANTO-LIGO

informas **Gafur Mučo**

Kun plezuro ni sciigas vin ke la 9an de marto 1991 fondiĝis en nia lando Albana Esperanto-Ligo, kun sidejo en Tirana. Ĉi tio estis multjara deziro de la albanaj esperantistoj, sed nur nun kreiĝis kondiĉoj ebligantaj tion. Sed precipe nun kiam nia lando travivas grandan ekonomian krizon, al ni mankas rimedoj kaj materialoj ĉiuspecaj. Ni bedaŭrige nun ne havas esperantaĵojn niajn nek alilandajn. Ĉian helpon ni elkore dankos. Adreso: Gafur Mučo, Rruga "Thanas Ziko" Nr.56, Tirana, Albanio.

The Australian Esperantist

Numero 268 Julio-Aŭgusto 1991

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488



Inter la artikoloj:

Alberto, Kuiberto kaj Egberto (*Elvie Rowe*) p.3
Prilingvaj temoj (*DB, A. Towsey, A. Albault*) p.4
Kiu diris tion? (*Ralph Harry*) p.7
Notoj el Sovetunio (*Trevor Steele*) p.8
Sed Nur Fragmento: la legantoj ajugas (*Vera Payne*) p.9
Pri miaj spertoj en la esperanta movado (*Eddie Hearne*) p.13
Nur fragmenteto (*Idyss Elnikovici*) p.18
Pravigo de la termino *lancjetilo* austatuŝ "varnaro" (*Bernard Golden*) p.19
11-minuta jarraporto de Odile Bokserp (*originale verkita*) p.22b?
Kongresinformo kaj El la Regionoj p .26
English supplement

LA AŬSTRALIA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562
Telefono: (09) 574 1307; Fax: (09) 574 1298
Provizora Prezidanto: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014
Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109
Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne VIC 3001
Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley WA 6102
Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036
Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702
P.R.O. (Oficisto pri Rilatoj kun la Publiko): Dennis Murphy, 79 Binnalong Rd, Old Toongabbie NSW 2146
Provizora Prezidanto de la Ekzamen-Komitato: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562

$25 por individuo, klubo kc. $30 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso). $15 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto aŭ al la Libroservo.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adresslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian nomon aŭ/kaj adreson. Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Limdato por ricevo de presotaĵoj por la venonta numero: 1 septembro.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *The Australian Esperantist* "Ni vere bezonas artikolon pri...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercdesegnaĵon. Vi povas sendi vian kontribuon en manuskripta formo aŭ sur komputila disko. Ni akceptas diskojn IBM-kongruajn kaj Macintosh-ajn. Nepre kunsendu adresitan afrankitan koverton por ke ni povu resendi al vi vian diskon por reuzo. Se vi preparas manuskripton, bonvolu atenti la ĉi-sekvajn postulojn: la teksto devas esti klare tajpita, per freŝa rubando, kaj kun duobla spaco inter la linioj. La dekstra kaj maldekstra marĝenoj estu po almenaŭ du centimetroj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netajpitaj manuskriptoj estos malakceptitaj. (Ankaŭ tajpaĵoj kiuj estas tro palaj por esti facile legeblaj.) Manuskriptoj estos resenditaj nur se ilin akompanos adresita afrankita koverto por tiu celo. La redaktoro kutime agnoskas la ricevon de gravaj/longaj tekstoj, sed kutime ne de malgrandaj informoj kc. kiuj estos uzataj laŭ taŭgeco. Aŭtoro de artikolo kutime ricevas senpagan ekzempleron de tiu numero en kiu la artikolo aperas, se la aŭtoro ne estas abonanto. Se la aŭtoro deziras pli da ekzempleroj, ŝi/li devas informi la redaktoron pri la dezirata kvanto (maksimume 5) samtempe kun la sendo de la verko. Eldoninto de libro ricevas senpagan ekzempleron de la numero en kiu la libro estas recenzita (du ekzemplerojn se la eldoninto specife petas tion).Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo.Laŭbezone ĝi povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa.

ALBERTO, KUTBERTO KAJ EGBERTO

Rakonto Verkita de Elvie Rowe

Foje estis tri malgrandaj porkoj. Iliaj nomoj estis Alberto, Kutberto kaj Egberto. Iun tagon Alberto diris: "Ni bezonas pli grandan domon".

"Kial?" demandis Egberto.

"Por ke la najbaroj opiniu ke ni havas multe da mono," respondis Alberto.

"Ni ne havas," diris Egberto.

Alberto lin rigardis per velkiga mieno. "Vi estas stulta porko, Egĉjo," li diris.

"Plenaĝiĝu!" diris Kutberto.

"Mi renkontis arkitekton en la kampara klubo," Alberto daŭrigis. "Li desegnos belan domon por ni."

Ili iris serĉi la arkitekton. Lia nomo estis Sinjoro Lupo. Li estis tre kontenta kiam li vidis ilin. Li montris al ili planon kun ses dormoĉambroj kaj sep banĉambroj.

"Kial ni bezonas ilin?" Egberto demandis.

"Vi devas konservi la najbarejajn normojn," diris la Arkitekto.

"Kial?" demandis Egberto.

"Ne estu stulta, Egĉjo," diris Alberto.

"Plenaĝiĝu!" diris Kutberto.

"Jen la salono, la formala sidĉambro kaj la manĝoĉambro," diris la arkitekto.

"Por kio ni bezonas ilin?" Egberto demandis.

"Silentu!" kriis Alberto kaj Kutberto kune.

"Jen la familiĉambro," diris la arkitekto. "La atriumo, la ŝprucbano, la malaltniveligita ludoĉambro--"

"Kio estas malaltniveligitaj ludoj?" demandis Egberto.

"Kia stulta porko!" kriis Alberto.

"Plenaĝiĝu!" diris Kutberto.

"Nun, la konstrumaterialoj," diris Sinjoro Lupo.

"Pajlo estas bona," diris Egberto.

"Bastonoj estas pli bonaj," diris Kutberto.

"Mi ŝatas brikojn," diris Alberto.

"Mi konsentas," diris la arkitekto. "Multe da glaco, marmoraj plankoj kaj ŝtuparo, oraj kranoj--"

"Ni ne havas la rimedojn por tio!" kriis Egberto.

"Sed la najbaroj ĉiuj havas ilin," diris Kutberto.

"Eble ankaŭ ili ne havas la rimedojn por ili," diris Egberto.

"Ne problemo!" Brilis la okuloj de la arkitekto. "Mia banko donos la monon."

"Ni bezonos multajn meblojn," diris Egberto.

"Mi aranĝos tion!" kriis la arkitekto. "Mia amikino estas dekoraciisto. Ne maltrankviliĝu pri io ajn!"

Kiam la domo estis preta, Alberto, Kutberto kaj Egberto enloĝiĝis. Ili havis malmulton por manĝi kaj ili ne uzis la lumojn nek la hejtilojn por ke ili povu pagi la monon ŝuldatan al Sinjoro Lupo. Poste Alberto kaj Kutberto perdis la postenojn

kaj Egberto forlasis la lernejon por serĉi laboron. Estis senesperige. Ili ne povis pagi sufiĉe.

Sinjoro Lupo alvenis ĉe la ĉefpordo kaj sonigis la sonorilojn. La tri malgrandaj porkoj malfermis la ĉefpordon.

"Foriru!" kriis Sinjoro Lupo. "La domo estas mia nun."

"Ĉio estas via kulpo, Egĉjo, vi stulta porko," Alberto kaj Kutberto grumblis dum ili marŝis en la sunsubiron.

Sinjoro Lupo rigardis ilin tra glaca fenestro. Tio certe superas spiregon kaj pufon," li diris.

[Teksto originale verkita en Esperanto post du lecionoj. Kontrolita de Vera Payne kaj D.B.]

PRILINGVA AVERTO

de Donald Broadribb

Mi ofte trovas inter aŭstraliaj esperantistoj tendencon fari kvazaŭgenitivan kazon, eble ĉar en la angla lingvo tiu kazo estas tre simple formata kaj multe uzata. Ekzemploj kiujn mi legis: la reĝina naskiĝtago ("the Queen's birthday"), la prezidantaj demandoj ("the president's questions"). La ĝustaj esprimoj, laŭ la Fundamento, estas La naskiĝtago de l'reĝino"kaj la demandoj de l'prezidanto. La a-formoj estas adjektivoj: reĝina = regal, prezidantaj = presidential. Kiel diras la Fundamento, "Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo...La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicio..."

Povas esti, kiel mi legis en revuo lastatempe, ke la instigon por la eraro inter aŭstraliaj esperantistoj donis la stranga zamenhofa idiotismo mia = my, mine; via = your, yours kc. kie la adjektiva formo estas uzata kvazaŭ genitivo. Aliflanke, alia zamenhofa idiotismo estas la vera genitiva kazo en la serio de korelativoj: kies, ties, ĉies kc.

LINGVA ANGULO

de Alan Towsey

Sub ĉi tiu rubriko mi intencas diskuti miaopinie mise uzitajn vortojn kaj esprimojn, kiujn mi rimarkas dum mia legado de diversaj esperantaj eldonaĵoj. Ĉar mi estas nek ĉioscia nek neerarema, mi bonvenigos komentojn aŭ korektojn de aliaj spertaj esperantistoj--mi estas ĉiam preta kaj dezirema mem lerni. (Por ŝpari tempon, skribu al mi ĉe 19 Market St, Tahmoor NSW 2573.)

MORTINTA

Mi ofte trovas morta en la senco de "dead" (mortinta). Kvankam la dua difino en Plena Ilustrita Vortaro (PIV) donas tiun sencon (morta besto), eĉ citante Zamenhof (la vivaj kaj mortaj lingvoj), tio estas malĝusta uzo. La ĝusta vorto estas mortinta (li estas mortinta) aŭ senviva. En ĉi tio subtenas min ĉiuj aliaj vortaroj, kiujn mi konsultis--Millidge, Butler, Wells, Fulcher & Long, "Etinburgh", la franca Grosjean-Maupin, kaj mia Nederlanda-Esperanta Vortaro! Morta signifas

"of death, deathlike, deathly", do "morta silento, morta rigideco". En la tekniko kaj tiel plu morta ankaŭ uziĝas idiotisme en esprimoj kiaj "morta punkto, morta pezo, morta angulo, morta kuglo, morta sezono". (Eĉ ĉi tie mi demandas al mi, ĉu ne-eŭropanoj bone komprenas ĉiujn tiujn; eĉ mia nederlanda vortaro donas por "het dode punt" [la morta punkto], "la neefika punkto".)

PIV ne estas leĝodona, ĝi nur registras (kelkfoje kun konsiloj aŭ rekomendoj pri uzado) la uzojn de la vortoj. Ne plaĉas al mi kelkaj el la aliaj sencoj donitaj sub morta. Mi preferas "vivantaj kaj mortintaj lingvoj", "mortiga vundo" (causing death) anstataŭ "morta vundo", "mortigema malamiko" (not necessarily causing death, but he'd like to kill you all the same!) "La homo estas mortema" aŭ (laŭ mi pli bone) "mortiva", aŭ "mortonta". (-ema por mi havas ian sencon de volo aŭ persona inklino, ne de neeviteblo. Sed tio estas nur mia propra sento. Nia klera redaktoro diras, ke li "emas akcepti la zamenhofan uzon de 'mortema' kiel idiotismon".)

Por ilustri: "la homo estas morta") (= mortiva/mortonta/mortema) ŝajnas al mi esti sufiĉe klara (ĉar la homaro ankoraŭ ekzistas!), sed kio pri: "la kanguruo estas morta"? Ĉu iu kanguruo estas mortinta, aŭ ĉu ĉiu ano de la specio nepre mortos?!

KOMENTOJ DE LA PREZIDANTO DE L'AKADEMIO

ekstraktoj el letero de D-ro André Albault al D-ro Ralph Harry
28 Marto 1991

[...] Volonte mi aplaŭdas vian tre Esperantecan Aŭsĉjo/Aŭsnjo por redoni la tre Anglecan Aussie.

Ŝajne cirkulas tra Esperantio diversaj sintenoj, diversaj maksimoj pseŭdolingvistikaj! Ili estas nek raciaj, nek bazitaj sur pripenso aŭ sur tradicia eldiro de Zamenhof aŭ aliaj [...] "Oni rare (kaj erare) uzas ŭ je la komenco de vorto" (kaj de iu ajn silabo). Vi tute pravas laŭ la instruo de Zamenhof mem. Same kiel vi pravas konservante la finon ero en vumero laŭ la sama instruo [...]

Pri karrio, ĵarro ja vi principe pravas: la duoblaj konsonantoj estas legitimaj en nia lingvo! Ne nur ili estas Fundamentaj: Ŝiller' en la Fundamenta Gramatiko; Anno en la Fundamenta Ekzercaro! Sed nia lingvo ne estus pensebla sen duoblaj konsonantoj: ellabori, ekkrii, littuko, ktp. ktp. La kontraŭdiranta maksimo evidente fontis el la kapo de homoj kiuj ne sufiĉe science studis la lingvon, eĉ se ilia profesio estas "lingvisto"! Ve! Tio tamen okazis.

La ĝeno de teamo estas, ke ĝi nur grafisme redonas la Anglan team; krome ĝi ŝajne povas signifi te-amo, tre konata kutimo de Britoj kaj aliaj (mi inter aliaj!). Sed bonvene aperis la sinonimo skipo: La malsama difino ne masku la realon de la sinonimeco!

Pri -oza (= riĉa, abunda...) ĝi efektive pasis tra periodoj de modo kaj de forgeso. Sed okazas, ke ĝi nepre estas bezonata por sciencaj vortoj; dume E-o nete bezonas ĝin malpli ol la Latinidaj lingvoj (kaj la Angla; ĉu?) ĉar plej ofte simpla -a tradukas ĝin "kuraĝa, nekuraĝoza") [...]

Mi tre kore vin salutas okaze de via paragrafo pri "Geografiaj nomoj" [...]

Mi permesos al mi nur du-tri rimarkojn: miaopinie la nomoj Kimro/Kimrio estas tute bonaj, same kiel Skoto/Skotlando. Aliparte same kiel la Akademio agnoskis, ke tamen estas preferinde diri Nova-Skotio por la Kanada Provinco, oni povas dubi, ĉu vere taŭga estas Nova Sud-Kimrio por la Aŭstralia New South Wales. Verŝajne tre multaj lingvoj aŭ konservas la aŭtentan Anglan nomon, aŭ asimilas tiun (en la Franca: Nouvelles Galles-du-Sud). Do eble necesus konsideri la formon Nova-Sud-Valio. Fakte necesus aparte studi la demandon. Sed evidentas, ke krom la nomo mem ne ekzistas multaj rilatoj inter la regiono kaj la Kimroj!

Hodiaŭ mi--tio evidentas (por mi)--uzus Adelajdo!! [...] La formo Adelaido respektas la grafismon de la Angla kaj "internacia" nomo Adelaide! La formo Adelajdo atentas, kiel estis asimilitaj al Esperanto ordinaraj vortoj de la Fundamento (hejmo, ajlo...). Nur plie kaj okaze ĝi atentas la fonetismon de la Angla...se vi asertas tion al mi!

NUN HAVEBLA: LA RESPUBLIKO DE PLATONO

Nin plezurigas povi anonci ke la plena teksto de la esperanta traduko de la fama libro *La Respubliko* de la klasika aŭtoro Platono nun estas havebla sur komputildiskoj (IBM kaj Macintosh). La tradukon, el la greka, faris D-ro Donald Broadribb. Ni kredas ke ĉi tiu estas la unua komputildiska libro en Esperanto--t.e. papera manuskripto de la teksto ne haveblas, kvankam kompreneble aĉetinto de la disko povas printi por propra uzo manuskript-ekzempleron. Estas anticipate ke presita eldono de la verko aperos nur post jaroj.

La prezo de ekzemplero de la disko estas $60, kio inkludas poŝtsendon ĉu enlandan ĉu eksterlanden. Pago, en aŭstraliaj dolaroj, devas akompani la mendon. Ĉiu mendo devas esti sendita rekte al D-ro Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562, Aŭstralio. La disko ne estas mendebla pere de libroservo.

AŬSTRALIA-ESPERANTA VORTARO: 4a ELDONO

Plurjara projekto por prepari kvaran eldonon de la Aŭstralia-Esperanta Vortaro estas jam komencita. Mi invitas ĉiun esperantiston kiu deziras kunlabori en la projekto kontakti min. Se vi havas profesian scion pri iu fako (precipe, sed ne ekskluzive, botaniko, zoologio kaj ornitologio) bonvolu indiki tion en via letero. Enmigrintoj el Britio ankaŭ estos speciale valoraj kunlaborantoj--por helpi distingi inter aŭstraliaj kaj ĝenerale britdevenaj idiotismoj. Tre gravaj ankaŭ estas komentoj de personoj kiuj jam konas kaj uzas iun el la tri jamaj eldonoj. Bonvolu kontakti la redaktoron.

KIU DIRIS TION?

(Citaĵkvizo 5)

kompilita de Ralph Harry

Jen kelkaj eminentuloj, citaĵoj el kies verkoj kaj vortoj sekvas. Penu parigi la personon aŭ fonton kun la spritaĵo. La solvo aperas sur paĝo 27.

(a) Fedor Mikhailoviĉ Dostoevski
(b) Blaire Pascal
(c) Protagoro
(ĉ) Alexander Pope
(d) Sankta Francisko de Assisi
(e) Proverbo
(f) Alexander Puŝkin
(g) Ŝekspiro
(ĝ) Mark Twain
(h) François Villon
(ĥ) L.L. Zamenhof
(i) Karolo la Dua de Anglio

1. Do vin mem konu, ne la dipersonon.
   Plej taŭge studas homo ja la homon.
2. La homo estas nur penso, malklara penso, senutila penso.
3. La homo estas fleksebla besto, estaĵo, kiu alkutimiĝas al ĉio.
4. Vivu l'homaro, vivu la frateco de l'popoloj, vivu eterne.
5. La homo estas la mezurilo de ĉio. Estas du flankoj de ĉiu demando.
6. Kiel belaj 'stas la homoj! Ho, brava, nova mondo, ke ĝi havas en si tielan genton!
7. Homo projektas, Dio direktas.
8. La homo estas nur fragmito, la plej febla de la naturo, sed estas pensanta fragmito.
9. Kutimo estas lordo de la tuta homaro.
10. Homfratoj, kiuj vivos plu sur tero, Ne havu krudajn korojn kontraŭ ni.
11. Mi pekis kontraŭ mia frato la azeno.
12. Mi jam estas teruran tempon mortante. Mi esperas, ke vi pardonos tion.

NOTOJ EL SOVETUNIO

de Trevor Steele

Mi pasigis kvin monatojn en Kiev. El la tri kutimaj simptomoj de radioaktiva infektiĝo mi suferis du: gorĝdoloroj kaj ofta laciĝo. Kapdolorojn mi ne havis. Kievanoj diris al mi, ke ili jam de pluraj jaroj spertas tiujn simptomojn, sed provas ilin ignori, ĉar kion oni povas fari?

Infankuracistino diris al mi, ke junaj infanoj en Kiev estas ĝenerale neviglaj kaj havas malfortan imunecon kontraŭ malsanoj. Aperas en ĵurnaloj bildoj de "ĉernobilaj beboj": la kompatinduletoj havis membrojn, kiuj similas fiŝajn naĝilojn.

La ĉernobila koŝmaro premos ankoraŭ multajn generaciojn.

Oni sentas, ke iu granda eksplodo povus okazi ĉi tie. Ĉiam, antaŭ kaj post 1917, la "normalaj" homoj de ĉi tiuj regionoj submetadis sin al maljusta regado apogata de armeoj kaj sekreta polico. Sed lastatempe tiom da "socia pulvo" amasiĝis, ke eble eĉ ĉi tie fajros.

En ĉiuj partoj de SU antaŭe subpremataj personoj postulas sendependecon kaj jam grandparte vivas, kvazaŭ tio estus reala: ili forigas la statuojn, flagojn kaj stratnomojn de la centra reĝimo, ili elektas kontraŭkomunistajn registarojn, ili histas flagojn kaj diras aferojn, pro kiuj antaŭ kelkaj jaroj oni estus puninta ilin. Sed Moskvo ankoraŭ sukcesas bremsi pli konkretajn ŝanĝojn.

La ekonomio prezentas eble unikan konstelacion de malbonaĵoj: la varoj estas aĉkvalitaj, se entute aĉeteblaj; la lacigaj, ĝenaj starvicoj ankoraŭ kreskas; prezoj nehaltigeble soras, sed eĉ tio ne aperigas la mankantajn varojn; salajroj iomete pliiĝis, sed la gajnoj estas ridindaj kompare kun la inflacio; la valoro de la rublo same nehaltigeble plonĝas--kaj nenia pliboniĝo iaspeca estas atendebla.

Sendube estas similaj situacioj en multaj landoj. Tiaj krizoj evidente endanĝerigas ĉiun ajn registaron. Ĝis nun sovetiaj registaroj ĉiam pretervivis krizojn, ĉar ili vere komandis kaj decidis, eĉ se brutale. Sed la registaro de Gorbaĉov ne estas respektata. Ĝi ne volas reformi la regsistemon kaj enkonduki veran demokration. Aliflanke ĝi ŝajnas ne plu kapabla reestabli tradician totalismon. Sed eĉ se Gorbaĉov eksiĝus, kiu transprenus? Jes, armea puĉo (reĝisorata de KGB, kiu estas nun multe pli kohera kaj forta ol KPSU) eblas--sed tio alportus nenian daŭran solvon--ni eĉ ne parolu pri justeco.

Mi loĝas nun [majo] en Tallinn, la ĉefurbo de Estonio. Ĝi havas interesan mezepokan centron kaj tre enuigajn antaŭurbojn. Ĝenerale direblas, ke novaj konstruitaj distriktoj de SU-urbo estas enuigaj: senfinaj vicoj de samaspektaj apartament-domegoj kaj fabrikoj.

La klimato de Tallinn memorigas pri malvarma bano. Eĉ nun (la komenco de somero, almenaŭ laŭ la kalendaro) oni devas sin varme vesti. Ne surprize, tamen: imagu urbon milojn da kilometroj sude de Hobart: jen la responda latitudo de Tallinn. La tagoj estas nekredeble longaj--ankoraŭ je la 11-a vespere estas lume.

Kiam mi venis ĉi tien en januaro, la suno apenaŭ deĵoris entute.

Laŭ invito de kampara lernejeto mi parolis esperante al la geknaboj pri Aŭstralio. (La lernejestro peris.) Iuj demandoj penetris kernen: ĉu viaj marondoj estas pli altaj ol homo? Ĉu aŭstraliaj hundoj, starante sur la malantaŭaj piedoj, estas pli altaj ol vi? Ĉu estas serpentoj en Aŭstralio? Ĉu viaj indiĝenoj ĉasas leonojn uzante bumerangojn? Kiam knabo demandis min, kion faras liaaĝaj aŭstraliaj knaboj en sia libera tempo, mi ŝultrumis, kvazaŭ ĉiuj devus scii la respondon, kaj diris, ke kompreneble ili kisas knabinojn. Post ŝok-momento la knaboj elbuŝigis la estonan vorton por "aĉ!" Kiam mi klarigis, ke ĉiuj aŭstraliaj knabinetoj estas tre belaj, la knabinoj grimacis nekredeme, dum la knaboj sentis kaj naŭzon kaj nevolan fascinon.

Poste la lernejestro prezentis min al grupo da inteligentaj geknaboj, kiuj jam ricevis 5 lecionojn de Esperanto. Kredu min aŭ ne, dum horo ni babilis en interesa maniero, uzante nur la IL.

Dum julio kaj aŭgusto estas tiel riĉa programo de Esperanto-renkontiĝoj en Eŭropo, sed precipe en SU, ke mi ankoraŭ ne scias kiujn elekti. Ni aŭstraliaj esperantistoj povas nur miri pri la vigleco de la movada vivo ĉi tie. Tutnokta kantado kaj flirtado ĉirkaŭ bivakaj fajroj, boatado, biciklado, marŝoj tra arbaroj, teatraĵoj, konkursoj pri seriozaj artoj kaj tute malseriozaj amuzaĵoj--kaj eĉ ne unu kunsido de iu estraro! (Aliflanke la vintraj kongresoj estas tedaj maratonoj el kunsidoj...).

Cetere, ĉu niaj indiĝenoj mortigas leonojn per bumerangoj?

Trevor Steel
Kärbegi
48-28
200038 Tallinn
USSR

SED NUR FRAGMENTO: LA LEGANTOJ ALJUĜAS

de Vera Payne

Jam trifoje mi tralegis SNF, la elstaran romanon de Trevor Steele, ĉiufoje kun plia plaĉo. Laŭ karaktero ruseska (mi kalkulis 127 nomojn!) ĝi ampleksas multajn, interplektitajn temojn, ĉiu el kiuj vere diskutindas. La lingvo kaj la stilo simple brilas, do, jen ne nur bonega rakonto sed ankaŭ lerniga literaturaĵo. Mi kuraĝigu individuojn, aretojn kaj klubgrupojn kune trastudi ĉi tiun, unuan verkon de propra aŭtoro nia, kiu nuntempe en Sovetunio (eble dum la lastaj jaroj de tiu unio) kolektas materialon por dua romano. Jen kelkaj rimarkoj (necese mallongigitaj kaj redaktitaj) de partoprenantoj en la literatura klaso de la somerkursaro ĉe Adelajdo dum januaro 1991.

"Antaŭe mi opiniis ke ĝi ne estas bona, sed ĝi estas tre bona!"

"Dankon! Mi amintas la tutan libron. SNF estas la unua Esperantoromano kiun mi legis, ĝi instigis min kaj legi kaj verki. La rakonto estas reala kaj instrua. Simile al Maklin, mi estis sciencema kaj materiisma, kredante ke la scienco povas klarigi ĉion, sed la vivo montras, ke io spirita ankaŭ ekzistas. Do, mi legis la libron (aŭ, oni legigis min) ĝustatempe. La tropoj montras la forton de la nuanceblecon en Esperanto. La tuta efiko estas pensoprovoka por mi, juna sciencisto."

"Kiel orgenisto kiu eltiras el sia instrumento la plejan soneblecon, tiel Trevor Steele uzas Esperanton en SNF. Bazinte la intrigon sur faktoj, li logas la leganton laŭ fikcia pado pri la vivo de rusa sciencisto, Nikolaj Ivanoviĉ Maklin. Oni devas koncentri la pensojn por tute kompreni kio okazas; tamen la beleco de la lingvo ensorĉas ekde la komenco. La titolo mem pensinstigas. Fragmento de kio?: De la tiama tempo? De la ĉefrolulo? Ni devas tralegi la romanon por malkovri la respondon, kaj survoje ni konstatas, ke la demando ne gravas. La vojo sufiĉe ravas, ni forgesas la celpunktojn kaj simple ĝuas la verkon."

"Maltrafinte la unuan klason, mi legis la unuajn 50 paĝojn vespere, post laciga tago. Unue mi trovis SNF sufiĉe malfacila, tamen pli kaj pli mi interesiĝis, kaj pri la historiaj faktoj kaj pri la roluloj en la romano. Kvankam mi ofte trovis la lingvaĵojn malsimplaj, la ideoj vere pensinstigis. TS ne celis popularan, monoenspezan rakonton. Liaj stilo kaj filozofio estas liaj propraj. Mi estas nun preta relegi la libron kaj atendas ke ĉifoje mi trovos ĝin eĉ pli plezurodona."

"TS bone rakontas strangan historion pri neordinaraj homoj, kaj tre interese priskribas plurajn 'homtipojn'. La lingvouzo estas elstara kaj la rakonto imagoriĉa. Ĉi tiu originala Esperanto-verko estas tre grava por nia Movado. La temo en SNF estas signifa kaj grava--la homa kondiĉo kun la ĉiama batalo inter krueleco kaj kompato. Tamen tio nek fuŝas nek trudas en la amrakonton kaj la individuajn historiojn. Precipe interesas min la aŭtentikaĵoj koncerne Kvinslandon dum la 1870-aj kaj la rilatoj inter la nigruloj kaj la blankuloj tiutempe."

"La libro plaĉis al mi. La scenejo en Nov-Gvineo estas artoplene desegnita. Post vizito al la adelajda 'Atrium', mi konscias kiel malfacila estis la tasko por Maklin en tia klimato! Plezurigis min la viva priskribo de homoj, lokoj kaj okazintaĵoj. Multe ampleksiĝis mia vortostoko, precipe en la kampo de eliminaj es-

primoj! Vortoj kiaj usheroeco, ĉue, tamenas indikas al mi la grandan flekseblecon de Esperanto."

"Mi trovis tre interesa la alvenon de la sciencisto al la ĝis tiam nekonata lando. TS ja diligente studis la vivmanieron de la 'sovaĝuloj'. Lia uzo de kripligitaj vortoj, kio montras la literaturecon de Esperanto, plaĉas al mi."

"Mi treege ŝatas kaj la stilon kaj la enhavon. SNF ĝuste nomiĝus historia romano. Por mi la plej memorinda parto de la libro estas tiu en kiu la verkisto tre lerte enkondukis kaj klarigis la nuntempe varmege debatatan temon pri terposeda justeco. TS ankaŭ tre kredeble rakontas kiel la bonkora sciencisto sintenas ĉe la unua vizito al la kamploko de la indiĝenoj. Same kiel mi, kiu iam spertis abomenon pri la stato de iu kamploĝejaĉo, la sciencisto sentis malesperon, kaj preskaŭ malestimon pri la homoj kiuj vivas tiele. Tre lerte la verkisto enkondukas la legantojn al la varmkora humaneco kaj kunuleco kiu regis ĉirkaŭ la komuna fajro. Ankaŭ brile lerta estas la rakonto pri la sonĝo de Maklin en kiu prezentiĝas la terura historio pri la ne maloftaj buĉadoj. TS ankaŭ fidele donas la veron pri la fina efiko al 'La Patrina Tero' de 'la fiuloj' kaj ties tro pezaj bestoj. La ankaŭ aŭtentikan rakonton pri la fidsanigo de komata junulo oni povas atribui al efektivaj spertoj de la verkisto mem. SNF estas memorinde leginda kaj aĉetinda libro."

"Mi trovis la rakonton rusa-stila, kun multaj karakteroj (la plimultaj por mallonga periodo) kaj komplikita, detala intrigo. Metaforo, similaĵo, hiperbolo, ripetado, ironio, onomatopeo ktp abundas. Tre impresa libro."

Unu aglo-okululo rimarkis, ke en la romano troviĝas zipo, sed post enketo montriĝis ke la zipo ne inventiĝis ĝis 1925![1]

Unu homo trovis "malakceptebla kiam Belinda parolas pri 'aliaj dimensioj'". Tamen, "Leginte la noveletojn kiujn mia edzo verkis pri siaj jaroj kun la insulanoj de la Suda Pacifiko, mi akceptas entute la rakonton pri Kodi kaj Engagu." Trafa rimarko de tiu persono estas, ke "Trevor/Maklin ne mencias la rojon kiam li revenas al la insulo. Ĉu la tertremo ĝin detruis? Aŭ ĉu la morto de B. malgravigis ĝin?"

Alia avertis ke "manpleno" estas eraro. Devus esti "plenmano". Simile, "plenvelo" estas la ĝusta vorto, ne "velopleno". Sed "plenbuŝajn vortojn" estas ĝusta.

Mi havas kelkajn aliajn demandetojn, ekz. ĉu "palpebrumante" ĉiam signifas "blinking" aŭ ĉu li fojfoje intencas "winking"? Kial "Brezbano" (ĉu vere homoj prononcas la urbon tiele?) Kio estas "ĉjo ĉjo" knabo? Kial "faris likvan oferdonon al Baal" signifas "pisi"?[2]

Unu klasano skribis angle: "La libro estis ege preter mia nuna ni-

---

1. Laŭ la *Encyclopaedia Britannica* la zipo jam estis uzata kiel fermilo por valizoj en 1918. Eble konfuzis la leganton la nomo "zipper" kiu estis "inventita" nur poste.—La Red.
2. Temas pri bibliismo. Verŝoferoj (de vino) al la Dioj de la tero estis kutimaj en antikvaj religioj, inkluzive de la Baalreligio en Palestino. Plurloke en la Malnova Testamento oni mokas la adoradon je Baal, kaj verŝoferojn por li. En unu teksto Elija sarkasme komentas ke eble Baal ne aŭskultas siajn adorantojn "ĉar li flankeniris por pisi".--La Red.

velo...miaopinie la esprimnivelo de SNF estas alta kaj plaĉa. La metafizikaj aspektoj prituŝitaj estas kredeblaj. TS elektis verajn faktojn kiel bazon por rakonto en kiu prezenti kelkajn el siaj propraj demandoj koncerne la vivon kaj ĝian celon."

Ankoraŭfoje mi kuraĝigu grupgvidantojn pritrakti ĉi tiun elstaran romanon, tiele plialtigante la kompreno-nivelon de la leganto. Bonega verkisto ne estu sen honoro en sia propra lando, kaj nia libroservisto surprizigu pro lavango da mendoj! Vi ne elspezos pli profitodonan $25.

(Kun la ĉisupraj taksoj mi plene akordas. Kiam mi tralegis ĝin mi trovis ĝin ne nur fascina, sed unu el la plej bonaj originalaj romanoj lastatempe aperintaj. Mi nepre rekomendas ĝin. Je tiu malalta prezo, oni ja ne povas plendi pro tro altekosta literaturo! D.B.)

NIA MEMBRARO

	1991		1990	
	Individuaj	Familianaj	Individuaj	Familianaj
NT	1	-	2	-
NSW + ACT	59	9	53	8
VIC	53	7	46	7
QLD	31	4	34	6
SA	9	2	8	2
WA	29	5	25	5
TAS	7	2	7	2
Fremdaj	5	-	3	-
SUME	194	29	178	30

La stato de la membaro de AEA je la 1a de junio 1991 kaj, por komparo, 1990.

La stato de la membaro de AEA je la 1a de junio 1991 kaj, por komparo, 1990. Krome 4 honoraj membroj ne pagintaj. (Pluraj honoraj membroj pagas la jarkotizon kaj estas kalkulitaj en la listo de pagintoj. Dumvivaj membroj estas simile kalkulitaj inter pagintoj.)

Rigardante la tabelon oni trovas ke la suma nombro iom kreskis dum unu jaro (194 + 29 = 223; 178 + 30 = 208). Tio estas bonvena post la plurjara malkresko de la membraro.

Estas nia espero ke ni povos komenci regajni la perditajn membronombrojn de la pasintaj plurjaroj. Unu entrepreno por efektivigi tion estas la preparado de novaj informbroŝuroj ĝisdatigitaj por doni al la varbotoj pli aktualan bildon de la stato

de la esperanta movado en la moderna mondo, kaj por evidentigi la bezonon por internacia lingvo, Esperanto, en la moderna socio kiu nun kreiĝas por la dudek-unua jarcento.

PLI DA LUMO EN KUBO

de Ruddy Fernández-M.

Nia klubo Pli da Lumo havas nun preskaŭ cent membrojn, ĉefe komen-cantojn. Ni lokiĝas en la urbo Santiago de las Vegas, kiu estas 20 km sude de la kuba ĉefurbo Havano.

Tamen, ni havas problemon. Mankas al ni esperantaj eldonaĵoj kaj ni ne havas devizon por povi mendi ilin eksterlande. Ĉu eblas via helpo en tiu celo?

Plaĉus al ni ankaŭ interŝanĝi leterojn kaj havi seriozan korespondadon kun anoj de via asocio. Korajn dankojn pro via atento, kaj altestime via.

Ruddy Fernánez-M. (Klub-prezidanto)

(Kontaktu ĉe la Kuba Esperanto-Asocio, Apartado postal 2018, La Habana 2, Provincia Ciudad de La Habana, Kubo.)

PRI MIAJ SPERTOJ EN LA ESPERANTA MOVADO

de Eddie Hearne

[Ŝajne mi ĉiam estis aferplena homo, eĉ kiam mi estis knabo. Nun, 91-jara, mi restas sed ne ripozas en Moonyo Lodge kie oni kuiras kaj provas fari ĉion por mi. Mi estas dankema, sed mi faras kiel eble plej multon por mi mem. Eĉ tiom, ke mi eliras en la larĝan ĝardenon kaj laboras ĝis mia dorso krias kaj mi devas eniri. Leteroj al miaj amikoj okupas min kaj mi legas librojn el la librarejo. Tamen mi foje enuiĝas: kion fari? Eble mi povas skribi ion pri mia aktivado dum la jaroj en la mondo de Esperantujo, eble povus esti interese. Do:]

Kiam mi estis 17-jara, mi loĝis en antaŭurbo de Ipswich, Qld. Mi laboris en karb-minejo. Nia familio venis el Skotlando en 1910.

Nia patro en Skotlando estis aktiva konservativulo, sed ŝajne la atmosfero de la tieaj radikalaj karb-ministoj ŝanĝis lin kaj nia hejmo ofte gastigis homojn kiuj venis de Brisbano por prelegi en Ipswich pri Laborpartiaj kaj Socialistaj aferoj. Mi estis juna kaj naiva, kaj sonĝis pri nova, pli bela mondo, kie amikeco kaj helpemeco estas universalaj.

En Brisbana ĵurnalo mi rimarkis leterojn. Unu homo proponis la italan lingvon kiel universalan komunikilon. Alia homo proponis Esperanton, kiu estis eĉ pli simpla ol la itala. Mi pensis pri tio kaj mendis el Melburno lernolibrojn de la itala kaj esperanta lingvoj.

La itala estis multe pli simpla ol la angla, sed Esperanto kun sia regula gramatiko estas multe pli simpla kaj ĝi estas tute neŭtrala. Mi lernis kaj komencis korespondi kun aliaj landoj.

En 1918 mi iris al Melburno kaj baldaŭ trovis Laboristan Esperanto-Grupon,

kiu kunvenis en Lonsdale-Strato. La gvidanto estis S-ro Skurrie, tre lerta homo. Mi bone memoras mian unuan rekonton kiam mi iom halteme parolis esperante. Mi tre ĝuis la klasojn kaj la atmosferon de alia lingvo.

Unu vesperon, kiam mi eliris el klaso, mi renkontis ebriulon kiu parolis al mi. Mi iom ŝerce diris: “Mi ne komprenas vin, Sinjoro”. La ebriulo ne estis stulta, li diris: “Oh! I see, you don't comprehend”. Ni ambaŭ ridetis.

Venis la granda financa krizo kaj ni ne povis havigi sufiĉe da mono por la kreskaĵoj kaj ovoj, kiujn ni sendis al la vendejo. Ni devis vendi nian bienon kaj reveni al Melburno. Ni loĝis en Coburg kaj havis tre malfeliĉan periodon. Mi nur malofte trovis laboron kaj grade perdis mian malmultan kapitalon. Ni tiam havis unu belan infaninon kaj bone memoras la korpremon kiam mi revenis hejmen sen trovi laboron.

Unu brileto estis ke ni renkontis esperantistojn. Tre baldaŭ ni fariĝis grupeto kaj starigis klasojn en la apuda laborĉambrego. Kun S-ino Pearl kaj S-ro Ernie Hanks kaj la aminda S-ino Anna Hintze ni ankaŭ starigis la unuan “Rendevuon”. Ni kunvenis ĉiumonate, ĉe la hejmoj de ni tri laŭvice kaj havis tre interesan babiladon kaj tetrinkadon. Nia nura regulo estis ke ni devas paroli en Esperanto. Estis tre aktiva grupo kaj ni eĉ eldonis ĵurnaleton dum iom da tempo, La Laborista Esperantisto. Ni sentis ke ni ja fariĝis forta movado kiam ni aranĝis koncerton en sufiĉe granda ĉambrego en la ĉefurbo.

Mi, kiel multaj aliaj en la laborista distrikto de Coburg, tre avide legis pri la Rusa Revolucio je la fino de la Unua Mondmilito. Ni aliĝis al la “Amikoj de la Sovetia Unio” (F.O.S.U.) kaj avide legis pri la mirindaj konstruaĵoj kiel la Dnjeper Digego, naive kredante ke la sovetianoj superas la ceteron de la mondo, kulture kaj industrie.

Miaj okuloj grande malfermiĝis kiam mi legis pri la di-iĝo de Stalin kaj la mortigo de multaj el la originalaj revolucianoj. Mi eltrovis ke la lando ne estas regata de sovetianoj sed de grupoj de diktatoroj.

Nun, post sepdek jaroj, estas radieto da espero, la grandega socia konvulsio kiu nun okazas donas iom da espero je la fino de mia vivo.

Dum mi estis tiel aktiva en Coburg, ankaŭ estis aktiva nepolitika grupo kiu kunvenis en Melburno. Kiam mi finfine akiris daŭran laboron, mi aliĝis tiun grupon.

La tempo pasis kaj la kosto de kunvenejoj en la ĉefurbo fariĝis tro alta. S-ino Fay kaj S-ro Herbert Koppel estis tre viglaj esperantistoj kaj estis la pelforto kiu starigis novan rendevuon en ĉambro kiun la grupo aĉetis en Richmond, apuda antaŭurbo de Melburno. Mi intertempe translokiĝis al apudmara Parkdale kaj mia tempo estis tre forte okupata pri komerco. Tamen, mi kaj mia edzino ofte ĝuis esperantan vesperon ĉe la Richmond “Rendevuo”.

Nun mi devas diri ion pri la mirinda Anne Hintze, tre radikala sed ĉefe Esperanto kaj Zamenhof estis por ŝi preskaŭ religio. Kriplulo, kun unu kruro en fera ingo kaj kun du lambastonoj, ŝi tamen estis tre vigla. Somere ŝi eĉ iris al la naĝejo en Coburg kie ŝi formetis la lambastonojn kaj ingon kaj eniris la akvon por instrui

WINDOW ON THE WORLD
NEWS NOTES

Plato's *Republic* in an Esperanto translation by the editor of *The Australian Esperantist* is now available on IBM and Macintosh computer disks @ $60. A printed edition is scheduled to be published as a part of the UEA's *Orienta-Okcidenta* ("East-West") series, probably in Brazil; the publication date is not yet known. Another book in the same *Orienta-Okcidenta* series, M. Bulgakao's *La Majstro kaj Margarita* ("Margarita and the Master") is to be published in the USSR, the first major novel in Esperanto to be published in the USSR since the start of Glasnost.

The 75th Universal Esperanto Congress is being held in Bergen, Norway, this (northern) summer. Next year's Congress is planned for Vienna, Austria, July 25—August 1, 1992. It is expected that the 1993 Congress will be held in Valencia, Spain, and the 1994 Congress in Seoul, South Korea.

The manuscript of the first Esperanto-Thai Dictionary has been completed. The first Esperanto textbook for Thais is now in preparation.

A half-hour TV film *Return to Finland* was completed recently. Its theme is the plight of thousands of prisoners of war taken by the Germans and used as workers to construct a railway in northern Finland during the Second World War. The film was made by two Esperantist TV film makers, Osmo Buller and Roman Dobrzynsaki, and financed by Polish TV. A Polish version was shown on Polish Television on April 1 and an Esperanto version will be shown during the Congress in Norway. Poland was the birthplace and home of the Jewish ophthalmologist L.L. Zamenhof, the creator of Esperanto in 1887.

In Australia, Justice Kep Enderby of the New South Wales Supreme Court and vice-president of the Australian Esperanto Association was interviewed in the "Ockham's Razor" feature on the ABC's Radio National in March.

The Brazilian Esperantist Youth Organisation will hold its thirteenth Congress next year, in Barro do Garças, under the auspices of the city councils of Barra do Garças, Aragarças and Torixoréu. The organisers are the Esperanto Association of the Araguaya Valley, the Cultural & Ecological Foundation of the Western region, and the Matogrosa Esperanto and Linguistics Federation. The theme of the Congress will be sports, culture, and ecological education. There will be presentations by folklore groups daily, also a cabaret. Two excursions are being organised, to the Valley of Waterfalls and to the Bateja Stream "where fish swim in warm, crystal waters". Non-Brazilians will be lodged free. Information from Ciro Gomes de Freitas, Caixa Postal 246, BR-78600 Barra do Garças-MT, Brazil.

Travel Scholarship: the Tim Einihovici TEJO Congress Foundation is asking candidates for the 1992 scholarship to register now with Idyss Einihovici, 88 Newry St, Floreat Park WA 6014. The scholarship covers return airfares to the 1992 TEJO congress in Montreal, Canada, food, lodging, and congress fees. The successful candidate will have completed successfully at least the *Elementa Ekzameno* of the Australian Esperanto Association, with honours, and meet criteria to qualify as representative of Australia at the congress.

Czechoslovakia: An expedition around the world is being planned. The group, consisting of five to ten Esperantists from a variety of countries, will bicycle, ride, walk, fly, sail, etc. around the world, using only non-polluting means of transport. Details from Vlasta Hajkova, CS-252 46 Skochovice 43, Czechoslovakia.

Yugoslavia: An international children's drawings competition is being organised by the Esperanto Society of Subotica in memory of the author, explorer and Esperantist Tibor Sekelj, in collaboration with the "Pionir" Chocolate Company. The theme of the competition is illustrations for T. Sekelj's book *Kumeŭaŭa la Filo de la Ĝangalo* ("Kumeŭaŭa Son of the Jungle"). Participants in the competition may chose their own medium and format. The closing date is August 31, 1991. Illustrations submitted for the competition must be sent to Esperanto Internacia Konkurso, TRG Slobode 1, YU-24000 Subotica.

THE NATURE OF ESPERANTO VERBS
by Donald Broadribb

Very few textbooks speak about the origins and nature of Esperanto grammar in their haste to start off the new student with a practical command of the language. This sometimes leaves beginners a bit in the dark as to just what is going on in the mechanics of the language. M.C. Butler's *Step by Step in Esperanto* is one very enjoyable way for those who have finished an elementary course in Esperanto to go on to perfect their knowledge of the vocabulary and also the subtleties of grammar. Here I wish merely to point out some interesting features and in so doing to end some of the confusions often experienced.

The verb system is based on a simple scheme: an s preceded by a vowel is placed at the end of a word:

-a-s the present time
-e-s
-i-s past time
-o-s the future
-u-s "maybe"

As you can see, this follows the order of the vowels in the alphabet: a, e, i, o, u. The -e-s is, however not used. Few people know why. -s-s was originally used for an "imperfect tense", a verb form that has no simple equivalent in

English but is used in many European languages. Shortly before the Esperanto language was published, in 1887, its creator, Dr Zamenhof, dropped this from the verb table—something for which English speakers, at least, will be eternally grateful.

As an example, we may take a simple word *hav* (=have)

mi havas = I have (at present)
mi havis = I had (in the past)
mi havos = I will have (in future)
mi havus = I might have (uncertain)

it is better not to think of these in terms of English grammar, for that leads many students astray. Think, instead, of them as referring to the time of some action or event: now, in the past, in the future, or only maybe. Often this is called using verbs to indicate "relative time".

As a beginner you will probably be thinking of your sentences in English and then putting them into Esperanto. It is best to aim at being able to think directly in Esperanto rather than to try to translate from English, but this takes lots of practice, and when you come upon something you want to say but do not know the Esperanto for, you may find yourself filling in your thought in English. So keep in mind: when making an Esperanto verb, turn your attention to the time it is referring to, not to English grammar.

For example: "I'll be going to the store soon" is simply stating something that will be done in the future. So you choose the Esperanto form that applies to the future: *mi iros al la butiko baldaŭ*. Contrast this with "I am going to the store now". Sometimes we mean this to refer to my actions in the present, so the Esperanto is *mi iras al la butiko nun*.. But often we mean it as talking about the very near future, i.e. in a few minutes. If that is what we have in mind, we are still concerned with the future, and to indicate that we mean the very near future we add in an extra word or two in the Esperanto to show that. An example might be: *mi jam nun iros al la butiko* (literally: "I already now will go to the store") Or perhaps *post kelkaj minutoj mi iros al la butiko* ("After a few minutes I will go to the store").

"I went to the store yesterday" is a pretty straightforward statement of something that took place in the past, so we use the past time verb form: "mi iris al la butiko hieraŭ". In English things get a bit complicated when we use an alternative way of indicating the past, as in the phrase "I have already gone". This *looks* as if it has something to do with "have", but when we stop to ask what we actually mean, we discover that we are simply talking about an event that took place in the past. Actually the "have" is linked in our mind with "gone" to make "have gone" which because it indicates past time turns into "iris", so the sentence reads *mi jam iris*.

One of the most common mistakes that beginners make in speaking or writing Esperanto is to try to translate the English words one by one instead of thinking what those words indicate. In this case, what time they indicate.

Where English often uses separate words to indicate time (have, will, would, might, could etc.) Esperanto uses just one simple ending.

Here is an example of using *-us*. "I would go if I had enough money" (or some people say "I would go if I would have enough money", or "I might go..." and so on). In Esperanto this is simply *mi irus se mi havus sufiĉan monon*. The *-us* at the end of *irus* and *havus* indicates that there is a sort of "maybe, perhaps, might" about it.

Of course in English all the many specialised ways we have of using our verbs contributes a lot to the nuances and variety of styles at our disposal. It is a common, but wrong, idea among new students that Esperanto because of its simple verb system must lose out on these nuances and varieties of style. The truth is that Esperanto shows its special nuances by using extra words that we normally would not use in the English sentence. And it allows for variations in style by letting the speaker change the word order around, something that for the most part English does not allow. As an example, *mi iris jam hieraŭ al la butiko* cannot be translated word for word into English as "I went already yesterday to the store" (this is the sort of phrase we often hear foreigners use when trying to speak English because they are not familiar with the English style of word order). If we were trying to translate the Esperanto sentence into English, we would have to think "what sort of time frame is the Esperanto sentence indicating?" and then pick one of various possible English phrases to fit the particular nuance or context that seems to be involved. Perhaps "I already went to the store yesterday".

Incidentally, this type of analysis of what sort of time frame is intended is at the heart of modern computer programs for making automatic translations. The usual system is for the computer and computer operator to decide the time framework in the original language and then replace it with the form used for the same purpose in Esperanto. Then when choosing, say, French for the final text, the computer automatically knows the methods French uses to express this particular time framework.

Obviously there may be several possible options the computer can choose between in making a correct French phrase out of it, so the computer would choose the most common or most straight forward. This is why most experts say that automatic translation computer programs cannot translate literary pieces adequately. Actually, a program for making literary translations could be written, but it would require active and very intensive collaboration with an expert in French language literature, a luxury the computer world has not yet had time for.

You may have already discovered that Esperanto also has a bewildering variety of participles (in contrast with just two in English). These have a special use that require a good basic knowledge of ordinary Esperanto speech to be used correctly. ■

la junulojn naĝi.

Mi havas feliĉajn memorojn pri libertempado sur la sablo ĉe Black Rock kun Anna kaj gesroj Hanks.

Kun mia edzino mi ofte portis en mia aŭto Annan longan distancon al la alia flanko de la ĉefurbo revene el la Richmond-Rendevuo. Mi sentis fieron kiam Anna petis ke mi faru adiaŭon post ŝia morto, en la Rendevuo. Multaj homoj iris al tiu kunveno, estis tre solena afero kaj mi ĝojis ke mi jam preparis laŭdan priskribon de ĉi tiu dediĉita esperantisto kaj idealisto.

Dum 1964 mi kun mia edzino iris al Britio kaj oni petis ke mi reprezentu Aŭstralion en la Esperanto-Kongreso en Nederlando. Estis tre interesa parto de nia vojaĝo. Ĉiam estis rimarkinde kiel facile estas komuniki kun alilandanoj. En la hotelo oni aranĝis tablojn por kvar kaj ĉiam mi sidis kontraŭ du homoj el alia lando. Neniam ni sentis malfacilaĵon.

Esperanto ja estas bela internacia komunikilo.

DEZIRAS KORESPONDI

Razen Manandhar. Adreso: KHA 1-389 Khichapokhari, Kathmandu, Nepalo. 22jara fraŭlo studanta la anglan literaturon por Magistra Diplomo.

Statement of Accounts

Australian Esperanto Association
Perth 1990

Commonwealth Bank of Australia, Bentley WA. A/c 6136-0090 3636
Operating cheque account from 1 January to 31 December 1990

Balance at 31 December 1989				$342.75
Receipts				
Subscriptions (Members/TAE)			$5970.50	
1989		$40.00		
1990		3756.00		
1991		2050.50		
Libro-Servo		124.00		
AEA Melbourne Congress Committee			1550.00	
Donations			1708.20	
to Banham Matasin (Australian Publications) Foundation		1105.00		
from Libroservo de AEA	$745.00			
from Ralph Harry	360.00			
to Australian Esperanto Association		388.20		
from Libroservo de AEA	372.20			
from Ralph Harry	10.00			
from P. Thompson	6.00			
to Exhibition in Tasmania by Independent Schools		140.00		
from K. Howe	20.00			
from J. Coogans	20.00			
from J. & N. Moore	50.00			
from S. Bruton	30.00			
from D. Parkinson	20.00			
to *The Australian Esperantist*		45.00		
from A. & E. Oliver	30.00			
from E. Hearn	5.00			
from M. Sanders	10.00			
to Goldsmith (Information Recruitment Foundation) (Oliver)		30.00		
Esperanto Examinations			92.00	
Books through the Libroservo			29.10	9349.80
AEA Summer School Contingency cheque not cashed				500.00
Bank account interest				73.40
Total receipts				$10265.95

Payments

The Australian Esperantist (every two months)			$3394.88	
Publication		$2764.60		
Postage		555.28		
Registration		75.00		
Correspondence	449.50			
P.O. Box rental	30.00	479.90		
Libroservo			278.40	
Adresaro		250.55		
Books		27.85		
Universal Esperanto Association (affiliation members)			189.38	
Independent Schools Exhibition in Tasmania			350.00	
Donations			251.36	
to Youth Group		200.00		
to Herzberg Esperanto Hotel		51.36		
Promotion of Esperanto			77.30	
Task Force		47.20		
Publications M-B Foundation		10.50		
Information TG Foundation		19.60		
A/c fees			96.00	
Balance sheet		60.00		
Corporate Affairs Commission		36.00		
Esperanto Examinations			24.62	
Transfer to CBA Trust Management A/c 6136-0078 3531			3000.00	
Statement of payments				$8141.84
Government fees				13.93
FID			3.58	
FDT			10.35	
Total Payments				$8155.77

Statement of Assets and Investments (Maturity Date) at 31 December 1990--Perth WA

Assets		
Operating Account		$2110.18
The Australian Esperantist		3800.00
Matasin-Banham (Publication)		7458.00
Tiny Goldsmith (Recruitment)		1329.00
Simpkins Foundation (Contingency)		1246.00
AEA Summer School (Contingency)		1242.00
General Investments		28786.17
Total Assets		$45971.35
Investments		
Commonwealth Bank A/c (Bentley)		$2110.18
CBA Term Deposit (4 April 1991) 50018028		5500.00
CBA Management A/c 783531 (24 hour call)		11187.05
at 31 December 1989	$6300.00	
Transfer (500-3677 closed) (including Term Deposit interest of $863.12)	1000.77	
Transfer from cheque account	3000.00	
Interest less fees 3.	886.28	
R&I Bank Account 6805769 (11 January 1991)		18187.46
R&I Bank Account 6805777 (21 February 1991)		8986.66
Total Investments		$45971.35

Owen Loneragan
(Hon Treasurer)
3 January 1991

Annual Audit 31 December 1990

I have examined the books of prime entry of the above association and found them to be in order.

In my opinion the statement of Income and Expenditure and the Statement of Assets and Liabilities reflect a true and fair view of both the years' operation and the assets on hand.

Yours faithfully

J. M. Box
M.I.A.A.
21 February 1991

NUR FRAGMENTETO

de Idyss Einihovici

Aĝiĝi estas malfacila periodo en la homa vivo. Ĝi estas destino neevitebla por ĉiuj. Dum mia longviva sperto mi lernis ke oni povas helpi sin mem. Gardi sin regule kaj honeste kun disciplino estas mia devizo, eliksiro, kaj ĉiam celadi al bona sano, korpa kaj mensa, sen plendo. Bonstato estas la plej altvalorigaj ĝojo kaj feliĉo. Do pensu ĉiam pri sano kaj sekvu sanigan vivstilon por atingi ĝin. Komence estas malfacile, sed iom post iom oni alkutimiĝas kaj akiras naturan vivstilon. Do komencu tuj sanigan vivstilon senprokraste, alie vi daŭre suferados. Kuraci malsanon estas ne ĉiam facile kaj ofte malsukcesas. Vi mem povas eviti suferadon gardante vin mem. Kutimiĝu al ĉiutaga marŝado en parko, en freŝa aero, sen distraĵo. Marŝu ritme, admirante belegajn arbojn, aŭskultante ĉarmajn voĉojn de birdetoj, vi helpos solvi problemojn dum aĝiĝado. Bedaŭrinde, malfeliĉige, dum la aĝiĝperiodo ĉeloj misfunkcias kaj sekve sano malboniĝas. La saniga vivstilo povas helpi kaj stimuli vin, kondiĉe ke vi ekzercu vin ĉiutage, honeste. Tio postulas honestan disciplinon. Persistado estas grava decido, kaj alportos kontentigajn rezultojn. Mia edzo ĉiam diris: "Estu propra kuracisto". Meditado helpas cerbumadon kaj pliakriĝon de la memoro. Parkerigi poezion ankaŭ estas bonega ilo por akrigi la memoron. Sed la plej bona metodo fortigi la cerbon estas lerni alian lingvon, kompreneble Esperanton. Oni ofte aŭdas negativan diron: "Mi estas tro maljuna". Tiu negativa ideo estas por pigruloj kiuj anstataŭ pliriĉigi sian intelektan vivon plendas pri io ajn. Dum la 70-jara datreveno de mia naskiĝtago mi flugis al Sidnejo por esti ekzamenata por la "supera" diplomo kaj ĝin ricevis. Ĝi estas mia plej ŝatata posedaĵo, kiun mi alte taksas. Plendemuloj, ĉesu plendi, komencu la novan vivstilon. Ne forgesu ke oni povas lerni kaj kleriĝi je iu ajn jaraĝo, kiam ekzistas deziro. Geamikoj, komencu studadon. Tiam vi ne havos tempon por plendi pri malsanoj. La kompleksa arto dum periodo de aĝiĝado estas motiviĝo, stimuliĝo, kaj disciplino. Mi esperas ke mia viv- fragmento inspiros vin. "Mens sana in corpore sano"[1]

LA VOJAĜFONDUSO TEJO

Ni atentigas ĉiujn legantojn ke ĉiuj eblaj kandidatoj por la premio 1992 (senpaga vojaĝo al kaj de la TEJO kongreso, kaj senpagaj loĝ- kaj manĝkostoj dum la partopreno en la kongreso) devus sin registri jam nun kun la fondinto de la fonduso, Idyss Einihovici, 88 Newry St, Floreat Park WA 6014. Jam pluraj junuloj sin registris en Okcidenta Aŭstralio, kaj ni deziras kandidatojn el ĉiuj ŝtatoj kaj teritorioj. El la kandidatoj kiuj sukcesos en la elementa ekzameno kun honoro la fina selekto estos farita surbaze de la karaktero kaj sinprezento de la kandidatoj, por trovi tiun, kiu plej inde reprezentos Aŭstralion en la kongreso. Ni nepre estu internacie reprezentataj en la tutmonda esperanta junularmovado!

---

1. [Latine; "sana menso en sana korpo".]

PRAVIGO DE LA TERMINO LANCĴETILO ANSTATAŬ VUMERO

de Bernard Golden

Leksikologia mispaŝo

En la Aŭstralia Esperanta Vortaro de Ralph Harry kaj Volo Gueltling, la aborigen-devena vorto woomera estas esperantigita per la neologismo vumero kaj difinita kiel “aborigena lancĵetilo”. Ralph Harry faris provon pravigi la vortformon “vumero” (TAE 1991, n-ro 266, p.22) sed lia arbitra elekto de la aŭstralia vorto woomera kiel etimo ne akordas kun normoj por la esperantigo de arkeologiaj kaj etnografiaj terminoj, kiujn mi starigis en studaĵo antaŭ pli ol dek jaroj.* Malgraŭ la opinio de D-ro Harry, la lancĵetilo ne estas “unika inventaĵo de la aŭstraliaj indiĝenoj”. Estas bedaŭrinde, ke li ne okupiĝis pri ĝia historio same profunde kiel li faris rilate la bumerangon. La lancĵetilo estas ĉasilo uzata dum granda parto de la historio kaj prehistorio de la homo en pluraj regionoj de la mondo.

Tempa kaj spaca distribuo de la lancĵetilo

La plej fruaj lancĵetiloj estis uzataj de la ĉasistoj de grandbestoj dum la paleolitika periodo en Eŭropo. Fig. 1 montras parton de surmura pentraĵo en la kaverno Lascaux en Francio. Kuŝanta sur la grundo estas kadavro de viro, kiu verŝajne estis mortigita de bizono pentrita antaŭ li. Apud lia dekstra mano estas bastono kun birda kapo ĉe unu ekstremaĵo. Laŭ unu el la interpretoj, kiujn donas prehistoriistoj, tiu objekto estas lancĵetilo.

En la Nova Mondo arkeologoj trovas restaĵojn de lancĵetiloj uzataj de la indiĝenoj de Usono, Mezameriko kaj la regiono de Andoj. Etnografiaj raportoj priskribas lancĵetilon en okcidenta Afriko (Togolando, Liberio), en Sudazio, ankaŭ ĉe la eskimoj (inuitoj), kaj, krom Aŭstralio, en Melanezio kaj Polinezio. Ne estas eble pruvi, ke la lancĵetilo estis inventita nur unu fojon en la prehistorio kaj poste difuziĝis tra la mondo. Nuntempe arkeologoj kaj etnografoj inklinas akcepti la eblon de sendependa invento.

Fig. 1. Detalaĵo de la “Sceno de la Puto” el la kaverno Lascaux, Francio. Kuŝas apud la mortinta ĉasisto objekto, kiu povas esti lancĵetilo.

Tipologio de la lancĵetilo

La lancĵetilo havas la formon de rekta bastono aŭ tabulo de 30 ĝis 60 cm longa kun plata supraĵo, sur kiu kuŝas lanco, sago aŭ harpuno. La plej ofta materialo estas malmola ligno; kie taŭga ligno mankas, rangifera antlero (branĉkorno) aŭ osto povas anstataŭi ĝin. La lanc- aŭ sagostango estas el malmola ligno kun pinto el siliko, osto aŭ, ĉe la inkaaj soldatoj, el bronzo. Lancĵetiloj de la magdalenia peri-

odo de la supera paleolitiko estis ornamitaj plejparte per skulptitaj bestfiguroj. (Fig. 2)

Fig. 2. Lanĉjetilo el rangifera antlero (branĉkorno) kun skulptita figuro de kapro (supra paleolitiko). Longo: 30 cm.

Fakuloj dividas lanĉjetilojn en du grupojn, masklajn kaj femalajn, surbaze de la maniero firmigi la pozicion de la lanco. La masklaj lanĉjetiloj havas elstaraĵon en la formo de dorno, tigeto aŭ hoko ĉe unu ekstremaĵo, kiu eniras en ing-forman ekstremaĵon de la lanco. Ĉe unu ekstremaĵo de la femala lanĉjetilo estas sulketo aŭ traforma profundaĵo, kiu ricevas la lanc-ekstremaĵon. Ĉe la ekstremaĵo de la lanĉjetilo, kiu estas en la mano de la ĵetanto, povas esti mantenilo aŭ leda maŝo fiksebla al la pojno. La amerikaj indianoj ekipis siajn lanĉjetilojn ankaŭ per pezaĵo el ŝtono por pli bone ekvilibrigi ilin dum la svingo antaŭ la ĵetimpulso. (Fig, 3)

Fig. 3. Pozicio de la lanĉjetilo kaj la lanco en la mano antaŭ ĵeto.

Funkcio de la lanĉjetilo

La lanĉjetilo servas por plilongigi la homan brakon per tria elemento (levumbrako), tiel ebligante ĵeton de la lanco en la intencita direkto kun pli granda rapideco kaj pli longa pafatingo. La impeto de la lanco estas eksterordinara. Blankula atestanto de la uzo de lanĉjetilo fare de indianoj en Usono vidis, kiel lanco tiel ĵetita tra distanco de 80 metroj tiel facile traboris homon, ke la pinto elstaris tri manlarĝojn post la dorso.

Filologia esploro por trovi la Esperantan terminon

La unua paŝo estas kolekti ĉiujn etnolingvajn ekvivalentojn kaj klasifiki ilin laŭ formo kaj signifo.

Angla—spear thrower, atlatl (Usono), wommera kaj woomera (Aŭstralio)
Franca—propulseur (à javeline)
Germana—Speerschleuder, Pfeilschleuder, Schleuderstange, Speer-Wurfstock, Wurfbrett
Hispana—lanzarados, populsor, atlatl (Meksiko), estólica (Peruo)
Hungara—dádavetö, nyilvetö, dárdahajító, lándzshajító

Analizo montras, ke ekzistas tri manieroj esprimi la koncepton.

1. Per unu vorto (morfemo): *atlatl* (nahŭatla lingvo el Meksiko): *woomera* (aborigena lingvo el Aŭstralio); *estólica* (indiĝena lingvo el Peruo.)
2. Per unu vorto enhavanta verban radikon (*populs-*), signifantan "pel" kaj sufikson (*-eur*, *-or*) signifantan aganton: franca *propulseur*; hispana *propulsor*.
3. Per kunmetita esprimo kun

a. Substantiva flankelemento signif-anta lancon aŭ sagon kaj verba ĉef-elemento

signifanta pelanton aŭ ĵet-anton: la unua angla termino kaj la kvar hungaraj terminoj; en la hispana termi-naro la ordo estas inversa: *lanza* = ĵet- kaj *dardas* = lancoj.
b. du substantivoj, la unua estanta la ĵetanto, kaj la dua la ĵetilo: la unuaj du germanaj terminoj.
c. du substantivoj, el kiuj la dua pri-skribas la formon de la ĵetilo: la lastaj tri germanaj terminoj-ĵetil-stango, lanc-ĵetbastono, ĵet-tabulo.
La vortoj en kategorio 3a montras la vojon al la solvo de la problemo en Esperanto: *lanc* + *ĵet* + *-ilo* = lancĵetilo.

La principo de analogio

Subtenas la vortformon lancĵetilo aliaj terminoj en Esperanto, kiuj estas formitaj laŭ la sama maniero:
a. armiloj: ŝtonĵetilo, flamĵetilo
b. fajrobrigado: akvoĵetilo, ŝaŭmĵetilo
c. maraj aferoj: harpunĵetilo (marfiŝado, balenĉasado) kabloĵetilo (ŝip- kaj homsavado)
ĉ. veturiloj: lumĵetilo
d. kinomatografia studio, teatro: lum- ĵetilo

Registrado en Esperantaj konsultlibroj

Plia apogo por la termino *lancĵetilo* estas ĝia registrado en prestiĝaj vortaroj.
a. *Esperanta Bildvortaro* redaktita de Rüdiger Eichholz enhavas tri bildkompleksojn montrantajn lancĵetilojn: 309/5 (lancĵetilo el rangifera branĉokorno), 335/40 (lancĵetilo kun lancoj, el Aŭstralio), 336/8 (lancĵetilo de eksimo).
b. *Plena Pekoteko* 1985-1990, elektronika vortaro kompilata de Rüdiger Eichholz, registras *lancĵetilo* ĉe n-ro 87/803.

Principo de laŭmorfema traduko

Jen la principo, kiu gvidas min, kiam mi havas okazon esperantigi arkeologiajn fakterminojn por artikoloj:

a. Internacieco. Se ekzistas vortoj aŭ radikoj vaste uzataj, t.e. en la ĉefaj naciaj lingvoj konataj al arkeologoj, estas necese nur konformigi ilin al la Esperanta ortografio kaj fonetiko, por ke ili restu rekoneblaj skribe kaj parole.

b. *Laŭmorfema traduko*. Kiam ne estas eble trovi internacian radikon, mi provas kunmeti la terminon en Esperanto per traduko de elementoj en nacilingvaj terminoj, kiuj plej bone priskribas la objekton aŭ ideon. Kiam temas pri artefaktoj, mi preferas tiujn terminojn, kiuj klarigas, kiel funkcias la objekto, se oni povas esti certa pri tio, ĉar la funkcio estas pli signifoplena ol la formo.

* Bernard Golden: “Kelkaj problemoj rilate la ellaboron de arkeologia fakterminologio en Esperanto”, p. 65-74 kaj 30 en *Apliko de Esperanto en Scienco kaj Teĥniko 1980* red. Z. Fluhar. Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Scienca-teĥnika sekcio, 1980, 104p.

PRILINGVA NOTO

Ne interŝanĝu la vortojn *plasta* kaj *plastika*. “Plasta koverto” = “plastic envelope”; “plastika” estas arttermino = “reliefa”.

---

la redaktoro pardonon petas pro la entrudiĝo de la sekvanta teksto.

11-MONATA JARRAPORTO DE ODLO BOKSERP

Ĉiu ĝustepensanta koboldo ja tute bone scias ke tute ne eblas verki laŭ la kondiĉoj postulataj de nia reaktoro. En mia lasta jarraporto (ho ve, ĝi tamen ne estis la lasta!) mi raportis la minacon de nia Plejsaĝa, Plejamata, Plejglorinda, Plejstulta Reaktoro (aj!!! ne ĵetu tiun poton da inko sur min!) Plejklera Reaktoro, dungi Macintosh-komputilon se mi ne tuj pli vigle laboros. Nu, tiu aĉulo plenumis sian minacon! Sed sciu, mi nepre ne lasos lin pretigi Esperanton-korektantan programon per ĝi, lia dua minaco.K aj du kolumnoj sur ĉiu paĝo! ĉu ne jam estas sufiĉe fuŝi nur unu kolumnegon ĉiupaĝe sen ke mi devu fardi farti farbi fari laboron duoble pligrandan kaj tute sen ekstra pago?! Nu, mi demandas vin!!! Kial vi ne respondas? Mi scias scias, estas ĉar vi eĉ ne legas min dum mi parolas, parolas min dum vi legas...jam uzas la foliojn de ĉi tiu gazeto en la ĝusta ĉambro. (Ne cenzuru tion, Reaktoro! Mi pentas!) Nu, mi venĝos! Jes ja! Ekde/ek de/ eke de/jam-de-nun mi simple rifuzos plu presi la literon d . Kaj nia Reaktoro restos Reaktoro um la tuta cetero e lia vivo! Ho homoj de Ĉernobil', vi ne restas sen simpatiantoj! Nun sur la Monteto e Bakistoj via amiko ra ia as por vi. Ve! Nia Plejsankta Reddddaktoro memorigis min ke mia propra nomo entenas la literon ddddddddd.....d! Sen ĝi mi ne povus eĉ presi mian propran nomon. Mi devos elpensi alian ruzon. Tiel sekretan ke eĉ nia Plejvipinda Reddaktoro ne rimarkos ĝin! Jes, mi scias!Mi presos la veran statistikon pri nia membronombro. Tio hontigos lin! Do, jen, mi fiere proklamas ke la kvanto da personoj legantaj nian gazeton estas, averaĝe, - 47 (legu: minus 47, matematikistoj.). Do ja ne gravas kion mi presas.Mia fuŝado ne plu estas rimarkata eĉ de la Reaktoro mem! *Ĉar li ja tute evidente ne legas la tekston, eĉ la provpruvtekston.*

Do vi volas scii scii kion

mi faris dum la lasta jaro por pravigi mian altan salajron, ĉu ne? Nu,mi komencis lerni presi ĉinstile de dekstre maldekstren, al iserp soseckus im jonoicel jailp jaklek run tsop ek saderk im jak unuan Esperanto-gazeton laŭ la ĉinlingva stilo. Araba? Nu, ne

gravas, ĉiuj tiuj amerikanoj same aspektas.

Kun fuŝanta respektego, via preskoboldo ODLO.

Kun grandega pardonpeto via redaktoro rekomencas la normalan tekston.

TRI NOVAJ LIBRETOJ

recenzas Donald Broadribb

Al Unu Lingvo por Eŭropo? La Estonteco de la Eŭropa Babelo de Mark Fettes. Roterdamo: UEA, 1991. (*Esperanto-Dokumento 27E*) 15p. Menenda rekte de UEA.

Mallonga kaj iomete supraĵa libreto pri la demando: ĉu rolu kiel helplingvo en Eŭropo la angla aŭ Esperanto? La respondo neeviteble estas Esperanto, kaj ĝin atingas la aŭtoro pere de sociologia argumentado. Oni nur demandas al si: kial eldoni tian broŝuron en Esperanto, ĉu vere necesas prediki al la konvertitoj?

Sed legado de la verketo ja inspiris en mi cerbumadon: kiel substrekas la aŭtoro, nur malgranda procento da l'lernantoj de la angla kiel dua lingvo sukcesas kontentige paroli kaj verki en ĝi, sed Esperanto estas multe pli facila lingvo. Kial, do, mi demandas min, nur malgranda procento da lernintoj de Esperanto kiel dua lingvo sukcesas kontentige paroli kaj verki en ĝi? Ĉi tiu psikologia fenomeno estas ankoraŭ malsufiĉe esplorita. Ŝajnas ke lingvolernantoj emas lerni nur ĝis tiu nivelo kie ili povas balbuti sed ne emas finlerni la duan lingvon, negrave ĉu la anglan, ĉu Esperanton, la francan, aŭ alian. La radikoj de tiu fenomeno nepre devas esti eltrovitaj kaj fortranĉitaj. Alie, Esperanto restos eterne lingvo de nur kelkdek mil personoj vere parolantaj ĝin. ❑

Wels: Urbo en Supra Aŭstrio de Walter Klag Patro. Eldonita de la aŭtoro (Vieno, Aŭstrio). Verda Serio 2. 24p. Mendenda de UEA.

Temas pri simple presita turismolibreto, modele verkita kaj kun lingvuzo neriproĉebla (escepte de la titolpaĝo kiu diras "regisita kaj komentita far Renate kaj Walter Klag Filo" en kiu estas atenco kontraŭ la Fundamento (far anstataŭ de) kaj tute nekonata vorto "regisita" kies signifon mi ne povas diveni.

Tre malmultaj ĉitiaĵoj ekzistas en Esperanto. Temas pri simpla manlibreto kiu kondukas la leganton tra la urbeto Wels (50 000 loĝantoj), kvazaŭ gvidisto parolanta pri la signifo kaj karaktero de la diversaj konstruaĵoj kaj lokoj rigardataj. Enestas kelkaj ilustraĵoj, kiuj pro la fotoreproduktado ne sukcesas adekvate imponi. Listo de klarigoj, ĉe la fino de la libreto, informas pri la diversaj historiaj kaj geografiaj mencioj, simple, klare, kaj sufiĉe amplekse.

Entute, se vi intencas iam ferii en Aŭstrio, ĉi tiu libreto helpos vin ĝui la urbeton Wels. Sed la libreto estas ankaŭ tre imitinda modelo por malmultekosta sed utila, fidinda, kaj ĉiam interesa gvidlibreto kian eble iam deziros iuj aŭstraliaj esperantistoj eldoni pri siaj propraj urboj. ❑

Hospitalo Sepetaĝa de Walter Klag Filo. Verda serio 3. Eldonita de la aŭtoro, Vieno, 1991. 16p. Mendenda de UEA.

Interesa, iom ĉarma, kaj facile legebla noveleto, kies surprizan klimakson mi ne volas riveli, por ne forpreni de ĝi iom da mistereco. Lingvo preskaŭ neriproĉinda (enestas regula misuzo de adjektivaj participoj anstataŭ de adverboj kaj neglekto de la akuzativo post kiel kiam ĝi estas gramatike postulata). La aŭtoro montras sin lerta verkisto, kaj ĉiu komencanto aŭ iomete-progresinta esperantisto ĝuus legi la libreton.

Unu problemo ankoraŭ ne solvita: la prezo de la libreto (kiel de la aliaj du supre recenzitaj) estas tiel malgranda, ke la poŝtkosto estas pli granda ol la prezo de la libreto mem. Se oni mendus ĉiujn tri de UEA, tiu monperdo iomete mildiĝus, sed ne kontentige. La libretoj en la "Verda Serio" kostas po inter unu kaj tri guldenoj, plejparte (= proksimume A$2.00). Sendube ekzistas merkato por tiaj libretoj, se iu libroservisto povus enstokigi ilin, sed la vendkvanto estus tiel malgranda ke al neniu libroservo valorus enstokigi ilin. Problemo nesolvebla? Nu, se vi mendas de UEA aliajn librojn samtempe, vi trovos ke indas mendi ankaŭ ĉi tiun libreton. ❑

STATUTO DE LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO INC.

ŜANĜO DE LA STATUTO

Konforme al alineo 31 de la Statuto: ĉiuj membroj de la Aŭstralia EsperantoAsocio Inc. nun estas informataj pri proponitaj ŝanĝoj kaj dum la ĝenerala kunveno en la kadro de la 18a Aŭstralia Kongreso venontjara la ĉisubaj ŝanĝoj, post diskuto, povos esti akceptitaj, kaj ĉi tiuj eroj el la statuto tiam konformos al la impostleĝoj entenataj en subparagrafo 78(1) de *The Income Tax Assessment Act*.[1]

Alineo 29: la ĝisnuna alineo 29 estu 29A, kaj sekvu alineo 29B kun la teksto:

29B Non-profit

The income and property of the Association whencesoever derived shall be applied solely towards the promotion of the objectives of the Association and no portion thereof shall be paid or transferred directly or indirectly by way of dividend bonus or otherwise howsoever by way of profit to the members of the Association provided that nothing herein shall prevent the payment in good faith of remuneration to any officer or servant of the Association or to any member of the Association in return for any services actually rendered to the Association or reasonable and proper rent for premises let by any member to the Association.

Nova teksto de alineo 32:

32. Dissolution:

If upon the winding up or dissolution of the Association there remains after the satisfaction of all its debts and liabilities and property whatsoever the same shall

---

1. Temas pri "Impostliberiĝo" rilate al la enspezoj de Aŭstralia Esperanto-Asocio Inc. kaj ĉiuj filiigitaj grupoj en Aŭstralio.

not be paid to or distributed among the members of the Association but shall be given or transferred to some other institution or institutions having objects similar to the objects of the Association and approved under subparagraph 78(1) of the Income Assessment Act.

La plena teksto de la Statuto de AEA aperas en la *Adresaro kaj Jarlibro*.

28a A.E.A. KAJ 57a N.Z.E.A. Esperanto-Kongreso
11-19 Januaro 1992. Temo: Ekologio
3a Listo de ĉeestontoj

20 Dudley Parkinson (TAS)
21 Robbie Robertson (NSW)
22 Margaret Robertson (NSW)
23 Max Wearing (SA)
24 Joyce Turner (QLD)
25 Eunice Graham (NSW)
26 Irina Timonin (NSW)
27 Betty Cleminson (NSW)
28 Bettie Hart (NSW)
29 Teri Metherell (VIC)
30 Wal Rawling (NSW)
31 Charlotte Rawling (NSW)
32 Vera Payne (WA)\
33 Phillip Thompson (QLD)
34 Malcolm Ross (NSW)

Ĝis 21 junio 1991: NSW—20, VIC—5, QLD—4, TAS—1, KANB—1, SA—1, WA—1, Usono—1 = 34.

KONGRESNOVAĴOJ
informas Les Scott

Sabato la 11-a: Registrado—Ĝuinda programo por Interkona Vespero.

Dimanĉo la 12-a: Filozofia diskuto, ĉiuj estos bonvenaj. Ekskurso: Antikvaĵoj de la Richmond-Windsor regiono. Diservo en antikva preĝejo en la Universitato mem.

Lundo la 13-a: Vic. Prez. AEA Juĝisto Kep Enderby malfermos la Kongreson (angle). Lokaj eminentuloj estos invititaj. Fotado sekvos. Prez. AEA Trevor Steele prezentos la kongrestemon kaj malfermos la aferkunvenojn de AEA, NZEA kaj JAGE. Vespere: Distraĵo prezentota de esperantistoj mem el la tuta Aŭstralio kaj el Nov-Zelando—diversaj eroj.

Lasthora informo: La tre bona Kongres-kantlibro preparita kaj verkita de Gaye Phillips kaj Kay Anderson kun helpantoj el la brisbana Esperanto-klubo

venis en la manojn de la LKK. Ĝi konsistas el malnovaj kaj novaj aŭstraliaj, novzelandaj kaj aliaj kantoj. Kay kaj Gaye prezentos erojn el ĝi ofte, dum la Kongreso. Kay akompanos kaj Gaye kondukos—kia granda esperanta skipo!

EL LA REGIONOJ

Sudaŭstralio: Preparado de la Aŭstralia Somer-Lernejo 1993 (11-22 januaro) jam komenciĝis. Kiu deziras frutempe inviti eksterlandajn geamikojn partopreni la kursojn povas akiri presitajn foliojn de Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney SA 5069.

Nederlanda paro Ep kaj Ramona van Dalsem vizitis gesamideanojn en Adelajdo la 11-14an de majo. Ramono estis dufoje intervjuita pri Esperanto (unue en la angla kaj poste en la nederlanda lingvoj) por dissendo fare de FM-radio la 13an kaj 16an de majo respektive.

La Adelaide University Esperanto Club nun havas 13 membrojn. Astrid Riessen (8 Clarence St, Blackwood SA 5051) sekretarias por ĝi kaj ankaŭ kasistas por JAGE. [El *Tamen Plu*]

Kvinslando: Konferenco ĉe Noosa, la 5-6an de majo. 25 anoj kaj vizitantoj ĉeestis la ege taŭgan konferencejon Motelo Noosa Lakes. Raportoj estis prezentitaj pri la grupoj en Brisbano, Toowoomba, St Lucia, Kaprikorno, Sunbrila Marbordo, kaj pri la skolta movado. Studento el Niĝerio petis helpon por studi ĉe la Universitato de Centra Kvinslando, sed la kosto estas ekster la financkapablo de *EFK*. Dum la distraĵkunveno Jim kaj Jenny Dimo kaj Kay Andersen per akordionoj profesie provizis muzikon. Annie Spencer voĉ-igis poemojn el sia propra poemlibro. [Kial pri ili neniam sciiĝis *TAE*?--Red]

Kitty Brisbane, Peggy Ross, Kay Andersen kaj Tom O'Grady kontribuis al la distroprogramo. Dimanĉe estis ekskursoj al Twin Waters (rivero kaj marbordo), Subakva Mondo ĉe Mooloolaba, Zingibro-Urbo ĉe Yandina--kontentiga kaj memorinda konferenco!

La ĉijara pikniko okazos en Caboolture la 14an de julio. La unua konferenco en 1992 estos en Toowoomba (preciza dato provizota). *Laŭ raporto de Ray Ross*

Nova "Esperanto Estate" estis fotografie prezentita en *Tereno* (aprila numero). Temas pri parceloj vendataj en Toowoomba.

NSW: Manly-novaĵo--En aprilo komenciĝis la dua trimestro, daŭronta ok semajnojn, en la Vespera Kolegio. Lastatempe nin plezurige vizitis nia malnova amiko Ali Milani, Baha'iano el Usono.

Respondoj Por Citaĵkvizo 5

1 ĉ; 2 ĝ; 3 a; 4 ĥ; 5 c; 6 g; 7 e; 8 b; 9 f; 10 h; 11 d; 12 i

The Australian Esperantist

Numero 269 Septembro-Oktobro 1991

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488

Inter la artikoloj:

Pri biciklo, buso kaj ĉampano (*Trevor Steele*) p.3
Mi serĉis vinkton...aŭ ĉu? (*Donald Broadribb*) p.6
Kiu diris tion? Citaĵkvizo 6 (*Ralph Harry*) p.10
Esperanto en radio 3ZZZ (*Svetislav Kanaĉki*) p.11
Pri "si" (*Akademio de Esperanto*) p.13
Pri tramoj kaj taso da teo. Spertoj nº 10 (*Donald Broadribb*) p.16
La perfekta virino (*Elvie Rowe*) p.19
El *Carmina Popularia* (tr. *José Fco Martín del Pozo*) p.21
23-a somerlernejo en San Francisco (*Margaret Furness*) p.23
Kiel juĝi esperantecon? (*Marcel Leereveld*) p.24
El la regionoj... p.26

English section

LA AŬSTRALIA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562 Telefono: (09) 574 1307
Provizora Prezidanto: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014
Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109
Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne VIC 3001
Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102
Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036
Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702
P.R.O. (Oficisto pri Rilatoj kun la Publiko): Dennis Murphy, 79 Binnalong [illegible] Old Toongabbie NSW 2146
Provizora Prezidanto de la Ekzamen-Komitato: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562

Membrokotizoj: $25 por individuo, klubo kc. $30 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso). $15 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adresslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian nomon aŭ/kaj adreson. Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Limdato por ricevo de presotaĵoj por la venonta numero: 1 novembro.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *La Aŭstralia Esperantisto* "Ni vere bezonas artikolon pri...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercdesegnaĵon. Ni akceptas surpaperajn manuskriptojn kaj ankaŭ verkojn sur 3.5-colaj diskoj IBM-kongruaj kaj Macintosh-aj. Se vi sendas manuskripton, bonvolu atenti la ĉi-sekvajn postulojn: la teksto devas esti klare tajpita kun duobla spaco inter la linioj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netajpitaj manuskriptoj estos malakceptitaj. (Ankaŭ tajpaĵoj kiuj estas tro palaj por esti facile legeblaj.) Manuskriptoj estos resenditaj nur se ilin akompanos adresita afrankita koverto por tiu celo. Se vi sendas diskon, nepre kunsendu adresitan afrankitan koverton por ke ni povu resendi al vi vian diskon por reuzo. La redaktoro kutime agnoskas la ricevon de gravaj/longaj tekstoj, sed kutime ne de malgrandaj informoj kc. kiuj estos uzataj laŭ taŭgeco. Aŭtoro de artikolo kutime ricevas senpagan ekzempleron de tiu numero en kiu la artikolo aperas. Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone ĝi povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa.

PRI BICIKLOJ, BUSO, KAJ ĈAMPANO

de TREVOR STEELE

Nu, kio estas kumuna al bicikloj, buso, kaj ĉampano? Legu pluen.

Mi iros baldaŭ al Baltaj Esperanto-Tagoj en Tartu, la dua urbo de Estonio. Sed mi ne simple "iros": kun grupo da kunfrenezuloj mi biciklos tien—kaj ne nur tien. Ni faros rondveturon, kvazaŭ [illegible]i veturus de Brisbano ĝis Melburno ĝis Darvino kaj Perto.

Ĉar mi lastafoje biciklis antaŭ iuj eonoj, mi decidis aĉeti biciklon por kutimigi miajn grandaĝajn muskolojn. Samkiel ĉio alia, bicikloj estas malfacile aĉeteblaj, sed lernanto mia raportis, ke estas belaspekta specimeno en proksima brokantejo. Mi rapidis tien kaj enamiĝis al la preskaŭ nova vehiklo. La kosto estis bagatela—nur trimonata salajro. Kun posedula fiero mi puŝis mian ŝikan duradaĵon el la butiko kaj preter la gregojn da ordinaraj homoj ĉe la apuda bushaltejo. Iom hezite mi sur-seliĝis.

Mia fiero ricevis la unuan baton, kiam klare sentiĝis, ke la radoj iom ŝanceliĝas kaj la selo insistas interbatiĝeti kun miaj gluteoj. Tamen mi peze tretis sur la pedalojn kaj eksagis antaŭen. La vento eksiblis preter miajn orelojn, mi [illegible]lfermis la buŝon por orgojle kriegi [illegible]ntikvan kozalean batalkanton. Je mia malagrabla surprizo la tuta maldekstra pedalo—ne nur la piedplataĵo—subite forfalis kaj mia maldekstra piedo vane rotaciis en libera spaco. Ekzamenante mian trompe belan posedaĵon, mi konstatis, ke tiu pedalo estas nekuraceble malsana. Mian saĝan diagnozon plene subtenis konata mekanikisto, kiu sukcesis "ripari", t.e., refoje kunfliki la pedalon, ke ĝi aspektu integra.

Mi reiris al la brokantejo kaj diris al la afabla vendistino, ke mi subite memoris, ke mi devos reiri al Aŭstralio post unu semajno; ĉu ŝi reakceptos la belan velocipedon? Certe ŝi akceptis, sed mi ricevos mian monon nur, kiam iu alia naivulo aĉetos. Mi esperas, ke tio okazos, antaŭ ol mi malmensoge reiros al Aŭstralio...

Bonŝance mi sukcesis lui malpli belan sed uzeblan biciklon. Mia unua veturo estis tre saĝe elektita: al geamikoj en loko 30 km for de mia apartamento. Miaj gluteoj plendis post 10 km. Sed ĉio iris pli-malpli bone, ĝis mi refoje atingis la urbon revenvoje.

Kiel ĉiam mi veturis kiel eble plej proksime al la dekstra ekstremo de la asfalto (bicikloj ŝajnas nevideblaj al multaj aŭtostirantoj). Sed en la (nun fama) strato Endla mi konsciis, ke duvagona buso maldekstre devancas min. Mi rigardis rekte antaŭen, ne la buson mem, sed mi vidis, ke la ombro de la monstro pli kaj pli proksimiĝas al mi—ke fakte iu parto de la dua vagono nepre batos min. Mi ricevis ne tre agrablan bildon: la rado de la buso kaptos la radojn de mia biciklo kaj mia korpo estos, ni diru, la viando en tiu metala sandviĉo. Nu, venis ideo, kiu probable savis mian vivon, sed eble vi devos ĝin mimi por kompreni. Provu! Mi ĵetis mian korpon supren por ne pezi sur la biciklo, samtempe per la dekstra mano mi provis levi la biciklon kaj tiri ĝin for de la buso, per la maldekstra mano mi puŝis kontraŭ la buso. Ne nepre rekomendinda

kiel ĉiutaga gimnastikaĵo, tiu manovro tamen permesis, ke mi skribu ĉi tiun rakonton, ke mi kaj mia irigilo post spektakla karuseliĝo troviĝis sur la asfalto. Mi tuj ekstaris kaj rapidege fortrenis la feran ĉevaleton, sciante, ke la aŭtoj malantaŭ ni estas proksimaj.

Dummomente mi sidis sur la trotuaro iom penseme. Abunda sangofluo, jes, sed ĉiuj ostoj restis integraj. Fakte estis nur vico da neprofundaj skrapvundoj. Mi volis nur iom ripozi kaj poste pluenveturi.

Sed la reago de la busŝoforo ne permesis tion. Li tuj haltigis sian buson, kriis ekscitite al la pasaĝeroj, ke ili ekiru kaj trovu alian transporton, kaj rapidis al mi. Unue mi konstatis nur, ke lia granda ventro provas samtempe balanciĝi diversdirekten: sed li alkriis min, ke mi restu sidanta, ke li tuj venigos policiston kaj diros al li la veron, por ke mi ne povu "fari skandalon" kaj procesi kontraŭ li kaj postuli, ke li pagu miajn kuracistajn fakturojn, ktp. Amare amuzate de liaj memcentraj zorgoj, kaj nedezirante devi konversacii kun li ruse, mi sfinkse ridetis, kiam la ŝoforo komencis klarigi al ĉiu ajn, kiu pretis aŭskulti, ke mi kulpis. Li demonstris al ĉiuj, kiel mi forveturis de la trotuaro: tenante la manojn ĉe la impona umbiliko, li antaŭenpuŝis ilin kaj grade apartigis. Sed, simile al fiŝisto rakontanta pri hokita sed nekaptita fiŝego, la ŝoforo ĉiufoje pliapartigis la manojn, ĝis la gesto iĝis klaŭnaĵo. Nu, la staranta buso jam ĝenis la ceteran trafikon; baldaŭ alvenis aŭto de businspektoro, du policaŭtoj, ambulanco, kuracisto kaj du flegistinoj, kaj—kiam oni eksciis, ke mi estas aŭstraliano kaj ne parolas estone—aŭto kun interpretistino el Inturist. Vane mi asertis, ke ĉio estas en ordo, ke mi volas simple iri hejmen. Ŝajnis, ke duono de la oficialuloj de Tallinn okupiĝas pri mi: oni testis miajn okulojn, miajn orelojn, sangopremon, pulmojn, ripojn, inteligentonivelon...intertempe estiĝis perfekta trafikŝtopiĝo, kaj la ŝoforo ripetadis sian gestaron al ĉiu, kiu ne povis ne aŭdi.

Post longa tempo kaj multe da skribado la afabla interpretistino kaj mi veturis en policaŭto al iu policejo. Nin sekvis la buso, kies sola ŝarĝo estis mia biciklo. La tremanta ŝoforo sidis ekstere, kaj oni kondukis min en ĉambron. Tie mi skribis angle raporton pri la akcidento: mi diris, ke kvankam mi ne konsentas kun la versio de la busŝoforo, mi ne volas procesi kontraŭ li nek ke li pagu eventualajn terapiajn elspezojn aŭ riparon de la biciklo aŭ flikadon de miaj vestoj. Oni tradukis tion en la estonan, kaj dume mi aŭskultis konversacion ĉe la apuda tablo: timaspekta policistino intervjuis malgrasan junan ruson kun maldensa lipharo pri tio, ke li batadas siajn infanojn. La nur insistadis, ke li suferas kapdolorojn kaj ke la infanoj senĉese kriaĉas en la apartamento.Ni eliris la ĉambron. Policisto flustris al la ŝoforo, kion mi skribis. Tuj li ekstaris, kvazaŭ ne plu sub ia ŝarĝego, laŭte elspiris, manpremis min kaj promesis veturigi min kaj la biciklon ien ajn. Mi danke akceptis veturigon al mia apartamento. Nekutima vidaĵo: busego, kiu normale devas kuntreni centojn da kunpuŝiĝantaj homoj, nun saltete transportis nur Viktoron (mian novan amikon), min kaj la fidelan sed lacan velocipedon. Kiam Viktor senhalte preter-

pasis la kutimajn bushaltejojn, la atendantoj minace sakris al li: li ĝoje respondis per obscenaj gestoj, dum mi superece ridetis al tiuj greguloj.

Atinginte la domegon de mia apartamento, Viktor insistis porti mian ĉevaleton ĝis mia sepaetaĝa pordo kaj promesis venigi botelon da ĉampano la postan matenon je la 11-a. Tiun matenon estis dekopa klaso ĉe mi. Iom [illegible]ntaŭ la 11-a ni eniris la kuirejon trinki [illegible]con/kafon: mi mienis enigme al la klasanoj kaj profetis: "Very soon champagne will arrive, brought by a fat man". Kiam Viktor ĝustatempe alvenis, estis ĝenerala ridado kaj festenado.

Do jen simpla metodo por akiri senkostan botelon da ĉampano: venu al Tallinn, luu (ne aĉetu!) biciklon, informiĝu pri la itenero de buso 16 kaj la horaro de dika Viktor, aranĝu ke lia buso renversu vian biciklon, kaj igu lin kredi, ke vi procesos kontraŭ vi. Tute simpla afero.

[Junio, 1991] ❑

LA RESPUBLIKO de PLATONO

La teksto de *La Respubliko* sur komputildiskoj estis anoncita en la julia numero. Mi deziras klarigi ke haveblas tri versioj de la disko: (1) IBM (nur 3.5-cola disko), teksto sen supersignoj. La teksto uzas la sistemon rekomenditan de la *Fundamento de Esperanto*, laŭ kiu ĉ fariĝas ch, ŝ fariĝas sh, kc.); (2) Macintosh, ankaŭ unu disko, sen supersignoj kaj uzanta la supre menciitan sistemon; kaj (3) Macintosh, ankaŭ unu disko, *kun* supersignita teksto.

Por uzi la supersignitan diskoteksto de (3) vi devas stokigi la esperantan literaron en vian Macintoshon. Por tio [illegible] bezonas almenaŭ du kb da RAM, kaj ankaŭ estas preferinde uzi malmolan diskon.

Mendantoj de la teksto kun supersignoj por uzo per Macintosh-komputilo ricevas Esperantan alfabeton por povi montri la supersignojn en la teksto. Tiu supersignita alfabeto ekefikas kiam oni enŝovas la diskon de *La Respubliko* en vian diskilon. Se vi mendas la diskon kun supersignoj, bonvolu indiki ĉu vi havas laseran printilon aŭ "punktmatrican" printilon, ĉar la literstiloj varias. Ĉar la supersignita alfabeto farita por tiu teksto estas farita per programo kiu estas © "copyright" de la Letrasetkompanio, vi ne povos senpere utiligi la supersignitan alfabetaron por mem verki kaj presi per la supersignitaj literoj.

Ĉar la teksto estas "copyright" (©) vi ne rajtas fari kopion por alia persono, sed vi ja rajtas printi manuskripton por propra uzo. Mendu de D-ro Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562, Aŭstralio. ❑

En la julia numero de ĉi tiu gazeto mi sukcesis fuŝi la literon ŝ 11-foje! Nova rekordo. Nun nia kara Reaktoro postulas ke mi redonu al vi la mankintajn ŝ-ojn. Nu, jen ili ĉiuibe kaj mi esperas ke vi ĝuos ilin. Feliĉige, la Reaktoro ne rimarkis ke mi ankaŭ fuŝis la dekstran marĝenon sur du paĝoj. Bonvolu ne informi lin. Tial mi flustras.

Kiel ĉiam, via amiko,

Odio.

ŝŝŝŝŝŝŝŝŝŝŝ

MI SERĈIS VINKTON...AŬ ĈU?
LA LABIRINTO DE NIAJ LEKSIKONOJ
de DONALD BROADRIBB

Ĉu vi iam demandis al vi kiel nomi tiujn metalajn stangetojn kiuj kuntenas kajerojn? Vi trovas ilin en la mezo de ĉi tiu gazeto, inter paĝoj 2 kaj 3 de la angla suplemento.

Antaŭ ĉirkaŭ tri jaroj mi hazarde ektrovis en *Plena Ilustrita Vortaro* (*PIV*) eldonita en 1970, tre utilan vorton: "vinkto". *PIV* donas tri difinojn, el kiuj la tria estas: "[Metala peco], kiun oni enfiksas mane aŭ maŝine en paperfoliojn, por kunteni ilin en kajeron." *PIV* ankaŭ kompleze informas min ke la vorto "vinkto" estis oficialigita per la *Sesa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro*, do en 1935.

Sed ŝajne mi estas la sola esperantisto kiu renkontis tiun nomon por nia familiara paper- kaj kajerligilo angle nomata "staple". (Ebla escepto estas Profesoro Waringhien kiu ĉefredaktis *PIV*-on, sed pri tio legu ĉisube sur p.7) Post multfoja manko de kompreno kiam mi uzis la vorton "vinkto", mi esploris niajn ĉef-leksikonojn kaj iom post iom trovis vere misteran situacion.

Post iom da serĉado en *Esperanta Bildvortaro* red. Rüdiger Eichholz, 1988, mi trovis sur bildo nº 240/40 ke oni nomas tiun utilan metalpeceton "krampo"! "Vere strange", mi diris al mi. La *Bildvortaro* ja estis eldonita longe post la oficialigo de la vorto "vinkto" en 1935. Krome Eichholz estas tre zorgema persono, direktoro de la Sekcio Teknikaj Vortaroj de la Akademio de Esperanto. Mi mem iam kunlaboris en lia projekto prepari tiun *Esperanta Bildvortaro*, kaj mi persone konis Eichholz-on dum mi loĝis en Usono ne tre for de lia loĝejo en Kanado.

Mi decidis serĉi plu. M.C. Butler en sia tre zorge preparita *Esperanto-English Dictionary* (1967) ĉe la vorto "vinkto" informas ke ĝi signifas "rivet (for china)...clip, paper-fastener, snap (for gloves)". Nu, mia serĉata "staple" ja estas "paper-fastener" sed tute ne "paper clip". Cetere, Butler ne indikas ke "vinkto" estas oficiala vorto. Mi plu serĉis en Butler kaj trovis la difinon "staple" por "krampo".

Kontraŭe al Butler, Eichholz nomas "paper clip" "paper-klipo" ĉe bildo 238 / 42, sed kun averto ke tiu termino ne troviĝas en *PV* nek en *PIV*.

Mi decidis ankoraŭ serĉi plu. J.C. Wells, en sia *Esperanto-English Dictionary*, eldonita de The English Universities Press Ltd en 1969, ĉe "staple" tradukas per "krampo", kaj ĉe "vinkto" tradukas per "rivet (china); (paper-) clip".

Ĉar la delonge atendata giganta *English-Esperanto Dictionary* red. Pete Benson en Usono ankoraŭ ne aperis, mi ne povis konsulti ĝin. Mi decidis serĉi en la malnova *PV* (*Plena Vortaro*) 4 eldono 1934, do tuj antaŭ la apero de la sesa *Oficiala Aldono*. En ĝi tamen tute mankas la vorto "vinkto"! Sed la *Oficialaj Aldonoj* devas oficialigi vortojn jam ĝenerale uzatajn...do kial ĝi mankis en la popularega *PV*? Ĉe "krampo" en tiu *PV* estas neniu mencio

pri nia kajer-kuntenilo. Mi decidis serĉi plu.

La *Suplemento* de *Plena Vortaro* aperis en 1954, kompilita de Profesoro Waringhien. Sed ankoraŭ plia mistero: La *Suplemento*, kiu estas kunbindita en la sama volumo kun *PV* mem, surhavas la daton 1954, sed la titolpaĝo de tiu volumo surhavas la daton 1953! Ĉu do la estraro de SAT, kiu eldonis *PV*-on, en [illegible]nco antaŭvidis la tutan tekston de la *Suplemento* kaj povis inkludi ĝin jam unu jaron antaŭ ol ĝi publikiĝis?— Verŝajne ne, ĉar Profesoro Waringhien je la fino de la Antaŭparolo de la *Suplemento* donas la daton "Oktobro 1953". Do estis preskaŭ la jarfino, kaj supozeble la kompostintoj ne sciis ĉu la volumo aperos jam en la fino de 1953, aŭ nur en la komenco de 1954. Sed kion diris Profesoro Waringhien pri nia serĉata "staple/vinkto/krampo"?

Li skribis, sur paĝo 6 de la *Suplemento*, iom mistere: "...VINKTO, kiun ni preterlasis [t.e. el la originala *Plena Vortaro*], ĉar ĝi estis senutila duoblaĵo de «krampo» kaj «nito» (la oficiala difino cetere ne kongruas kun la tradukoj en angla kaj germana lingvoj):...oni serĉu do en la Suplemento." Evidente en la *Suplemento al PV*.

[illegible]one. Mi serĉis en la *Suplemento*, kaj [illegible] "vinkto" tute mankas la indiko ke ĝi estas oficiala vorto (eĉ kvankam la *Suplemento* aperis 19 jarojn post la *Sesa Oficiala Aldono*!), kaj la difino diras nur ke ĝi estas "Metala peco, uzata por ripari porcelanaĵojn ktp." kaj krome ke ĝi estas sinonimo de "nito". Sed laŭ *PV* nito estas speco de ronda najlo; kaj en la *Suplemento* ĝi estas, anstataŭe, difinita kiel "Cilindra metala peco...por solide kunfiksi la du [metalajn] surfacaĵojn, tra kiuj ĝi pasas." Do evidente ne mia delonge serĉata "staple". La sama difino estis laŭvorte kopiita ĉe la vorto "nito" en *PIV*.

Mi decidis iom pli informi min pri tiu *Sesa Oficiala Aldono*, por trovi ĉu, se ĝi ja oficialigis la vorton "vinkto", ĝi difinis tiun vorton. Mi tamen ne tre esperis, ĉar nur lastatempe la Akademio kutimiĝis difini la oficialigatajn vortojn. Sed ve! En *La Letero de l'Akademio* nº 12, Julio-Septembro 1990, mi legas ke D-ro André Albault mem, la prezidanto de la Akademio, ne havas ekzempleron de la *Sesa Aldono* do ne povas informi pri precize kion ĝi diris.

La *Suplemento* de *PIV*, aperinta en 1987 tute ne mencias la problemon.

Kie min turni nun? Mi serĉis en *Aktoj de la Akademio II 1968-1974*, eldonita en 1975, kiu i.a. enhavas la valoregan "Baza Radikaro Oficiala", verko pri kiu laboris multaj akademianoj dum tre longa tempo, kaj poste tute ignorata de la esperantista mondo. Sed ankaŭ la "Baza Radikaro Oficiala" ne mencias "vinkto"-n; ne surprize, ĉar la B.R.O. nur listigas oficialajn vortojn laŭ ordo de ilia ofteco en la Esperanto-uzado, kaj evidente "vinkto" ne estas ofte uzata vorto.

Do kion konkludi el ĉi tiu ŝajne senelireja labirinto? Mi povus, kompreneble, skribi al Profesoro Waringhien, sed, se lia *Suplemento al PV* estas fidinda, ankoraŭ en 1953 li ne konsciis pri la signifo kiun ni serĉas. Kial do "vinkto" ekaperis, ŝajne unuafoje, en la 1970a *PIV* ne nur kiel oficiala, sed kiel oficialigita en 1935, kaj kun la signifo de nia angla vorto

"staple", la vorto kies esperantan ekvivalenton mi volis trovi?

Mi povas fari provdivenon: kiel supre estis dirite, la Akademio ĝis post la Dua Mondmilito ne kutimis difini la oficialigitajn vortojn, sed nur donis tradukojn en diversaj naciaj lingvoj. Helpante en la kompilado de la *Oka Oficiala Aldono*, mi konsciiĝis pri kiel malfacile estas trovi precizajn, neambiguajn, tradukojn de individuaj Esperanto-vortoj en la naciaj lingvoj. Do preskaŭcerte la *Sesa Oficiala Aldono* en 1935 nur donis kelkajn nacilingvajn ekvivalentojn por "vinkto", sed sen difino...se, efektive, "vinkto" ja estis en la *Sesa Oficiala Aldono* kaj ne temas pri preseraro en *PIV*.

Sed, ĉar plejparte neniuj oficialaj vortoj havas oficialan difinon (plejparte eĉ ne tiuj en la *UniversalaVortaro* de la *Fundamento de Esperanto* mem), povas esti ke, kompilante la tekston de *PIV*, iu ekdecidis ke la signifo de "vinkto" estas utile pli-larĝigebla por inkludi la sencon de nia angla "staple".

Tio des pli grandigas mian suspektemon pri la fidindeco de niaj leksikonoj, kiuj ne nur malakordas inte si pri signifoj, sed ŝajne ofte arbitr kreas signifojn. Estas ja bele, diri k leksikono "nur registras vortojn ka signifojn komune uzatajn" kaj n preskribas. Sed efektive, neniu esperant leksikono konata de mi agas tiel; i senescepte preskribas, aŭ almenaŭ n indikas ke difino estas arbitre elpensit de la kompilinto de la leksikono kaj n estis transprenita el komune uzat esperantaj lingvotekstoj kaj -paroladc Sekve leksikonoj varias rilate al sia difinoj.

Ĝis iu sukcesos montri al mi la vojo el la labirinto konstruita ĉirkaŭ "vinkto krampo/staple" mi plu uzos la vorto "vinkto" kun la signifo de "staple", n pro konvinkiĝo ke ĝi estas la plej taŭg vorto, kaj neniel pro konvinkiĝo ke ĝ estas oficiale difinita tiel, sed nur ĉar ĝ aperas en *PIV*, la unusola leksikon esperanta uzata en ĉiuj landoj d parolantoj de ĉiaj naciaj lingvoj, do l sola leksikono komune uzata kie l signifo de "staple" estas por la tut mondo enlistigita—kiel "vinkto".

Deziras Korespondi

Rabindra Man Pradhan
1-560 Kalikasthan
Dillibazar, Kathmandu
Nepalo.
27-jara viro. Hobioj: vojaĝi, aŭskulti muzikon, legi kaj korespondi.

Ram Malla
G.P.O. 4088
Kathmandu
Nepalo.
Hinduo, kies hobioj estas skribi leterojn kaj rigardi televidon.

STATUTE OF THE AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION INC.)

[In our last issue proposed amendments to the Statute of the Australian Esperanto Association were published for public consideration before a decision is made on them at the AEA-NZEA Congress in January 1992. Unfortunately there were some misprints in the published text. Also a further important amendment has been proposed for discussion. For that reason the proposed amendments are re-presented here along with the newly proposed amendment to paragraph 5.]

Paragraph 5 of the present Statute to be replaced by:

5. Language:

"The official language of the Association is the Esperanto language as presented in the Fundamento de Esperanto *adopted by the first Universala Kongreso de Esperanto in Boulogne-Sur-Mer in 1905 and the decisions of the* Akademio de Esperanto."

The present paragraph 29 be numbered 29A and a new paragraph numbered 29 preceed it containing the following text:

29: Non-profit:

"The income and property of the Association whencesoever derived shall be applied solely towards the promotion of the objectives of the Association and no portion thereof shall be paid or transferred directly or indirectly by way of dividend bonus or otherwise howsoever by way of profit to the members of the Association provided that nothing herein shall prevent the payment in good faith of remuneration to any officer or servant of the Association or to any member of the Association in return for any services actually rendered to the Association or reasonable and proper rent for premises let by any member to the Association."

Paragraph 32 of the present Statute to be replaced by a new paragraph 32:

32. Dissolution:

"If upon the winding up or dissolution of the Association there remains after the satisfaction of all its debts and liabilities any property whatsoever the same shall not be paid to or distributed among the members of the Association but shall be given or transferred to some other institution or institutions having objects similar to the objects of the Association and approved under subparagraph 78(1)(a) of the Income Tax Assessment Act."

DEZIRAS KORESPONDI

60 gelernejanoj (12-16jaraĝaj) deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Respondoj garantiataj. Skribu al: Valerij Malihin, Dvorec pionerov, Infana Esperanto-Klubo, str. Konstitucii 1, Krasnojarsk 660049, USSR.

KIU DIRIS TION?
CITAĴKVIZO 6
kompilita de RALPH HARRY

Jen kelkaj eminentuloj, kies lastaj, antaŭmortaj vortoj sekvas. Penu parigi l personon kun la citaĵo. La solvo aperas sur paĝo 27.

(a) Jeanne Manon Roland
(b) Thomas Hobbes
(c) Vilhelmo la Silenta de Nederlando
(ĉ) Nathan Hale
(d) Frederiko la Granda de Prusio
(e) Johann Wolfgang von Goethe
(f) Robert Falcon Scott
(g) Cecil John Rhodes
(ĝ) Robert Burton
(h) Vilhelmo la Unua de Germanio
(ĥ) Jules, Kardinalo Mazarin
(i) Harold Edward Holt

1. Mi estas faronta mian finan vojaĝon, grandan salton en la mallumon.

2. Mi bedaŭras, ke mi havas nur unu vivon perdeblan por mia lando.

3. Nun mi ne havas tempon por esti laca.

4. Tiel malmulte farita—tiom farenda.

5. Niaj mortintaj korpoj devos rakonti la historion.

6. Ne estu soleca, ne estu mallaborema.

7. Ho Libereco! Ho Libereco! Kiajn krimojn oni faras en via nomo.

8. Mi estas laca de regado de sklavoj.

9. Pli da lumo!

10. Dio kompatu mian animon kaj mian kompatindan popolon.

11. Mi konas ĉi tiun plaĝon kiel la dorsflankon de mia mano.

12. Mi devas forlasi ĉion! Adiaŭ karaj pentraĵoj, kiujn mi tiel amis kaj kiuj tio kostis.

ESPERANTO EN RADIO 3ZZZ EN MELBURNO

raportas Svetislav Kanaĉki

Spite de malfacilaĵoj kaj malakordoj inter niaj samideanoj, ni ankoraŭ ekzistas kaj daŭrigas niajn regulajn disaŭdigojn de Esperanto en radio 3ZZZ kaj esperas daŭrigi ĝis la estraranoj de 3ZZZ faros definitivan decidon pri nia akceptiteco aŭ elpeliteco. Tiu necerteco gvidis [illegible] niajn membrojn, al malkonsento, kaj pro tio membroj de la Melburna grupo ĉesis esti membroj de la Esperanto-radio-programo de 3ZZZ. Laŭ la opinioj de la estraranoj de la Melburna Esperanto-Klubo, nia radiodisaŭdigo ne plenigis ilian lernoklason. Ilia konkludo: subteno de la ĉiusemajna Esperanta radio-programo 30-minuta ne valoras. Estas bedaŭrinde ke oni rigardas progreson nur rilate al komencantoj, sed ne ankaŭ por personoj kiuj restas kaj daŭrigas Esperanton kiel membroj kaj aktivuloj por Esperanto. Ni povas kalkuli per la fingroj de unu mano ĉiujn kiuj komencis studi Esperanton dum la pasintaj dek jaroj kaj plu restas nun.

Mi daŭre persiste klopodas ke ni ricevu unuhoran radio-programon. La estraro de 3ZZZ emas plilongigi la disaŭdigan tempon de la stacio, nun ĝi funkcias inter 7atm ĝis la noktomezo, [illegible]emas komenci je la 6a atm kaj fini je la 3a atm. Do estas ebleco ke mi povos komenci je la sesa matene kaj fini je la 7a matene, ĉio dependas de la nove elektita duono de la estraro. La elekto okazis la 25an de julio. Ĉu valoras mia klopodo plilongigi la Esperantan radio-programon? Mi petas vian sinceran opinion. Se niaj samideanoj opinias ke valoras, bonvolu sciigi min pere de leteroj. Skribu al la adreso: 3ZZZ, PO Box 422, Carlton South Vic 3053, kaj menciu ke viaj leteroj estas por la Esperanto-programo. Samtempe mi petas sendi al mi novaĵojn pri Esperanto aŭ kion ajn vi opinias dezirinda sciigi al niaj aŭskultantoj. Skribu en la angla lingvo se temas pri kuraĝigo lerni Esperanton, kaj pri novaĵoj kiuj rilatas Esperanton, kiel la Eŭropa Komunumo kaj la lingvoproblemo en ĝi, aŭ similaj. Se koncernas nur esperantistojn, sendu viajn leterojn en Esperanto. Se vi havas Esperanto-kasedojn aŭ diskojn kaj povas prunti ilin, mi akceptos. Sed antaŭ ol sendi, menciu kiujn kantojn ili havas. Se mi jam havas ilin, mi respondos ĉu jes, ĉu ne sendu.

Anticipan dankon pro via kunlaboro kaj viaj konsiloj.

[Samideano Kanaĉki bonvolis sendi al mi plurajn programojn sur kasedoj, kaj ankaŭ diversajn dokumentojn de 3ZZZ.— Feliĉige, la nomo "Esperanto" nun aperas en la programlistoj publikigataj de la ĵurnaloj kaj de la stacio, tiel ke la publiko povas scii pri la ekzisto de tiu programo. Sed jura problemo ekzistas: ĉu Esperanto rajtas nomiĝi "etna" lingvo kia devas esti la enhavo de la programoj disaŭdigataj de tiu stacio. T.e., ĉu interetna lingvo ankaŭ estas akceptenda laŭ la statuto de la stacio. Pri tio disputas la estraranoj de l'stacio.

Post zorga aŭskultado de la specimenaj programoj, mi faris jenan konkludon pri la valoro de la programo Esperanta: Temas pri longedaŭra reklamo por Esperanto, nepre necesa por la estonta vivo de nia

lingvo en Aŭstralio. La publiko vidas la nomon Esperanto en la program-listo kaj ekpensas "Do! Tiu lingvo plu ekzistas. Mi kredis ke ĝi antaŭ longe formortis." Kaj ŝ/li ankaŭ pensas: "Jen, oni ja povas paroli kaj kanti belsone en tiu lingvo!" Ankaŭ por la progresinta Esperantisto temas pri la sola eblo aŭskulti longedaŭre Esperanton. Oni ne anticipu tujajn sukcesojn. Povas pasi jaroj antaŭ ol la mesaĝo fiksiĝas en la mensoj kaj koroj de la publikanoj. Tamen, ĝi ja fiksiĝas iom post iom. Ni devas certigi ke Esperanto estos renkontata de la publiko ankaŭ en la futuro.—La redaktoro.] ❑

BIBLIOTEKO DE AEA

raportas RALPH HARRY

Gazetoj:

Dankojn al Alan Towsey, kiu donacis al la Biblioteko ĉiujn mankantajn numerojn de *Monato*! Ni nun havas duoblan kompleton—unu kompleton binditan, unu en bindiloj, ekde numero 1—dek jarojn.

Ni dankas ankaŭ al Jozefo Major, Mary Richardson, Gwenda Sutton kaj Joyce Hill de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, kiuj provizis ĉ.200 numerojn de *Nov-Zelanda Esperantisto* por nia kolekto. El la 506 numeroj de tiu gazeto (kaj ties antaŭuloj, *New Zealand Esperantist* kaj *Bulteno* de NZEA) mankas nun nur 40 numeroj, ĉefe de la plej frua periodo. Ni jam komencis ilin bindigi, kompreneble kun tute nigraj kovriloj!

Novaj libroj

La estraro disponigis al la Biblioteko $690 por aĉeti novajn librojn. Ni intencas aĉeti kelkaj mankantajn verkojn por enketado kaj ekspozicioj, ekzemple:

Ne-PIVaj Vortoj (André Cherpillod),

Esperanta Bildvortaro (red. Rüdiger Eichholz)

Esperanta Rimvortaro (Jonathan Cooley)

Jubileo—Jarcento de Esperanto (red. Mark Fettes)

Trezoro: La Esperanta Novelarto (red. Retto Rossetti)

Nova Esperanta Krestomatio (red. William Auld)

Estas kelkaj libroj en la serio "Oriento-Okcidento" kiuj mankas, kaj kiujn mi intencas mendi:

La Spleno de Parizo Charles Baudelaire)

Aniaro (Harry Martinson)

La Suferoj de la Juna Werther (J.W. von Goethe)

Loulan kaj Fremdregionano (Inoue Yasushi)

Sanga Nupto kaj La Domo de Bernarda Alba (Federico García Lorca)

Diskurso Pri la Metodo (Kartezio)

Eldonaĵoj pri Nov-Zelando.

Ni bonvenigus sugestojn de Esperantoorganizoj pri libroj, diskoj aŭ kasedoj, kiujn ili bezonas por programo aŭ ekspozicio, kaj kiujn ili ne povas aĉeti, aŭ kiujn ili preferus nur prunte ricevi. Kompreneble se la ero jam troviĝas en la Biblioteko oni sendos ĝin kiel eble plej baldaŭ. Bonvolu sendi petojn aŭ sugestojn al D-ro Ralph Harry, 319 Bayview Village, 36-42 Cabbage Tree Road, Bayview NSW 2104. ❑

PRI "*SI*"
(OFICIALA KOMUNIKO DE LA AKADEMIO 1971)

La Akademio, post zorga esploro de la demando, oficialigis jenan regulon pri la uzo de la refleksiva pronomo-adjektivo. Ĝi esperas per tio pozitive kontribui al pli granda unueco de la uzado.

REGULO

1. La refleksivaj pronomoj (serio *si/sia*) rilatas nur la 3-an personon kaj resendas al la plej proksima subjekto, aŭ singulara aŭ plurala. Tiu subjekto ne ĉiam koincidas kun la gramatika subjekto de la tuta frazo, ĉar novan subjekton povas enkonduki (1) infinitivo, (2) *a*-finaĵa participo kaj (3) substantivo de verba deveno, kiam ĝi klare esprimas agon.

[Gvidaj ekzemploj]

Vi lavas vin kaj li lavas sin.

Ĉiuj homoj akiras por si.

Ŝi estas amata por si, ne por la doto.

Ŝia propra patrino forpelis ŝin de si.

Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem.

Mia patrino plendas, ke ŝiaj filinoj faras ĉion por si, nenion por ŝi.

Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro.

La infanoj serĉis sian patrinon.

Ŝi estas amata de siaj instruistinoj.

Li promenis kun sia edzino; li kaj lia edzino promenis.

Ili kondukis la kolegojn en sian loĝejon anstataŭ iri kun ili en ilian.

La patrino diras, ke ŝia filino venos kun sia infano.

(1) La sinjoro ordonis al la servisto vesti lin por la ceremonio.

La sinjoro ordonis al la servisto vesti sin pli dece.

La mizero kutimigis lin levi sin el la lito tre frue.

Jozefo ordonis al siaj servistoj balzami lian patron.

Li invitis la pentriston alporti unu el siaj pentraĵoj.

La reĝo, konsultinte kun la ĉefministro, sendis voki sian kuraciston.

(2) Ŝi ekvidis viron staranta antaŭ ŝi.

Ŝi ekvidis starantan viron antaŭ si.

Li sidiĝis sur la seĝo prezentita al li.

Li portis seĝeton refalditan sur si mem.

Li estos kiel arbo donanta sian frukton en sia tempo.

La rekompencis la soldatojn batalintajn por lia savo.

La pastro sentis la pekulon tuŝita de liaj admonoj.

La juĝisto opiniis la atestanton influata de siaj antaŭjuĝoj.

Ŝi zorge observis la enportadon de siaj kofroj.

(3) Marta admiris lian fidon al ŝi (Marta).

Marta admiris lian fidon al si.

Ŝi kompleze aŭdis la flatadon de ŝiaj amindumantoj.

Ŝi ribelis kontraŭ la interveno de edzo en ŝiajn aferojn.

2. Foje la vera subjekto lasas sin vidi per enmeto de la vortoj "Kiu(j) est-", ekz. apozicioj adjektivaj aŭ substantivaj provizitaj per komplemento (ekz.

kastelo fama pro sia historio; sed *li ekvidis sian fraton Benjamenon, la filon de lia patrino = B., kiu estis la filo de...).*

[Gvidaj ekzemploj]

Li evitu la trinkaĵojn por li tro acidajn.

Ĉiu konas homojn nur por si indulgajn.

Picasso vizitis muzeon, faman pro liaj pentraĵoj.

Ili vizitis la muzeon, faman pro siaj pentraĵoj.

3. Ekzistas tradicie sankciitaj vortkunmetoj kaj frazeroj, en kiuj la refleksivo funkcias absolute, sen rilato al la agsubjekto: ekz. *siatempe ktp.*

[Gvidaj ekzemploj]

Moki ies fidon al si mem.

Oni komprenis liajn gestojn per si mem.

Ni ne povas koni la realon en si mem.

Metu ĉion en sian lokon.

En ĉiu kranio estas sia opinio.

4. Nekonformiĝo en iaj okazoj, se ĝi tio rezultas pli granda klareco, estas tolerata.

[Represita el *Esperanto*, julio-aŭgusto 1971.]

❑

KIU KONAS ERNEST MAGUIRE?

Atingis la redakcion ĉerpaĵo el nekonata Aŭstralia publikaĵo de 1934, kun granda bildo de juna viro kaj lia nomo Ernest Maguire. Sekvas teksto en la nederlanda lingvo kiu tradukite diras:

"Aŭstralia Esperantisto faras ĉirkaŭmondan vojaĝon por kolekti materialon por verki librojn kaj fari prelegojn kaj samtempe por propagandi la mondhelplingvon Esperanto."

Sur la alia flanko de la folio estas teksto kiu tradukite diras: "Sekretario de la Esperanto-Societo en Perto (Okcidenta Aŭstralio) kaj kunlaboranto ĉe diversaj Esperanto-gazetoj. Forlasis Perton (Okcidenta Aŭstralio) je la 4-a de Aŭgusto 1922 por fari, piede kaj bicikle, vojaĝon ĉirkaŭe en Aŭstralio, tra Afriko, Eŭropo, Azio kaj Ameriko. Retrovenis la 4-an de Aŭgusto 1934. Estigis dumvoje Esperantogrupojn kaj fondis la Port Pirie Esperanto-Societon. Aĉetu memorkarton de la Esperanto-Turisto."

Gesamideanoj en Perto ne memoras ĉi tiun mondveturemulon, kaj ni ŝatus iom pli scii pri li, por helpi kompletigi nian konon de la historio de Esperanto en Aŭstralio. Se vi ion scias pri Ernest Maguire, bonvolu skribi al la redaktoro de *La Aŭstralia Esperantisto.*

[Mi dankas samideanon Marcel Leereveld pro la traduko de la nederlandlingva teksto.—La Red.]

❑

RADIO BROADCAST ON ESPERANTO

by SHIRLEY LANDQUIST

There are many aspects to peace working and among the most important must be communication—between nations—their leaders—and between individuals. However, there is not one generally accepted language.

Those of us who speak English are inclined to believe that this will become the international language. However, Spanish is spoken more widely than English, French is the first language in many countries and the Chinese of course tend to speak Chinese. In fact among the earth's five billion people three thousand languages are spoken—which does nothing to unite the human family.

At international conferences interpreters are used for simultaneous translation. Conference members don ear phones—dial to the language of their choice of those available—and listen to the interpreter, who is performing the remarkable intellectual feat of saying words that have just been spoken at the same time that his brain is absorbing and interpreting the words spoken now. The most remarkable instance of this I have observed was when a Russian interpreter translated for a French speaker into English.

A person who felt very strongly about the need for a truly international language was a Polish oculist, Dr L.L. Zamenhof, who created the auxiliary language Esperanto, which was first published in 1887. Some people think of Dr Zamenhof as a dreamy Utopian who imagined that if a neutral second language were once introduced, all wars would cease and the world become a Garden of Eden. In fact, he was fully informed on the state of the world and knew that the causes of war have little to do with language—and I'm personally convinced that this is so. Esperanto is meant simply as a second language so that each of us may have it in his/her power to speak to, and to understand, any person from any other country.

The United Nations (Associations and United Nations Educational, Scientific and Cultural Organisation) have endorsed Esperanto as an international language but nothing has been done through UNESCO to promote its use, which seems surprising.

However, according to the Vice President of the Australian Esperanto Association, Mr Justice Keppel Enderby, the international aspect that enthuses people is exactly the factor that has turned some countries against its use and even national leaders who have been very much in favour have been forced to relinquish any thought of fostering its use by the terms of their national constitutions which demand that they encourage the use of their national language in every way possible.

The Chinese people are excellent

Esperantists which I think is a great credit to them because the language is based on European root words. Actually I learned French, German and Latin at school, which I have found a great boon—and something I like very much about Esperanto is that it engages the mind in a most enjoyable way as well as opening doors to communication.

Several weeks ago there was an interesting article and photograph in *The West Australian*, of a group of primary school students in Darlington who are corresponding with children overseas in Esperanto and in Perth there is also the WA League of Esperantists, which exists to promote the language and enjoy studying and socialising together. Members also attend national and international conferences.

Communication is one of the many important aspects of peace making and Esperanto has attracted several million people around the world as a means of achieving that.

I would like to close with a short message in Esperanto: "Miaj bonaj amikoj mi esperas ke via tago estos feliĉa kaj por vi la suno brilos, la floroj floros kaj la birdoj kantos." — "My good friends, I hope that your day will be happy and for you the sun will shine, the flowers bloom and the birds sing."

[Shirley Landquist is president of the United Nations Association of Australia (W.A. Division) Inc. The above text was broadcast by 100FM Fremantle WA, on April 2, 1991.] ❑

ESPERANTO TEACHING IN HUNGARY

WALTER KLAG interviews KATALIN SMIDELIUSZ

K: In which tertiary institution do you teach?

S: My teachers' College is in Szombathely, western Hungary, and consists of 18-23 year old students who have finished high school. After four years' study in the College they receive the teacher's diploma which entitles them to teach in public schools, in adult education, or to serve as librarians. Every student has two majors, the most capable students are allowed to choose a third major in the third year. My College has 1600 day students, but there is also a parallel correspondence course. We are in a period of rapid change now, as a consequence the board of directors is ready to support any rational, practical plan.

K: Does this include the international language?

S: The political changes have caused a real explosion in language teaching. Up to two years ago students were required to study Russian in their first two years, and there were very few other languages taught. But even then I was teaching Esperanto to those interested. Since the reforms the students may choose be-

tween ten languages, and at the end of four semesters of study they must pass exams in their chosen language. Esperanto is on the same level with the other languages. In students' interest it occupies fifth place, after German, English, Italian, and Latin which is required of students of history.

K: How do you try to interest your students in Esperanto?

S: My aim is not only to teach the language—from the start I try to give the students enrolled a feeling of the essence of the movement and a whiff of Esperanto culture. They are also very interested in my own experiences, for example, early contacts through correspondence, meeting Esperantists, magazines, expositions.

K: Do you also encounter criticism?

S: My experience is that my students are often proud of their Esperanto studies and the other students not only accept them but also become interested in our activities. On the other hand, the fact that the language can be taught without any prior special training sometimes makes our language appear less than serious.

K: Even though there has been an Esperanto department in the ELTE University in Budapest since 1966?

S: Unfortunately only few graduates of ELTE become teachers of the language. Up to now the ELTE degree has been "only" focussed on study, not on teaching. It is only in extreme cases that a person with a university degree is employed as a teacher in a public school. It is our College that prepares teachers for the public schools.

K: How many students do you have in Szombathely, and what exactly do they learn?

S: Our Esperanto department began in the 1990-1991 university year. I have seventy students studying Esperanto as their compulsory elective language. In the framework of five semesters the students are concerned with practical and theoretical grammar, literature, interlinguistics, history of the Esperanto movement, and methodology of language practise.

Our principal goal is for the students to reach a high level of proficiency in the language and to know language teaching methods thoroughly. For this purpose we plan to set up a children's group in which our students will at first be only observers but afterwards will have responsibility for taking part in the teaching of the pupils.

So that they will have experience in teaching adults, they have prac also in the College, teaching a students' group. After their studies they will have a State exam and become official teachers of Esperanto and Esperanto literature in the public schools. I am eagerly looking forward to our first graduate!

K: How did you come to Esperanto?

S: In the middle of the '70s I became interested in Esperanto through Blazio Vaha in our College. For various reasons I stopped my Esperanto studies, but I knew that I would some day learn and even teach the language. I began to teach myself, and later I received the C-

certificate in teaching Esperanto. Last year I finished my studies in the Esperanto department of ELTE in Budapest. Before my graduation I had opportunity to spend time in KCE (Switzerland) and those two months determined my future. I learned a great deal from Claude Gacond, successfully passed the ILEI/UEA exam in teaching methodology with Irena Szanser as my tutor, and found many friends throughout the world. Without their friendship and support there have been times when I would not have had the fortitude to continue what I had begun.

K: What help will you be needing in the future?

S: Our department has no money at all, even money for postage is severely limited. We must have books if we are to teach, since we must not only learn about original Esperanto literary works but also have the chance to read and translate them. Our address is: K. Smidêliusz, BDTF, PO Box 170, Szabadsâg têr 4, H-9701 Szombathely, Hungary. We have received a large gift of books from our national Esperanto association, but they are all recent publications, we have no older works. We would be interested mainly in textbooks used in other countries, so as to study their methodology, vocabulary, etc. We would also be very happy to receive copies of major Esperanto magazines so as to be informed about their areas of interest and also about the Esperanto movement. We had a very valuable visit by Mr Carlevaro of Switzerland—he has considerable influence in getting Esperanto accepted as a subject in the College.

It would also be good if our students, like me with KCE, had the opportunity to have a whiff of Esperanto ethos in other countries. They could help in teaching, caring for children, working with computers, cataloguing books, and in general be very useful though Esperanto. Why not?

[Translated by Donald Broadribb. The interviewer, Walter Klag, is an author of Esperanto literature and resides in Vienna, Austria.]

❑

TRAVEL PRIZE

Registration for the Tim Einihovici Memorial travel prize to attend the 1992 international TEJO (World Esperanto Youth Organisation) Congress in Montreal, Canada, closes on November 1 this year. Interested persons should contact Idyss Einhovici at 88 Newry St, Floreat Park WA 6014.

AFRICA

There are now Esperanto organisations throughout all of Africa: Northern (Tunisia, Algeria, Egypt), Southern (Republic of South Africa), Eastern (Madagascar, Tanzania, Rwanda), Western (Togoland, Ivory Coast, Benin, Cameroon, Ghana), and Central (Zaire, Congo, Central African Republic).

DIVERSAĴOJ

GENETIVO/ADJEKTIVO?

Komento:
"Noto por Donald:
Reĝina naskiĝtago okazas dum Junio!
Naskiĝtago de Reĝino dum Aprilo!"
[*Margaret Chaldecott, en* Telopeo *Aŭgusto 1991*]
Ĵondo: mmmmm.
Komparu:
Reĝinaj vestoj = regal robes
Vestoj de l'reĝino = what the queen is wearing. DB

VERA GENITIVO?

"Georg-ies profesio nuntempe estas eĉ pli atentinda..."
[*tejo—TUTMONDE*, p. 18, majo-junio 1991]
Komento: interesa kreo de genitivo laŭ la modelo de *ies/kies/ĉies* kc. Ĉu eble ĉi tiaj provoj formi genitivon en Esperanto respondas al aŭtentika sento de manko en nia gramatiko? Kion pensas aliaj Esperantistoj-lingvistoj?

ĈU "-IO" = ŜTATO?

En la eldonaĵoj de TEJO lastatempe mi ofte legas pri *Kebekio*, unu el la provincoj (ŝtatoj) de Kanado, en kiu okazos la TEJO-kongreso 1991. *PIV* subtenas tiun formon de la propra nomo. Mia atlaso informas ke ja ekzistas urbo *Kebeko*, do la provinco estas...(!) Sed ĉu *-io/-ujo* ja = ŝtato aŭ provinco? Aŭ ĉu temas pri insida intrigo de la franckanadanoj oficialigi sin kiel apartan landon almenaŭ en la Esperanta movado? DB

ANKORAŬ NOVA ENIGMO

"Post longa tempo de konfuzo...Ni havas la grandan plezuron prezenti al vi la estraron de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo: [sekvas sep nomoj de virinoj]. La komuna *adreso* de la sendube rava sepopino (aŭ sepinopo; rim.TT) estas..."
[*tejo-TUTMONDE*, p.30, majo-junio 1991]

Komento: Mi kompatas la patrinon!— DB

NOVA "0055" POR VI
Sed ankoraŭ eĉ pli multekosta!

De la 2-a de oktobro, funkcias telefona Esperanta gazeto. Ĝi nomiĝas "La Papago". Ĝi estas ĉiutaga, kaj daŭras inter kvin kaj dek kvin minutojn. Ĝin prizorgas Patriko Monja, en Montrealo, Kanado; kompreneble ĝi ja aŭdeblas de ĉie en la mondo...Por aŭskulti "La Papago"-n, simple telefonu [0011-1]-5142700054.
[El *Esperanto* junio 1991, p.117]

Komento: konsultu vian telefonlibron por trovi la prezon. El Perto ĝi estas inter $5.95 kaj $24 depende de la tempo kaj la daŭro.

PRI TRAMOJ KAJ TASO DA TEO
(SPERTOJ 3)
de DONALD BROADRIBB

Frue en 1962. Mia tria tago en Aŭstralio, mia dua en Melburno. Mi jam aranĝis rendevuon ĉe la Universitato je la 2a ptm. Poste mi serĉis la vojon sur mia porturista mapo, ĉar ĝi montris la tramvojojn. Mi trovis la numeron 23 en cirkleto proksima al la loko nomita "Universitato". Sed kiam mi petis la konduktorinon ke ŝi vendu al mi bileton ĝis haltejo numero 23 ŝi tute ne komprenis. "Kie estas haltejo 23?" ŝi demandis. "Ĉu vi volas la Urbon?"

Pro kio ŝi demandis ĉu mi volas la urbon? Mi peraviadile venis al Melburno. Mi celas la Universitaton de Melburno. Se ĝi ne troviĝas en ĉi tiu urbo, do en kiu urbo? Perpleksa, mi kapjesis.

"One'thrippens" diris la virino. Aŭ ion tian. Estis malfacile kompreni, sed mi kredis ke eble ĝi estus deĉifrebla kiel "unu ŝilingo kaj tri pencoj". Mi prenis kelkajn monerojn el la poŝo kaj zorge rigardis ilin. Mi elektis arĝente brilan kaj tri rustaspektajn grandajn. Laŭ iu nekomprenebla logiko la plej grandaj, oni diras, estas malplej valoraj. Mi transdonis ilin al ŝi. Ŝi gapis al ili, poste al mi, kaj atendis minaceme. Fine, kvazaŭ perdinte ĉian paciencon, ŝi diris *"Thassahaypnee"*.

Evidente mi donis al ŝi malĝustan moneron, kvankam mi ne komprenis kiun. Embarasite, konfuzite, mi atente rigardis la aliajn monerojn en mia mano, prenis plian brilan kaj transdonis ĝin al ŝi. Ŝi kolere murmuris ion kaj ĵetis kelkajn monerojn al mi. Poste, ŝi prenis tabuleton sur kiu troviĝis diverskoloraj paperslipetoj, deŝiris bluan kaj per truilo enmetis trueton ie, ŝajne celante la marĝenon.

La versoj de Mark Twain aŭdiĝis en mia cerbo:

Punch brothers, punch with care!
Punch in the presence of the passenjare!

A blue trip slip for an eight-cent fare,
A buff trip slip for a six-cent fare,
A pink trip slip for a three-cent fare,
Punch in the presence of the passenjare!

Oni uzis pencojn, ĉi tie, sed klare la senco estis tute sama.

"Bonvolu atentigi min, kiam ni atingos la Universitaton," mi petis.

"Universitato? Kie oni trovas tion?" Ŝi ŝultrumis kaj foriris celante kolekti pagon de alia pasenĝero.

Mi intense rigardis tra la fenestrojn, cerbumante pri kiel mi scios kiam ni atingis la Universitaton. Laŭaspekte ni preterpasis senfinan vicon da malnovaj domoj, ĉiuj tute identaj. Mi strebis sekvi la vojon sur la porturista mapo, sed ĝi ne montris la plej multajn stratojn. Mi eksentis panikon. Tute certe ni jam preterpasis la ĝustan haltejon. Mi stariĝis kaj marŝis al unu el la nefermitaj "pordoj", ĉe kies kapoj estis rulitaj kanvasaĵoj, verŝajne por uzo kiam pluvas. La tramo pluiris, ne atentante la benkon apud la vojo, kiu klare indikis haltejon. La konduktorino denove kolere rigardis min. Ŝi trifoje tiris kordon kiu etendiĝis laŭlonge de la flanko de la

tramo, kaj la tramo ekhaltis abrupt-ĵetige. Mi eliris, humiligite, kaj min demandante kie sur la tero mi nun troviĝas.

Se ja troviĝas universitato ĉi tie, oni bone kaŝis ĝin. Mi tre volis scii kie mi estas. Stratnomafiŝo ĉe vojkrucejo informis pri la nomo de la malgrava transiranta strateto, sed neniom informis pri la nomo de la ĉefvojo. Mi decidis provi ...straton kiu ja estis nomita. Eble post ...lka tempo mi trovos butikon, aŭ eĉ policiston, kiu povos informi min pri mia kieo. Baldaŭ mi atingis novan ĉefvojon. Denove neniu indiko pri ĝia nomo. Mi hazardeme turnis min kaj ektrovis ke la domo ĉe la stratangulo surhavas afiŝon kun la vorto "Kriminalogio".[1] La domo estis firme fermita, sed ĝia ekzisto pensigis ke verŝajne ja estas universitato ie proksime. Trans la strato, laŭ mia vidkapablo, troviĝas nur amaso da arboj; kaj cis, malnovaj mallarĝaj domoj kun komunaj muroj kaj nur etaj gazonoj, kvazaŭ oni devis enŝovi ilin pro manko de spaco.

Mi transpromenis kaj trovis nerektan vojeton kiu serpentumis inter la arboj. Fojfoje eksubita ridado de kukaburoj rompis la pacan silenton. Kaj, jen, egale ...bite, la vicoj da arboj trovis finon kaj ... vidis displantitajn konstruaĵojn antaŭ mi. Tre malnovajn, kvazaŭ de la deknaŭa jarcento. Sendube jen la Universitato. Mi rigardis mian brakhorloĝon. Jam dekkvin minutoj antaŭ la 3a. Mi almarŝadis la konstruaĵojn, serĉante homenhavantan. Super tre antikvaspekta ŝtona pordejo mi vidis la engravuritan vorton "Administracio". Mi eniris kaj vidis ke junulino estas aliflanke de giĉeto en la maldekstra muro.

"Bonvolu, ĉu vi povas informi min pri kie trovi la Departementon de Prisemidaj Studoj?" mi demandis.

La junulino gratis sian kapon, poste prenis malgrandan mapon el tirkesto kaj metis ĝin sur la giĉetbreton. Kune ni serĉumadis. Sur la mapo estis numeroj, laŭŝajne arbitre distribuitaj, indikantaj konstruaĵojn. Ŝlosilo apud la marĝeno informis ke la Departemento de Prisemidaj Studoj estas numero 73. Ni plu serĉumadis, esperante trovi 73 sur la mapo.

"Jen!" triumfe diris la junulino, indikante per sia fingro. "Mi ĉirkaŭmetos cirklon." Per krajono ŝi desegnis cirkleton ĉirkaŭ la numeron. "Kaj jen ni nun," ŝi pludiris, kaj desegnis duan cirklon. "Tiu vojo sur la mapo—" ŝi perfingre indikis, "—estas tiu tuj ekster la ĉefpordo. Eliru, vin turnu dekstren, kaj sekvu la vojon ĝis Parado de Reĝoj. La Departemento sendube troviĝas en iu el tiuj malnovaj domoj trans la strato. Ĝi estas apud konstruaĵo numero 89. Hmm, 89..." Denove ŝi serĉis en la apudmarĝena ŝlosilo. "89 estas Kriminalogio. Do vi vidos malnovan domon kun afiŝo 'Kriminalogio'. Tuj apud ĝi estas la Departemento kiun vi volas."

Ŝi donis al mi la mapon. Mi dankis, kaj zorge obeis ŝiajn instrukciojn. Baldaŭ mi retrovis min ĉe la domo afiŝumita "Kriminalogio". La domo apud ĝi nepre devas esti tiu kiun mi serĉas, malgraŭe ke ĝi ne surhavas afiŝon.

Mi eniris kaj tuj trovis ŝtuparon. Du pordoj, po unu ĉiuflanke, estis fermitaj kaj sennomaj. Mi decidis ke sendube temas pri malnova domo akirita de la

Universitato kaj ial oni lokigis la oficejojn supretaĝe. Mi grimpis la malnovajn lignajn ŝtupojn kaj ĉesupre trovis kelkajn lumigitajn ĉambrojn kun nefermitaj pordoj sed tute sen personoj. Fine mi trovis ĉambron en kiu estas sekretario kun tajpilo. Mi timide surpordfrapis kaj ŝi ekrigardis min. "Mi aranĝis rendevuon kun la Profesoro de Prisemidaj Studoj," mi diris. "Ĉu mi trovis la ĝustan lokon?"

Ŝi kapjesis. "Sendube vi estas la nova reserĉ-studento el Usono. Via akĉento estas tre orelfrapa. Kaj vi malfruegas. Ĉu estis malfacile nin trovi?"

"Mi ankoraŭ ne lernis min orienti ĉi tie," mi diris. "Mi plene perdiĝis. Kaj la tramo estis tremiga sperto. Mi iom nebule memoras ion tian, el antaŭ la dua mondmilito, kiam mi estis tre juna."

La sekretario preskaŭ ridis. "Jes, mi kredas ke efektive oni konstruis tiujn vagonojn komence de la jarcento." Ŝi surpiediĝis kaj kondukis min al la fermita pordo de proksima ĉambro. Ŝi frapetis sur la pordon kaj malfermis ĝin. "Jen li," ŝi anoncis.

Malalta, tre dika viro troviĝis sidanta malantaŭ enorma skribtablo sur kiu estis amaso da paperfolioj. Li stariĝis kaj invitis min enmarŝi. Li serpentume venis inter seĝoj, el kiuj ĉiu surhavis amason da libroj, kaj manpremis kun mi. Li rapide rigardis la murhorloĝon. "Dekkvin minutoj post la tria," li diris kun ŝanceliĝanta tono. "Mi diris al la dekano ke ni estos ĉe lia oficejo je la dua kaj duono. Ni devos rapidege..." Li hezitis, poste ekridetis. "Ne, unue ni trinkos tason da teo." Li puŝis amason da libroj sur la plankon kaj indikis ke mi sidu sur la komforta fotelo kiun li tiel liberigis. Poste, li iris al la pordejo kaj kriis: "Johanjo, bonvolu prepari tason da teo por nia nova amiko Usona, kaj ankaŭ tason por mi. Dankon." Li reiris al sia skribtablo kaj sidiĝis malrapide, kvazaŭ tute ne mankas al ni tempo. Subite penso evidente trafis lin: "Eble vi preferas kafon?" Li restariĝis.

Mi manneis. "Teon, bonvolu," mi diris. "Ni la Usonanoj ja trinkas ankaŭ teon, kvankam por vi eble estas malfacile kredi tion."

"La *Tefesto de Bostono*[2] estas jam forgesita, ĉu?" La profesoro ridetis. "Nu, ni tamen bonvenigas vin."

Alvenis la tasoj da teo kaj ni malrapide trinkis ĝin dum ni konversaciis. Plejparte pri Usono, kaj ĉu estas por mi malfacile kompreni la Aŭstralian akĉenton. Ni konversaciis dum ĉ. duona horo. Tiam rerigardis la horloĝon la profesoro, stariĝis kaj diris: "Nun ni iru al la oficejo de la dekano."

Mi sekvis lin. Ni malsupreniris la ŝtuparon, trairis la arbareton trans la strato, marŝis inter la disaj konstruaĵoj. Min surprizis trovi ke tiuj konstruaĵoj ĉirkaŭas bone zorgatan parketon en kiu abundas arboj kaj arbustoj. Denove mi aŭdis la malĝentilan ridadon de la kukaburoj. "Ili abundas ĉi tie," komentis la profesoro. "Vi rapide kutimiĝos al ili." Fine ni eniris malnovan grizŝtonan konstruaĵon, trairis labirinton de koridoroj kaj nin trovis ĉe la pordo de la oficejo de la dekano.

"Pardonu nian malfruon, mi petas," diris la profesoro dum ni eniris. "Jen nia nova studento el la Universitato de Ĉikago. Ni konversaciis pri Usono, tiel vigle ke mi plene forgesis ke mi aranĝis

ke vi intervjuu lin. Bonvolu pardoni."

La dekano ridetis. "El Ĉikago, ĉu? Sendube urbo tre malsimila al nia, ĉu ne? Bonvolu sidiĝi." Li funkciigis interkomunikilon kaj parolis al sia sekretario: "Margareto, bonvolu prepari por ni tri tasojn da teo." Li denove alparolis min: "Nu, ĉu plaĉas al vi Aŭstralio?"

"Tre bela lando," mi respondis. "Mi aldas ke mi ĝuos laboradon ĉi tie...se mi sukcesos kompreni la tramsistemon."

Postkomento: La eventoj en ĉi tiu rakonto estas tute veraj. La Departemento de Prisemidaj Studoj poste renomiĝis la Departemento de Mezorientaj Studoj. —DB

---

[1][Laŭ Butler] La scienca studado pri kriminalismo.

[2]En decembro 1773 kolonianoj en la Bostona regiono perforte kaptis ŝarĝon de teo en Britaj ŝipoj kaj ĝin ĵetis enmaren, protestante kontraŭ la Brita monopolo de la temerkato, kaj kontraŭ tiurilataj impostoj. Dum multaj jaroj post tio Amerikanoj emis taksi tetrinkadon kiel perfidon.

❑

LA PERFEKTA VIRINO

(Daŭrigo de la rakonto pri Sinjoro Lupo)

de ELVIE ROWE

Tuj kiam Alberto, Kutberto kaj Egberto foriris, Sinjoro Lupo translokiĝis en la novan domon kun sia amikino.

La najbaroj estis ravitaj. Li estis evidente Unu el Ni, kaj lia amikino estis tre dekora. Sinjoro kaj Sinjorino Bonakorpo invitis la paron al festo por bonvenigi ilin al la najbarejo.

Kiam ili alvenis, Sinjoro Bonakorpo kriis: "Geamikoj, mi deziras ke vi renkontu niajn novajn najbarojn, Sinjoro kaj Sinjorino Lupo."

"Mi ne estas Sinjorino Lupo," diris la virino. "Mi nomiĝas Freda Servuto kaj ni estas kunuloj."

"Kia belega virino," pensis Sinjoro Bonakorpo. "Tiel sendependa. Tiel dekora. Tiel svelta."

Sinjorino Bonakorpo rapide ofertis al Sinjoro Lupo iom da antaŭtagmanĝoj. Ŝi estis bonega kuiristino.

"Kia belega virino," pensis Sinjoro Lupo. "Tiel bonega kuiristino. Tiel bonkora. Tiel brakuminda."

Post ĉi tiu bona komenco la festo estis sukcesego, sed, strange, kaj Sinjorino Bonakorpo kaj Freda Servuto havis kapdolorojn.

La postan matenon, Sinjorino Bonakorpo plenigis korbon per frandaĵoj por sia bopatrino. Ŝi faris ĉi tion preskaŭ ĉiutage. Ŝia filineto portis la korbon al sia avino dum sia iro al la lernejo. Kompreneble, Sinjoro Bonakorpo veturigis ŝin tien. Nuntempe, ni ne povas permesi infanon eliri sola.

Kiam la patro kaj lia filino eniris la

kuirejon, Sinjorino Bonakorpo puŝis bongustan peceton en la buŝon de sia edzo.

"La vojo al vira koro estas tra lia stomako," ŝi informis sian filinon kun subrido.

Sinjoro Bonakorpo malridis.

"Nu, nepre transdonu al Avino mian amon," diris Sinjorino Bonakorpo, "kaj mi enmetas la plej novan *La Perfekta Virino*. Ĝi enhavas kelkajn ravajn receptojn."

"Pluvas!" diris Sinjoro Bonakorpo.

"Surmetu vian ruĝan pluvmantelon kun la kapuĉo, karuleto," diris la patrino. "Nun, kisu min, Ruĝkufulino. Eliru kune."

Kiam ili alvenis al la domo de Avino ili trovis ŝin sur la planko, ruliĝanta de flanko al flanko.

"Ho ve, Avino! Kio okazis?" kriis Ruĝkufulino.

"Nenio estas malĝusta, stulta infanino," diris Avino. "Mi reduktas miajn koksojn. Tiom da manĝaĵo kiom via patrino konstante sendas estigos mian morton."

"Kaj mian," diris ŝia filo. "Mi dehakis ĉiun arbon en la arbarego, mi trotetis dum horoj. Ankoraŭ mi estas tro peza."

"Sed Panjo diris ke la vojo al vira koro estas tra lia stomako," protestis Ruĝkufulino.

Avino laŭte ridis.

"Ĉu ŝi akiris tion de Reĝino Viktorio?" ŝi demandis. "La vojo al vira koro estas tra la beligistino, mia infanino. Donu al mi tiun *La Perfekta Virino*. Mi volas legi pri la plej nova dieto."

Dume, Sinjoro Lupo sin demandis kien iras tiom da manĝaĵo en la korboj. Post kiam li gustumis la bongustegan festan nutraĵon de Sinjorino Bonakorpo, li decidis eltrovi kien. Tiumatene li sekvis la patron kaj la filinon al la avinodomo kaj rigardis tra la fenestron.

Ili eliris, kaj Sinjoro Lupo frapis ĉe la pordo.

"Eniru!" Avino kriis. "Mi esperas ke vi estas malsata. Vi povas helpi min manĝi ĉi tiun manĝaĵon. Efektive, vi rajtas preni ĉiom."

Sinjoro Lupo subite vidis sian tutan vivon streĉitan antaŭen, plenan je mirinda kuirado.

"Ĉu vi ŝatus vendi vian domon?" li demandis.

"Eble," Avino respondis. "Mi laciĝas de domlaboro. Sed kien ni povus iri?"

"Mi havas belan novan Retiriĝan Bienon," diris Sinjoro Lupo. "Tie estas banujo, varma naĝejo, gimnastikejo..."

"Aj aj aj!!" kriis Avino. "Faru al mi proponon!"

Post kelkaj semajnoj, Sinjoro Lupo kaj Freda Servuto surmetis la vestojn.

"Rigardu ĉi tion," grumblis Sinjoro Lupo. "Ĉiuj el miaj ĉemizoj bezonas butonojn. Ĉu estas troe, peti vin alfiksi kelkajn butonojn?"

"Jes, estas troe," respondis la virino. "Rigardu vin. Vi fariĝas pli dika ĉiun tagon. Ne surprizas ke vi krevas el viaj ĉemizoj."

Sinjoro Lupo estis tiel kolera ke li piedfrape iris el la domo kaj en la kuirejon de Sinjorino Bonakorpo. Li kunprenis siajn ĉemizojn.

Kiam Sinjoro Bonakorpo vidis sian edzinon alfiksanta la butonojn de

Sinjoro Lupo, li komprenis kio okazas. Li rapidis konsoli Freda Servuto.

Post la eksedziĝo, Ruĝkufulino loĝis dum unu semajno kun sia patro kaj Freda Servuto, ekzercante sin, dietante kaj lernante aspekti dekora.

Ĝuste kiel *La Perfekta Virino*. ❑

EL *CARMINA POPULARIA*

el la helena tradukis JOSÉ FCO MARTIN DEL POZO

Venis, venis hirundo
bonajn sezonojn portanta
bonajn jarojn
sur la ventro blanka
sur la dorso nigra.

Frukttorton vi eligu
el via riĉa domo,
kaj de vino pokalon,
kaj de fromaĝo korbon.
Nek panon tritikan
nek ovoflavan hirundo
rifuzas; ĉu ni foriru aŭ ĝin prenu?
Ĉu vi donos ion? Se ne, ni ne permesos tion;
ni forprenos la pordon aŭ la lintelon.
aŭ la virinon ene sidantan;
ŝi estas malgranda, ni forportos ŝin facile.
malfermu, malfermu la pordon por la hirundo:
ĉar ni ne estas maljunuloj, sed infanoj.

28a A.E.A. KAJ 57a N.Z.E.A. ESPERANTO-KONGRESO

11-19 Januaro 1992. Temo: *Ekologio*

4-a Listo de ĉeestontoj

35 Terry Manley (NSW)
36 Gaye Phillips (Qld)
37 Kay Anderson (Qld)
38 Ronald Gates (NSW)
39 Constance White (Qld)
40 Betty Aulsebrook (NSW)
41 Bill Aulsebrook (NSW)
42 Rosalie Schultz (NSW)
43 Betty Fripp (NSW)
44 Colin Gates (SA)
45 Owen Loneragan (WA)
46 Peg Martin (WA)
47 Lilian Newman (Qld)
48 Cathy Sullivan (Qld)
49 Maureen McSweeney (WA)
50 Marcel Leereveld (Vic)
51 George Lancaster (Vic)

Ĝis 21 aŭgusto 1991: NSW—25, Vic—9, Qld—7, WA—5, SA—2, Tas—1, ACT—1, Usono—1 = 51.

KONGRESNOVAĴOJ

informas Les Scott

21 aŭgusto 1991

Eksterlandanoj: Rezulte de sciigoj pri la kongreso en *Esperanto* kaj *Heroldo de Esperanto*, la LKK jam ricevis kelkajn petojn pri plia informo. Du eksterlandanoj jam konfirmis sian ĉeeston.

Junulara Kongres-Fonduso: La LKK atendas taŭgajn kandidatojn por ricevi la subvencion de $250 el tiu Fonduso por finance helpi gejunulojn ĉeesti la Kongreson. Membroj de JAGE estas speciale invitataj uzi la oportunon ricevi helppagon. Aldone, proponoj estas bonvenaj de grupoj tra Aŭstralio, aŭ eĉ de individuoj, kiuj havas kontakton kun taŭgaj junaj personoj. La LKK serĉas kompetentajn Esperantistojn ĝis-25jaraĝajn (aŭ -30jaraĝajn se temas pri plentempaj studentoj).

Drama Konkurso: Du grupoj, Brisbano kaj Manlio, informas ke ili intencas konkursi.

Kantadokonkurso: Nur Brisbano indikis partoprenon, ĝis nun.

22-A SOMERLERNEJO EN SAN FRANCISCO

de MARGARET FURNESS

Se vi iam scivolis, kial tiom da strangaĵoj okazas en tiu urbo, demandu al iu pri la vetero.

Proksimume 30 Esperantistoj el 10 landoj ĉeestis tri-semajnan somerkursaron en San Francisco en julio. Tri profesoroj instruis je kvar niveloj, kaj ek. metodika kurso. En la supera klaso, So Gilsu, Koreano, parolis pri Azia kaj Esperanta filozofioj, kaj politika ekonomiko; Michel Duc Goninaz, Franco, Akademiano, prelegis pri la Budapeŝta skolo kaj la poezio de Waringhien ("Esperantistoj estis neŭroze prudaj..."); kaj Jim Cool, Usonano, gvidis tradukadon de modernaj rakontoj. Poste, Ionel Onet, kiu multe verkas kaj estas duono de la Eldonejo Bero, konsilis pri la metodoj persvadi redaktorojn akcepti skribaĵojn. Li citis *TAE* ("Se vi deziras legi pri io, verku artikolon!")

La familio de S-ro Grzebowski parolis pri Esperantotur kaj la nova hotelo en Bydgoszcz.

La distraĵoj similis al niaj. Kial nur en Esperantujo mi kuraĝas kanti kaj danci? Kelkaj ideoj estas ŝtelindaj. Okazis Paroliga Grupo, kiu sekvis la programon de Toastmasters International. "Tablotemoj" taŭgus al klubkunvenoj—iu elektas temon, pri kiu kelkaj klubanoj devas paroli senprepare dum 1-2 minutoj.

La ĉiutaga Buteno utiliĝis kaj por anoncoj, kaj por intervjuoj, artikoletoj, poemoj ktp. Sed eĉ per komputoro (Usonaj Esperantistoj verŝajne ne estas senmonaj), kaj kun grupo de raportistoj, estis peza ŝarĝo por la redaktoro, kiu kutime laboris ĝis post noktomezo. (Kaj poste la preskoboldoj laboris). Se ni provos produkti bultenon en januaro '93, ni devos pli dividi la laboron. Fakte, en SF la studantoj kaj klubo de ESF-studintoj deĵoris pri fotoj, transporto al la festoj ktp, por helpi al la profesoroj kaj la estraro.

SF estas rimarkinda, kaj respektinda, pro sia toleremeco. En la Ĉina kvartalo, ĉiuj parolis la Ĉinan. La SF-Asocio de Gejaj (samseksemulaj) Esperantistoj invitis gejojn kaj ne-gejojn aŭskulti, kiel ili provas disvastigi Esperanton en la SF-geja komunumo. Mi scivolis, ĉu eble por la unua fojo kelkaj Esperantistoj "elŝrankiĝos". Sed ĉeestis la (laŭ mi) nura alloga viro el la kursanoj, ho ve!

Cathy Schultze ja estas gratulinda pro la alta nivelo de la kursaroj kaj la profesoroj dum tiom da jaroj. Mi revenis de SF instigata al kelkaj planoj: 1. Pli serioze atenti la nivelon de kolesterolo, ĉar mi konstatis, kiel mi min sentos post apopleksio—nur duonkapabla esprimi la pensojn. 2. Traduki rakontojn, eĉ verki (post kiam mi regos la akuzativon.) 3. Eble mi eĉ komencos la korespondkurson, por kiu mi pagis antaŭ du jaroj...

Kaj la vetero en julio? Nebulo, nebulo, nebulo...

❑

KIEL JUĜI ESPERANTECON?

de MARCEL LEEREVELD

La kriterioj kiujn ni uzas por juĝi la funkcion de ĉevalo ne estas la samaj kiaj tiuj kiujn ni uzas por juĝi la funkciojn de aŭtomobilo.

La kriterioj kiujn ni uzas por juĝi etnajn ("nature ŝanĝiĝemantajn") lingvojn ne estas la samaj kiaj tiuj kiujn ni uzu por juĝi interlingvon kia Esperanto. La rezonoj por juĝi ĉu vorto aŭ esprimo estas "bona", ĝusta, en etna lingvo ne povas esti la samaj por juĝi ĉu vorto aŭ esprimo estas "bona", ĝusta, en Esperanto.

En la etnaj lingvoj la precipa kriterio por juĝi ĉu vorto, esprimmaniero, signifo, literumo kaj gramatikaĵo estas ĝustaj, estas tre simpla: se la vorto ktp estas ĝenerale akceptata, aŭ se ĝi estas uzata de fama verkisto (aŭ sciencisto, aŭ politikisto), aŭ estas en la vortaro, ĝi estas ĝusta. Kvankam ekzistas multaj lingvoreguloj en la etnaj lingvoj, ili ĝenerale estas nur flank–kriterioj; tio okazas ĉar pro (precipe) homopsikologiaj kaŭzoj la diversaj aspektoj de la etnaj lingvoj daŭre ŝanĝiĝas. En tiu fenomeno signifoj, formoj, sonoj kaj reguloj malplivastiĝas, ŝanĝiĝas, kaj plivastiĝas, kaj precipe la gramatikreguloj (kaj en la angla ankaŭ la literumreguloj) ricevas diversajn esceptojn, kiuj jen kaj jen formiĝas en subregulojn. Ĉio ĉi estas "bona lingvo", eĉ se tio malplisimpligas (kelkfoje plisimpligas) la lingvon kaj ĝin malklarigas, ekzemple kaŭzante miskomprenojn pro plursenceco, pro ŝanĝiĝo de signifoj, pro disfalo en dialektojn ĉe geografia aŭ socia disiĝo, kaj dum uziĝo kiel fremda lingvo. Ankaŭ se tiu disvolviĝo kaŭzas ke lingvo fariĝas tre malfacile lernebla por alilingvanoj kaj eĉ por samlingvanoj. Cetere la disvolviĝado de etnaj lingvoj ne estas pliboniĝo aŭ malpliboniĝo, kresko aŭ degenero, sed simple ŝanĝiĝado, aliformiĝado de sonoj, signifoj kaj gramatikregu. (inter kiuj tiuj pri la [ne-]uzado de certaj vortoj kun certaj aliaj vortoj).

Estus do malĝuste diri ekz. ke Esperanto devas "kreski" kiel la etnaj lingvoj: ĉilastaj ne kreskas (escepte en la relative malmultaj kazoj de pliriĉiĝo de, precipe teĥnikaj, homaj nocioj), nur ŝanĝiĝas; aplikante tiun kriterion por Esperanto signifus ke ĝi daŭre devus ŝanĝiĝi. La flankkriterioj por esti "bona" en etna lingvo, tiuj pri reguloj de sonoj, signifoj kaj gramatikaĵoj, varias nature laŭ la diversaj lingvoj; ili kelkfoje intersamas kaj ofte intersimilas. Eĉ, interese, la esceptoj kelkfoje similas en tute malsamaj lingvoj.

Serĉante la kriteriojn por "boneco" en Esperanto (aŭ kiu ajn neetna interlingvo), ni devas unue konscii ke ĝi estas lingvo farita kaj daŭre refarata en la menso, farita laŭ la konceptoj Zamenhof, kaj farata laŭ la reguloj kaj spirito de sia kreiĝo. La funkcioj kaj la celoj de interlingvo estas, parte, malsamaj al tiuj de etnaj, naturaj lingvoj: ĉilastaj ŝanĝiĝas (kvankam eble "kreskis" en primitivaj epokoj) plejmulte sendepende de la konscia volo homa. Ili sufiĉe bone servas la popolojn ilin parolantajn (speciale se la popolanoj interkomunikas multe), eĉ malgraŭ iliaj

malfacileco, nereguleco kaj dusencaĵoj. Interlingvo ne povas sekvi la saman vojon, precipe ĉar la anoj loĝas tre dise en la tuta mondo, ĉar ĝi (ankoraŭ) ne estas la unua lingvo de la anoj (ĉu ĝi iam estos aŭ devos esti?), kaj ĉar miskomprenoj inter samlingvanoj ĝenerale kaŭzas malfacilaĵojn pli solveblajn ol tiuj inter nesamlingvanoj. La kriterio ĉu io estas "bona" en Esperanto do ne povas esti ke "io estas 90-procente akceptita", aŭ ke "iu fama verkisto, lingvisto, aŭ Akademiano sankcias ion", aŭ ke "la germana lingvo solvas certan problemon sammaniere" (por ĉi tiuj tri ideoj vidu tri artikolojn de tri konataj lingvistoj en *TAE* nº 267 kaj 268). La kriterioj por boneco en Esperanto, jam de Zamenhof formulitaj praktike kaj/aŭ spirite, estas aliaj, kaj dependas de la funkcioj kaj celoj de tiu interlingvo. Kaj tiuj kriterioj ne nuligas aŭ malplivalidigas unu la aliajn. La precipa estas tiu de klareco, de fidebleco; ĝi postulas ke du vortradikoj ne povu havi la saman signifon*, ke unu vortradiko ne povu havi du nesamajn signifojn (metaforo = sama signifo en malsama rilato), ke la sonoj reprezentantaj la literojn (kaj inverse) estu prononcataj sufiĉe samaj de ĉiuj personoj, ke la uzantoj obeu regulojn gramatikajn kaj vortfarajn, ke ĉiuj eblaj nocioj kaj pensoj povu esti esprimataj, kaj ke neniu ŝanĝu la signifon de la vortoj nek la vortojn por la nocioj (ekz. "malsanulejo" al "hospitalo").**

Kompreneble unu-du esceptoj al ĉiu regulo ne multe difektus Esperanton, kiel la kontraŭregulaj "far" kaj "krokodili" (ĝi ne estas metaforo!), kvankam tio en si mem jam farus Esperanton malpli fidinda. Ne, la danĝero situas en la fakto ke se unu Esperantisto (inkl. Zamenhof) rajtus fari escepton, ĉiuj aliaj plenrajte kreus siajn aliajn esceptojn (kaj nenecesajn neologismojn) kaj malobeojn al la originaj reguloj, kaj la interlingvo fariĝus kia etna lingvo, daŭre ŝanĝiĝanta, nefidebla, kaj malfacile lernebla. Ekzemple Zamenhof erare kreis kelkajn kunmetaĵojn de adjektivo kaj substantivo (kia "belknabino"); *Plena Analiza Gramatiko* insiste avertas kontraŭ "danĝera" daŭrigado de tia formado ("la tuta konstruaĵo [= Esperanto] ekŝanceliĝus", § 423); tamen bonega Esperanto-lingvisto ankoraŭ kreas novajn tiajn kunmetaĵojn (*TAE* Nº 268) por sia plezuro. Ĉe tia libereco la lingvo degenerus for de fidebla interkomunikilo, aŭ simple ŝanĝiĝus en por sia celo netaŭgan lingvon similan al la etnaj.

Alia grava kriterio estas la simpleco, ne en la kvanto de esprimeblaj nocioj, sed en la nur necesaj reguloj por la gramatiko kaj la vortfarado kaj en la logika aplikado de la riĉiga kaj preskaŭ neelĉerpebla sistemo de kreado de kunmetitaj vortoj (ekz. "lancĵetilo" anstataŭ "vumero"). Ĝi postulas ke

---

* Multaj lingvistoj studantaj la strukturon de lingvoj pretendas ke ĉi tiu postulo ankaŭ ekzistas, kvankam ne konscie formulite, en la etnaj lingvoj, kaj ke veraj "sinonimoj" ne ekzistas en ili..—la Red.

**"Hospitalo" estis oficialigita en la 1ª *Oficiala Aldono*, kaj plenumas la regulojn en subparagrafo 2 de la Antaŭparolo de la *Fundamento de Esperanto*. Do Marcel ĉi tie laŭrajte dubigas la konsilindecon de kelkaj aplikoj de tiuj reguloj.—la Red.

kreatu nur absolute necesaj (= malmultaj) neologismoj, ke geografiaj nomoj sekvu nur la simplajn regulojn kiuj difinis la kreadon ate de Zamenhof ante la aliajn nomojn, kaj ke metaforoj estu vivantaj, ne "ŝtonigitaj" (jese "reĝino inter la floroj", nee "lignero sur la ŝultro"). La simpleco en tiu ĉi aspekto de la lingvo necesas por ke ĝi estu facile lernebla de ĉiuj homoj. Artefarita lingvo malfacila kiaj la etnaj estus interesa kaj lernebla por multaj, sed ne por ĉiuj, pro manko de tempo aŭ de komprenkapablo. Kaj ree: se unu rajtus malsimpligi Esperanton kreante unu-du nenecesajn neologismojn (kio ne gravus multe), ĉiuj aliaj havus la saman rajton kaj la vortaro fariĝus 1300-paĝa (kia *PIV!*). La situacio tamen jam similas, kvankam subtile, al la Ido-krizo en la komenco de la nuna jarcento. La estonteco de Esperanto, degenero en ĉies ludaĵon aŭ pluvivo en saneco kaj pureco, kuŝas en niaj propraj manoj.

Ĉe etnaj lingvoj oni tre malmulte malobeas la kriteriojn de 'bona lingvo'. Ĉe Esperanto, parte pro la neserioza traktado ante la lingvon ate de la plimulto el ĝiaj verkistoj kaj lingvistoj, oni multe kuraĝas malobei la kriteriojn de "bona lingvo". La pretekstoj estas ke la lingvo devas "kreski" (kion ĝi ne bezonas) kaj ke ĝi devas fariĝi fleksebla (kion ĝi ne bezonas). La vera motivo estas, ke estas pli facile nestrikte apliki gramatikajn regulojn (se oni ne perfekte konas ilin) kaj uzi etnajn vortojn (neologismojn) anstataŭ serĉi Esperantecajn vorkombinojn (kio ofte postulas tempon kaj energion). Estas vere ke en Esperanto (eĉ pli ol en la etnaj) la artisma lingvouzo estas limigita de kriterioj de ĝusteco. Sed Esperanto ne necese devas esti poezia lingvo: oni ne rajtas postuli ke ĝi internacie traduku artaĵojn, kiel pentraĵon, muzikaĵon, skulptaĵon, nek poeziaĵon, ĉiu el kiuj perdas sian originan artecon se transformita. Pro la genio de Zamenhof lia lingvo tamen kapablas, bonŝance, uzati kiel taŭga ilo por krei sian propran beletron, eĉ se la poetoj devas esti iom pli kapablaj artistoj en Esperanto ol en etnaj lingvoj. Kvankam malfacile sen neologismoj kaj sen "liberiĝo" de la gramatikaj reguloj, tio kreas eĉ pli grandajn poetojn kaj lasas la lingvon esti la fidebla komunikilo kio estas ĝia unua celo.

[Ni bonvenigos la reagojn de legantoj al la ĉisupra diskuto.—La Red.] ❑

EL LA REGIONOJ

Victoria: En la *Syme Messenger* (ĵurnalo por dungitoj de *The Age*), Julio, aperis kvaronpaĝa artikolo pri F.R.Banham, laŭ la biografio verkita de Audrey Bruton kaj distribuita kun *TAE* 266. Duono de la artikolo konsistas el granda foto de Banham kun kolegoj.

La 17-18an de majo Ramona kaj Epo Van Dalsem, el Nederlando, vizitis Melburnon. Intervjuo por Radio 3ZZZ kaj lumbild-prezento en la Esperanto-kunveno akompanis ilian turismadon en Melburno.

La 15-16an de junio el Germanio

venis la Schubert-Ĥoro, inter ili gesamideanoj Eberhard. Triparta intervjuo kun ili estis disaŭdigita per Radio 3ZZZ.

Dum ses semajnoj ni havis vizitantinon el Germanio. Ŝia nomo estas Gudrun Fiŝer. F-ino Fiŝer venis al Aŭstralio laŭ student-interŝanĝarangĝo inter Germanio kaj Aŭstralio. F-ino Fiŝer loĝis ĉe familio kies filino iros en Germanion en novembro kaj loĝos ĉe la familio Fiŝer dum ses semajnoj.

La tuta familio Fiŝer ludas grandan rolon en sia lando kiel Esperantistoj kaj ĉiuj estas UEA-delegitoj en Nordwalde. Gudrun, junulardelegito, estas vicprezidantino de la junulara movado en sia urbo. Gudrun partoprenis en du Esperanto-kunvenoj kaj estis trifoje intervjuita por la 3ZZZ-Esperanto-programo.

Mi deziras esprimi mian dankon al la personoj kiuj sendis informojn kaj novaĵojn por nia radioprogramo: Ralph Harry, Ray Ross, Jean Lehane, J.B. Moore, Keri Aŭgunas, Winsome Greenhalgh, Kay Anderson, Herbert Koppel, Marcel Leereveld kiu estis intervjuita pri sia vojaĝo en Ĉinio, Owen Loneragan. Donald Broadribb. Dankon, per via subteno ni povos plibonigi nian Esperanto-radio-programon.

Mi invitas Esperantistojn kaj amikojn de Esperanto subteni la Esperanto-radioprogramon kaj aliĝi al la membraro de Amikoj de Esperanto; per viaj $10 jare vi helpos Esperanton en la radio. Antaŭdankon.

—Svetislav Kanaĉki

NSW: Ekzempleroj de Fulcher & Long *Esperanto-English Dictionary* estas bezonataj de lernantoj. Bv. kontakti Edna Turvey, 36 Calder Road, Darlington NSW 2008.

Roger Springer, de la Manlia grupo, estas la nova estro de la Manly-Waringah Pipe Band—sakŝalmistoj kaj tamburistoj. La 13an de julio okazis balo por tiu grupo, en la Chatswood Civic Centre.

La 26an de junio la Merkreda Konversacia Grupo en Manly ĝuis duhoran ekskurson per pramŝipo.

Queensland: La 14an de julio en la urboparko de Caboolture (70km norde de Brisbano) dudek membroj de la Federacio kunvenis kaj piknikis—kun la helpo de granda nombro da birdoj (kelkaj indiĝenaj).

Konferenco de la Esperanto-Federacio de Kvinslando okazos la 5-6an de oktobro. ❑

Respondoj Por Citaĵkvizo 6

1 b; 2 ĉ; 3 h; 4 g; 5 f; 6 ĝ; 7 a; 8 d; 9 e; 10 c; 11 i; 12 ĥ

Wholly printed in Australia. Computer typeset by Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill, WA, 6562; printed by SNAP, 921 Albany Highway, Victoria Park East, WA, 6101 Australia.

The Australian Esperantist

Numero 270 Novembro-Decembro 1991

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488



Ĉefartikoloj:

Briĝo: Diplomata Kunludanto (*Ralph Harry*) p.3
La Lernprocedo en Etnaj Lingvoj kaj Esperanto *(Marcel Leereveld)* p.5
Niaj Propagandaĵoj (*Donald Broadribb*) p.7
Feliĉaj Memoroj (*Eddie Hearne*) p.17
Citaĵkvizo 7 (*Ralph Harry*) p.19
Retrokomente (*N.P. Stepanov*) p.20
Nekrologo: Clarence Strochnetter (*Max LeFevre*) p.21
Lingva Angulo (*Alan Towsey*) p.22
AEA-NZEA Kongreso Januaro 1992 p.25
El la Regionoj p.26
Malnova Bjalistoko Sur Poŝtkartoj p.27

LA AŬSTRALIA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562 ☎ (09) 574 1307.
Provizora Prezidanto: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014
Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109
Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne VIC 3001
Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102
Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036
Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702
P.R.O. (Oficisto pri Rilatoj kun la Publiko): Dennis Murphy, 79 Binnalong Rd, Old Toongabbie NSW 2146
Provizora Prezidanto de la Ekzamen-Komitato: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562

Membrokotizoj: $25 por individuo, klubo kc. $30 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso). $15 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adresslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian nomon aŭ/kaj adreson. Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Limdato por ricevo de presotaĵoj por la venonta numero: 1 januaro.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO
verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *La Aŭstralia Esperantisto* "Ni vere bezonas artikolon pri...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercdesegnaĵon. Ni akceptas surpaperajn manuskriptojn kaj ankaŭ verkojn sur 3.5-colaj diskoj IBM-kongruaj kaj Macintosh-aj. Se vi sendas manuskripton, bonvolu atenti la ĉi-sekvajn postulojn: la teksto devas esti klare tajpita kun duobla spaco inter la linioj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netajpitaj manuskriptoj estos malakceptitaj. (Ankaŭ tajpaĵoj kiuj estas tro palaj por esti facile legeblaj.) Manuskriptoj estos resenditaj nur se ilin akompanos adresita afrankita koverto por tiu celo. Se vi sendas diskon, nepre kunsendu adresitan afrankitan koverton por ke ni povu resendi al vi vian diskon por reuzo. La redaktoro kutime agnoskas la ricevon de gravaj/longaj tekstoj, sed kutime ne de malgrandaj informoj kc. kiuj estos uzataj laŭ taŭgeco. Aŭtoro de artikolo kutime ricevas senpagan ekzempleron de tiu numero en kiu la artikolo aperas. Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone ĝi povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa.

BRIĜO: DIPLOMATA KUNLUDANTO

de RALPH HARRY

La Ambasadoro ridetis diplomate al sia kunludanto, la edzino de la Ministro pri Eksterlandaj Aferoj. Ŝi estis bela virino, kvankam ŝia scipovo pri briĝo estis minimuma. Ŝi retroridetis kun pardonpeto:

"Mi esperas, ke mi pli bone ludos en enonta mano."

La Ambasadoro tre deziris, ke ŝi sukcesu en almenaŭ unu kontrakto, ĉar la tagmanĝoj, sekvataj de iom da briĝo, estis utila metodo amikiĝi kun la Ministro.

Kiam li ekzamenis sian lastan manon de la vespero li trovis:

♠ R, F
♥ A, 5
♦ A, R, D, 10
♣ D, 10, 4, 3, 2

La Ministroedzino en la norda seĝo ekofertis: unu trefo. La Ambasadoro-edzino, oriente, pasis. La Ambasadoro ankaŭ pasis, certa, ke unu trefo sukcesos. Sed la Ministro, en la okcidenta seĝo, sentis, ke ne estus bone permesi al siaj kontraŭuloj ludi unu trefon. Tial li aŭdacis oferti unu pikon. Ambaŭ virinoj pasis, kaj kiam venis lia vico la Ambasadoro kunpremis la dentojn kaj ofertis du trefojn.

Li estis tre agacita, kiam lia edzino, dekstre, daŭrigis la ofertadon per "Du pikoj". Ŝajnis neeble, ke lia tremetanta kunludanto sukcesus plenumi kontrakton de tri trefoj. Sed iel li devis aranĝi por ŝi triumfon. Li ofertis "Ses senatutoj"! Tio kaŭzis konsterniĝon ĉirkaŭ la tablo. Kiel povus ludanto, kiu ne povis subteni unu trefon, subite oferti malgrandan ŝlemon en senatutoj? Jen estis la kvar manoj:

Nordo
♠ 6, 3
♥ R, D, 3, 2
♦ 7, 6, 5
♣ A, R, F, 5

Okcidento
♠ A, D, 9, 7, 2
♥ —
♦ F, 9, 8, 4, 3, 2
♣ 9, 8

Oriento
♠ 10, 8, 5, 4
♥ F, 10, 9, 8, 7, 6, 4
♦ —
♣ 7, 6

Sudo
♠ R, F
♥ A, 5
♦ A, R, D, 10
♣ D, 10, 4, 3, 2

La eksterordinara ofertado, resume, estis:

Nordo	Oriento	Sudo	Okcidento
1 ♣	Paso	Paso	1 ♠
Paso	Paso	2 ♣	Paso
Paso	2 ♠	6 S.A.	Paso
Paso	Paso		

Se la Ministro, en la okcidenta seĝo, estus ekludinta per unu aŭ alia de siaj longaj emblemoj, li estus donacinta al la Ambasadoro lian kontrakton. Sed li ekludis trefon, nenion rivelante. La Ambasadoro prenis en la fantomo kaj ludis karoon al la aso, tiel malkovrante la malbonan dividiĝon. Tiam li enkasigis alian gajnantan karoon, kvar trefajn trekojn pli, kaj tri kerajn trekojn.

La Ministro, okcidente, devis konservi du karoojn, tial li fordonis la pikan damon. La Ambasadoro sciis, kio okazas, tial li ekludis pikon, kaj la Ministro devis ekludi per la karoa fanto en la fino.

"Bonega poentaro por ni, partnero" anoncis la Ambasadoro, gaje, rezistante penojn de la kontraŭuloj komenci "postmortan enketon".

"Kial vi ne ofertis pli da trefoj?" demandis la Ministro.

"Estis malfrue, kaj mi ne estis certa, ke mia partnero povus sukcesi en kontrakto de tri trefoj," diris la Ambasadoro.

"Kion vi intencas diri per tio?" demandis lia bela kunludanto, iom suspekteme.

"Mi pravis," diris la diplomato, "ĉar vi ne povus sukcesi en pli ol unu trefo. Ili povus krucatuti en la ruĝaj emblemoj kaj ankaŭ preni du pikajn trekojn."

La Ministro stariĝis. "La horo venis", li diris.

"Mi bedaŭras, ke vi devas hejmeniri" diris la Ambasadoro, "sed mi esperas, ke ni baldaŭ havos la plezuron denove ludi unu-du robrojn".

(Kun dankoj al Alan Truscott, kiu unue priskribis ĉi tiun manon, kvankam en aliaj cirkonstancoj.)

[Mallongaj difinoj de la ĉefaj terminoj:

♠ Piko A= aso
♥ Kero R = reĝo
♦ Karoo D = damo
♣ Trefo F = fanto

fantomo = la partnero de la deklarinto — tiu kiu elmontras siajn kartojn sur la tablo

kontrakto = la sindevigo de la deklarinto gajni, en la kategorio nomita, la nombron da plitrekoj specifitan en la fina oferto

malgranda ŝlemo = gajno de 12 trekoj el 13

oferto = propono sin devigi gajni almenaŭ specifitan nombron da plitrekoj en specifita kategorio

robro = unuo en poentado, indikanta la gajnon de du partioj fare de unu duopo

senatutoj = kontrakto en kiu ne estas atutoj

ŝlemo = gajno de 12 aŭ 13 trkoj

treko = la unuo per kiu la rezulto de kontrakto decidiĝas. La kartoj demetitaj dum unu rondiro kaj kolektitaj de la venkinto (= preno). (A. *trick*, F. *levée*, G. *Stich*, H. *presa*)

D-ro Harry kompilis leksikoneton de briĝterminoj. Interesatoj povas kontakti lin ĉe 319 Bayview Gardens, 36-42 Cabbage Tree Road, Bayview NSW 2104. — Red.] ❑

LA LERNPROCEDO EN ETNAJ LINGVOJ KAJ EN ESPERANTO

de Marcel Leereveld

Konstatinte ke la kriterioj por (sen)erareco en etnaj lingvoj estas aliaj ol tiuj por internacia komunikilo kia Esperanto, ni devas fari malsamajn konkludojn pri la procedo, [illegible] la lernmetodoj, de la du malsamaj [illegible]coj de lingvo.

Kio estas sama en ambaŭ, tio estas la fenomeno de la sonoj, kiuj en si mem ne havas signifon, ne aludas al impresoj ĝenerale, sed kiuj en kombinaĵoj reprezentas niajn impresojn pri la ekstera mondo (inkluzive nian propran korpon). Tiu fenomeno de sonkombinaĵoj, kiujn ni nomas vortoj, estas la sama en etnaj lingvoj kiel en Esperanto. Duagrada fenomeno estas la skriba reprezentado, kiu en Esperanto ree estas la sama kiel en multaj etnaj lingvoj, i.a. ĉiuj eŭropaj. Nome, ke la sensignifaj apartaj sonoj de vortoj estas reprezentataj de sonsignifaj literoj kiuj en kombinaĵoj reprezentas vortojn, kaj tiel impresojn. Tiuj sonaj vortoj kaj skribaj vortoj do havas signifojn, ili signas la impresojn (inkl. la sentojn kaj reagojn). [illegible]certaj lingvoj tamen (i.a. la ĉinaj), la "literkombinaĵoj" (kaj eĉ la "literoj" mem) rekte reprezentas la impresojn sen aludo al la sonoj, kvankam fine la sonaj vortoj kaj la skribaj vortoj estas mense ligataj.

Lernante lingvon, la homa menso kunligas, per ofta ripetado, la sonajn vortojn (kaj poste la skribajn vortojn) kun la impresoj kaj kun la ideoj (kreitaj siaflanke per la helpo de la lingvo mem; do ideoj kaj lingvo disvolviĝas en interagado). Ankaŭ tio estas sama en ambaŭ specoj de lingvo, kvankam en la nerekta lernmetodo la vortoj en Esperanto, ja fremda lingvo ĝenerale, lernatas kaj kunligiĝas al impresoj parte per la signifosistemo de la denaska etna lingvo. Sed la homo lernas ne nur la respektivajn vortojn. Ĝi lernas ankaŭ malsimplan retaron de reguloj, kiuj ĉiuj havas siajn proprajn signifojn ĉar tiuj signifoj reprezentas la variajn interrilatojn inter la signifoj de la vortoj; ili do aldonas signifon al kombinaĵoj de vortoj, por pli klare reprezenti la bildon, la impresaron. Estas precipe en ĉi tiu fenomeno ke la etnaj kaj artefaritaj lingvoj diferencas, necesigante malsamajn lernprocedojn.

La reguloj pri la interrilatoj inter la vortoj (kaj inter la vortparoj) povas esti lernataj en ambaŭ specoj per konscia ekzameno aŭ per nekonscia ripetado. En ambaŭ kazoj la menso lernas uzi regulojn (kelkaj evidente jam transgeneraciigitaj) por ĝuste kunligi la vortojn, konscie aŭ nekonscie. Tiujn regulojn oni nomas la gramatiko, kvankam diversaj el tiuj reguloj apartenas al negramatikaj regularoj, kiel tiuj pri sonkombinado kaj tiuj pri vortkunmetado (kiu havas tre gravajn regulojn en Esperanto).

Dum en lernado de etnaj lingvoj la menso lernas, alkutimiĝas, apliki regulojn kaj atendi esceptojn, en la lernado de Esperanto la menso lernas, alkutimiĝas, apliki klarajn kaj simplajn regulojn kaj atendi mankon de

esceptoj. La fidebleco pri ĝusteco en etna lingvo dependas de aplikado de reguloj kaj de multegaj esceptoj. La fidebleco pri ĝusteco en Esperanto dependas de aplikado de senesceptaj reguloj. La menso do procedas en malsamaj manieroj en la du specoj de lingvo, ĉar la menso alkutimiĝas al unu aŭ al la alia. (Flankrezulto: en Esperanto la menso serĉas pli kritikeme ol en la aliaj.) Pro la malsama lernprocedo oni bezonas malsaman instruprocedon, en rekta same kiel en nerekta metodo. Lernante etnan lingvon, la menso atendas la neceson lerni escepton, aŭ eĉ kelkfoje forgesi pri reguloj, kaj ne ribelas kontraŭ tio. Lernante Esperanton, la menso atendas, konscie aŭ ne, mankon de esceptoj, senesceptan aplikon de reguloj, kaj ribelas se tio ne okazas, se ĝi trovas ke la reguloj estas nefideblaj. Akcepto de esceptoj al reguloj kondukus la menson al daŭra preteco renkonti esceptojn, kaj renversus la tutan konstruaĵon Esperanto, nuligante la ekzistorajton mem de la lingvo.

La postulo de fidebleco en Esperanto precipe koncernas la gramatikajn regulojn (inkl. de reguloj pri vortkunmetado), sed ĝi ekzistas ankaŭ ĉe la reguloj pri signifo, kiel tiu ke unu radiko povas havi nur unu signifon, ke unu signifo havas nur unu vorton, kaj ke la signifo ne ŝanĝiĝas se la vorto estas uzata kun diversaj aliaj vortoj aŭ [illegible] diversaj gramatikaj situacioj. Same, sed malpli grave, la senesceptaj reguloj pri la sonoj (prononco) kaj pri la literoj (skribo). Dum la instruado de etna lingvo ni pretigas la menson al akceptado de reguloj kaj de esceptoj, en gramatiko kiel en sonoj, literoj, kaj signifoj.

Dum la instruado de Esperanto, eĉ en la rekta metodo, ni pretigas la menson al akceptado de reguloj kaj al malakceptado de esceptoj aŭ variaĵoj. La neceso de klareco kaj de fidindeco de Esperanto postulas tion. ❑

BIOGRAFIO DE FRANK REGINALD BANHAM

Verkita de Audrey Bruton kaj redaktita de Marcel Leereveld. Tiu 36-paĝa libro estis dissendita kiel Suplemento al *La Aŭstralia Esperantisto* nº 266 (marto-aprilo 1991). Ekzempleroj estas senpage haveblaj ĉe la redakcio de *La Aŭstralia Esperantisto.*

Petante ekzemplero(j)n bonvolu kunsendi afrankitan adresitan A-5 koverton por ĝia enpoŝtigo. La libro estas samdimensia kiel *La Aŭstralia Esperantisto.* ❑

PRIESPERANTAJ ARTIKOLOJ

La *Modern Language Associatio* (Usono) ĉiujare eldonas bibliografion de prilingvaj artikoloj. Nun ekzistas sur porkomputila komptaktdisko bibliografio inkludanta la ses pasintajn jarojn.

La rubriko "Esperanto" havas detalojn pri proksimume 3000 priesperantaj artikoloj.

Por detaloj bonvolu kontakti David Poulson, 6 Barlee Place, Edgewater WA 6027. ❑

NIAJ PROPAGANDAĴOJ

de Donald Broadribb

Nuntempe mi tralegas diversajn faldfoliojn kaj broŝuretojn kiujn produktis AEA dum la pasintaj jardekoj, por ilin ĝisdatigi. Min trafas pluraj malallogaĵoj en tiuj presaĵoj, kiuj eble helpas kompreni kial nia propagandado por Esperanto en Aŭstralio tiel e fiaskas jam de tiom da jaroj.

Mi volas prezenti al vi kelkajn premisojn kiujn — mi opinias — vi akceptos post iom da pripensado. Uzante tiujn premisojn kiel bazon mi deziras poste proponi novan karakteron por nia poresperanta propagandado.

(1) *Esperanto ne plu estas "nova" lingvo.* Ĝi jam aĝas pli ol 104 jarojn. Tio signifas ke ne plu ekzistas sur nia planedo eĉ unu originala Esperantisto. Efektive, ĉar plejparte interesiĝas pri Esperanto maturaĝuloj, ni apartenas al la sepa aŭ oka generacio de Esperantistoj. Tio signifas ke ĉiu el ni ekrenkontis Esperanton kiel jam ekzistantan lingvon kun kulturo. Por ni kaj por ĉiu estonta Esperantisto Esperanto okupas similan kulturrangon kiel, ekzemple, la franca, la germana, la ...la, la hispana, la ĉina, la japana kc. ...gvoj kun propra, specifa kulturo. Ĝi ne plu estas eksperimento nek lingvoprojekto, nek "artefarita", nek io akceptenda aŭ malakceptenda. Ĝi ekzistas, samkiel ekzistas ĉiu etna lingvo, kaj samkiel ĉiun etnan lingvon oni ĝin studas pro diversaj motivoj kaj celoj.

(2) *Analfabeteco inter Esperantistoj estas tre granda.* "Ĉu??" vi demandas. "Ĉu ja ekzistas analfabeteco inter la Esperantistoj? Nu, jes, se ni iom metafore komprenas la vorton "analfabeta". Ĉi-epoke pli kaj pli fortiĝas la konstato ke multaj Esperantistoj ne regas la lingvon.

Iam mi demandis: kvankam Esperanto estas pli facile lernebla ol ĉiu etna lingvo, kial la Esperantistoj ne regas Esperanton pli bone ol averaĝa studinto regas lernitan etnan lingvon?

Ekzemple, tipa lerninto de Esperanto kiel "dua" lingvo ne pli bone uzas Esperanton ol tipa lerninto de la franca kiel "dua" lingvo. Kiel ekspliki tiun paradokson?

Rilate Esperanton, pri tio parte kulpas la fakto ke en Aŭstralio nenie oni povas libere konversacii en Esperanto, nek aŭskulti ekskluzive ĝin, eĉ se oni estas tre bone lerninta Esperanton.

Tamen la vera kaŭzo estas pli profunda. Iu tre saĝe respondis al mi: Ĉar kontentigas la plej multajn personojn balbuti en lernita lingvo kaj proksimume kompreni ĝin. Samkiel la plej granda parto de fremdlingvaj migrintoj en Aŭstralio neniam lernas la anglan pli bone ol por balbutata preskaŭkonversacio, tiel estas ankaŭ rilate al Esperanto. Tipa lernanto de iu ajn lingvo ne trovas neceson aŭ bezonon pli profunde kompreni kaj paroli ĝin.

Iom hontige, nia propagandado pri Esperanto helpas instigi kaj daŭrigi tiun staton de lingva analfabeteco. Ni konstante emfazas ke Esperanto estas "facile lernebla", havas nur 16 gramatikajn regulojn, malgrandan vortaron, kaj ke oni rapide ekregas la lingvon. Interesato baldaŭ seniluziiĝas, kaj plejparte perdas

sian interesiĝon, trovante ke tiuj pretendoj estas malveraj.

En la praktiko ekzistas multe pli ol 16 gramatikaj reguloj, se per "gramatika regulo" ni nomas saman fenomenon en Esperanto kiel en etnaj lingvoj. La "nur 16 reguloj" estis jam de la komenco nur reklamtruko. Eĉ kvankam mi trovas multegon kritikindan en *Plena Analiza Gramatiko*, ĝi ne senkaŭze plenigas 599 paĝojn. Tio indikas ke la gramatiko de Esperanto ampleksas multe pli ol nur 16 regulojn.

Kaj la vortaro de Esperanto ne estas malgranda.[1] Se la vortkvanto de Esperanto ŝajnas malgranda, tio ŝuldiĝas ne al la vortprovizo de nia lingvo, sed al la manko de vortlernado fare de niaj studantoj. Pro tio, kiel prave plendas Marcel Leereveld, Esperantistoj emas inventi tiom da "neologismoj": ĉar ili efektive ne scias ke jam ekzistas en Esperanto esprimoj por preskaŭ ĉiu nocio. Kaj bedaŭrige, ankoraŭ post 104 jaroj ne ekzistas en Esperanto ampleksa Angla-Esperanta Vortaro![2]

Ni provas allogi "interesutojn"[3] pri Esperanto per la slogano ke oni bezonas nur malmulte da tempo por regi Esperanton. Por pravigi tiun pretendon, ni eĉ senintence malhelpas profundan ellernadon de la lingvo.

Preskaŭ senescepte ni prezentas "elementajn kursojn" kies enhavo estas nur ĉ. 30-50 horoj da instruado. Kaj ni diras al la publiko ke dum nur kelkdek horoj da partopreno en klaso aŭ da perkoresponda studo oni sufiĉe lernas la lingvon por ne bezoni pli da studo.

Praktika ekzemplo: en la priskribo de la perkorespondaj kursoj de AEA estas dirate ke post la komenca kurseto (kiu konsistas el *Bonan Tagon* plus prononckasedo kaj vortareto) oni bezonas studi nur ankoraŭ 31 lecionojn (Kurso 2, kun 12 lecionoj; kaj kurso 3, kun 20 lecionoj) por "kontentige" regi la lingvon.

La detaloj pri la perkoresponda "progresiga kurso" diras ke la kurso, bazita sur *Step by Step in Esperanto* de M.C. Butler, "improves confidence and ability to the Supera examination standard" kaj ke tiu studlibro "doubles as a lifetime reference work" (!).

Nu, M.C. Butler estis tre honorinda kaj kompetenta Esperantisto/filologo. Sed *Step by Step in Esperanto* ne portas la studanton al pli alta nivelo ol tiu atingata de kompetenta unuajara universitatstudento lernanta la araban lingvon, aŭ la klasik-grekan lingvon, aŭ la klasik-

[1] Tipa parolanto de etna lingvo kiel hejmlingvo kapablas aktive uzi ĉ. 10 000 vortojn, kaj pasive kompreni ĉ. 3000 pli. *PIV* enhavas ĉ. 15 000 "radikojn", do multe pli ol kapablas averaĝa etnalingvulo aktive uzi en sia hejma lingvo.

[2] La de multe jaroj atendata *Comprehensive English-Esperanto Dictionary*, kompilata de Pete Benson en Usono, ankoraŭ ne estas finpreparita nek baldaŭ eldonota. La *Esperanta Bildvortaro* redaktita de Rüdiger Eichholz multe helpas trovi la nomojn de palpeblaj objektoj, sed malmultaj aŭstraliaj Esperantistoj ĝin posedas.

[3] "Interesuto" = Persono kiu estus interesita/interesata se oni senblage prezentus la karakteron, valoron, kaj celaron de Esperanto.

hebrean lingvon.[4]

Per ĉio ĉi mi nur celas diri ke la publiko rapide seniluziiĝas kiam ĝi ektrovas ke oni ne kvazaŭmirakle regas Esperanton post kelkaj semajnoj da ne tre vigla lernado.

(3) *Ni ofte erare proklamas ke Esperanto estas amase lernata en alia(j) lando(j).* Mi ŝatus vidi statistikojn kiuj subtenas tiun pretendon. Laŭ la ~overbo, "la herboj estas ĉiam pli ~rdaj en alies paŝtejo". Ke la nombro da Esperantistoj en Aŭstralio estas tre malgranda, tion neniu neas — maksimume kvincent. Sed, ekzemple, en Aŭstralio loĝas proksimume dek sep milionoj da homoj. En Ĉinio loĝas proksimume 1.143 miliardoj (laŭ artikolo en la aŭgusta 1991 numero de *El Popola Ĉinio*). Ĉu kelkmil aŭ eĉ kelkdek mil Esperantistoj en Ĉinio efektive pruvas ke Esperanto estas amase populara aŭ pli facile lernata en Ĉinio ol ĉi tie, kiel diras kelkaj el niaj entuziasmaj propagandantoj aŭstralianaj?

(4) *Niaj pretendoj pri la Esperanto-movado efektive ne imponas* kaj ofte ni malinteresas homojn kiuj eble volus scii pri Esperanto.

Iam usona Esperantisto skribis al la ~tro de Kodako petante ke ĝi reklamu en la plej legata gazeto Esperanta, t.e. *Esperanto* de UEA. La estro de Kodako demandis: "Kiom da legantoj havas tiu gazeto?" La respondo: "Proksimume 5000 abonantoj." "Karulo: via najbareja anglalingva ĵurnalo havas almenaŭ trioble pli!"

Ni ofte mencias niajn "prestiĝajn" gazetojn kaj kongresojn, kvazaŭ ili imponus en la okuloj de ne-Esperantistoj. En la historio de Esperanto ili — foje — estas imponaj al la okuloj de Esperantisto. Sed Esperanto aĝas pli ol 104 jarojn! Ĉu vere al la ĝenerala mondo imponas gazeto kun 50 paĝoj kaj koloraj bildoj, aŭ internacia kongreso kun 2400 partoprenantoj?...

(5) *La kvalito de niaj presaĵoj estas tre malalta.* Preseraroj abundas en Esperantaj eldonaĵoj multe pli ol en etnalingvaj. — Nur en Esperanto plejparte kompostas personoj kiuj ne komprenas la lingvon. Kaj ŝajne nur tre malofte korektas la presprovaĵojn Esperanton-komprenantoj. Ni ne tolerus ke kompostu la tutan anglalingvan literaturon personoj kiuj ne komprenas la anglan lingvon. Kompostado ne plu estas teknika arto necesiganta multekostajn maŝinegojn kaj jarojn da trejnado. Kiu talente tajpas, tiu povas perkomputile komposti libron. Sed ekster UEA, mi kredas, neniu Esperanto-organizo pagas dungitan tajpekspertan redaktoron/editoron.

Ĉu malgrave? Kiom da personoj forpelas malbone aspektantaj eldonaĵoj plenaj de preseraroj! Se legi ne estas plezurige, oni ja ne legas.

(6) *Esperanto ne plu estas lingvo-projekto, kaj eĉ ne plu artefarita lingvo.* Krome, nomi Esperanton "an artificial

[4]Jes, mi ja scias kion mi diras. Mi studis *Step by Step* por lerni Esperanton... kaj ankaŭ mi studis la unuan jaron da l'araba lingvo, dek jarojn da l'klasik-greka lingvo, sep jarojn da l'klasik-hebrea lingvo kaj mem verkis lernolibron pri la klasik-hebrea lingvo (eldonitan en 1963 de la Universitato de Melburno).

language" sonas tre malalloge. "Lingvo" estas sonsistemo per kiu oni komunikas kun alia persono. Same kiel ŝafoj ne pro hazardo ekzistas nun kun tute blanka kaj tuta nigra hararoj, sed estas zorge bredataj jam de dumil jaroj por efektivigi tion — tiel same Esperanto estas planita lingvo. Sed ĝi ja estas vera lingvo, same kiel blanklana ŝafo estas vera ŝafo.

Iam, antaŭ 104 jaroj, Esperanto ja estis artefarita. Ĝi ŝuldis sian karakteron kaj sian ekziston al unusola persono, kiu "arbitre" (t.e. sen ricevi konsilon de aliaj personoj) inventis ĝin. En januaro 1887 tiu persono (L.L. Zamenhof) rajtis laŭvole ŝanĝi eĉ radikale la strukturon de Esperanto. Sed ne plu, ĉar Esperanto ne plu estas projekto sed ekzistanta lingvo.

Nuntempe vi ne pli rajtas ŝanĝi Esperanton ol vi rajtas ŝanĝi la anglan lingvon. (Pri tio legu la pensigajn artikolojn de Marcel Leereveld.) Kiam oni diras ke Esperanto nuntempe estas "konstruita" lingvo kaj "artefarita", la publiko kredas ke ĝi estas arbitra elpensaĵo per kiu oni nuntempe rajtas ludi. En la komenco de 1887 Esperanto ja estis tia. En 1991 ĝi ne plu estas tia. Iel ni ne sukcesas komprenigi la publikon pri tio. Plu venas "lernantoj" kiuj supozas rajti proprarbitre ŝanĝi la lingvon.

Kion ni devas emfazi

Mi proponas ke por allogi seriozajn studontojn de Esperanto ni:

(1) Emfazu ke Esperanto estas funkcianta lingvo kun longa tradicio kaj bone establita kulturo mondampleksa.

(2) Emfazu ke Esperanto internaciigas la internan kulturon de la uzantoj, t.e. de la Esperantistoj mem.

(3) Emfazu ke kvankam la literaturo en Esperanto estas relative malgranda, ĝi tamen estas unike multkultura. Leganta Esperantisto ne povas eviti senpere renkonti kaj pripensi aliajn kulturojn.

Tio kontrastas kun tipa etnalingvano, kiu malofte legas verkojn el aliaj kulturoj ol la sia, kaj malofte havas oportunon legi aktualajn verkojn el aliaj kulturoj mem.

Anglalingvanoj ja povas legi pri Ĉinio, sed malofte aŭ neniam legas libron verkitan kaj eldonitan en Ĉinio mem do puran ĉinkulturaĵon. (Mi parolas nun ne pri politikaj propagandaĵoj sed pri kulturaj artverkoj.)

Ekzemplo de altkvalita kulturverko estas la Esperanto-traduko de la rimarkinde altkvalita romano *Kamelo Ŝjangzi* eldonita en 1989. Verŝajne elĉinaj tradukoj de tiu romano ekzistas en pluraj etnaj lingvoj, sed ilin ne renkontas ordinara etnalingva persono. Kiam vi lastfoje legis en la angla lingvo romanon verkitan originale en la ĉina lingvo? Kiam vi legis recenzon pri tia libro en viaurba ĵurnalo? Esperantoleganto ne povas eviti tiajn verkojn. Etnalingvano malofte eĉ konscias ke ili ekzistas.

Simile, kvankam ni multon aŭdas, pertelevide rigardas, kaj en ĵurnaloj legas pri USSR nuntempa, nur per Esperanto en la praktiko ni renkontas librojn kaj diskutojn verkatajn de Sovetianoj nuntempaj en USSR mem — do el la interno de la lando, ne de eksterlanda ekzamenanto. ➜

Denove: ni ne blagu ke tiaj verkoj ne ekzistas en la etnaj lingvoj — ili ja ekzistas. Sed nur Esperantisto pro sia uzado de Esperanto estas vole-nevole internaciisto nekapabla eviti tiajn verkojn.

(4) Ni emfazu ke *vere kapabla* parolanto de Esperanto povas bone, eĉ intime, renkonti kaj koni egale kapablajn personojn loĝantajn en aliaj kulturoj kaj senĝene konversacii aŭ respondi kun ili.

Sed ni devas emfazi du punktojn: ke temas pri *kapablaj parolantoj*, kaj ke oni bezonas *almenaŭ plenan jaron da universitatnivela studado de Esperanto* por atingi tiun kapablon.

Dirante tion, mi volas insisti ankaŭ pri io alia, kio ne plaĉas al la plej multaj legantoj de *TAE:* ke rajtas propagandi pri la karaktero de la lingvo nur personoj kiuj mem flue kaj kun malmultaj eraroj parolas Esperanton, do per propra sperto indas esti atentataj.

Se vi mem ne kapablas intime vin esprimi en Esperanto, kiel vi povas konvinki alian personon ke tio eblas? Kaj ke valoras?

Mi tute ne diras ke nebone parolantaj Esperantistoj havas neniun rolon en nia propagandado. Tute male. Sed ke ili pre devas forgesi praktiki la tradician maksimon "ne imitu kiel mi mem agas, plenumu kion mi predikas". Kiu estas idealisma, tiu estas tre havinda membro kaj kunlaboranto. Kapablaj Esperantistoj malofte havas ekstran tempon en kiu ili povas esti idealismaj. Sed ni distingu la du rolojn en propagandado — kiu mastras la lingvon, tiu parolu pri lernado de la lingvo; kiu estas idealoplena sed ne kapabla uzi Esperanton, tiu parolu pri la idealoj.

(5) Ni devas klare distingi inter verkoj/informiloj/bultenoj preparataj por pripropagandi Esperanton, kaj verkoj/gazetoj kc. preparataj por normala uzado de Esperanto.

Mi povas mencii ekzemplojn de kiel fari tion:

TEJO (Tutmonda Junulara Esperantista Organizo) eldonas *du* gazetojn. Unu, *Kontakto*, celas lernantojn, kaj ĝiaj artikoloj estas verkataj per "facila" lingvaĵo — t.e. uzanta ne-multajn vortojn. En la listo de la enhavo de ĉiu numero oni indikas la gradon de lingva malfacileco de ĉiu artikolo. La artikoloj en *Kontakto* estas tre kulturinformaj kaj ofte interesaj, do la lernanto ja havas legindajn artikolojn malgraŭ la simpligita lingvaĵo. Laŭ karaktero kaj aspekto ĝi tre taŭgas por junaj gimnazianoj kaj maturaj elementlernejanoj.

TEJO ankaŭ eldonas dumonatan gazeton *tejo-TUTMONDE* — multe malpli luksan, sed kun artikoloj por spertaj Esperantouzantoj. Ĝi plejparte celas la malpli junajn membrojn de TEJO. (Oni memoru ke membroj de TEJO povas esti ĝis-30-jaraĝaj.)

En Aŭstralio iom simila situacio ekzistas, neplanite. La regionaj bultenoj (*La Nigra Cigno, Telopeo, Tereno,* la nova *El Dormo*), la porjunulara *Luka Bulteno*, kaj la tre meritoplena kvaronjara *Your Esperanto Bulletin* enhavas relative simple verkitajn artikolojn kiuj bone taŭgas por lernantoj. Tial *La Aŭstralia Esperantisto* povas dediĉi sin al lingvonivelo celanta kompetentajn Esperantolegantojn, dum ĝia "anglalingva suplemento" celas servi kiel

propagandilo transdoninda al "interesutoj". La enhavo de *TAE* intencas esti ne nur lingve altnivela kaj interesa por Esperanto-legantoj sed aldone ankaŭ esti kvazaŭ-karoto antaŭ la azeno, logante al pli alta lingvonivelo kiu ja povas esti ia modelo imitinda kaj alstrebinda.

(5) Laste: En niaj propagandiloj ni devas prezenti, sen bezono blagi, "triumfojn" kaj valorojn de Esperanto kaj de la Esperanto-movado kiuj ne nur estas veraj, sed ankaŭ havas ian imponvaloron. Ili ja ekzistas, ni bezonas ilin nur elserĉi. Ekzemple, iam la apero en Esperanto de la libro de Thor Heyerdahl *Kon-Tiki* estis tre bona propagandilo — ne nur pro sia luksa aspekto, sed ĉar ĝi estis eldonita antaŭ ol aperis anglalingva traduko. Nuntempe originalaj informoj el USSR povas imponi, ĉar la ordinara "surstratulo" ne renkontas tion anglalingve. Morgaŭ, venontjare ... i alia estos pritrumpetinda.

SUR LA SPUROJ DE ERNEST MAGUIRE

Ni sukcesis trovi kelkajn informetojn pri nia mistera biciklisto. Ray Ross atentigas ke sur paĝo 27 de *Esperanto en Aŭstralio* estas dirite rilate al 1928:

"Vizitis al [Brisbana Esperanto-Societo] ... Ernest Maguire (biciklisto kiu rajdis el Perto),..."

Ray informas ke ankaŭ en *Historio de la Brisbana Societo* aperas, ĉe la jaro 1928: "Interesa vizitanto dum la jaro estis Ernest Maguire, kiu veturas ĉirkaŭ la mondo per biciklo".

Letero de Ernest Maguire, el Mackay, 18/4/28, al Elizabeth Carrick, Sekretariino de la Brisbana Esperanto Societo, estas konservata. La letero tekstas:

"Alvenis ĉi tiun urbon antaŭ unu semajno, konatiĝis kun la Sekretario de la Radio Klubo kiu tre interesiĝas pri nia afero. Sekvate de tio mi donis paroladon antaŭ la ĉeestantaro de la Radio Klubo la proksiman kunvenon.

"Post la parolado mi montris ekzemplojn facilajn per nigra tabulo. Pluposte S-ro Cole ano de Radio Klubo favore parolis pri Esperanto, fine petante ke iu voĉdonu ke la lingvo estu akceptata kaj grupo starigata. Tion konfirmis S-ro Finnegan, kaj akceptita de S-ro Chivers, ĉiuj anoj konsentis. Enfermata trovu gazetartikolon kaj mi petas, se vi havus la tempon liberan, skribu al S-ro Milne — Milrose Motors (Secretary Radio Club) Mackaj). Morgaŭ mi forlasos Mackay kaj intencas resti ĉe Bowen, aŭdinte ke S-ino Kent scipovas la lingvon." [Mi esperas ke mi ĝuste deĉifris la skribon. La eraroj estas en la originalo. — Red.]

Ĵurnalpeceto, sen indiko pri la datc inkludita en la letero anoncas "A lecture on Esperanto will be given in Milrose Motories' old premises, Brisbane-street, at 8 o'clock to-night, Tuesday, under the auspices of the Mackay Radio Club. All interested are invited to attend.

Mr ERNEST MAGUIRE,
Lecturer.
A.B. MILNE,
Secretary."

28-a AŬSTRALIA KAJ 57-a NOV-ZELANDA ESPERANTO-KONGRESO

Kongresa Temo

raportas RALPH HARRY

Je la sugesto de Margaret Chaldecott, oni decidis, ke la temo de nia venonta kongreso estos: *Ekologio — La alia verda movado.*

La programo antaŭvidas prelegojn kongrestemajn vendredon la 17-an de januaro, matene, kaj invititajn parolantojn posttagmeze, je la 1400-a, inter ili eble ankaŭ paroladoj pri la temo.

La temo estas multaspekta. La Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj, kiu okazos en Brazilo en Julio 1991, pri *La Medio kaj Disvolviĝo*, havos sep sektorojn:

(1) Protektado de la atmosfero, konservado de la ozontavolo, prevento de la varmdoma efekto, translima aerpoluado (acida pluvo, radioaktiveco)

(2) Protektado de la kvalito kaj fontoj de pura dolĉa akvo

(3) Protektado de la oceanoj kaj marbordoj kontraŭ poluado el riveroj kaj pro forĵetaĵoj el ŝipoj; protektado de la animalspecioj en la maro

(4) Protektado kaj administrado de grundriĉaĵoj, dezertigo, konservado de arbaroj, konservado de la diverseco de specioj — insektoj, bestoj, birdoj, plantoj — saligo de grundo kaj akvo

(5) Administrado de bioteknologio (genetika manipulado) en maniero taŭga por la medio

(6) Administrado de rubaĵo, precipe danĝera rubo, reuzado de materialoj

(7) Protektado de aliaj kondiĉoj por homa sano, loĝado, kaj labormedio. Kresko de la tutmondaj loĝantaro-problemoj.

Mi kredas, ke Esperanto povas helpi sur ĉiuj tiuj kampoj. Ĝi povas:

- Ebligi al la popoloj lerni, ekzemple per *Monato,* pri la diversaj aspektoj de la minaco al la medio, kaj pri la neceso de solidareco por forigi la minacon
- Ebligi al la popoloj informiĝi pri la pasinta kaj nuna agado de registaroj kaj ne-registaraj organizoj, naciaj kaj internaciaj
- Ebligi al Esperantistoj en Aŭstralio kaj Nov-Zelando informi Esperantistojn en aliaj landoj pri problemoj kaj atingoj
- Helpi al internaciaj ne-registaraj organizoj informi la publikon pri decidoj, interkonsentoj ktp. Ekzemple ni povus disvastigi la tekston de la proponata *Tutmonda Ĉarto pri la Medio.*

Se iu paroprenonto en la Kongreso ŝatus prepari sin por la diskutado mi akiris materialojn el *Monato*, Unuiĝintaj Nacioj, la Aŭstralia Registaro, kaj aliaj fontoj. Skribu al mi, indikante la parton aŭ sektoron pri kiu vi ŝatus informiĝi:

Ralph Harry, 319 Bayview Gardens, 36-42 Cabbage Tree Road, Bayview NSW 2104, Aŭstralio.

❑

RECENZOJ

Anatomia Nomenklaturo
priverkas RALPH HARRY

Anatomia Nomenklaturo, de Huang Ying, Li Kexi kaj André Albault. Ĉina Esperanto-Eldonejo, Beijing, 1989. 697p.

La Biblioteko de AEA ricevis, donace de D-ro Somogyi de Okcident-Aŭstralio, ekzempleron de ĉi tiu rimarkinda terminaro, kiu donas la anatomian nomenklaturon en la latina, angla, franca, esperanta kaj ĉina lingvoj. Ĝi estas valora aldono al niaj terminaroj. Ĝis nun ni posedis, sur la medicina kampo, nur *Esperanta Teknika Medicina Vortaro* verkitan de Maurice Briquet kaj eldonitan de *Internacia Medicina Revuo* en Bruselo en 1932.

Mi ne kompetentas prijuĝi la teknikan enhavon de la terminaro. Ĝi estas bazita sur la kvina eldono de *Nomina Anatomica*, kaj Li Kexi instruas Latinon kaj Esperanton. Huang Ying estas Direktoro kaj Profesoro de la Laboratorio de Anatomio en la Dua Milita Medicina Universitato de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. D-ro Albault estas fame konata oftalmologo kaj prezidanto de la Akademio de Esperanto. Do, oni povas fidi al la latina, ĉina, esperanta kaj franca tekstoj. Estas bona indekso en ĉiu lingvo.

Mia nura dubo estas pri la kvalito de la angla terminaro, ĉar la angla teksto de la antaŭparolo, kaj de la enkonduko, estas en malpli ol perfekta traduko..."with the entries contrasted each"..."It will be also good for the collection by a library"..."This is the good wish and yearning of mankind"... "extracted principally from Latin, with loans [!] from German...a language rich and with delicate senses"..."Mr. Li had already proposed new undertakings from Latin"..."We should conquer" [? "we had to overcome"]..."not confusible in the international language"...ktp. Estas ankaŭ kelkaj preseraroj en tiu rubrikoj. Eble la terminoj estas pli bonaj.

Mi esperas, ke specialistaj kuracistoj kaj anatomoj atentigos la aŭtorojn kaj la eldoniston pri preseraroj kaj, se ili ekzistas, teknikaj eraroj. Dumtempe la esperanta komunumo estu dankema, ke niaj ĉinaj amikoj faras tiel bonan laboron sur la terminara kampo. ❑

Kiu Posedas Danion?
recenzas Marcel Leereveld

Kiu Posedas Danion? de Lennart Weber, tr. Betty Larsen. Kopenhago: Dana Lab. Esp.-Asocio, 1989. 46p. Prezo: 20 danaj kronoj (=proks. $A4). Mendu de Dana LEA, Edvard Griegs Gade 18, DK-2100 Kopenhago, Danio.

La nuna tempo estas laŭdata pri la granda kvanto da informaĵoj ade enpumpataj en nin de la diversaj informaĵ-dissendistoj: gazetoj, ĵurnaloj, radiofonio, televido. Oni parolas pri "informaĵ-abundo", kiun oni anstataŭe povus nomi "informaĵinundo". Tamen estas tri kazoj de manko de tiu inundo: 1ª: ne la ricevantoj, sed la liverantoj de la informaĵoj decidas kiujn (tamen multajn) elekti por ni el la grandega

ESPERANTO HELPS SOLVE GLOBAL PROBLEMS

AUSTRALIAN CONFERENCE ON THE ENVIRONMENT

reported by RALPH HARRY

Six Australian Esperantists, from Canberra, Melbourne, Perth and Sydney, participated in the Conference "Global Solutions for Global Problems" organised by the United Nations Association of Australia and held in Canberra 13-15 September 1991.

The Conference dealt with Conflict Resolution, Peacekeeping, Status of Women, the Environment, and Human Rights. Speakers included Richard Walsh, Chairman of the Australian Commission for UNESCO, the Hon. Barry Jones, Senator Robert Hill (opposition spokesman on Foreign Affairs), Hon. Fred Chaney (opposition spokesman on the environment) and officials of the Department of Foreign Affairs and Trade and other government bodies.

The Australian Esperanto Association has, in recent months, drawn attention through *Unity*, the magazine of UNAA, to the role of Esperanto in international communication. Letters, an information column and a translation from *Monato*, the monthly news magazine, have been published. There was, as a result, much interest at the Conference in the evolution of Esperanto, its present capacity for travel and contacts, its potential for international law, its culture and the place of women in the Esperanto movement.

The role of Esperanto came to particular attention in the seminar on the environment, which reviewed steps to prepare an Australian report to the World Summit on the environment and development to be held in Rio de Janeiro in June 1992.

Dr Peter Ellyard, former Director of the Australian Commission for the Future and currently chairman of the Commission for the United Nations Environment Program in Australia gave one of the keynote addresses. He stressed the need for less talk of problems and more emphasis on a positive program for the attainment of a world society in which air, water and land have been restored to good condition and resources are used on a clean and sustainable basis. The achievement of such a program, he said, required the best possible communication between governments, nongovernmental organisations and individuals in all countries. In this the international language, Esperanto, could play an important part.

Dr Ralph Harry, former Australian Ambassador to the United Nations, agreed with Dr Ellyard. He stressed the need for all peoples to understand the need for cooperation in

keeping the home of humanity clean. He recalled the efforts made through the Convention on the Law of the Sea, which he had helped to negotiate, to preserve the marine environment, to protect rare marine mammals and to ensure sustainable fisheries. He stressed the need for a common approach to nonrenewable resources like petroleum and minerals. Esperanto had been a useful medium for informing members of the global village and could play a part in negotiation of treaties and preparation of texts with agreed interpretation.

A number of organisations offered to provide information to be translated into Esperanto for international dissemination and for participants in the Congress of the Australian and New Zealand Esperanto Associations in Sydney in January 1992. ❑

INTERNATIONAL ESPERANTO CONGRESS IN NORWAY 1991

reported by IDYSS EINIHOVICI

Some 2300 Esperantists from 60 nations took part in the 76th International Congress in Bergen, Norway, the land of fjords and charming landscapes, a country known for its rich historical traditions and culture.

One of the most famous buildings in Bergen is the Grieg Concert Hall dedicated to the composer. Congress members were fortunate and proud to attend the eight day congress in this hall in a joyous atmosphere. The tone was imposing, solemn, there was a heart-felt feeling of being one big family. Spontaneous embraces and kisses were a true emotional experience. Although the concert hall was packed, the congress began with dignity and joy. In the air there was to be heard the sound of hope as the voices of the representatives of the many national associations were heard as they brought greetings and good wishes for almost two hours. Our representative, Justice Kep Enderby, spoke for Australia.

I met many Australian Esperantists at the congress, including our President, Kep Enderby, and his charming wife Dorothy, who embraced and kissed me. I quite forgot the long, tedious air trip to get there and my mood was transformed. There was something magic in the air and all of the unpleasantnesses of travel abruptly disappeared. All the members contributed to our joyful meeting.

After studying carefully the congress program I was delighted with the choice of topics and lectures. There were many lectures taking place at the same time, and it was difficult to decide which to attend. They were held in various rooms located quite distant from one another. Since the program was bountiful and rich, a lot of time was needed to reach the various halls.

The largest group came from Poland, 350 of them, staying in a vast dormitory. I visited them and admired their enthusiasm. They slept on the floor, side by side in difficult conditions but happy to take part in the congress. They all laughed and joked about the conditions. In my first class hotel I heard no laughter. The Polish Esperantists had travelled for days and nights in difficult conditions but had triumphantly reached their destination. The Poles' experiences certainly gave inspiration to many of us.

The lectures and entertainment evenings were very pleasurable and instructive. Ibsen's *The Dolls' House* was beautifully presented in Esperanto by professional actors. The international choir of 200 voices from many nations made a deep impression on the audience.

Twice I visited the children's congress and was charmed by the children who had been speaking Esperanto since birth. There were 42 children aged 6-14. I brought them gifts from Australia, with a kangaroo and koala, and greetings taped for them by a school in Darlington WA. I was promised a tape of the children's congress, and look forward to receiving it. The children put on a special program for the congress members and it was a joy to hear the voices from so many distant countries as they spoke Esperanto while playing together. Among the children was six year old Tali. She had come from Israel with her parents. When I asked her how long she had been learning Esperanto she held up six fingers. She was a charming girl. She gave me drawings which I have donated to Don Hughes' class in Darlington WA.

During a meeting of patrons of TEJO (World Esperantist Youth Organisation) I spoke of the foundation which I had set up. They were very pleased. I promised that an Australian representative would take part in the TEJO congress in Montreal next year.

On the way back home I visited a student of mine from last year, Veni, who now plans to teach Esperanto in Singapore. It was a pleasure for me to join the Esperanto group there.

The Bergen congress inspired me so much that I am already preparing to take part in next year's 77th International Esperanto Congress in Vienna.

(Translated from *La Nigra Cigno* October 1991, Perth.) ❑

WINDOW ON THE WORLD

China: A new videotape titled *Ĉina Masaĝo* — traditional therapeutic Chinese massage is available from the Chinese monthly magazine *El Popola Ĉinio* @ US$80. It is reputed to be of value in the treatment of dislocated joints, twisted neck, nervous headache, colds, vomiting, bone ailments and other internal illnesses. Orders may be sent to Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Box 77, Beijing, China.

The Fifth Pacific Congress of Esperanto is to be held in Qingdao, China, 17-22 August 1992, at the Huanghai Hotel. Its theme will b "Collaboration and Progress in the Pacific Region". The mayor o Qingdao, a city of six million people, has formally invited the Congress. Qingdao is 5000 years old and located close to Qufu, the home of Confucius and listed by UNESCO in the World Heritage series. Numerous excursions are scheduled before and after the Congress. Details will be available from the Libroservo of the Australian Esperanto-Association.

Korea: The Korean Esperanto Association has formally invited the 79th Universal Esperanto Congress to Seoul in 1994.

The "Universal Language": According to an article in the Queensland Esperanto bulletin *Tereno*, two asteroids have officially been named Esperanto and Zamenhof respectively. (Dr L.L. Zamenhof was the creator of Esperanto in 1887.)

[Perhaps the mayor of Alpha Centauri will invite the 1995 Universal Esperanto Congress to an asteroid in his system? — ed.]

U.S.A.: An intensive summer Esperanto course was held 12-17 August at the University of Hartford,Ct, taught by Prof. John Wells, of the University of London, Prof. William Orr, of Hofstra University (N.Y.), and Dr Humphrey Tonkin, president of the University of Hartford.

An Esperantist co-operative titled the "Esperanto Oasis" has been incorporated in — you guessed it — California, headed by the one-time mayor of Garden Grove CA. The intention is to make the oasis (8 hectares, 222 km north-east of Los Angeles) an international educational and cultural centre.

amaso da informaĵoj havebla; 2ª: en la diktatorecaj landoj, kiuj ja formas la plimulton, la informado estas eĉ tre unuflanka, kaj sufiĉa "informaĵlibereco" tie grave man-kas; 3ª: la ĝenerala publiko, eĉ en niaj t.n. demokrataj landoj, tre malmulte ricevas informojn pri la privataj agado, riĉego kaj potenco ekonomia (kaj tial ankaŭ politika) de la "kapitalistegoj", la posedantoj de grandaj konzernoj kaj, kvankam malpli potencaj, la direktoroj de financaj kompanioj. Pro tiu manko de informado la socio malhavas la demokratian kritikpovon kiun ĝi havas pri ĉiuj aliaj partoj de la socia vivo, kiel pri politikistoj, registaroj, kaj la konzernoj mem.

La ĉi tie recenzata libro malgranda klare, detale kaj ne partiopolitike informas nin pri tiuj kapitalpotenculoj en Danio, pri iliaj privataj kaj aktivaj kapitaloj, kaj pri iliaj respektivaj influoj en la diversaj kompanioj. Sendube simila libro ekzistas pri Aŭstralio, sed ni ĝenerale ne aŭdas multe pri la afero. Kaj ĝi certe ankoraŭ ne ekzistas en Esperanto.

Kontraŭe al la utila kaj objektiva informemo de ĉi tiu libro, precipe por danoj (kiuj cetere povas legi ĝin en la dana) kaj por alilandanoj kiuj deziras ekhavi ideojn por samspeca libro por la siaj, la lingvo uzata havas tro da eraroj por legi ĝin kun plezuro. En la plejmulto de la kazoj la signifo estas tamen klara: do se al vi gravas nur la enhavo kaj ne la multaj eraroj, legu ĝin.

La libro konsistas el la ĉefparto de la verkinto (kun multaj listoj), de marksismema antaŭparolo (ne indikita kiel tio) de Helge Andersen, kaj de "Antaŭvorto" de la tradukinto. Kvankam nur unu tradukisto estas menciita, la dupaĝa antaŭparolo de Andersen havas almenaŭ duoble pli da (plejparte gramatikaj) eraroj ol la ĉefverko, dum en la unupaĝa enkonduko de la tradukinto estas nur unu-du eraroj. Tre stranga fenomeno: apenaŭ du eraroj (krom kelkaj enhavostrangaĵoj) en la enkonduko de la tradukisto, multaj eraroj en la traduko de la libro, kaj multegaj eraroj en la traduko de la antaŭparolo.

La libro estas tre utila se vi bezonas erarekzercaĵojn por viaj lecionaranoj, sed preskaŭ tute mankas nenecesaj neologismoj. ❑

Ĉernobil
recenzas Donald Broadribb

Ĉernobil, de Jurij Ŝĉerbak. Tr. Elena Ŝevĉenko kaj Aleksej Ĵuravljov, red. Aleksandr Ŝevĉenko kaj Dmitrij Perevalov. Moskvo: Eldonejo Progreso, 1990. 398p., broŝurita. Prezo ne indikita. Speciale mendenda.

Timiga dokumentaro kompilita kaj prikomentita de kuracisto/romanisto.

La aŭtoro karakterizas sian verkon kiel "dokumentan novelon" — kvankam ne estas klare kiu parto estas la "novelo"; sed la aŭtoro ŝajne celas indiki per tiu vorto ke temas pri historia studo kaj ne fikcio, iom stranga uzo de la vorto.

Se okcidentanoj ankoraŭ ne komprenas kial kaj kiel la Sovetia popolaro povis sin turni tiel radikale kaj sovaĝe kontraŭ la estintan burokrataron kaj Komunistan Partion, kaj kial la individuaj respublikoj postulas sendependecon, ĉi tiu libro tre bone helpas la komprenon.

En 1983 oni ekfunkciigis kvar

nuklereaktorojn ĉe Ĉernobil, por produkti elektrenergion. Pluraj sciencistoj sciis kaj avertis ke pro la manko de adekvata scienca scio eksplodo estos neevitabla, kvankam ne eblis aŭguri kiam, ĉu post semajnoj, ĉu post jardekoj. La 26an de aprilo 1986 reaktoro numero 4 eksplodis.

Ĉernobil estis katastrofo kun amaso da kaŭzoj. Difektita konstruado de la nukleaj reaktoroj, manko de elprovoj, malsaĝe planita kaj senrespondece plenumita eksperimento, decidoj faritaj de burokratoj tute sen scienca scio kaj sen konsiloj de sciencistoj, funkcigantoj de la reaktoro sen kompreno pri la naturo kaj strukturo de la reaktoro, burokrata komplikaĵaro kiu necesigis tagojn por ke decido estu farebla kiun necesis fari jam dum nur kelkaj sekundoj, koruptaj Partioficialuloj ... Senfinas la listo.

La libro konsistas el amaso da intervjuoj kun personoj rilatintaj al la reaktoreksplodo. Pluraj el ili jam mortis kaj tiuj intervjuoj estas la solaj objektivaj dokumentoj el kiuj eblas fari konkludojn. Unu bravulo kompilis taglibron en kiu li notis ĉiun eventon dum ĝi okazis.

Neniu sola kaŭzo de la katastrofo ekzistas. Precize kio okazis estas necerta. Raportoj de la ĉeestintoj kaj partoprenintoj kontraŭas unuj la aliajn. Sed solide fundamentitaj estas kelkaj konkludoj: ke pluraj personoj sciis ke la reaktoroj ĉe Ĉernobil estis danĝeraj kaj tion raportis al la oficialularo en Moskvo, sed tiu oficialularo rifuzis kredi. Ja la konstruistoj certigis al ili ke la reaktoroj estis plene sendanĝeraj negrave kia akcidento okazus.

La redaktoro de regiona ĵurnalo, juna virino kun stabo de du raportistinoj, priverkis la fifuŝkonstruadon dum oni konstruis la reaktorojn ĉe Ĉernobil, sed eldoni la raportojn la loka estraro ne permesis...

Ĉu nova eksplodo povus okazi, ĉe la aliaj tri reaktoroj en Ĉernobil, ĉe aliaj reaktoroj en USSR, ĉe reaktoroj en aliaj landoj? La sciencistoj konsultitaj de la aŭtoro diras ke jes.

Kvankam ĉi tiu libro estis eldonit[illegible] antaŭ pli ol unu jaro, la aŭtoro jam tiam timis ĉar la reaktorojn direktas ne sciencularo de Ukrainio, kie situas la reaktoroj de Ĉernobil kaj multaj aliaj, sed burokratoj en Moskvo. Nun post la diseriĝo de USSR, ni rajtas demandi al ni, ĉu nun efektive ekzistas personoj kiuj respondecas pri la sendanĝerigo de la reaktoroj.

La aŭtoro limigas sian kritikadon al la socio de USSR kaj la tiea misagado. Sed multo dirita de li egale valoras por aliaj landoj. Kiel socihistoria dokumentego, ĉi tiu libro tre valoras.

Eble estas dezirinde aldoni kelkajn komentojn pri la karaktero de la traduko. Enestas multaj preseraroj, kaj ĝi ne estas lingvuze laŭdinda. Min krome ĝenis la ofta uzado de "ĝis" kun la signifo "antaŭ" kiu ofte cerbumigas la leganton. Eble mi ne rajtas malaprobi la nuntempe tre disvastigitan uzon de la verbo "dividi" kun la senco "partopreni", stranga idiotismo ne specife rusa. Adverbo modifanta substantivon estas neĝusta, ekz. la tre ofta frazo "Tio estis bone". Kaj min plurfoje mirigis ke oni uzas "hejtaĵon" por funkciigi helikopterojn kc., malfeliĉa klopodo esprimi la sencon de la anglalingva vorto "fuel". ❑

FELIĈAJ MEMOROJ

de Eddie Hearne

Maljuneco havas siajn malfacilaĵojn, tamen, se oni rigardas al la estinto, ni povas revivi multajn feliĉajn spertojn.

Frue en 1964 kun mia edzino Vena mi iris al Britio. Naskite en Skotlando, mi iris al Kvinslando en 1910 kiam mi estis jara. Ofte mi pensis ke estus mirinda ferio se mi irus kun Vena al la lando de mia naskiĝo. Nun venas la oportuno.

Laŭ multaj homoj ni estis maljunuloj, je 63 kaj 64. Tamen ni estis aktivaj arbarmarŝantoj dum la plejparto de niaj vivoj.

En Britio ni kutime uzis "Porjunulajn Gastejojn" dum niaj vagoj. Junio trovis nin antaŭ tre impona konstruaĵo, Auchenennan Kastelo. Tri-etaĝa, kun belaj turetoj. La enirejo estis proktektata de bele skulptita arkaĵo kaj kontraŭe estis fonto kun granda kupra aglo. Ĉirkaŭe estis malalta ŝtona muro kun skulptitaj ornamaĵoj ĉiujn dek metrojn.

Ni eniris kaj aranĝis ke ni restu tiun nokton. Poste ni grimpis imponan ŝtuparon al la porvirina etaĝo. Mi pluiris al la porvira etaĝo, la dua, kaj eniris la mejon kie mi elektis unu el la litoj. Ĝi havis kelkajn lankovrilojn kaj kapkusenon. Mi eltiris mian propran katunan dormsakon. Ĝi havis lokon por enmeti la kapkusenon kaj etendaĵon por kovri la lankovrilon, tre simpla kaj higiena.

Interne estis balkono ĉe la unua etaĝo. Ĉe nia, dua, etaĝo, estis rondaj malfermaĵoj kaj mi povis rigardi la tre imponan vidaĵon. Aperta de la fundo ĝis la bela plafono, la aspekto de la ĉefa salono estis inspira. Kontraŭ mi, ĉe la muro, mi vidis kelkajn inajn statuojn. Ĉe unu fino estis impona skribaĵo "Paco estu kun ĉiuj, kiuj sub ĉi tiu tegmento restas".

Post simpla manĝo ni sidis en la "komuna" ĉambro kie mi skribis kaj elektis kion fari la proksiman tagon. Ekstere, kaj for je nelonga distanco, estis Lago Lomond. Iom maldekstre, Ben Lomond klare elstaris. Mi tre deziris grimpi ĝin la sekvontan tagon. Eĉ je la deka horo estis klarlume.

Frue en la mateno mi eliris al la banejo, nur malvarma akvo por mi sed tio ne estis ĝeno. La virinoj havis varman akvon. Mi ĵus atingis la kuirejon kiam Vena venis. Ni ĉiam preparis niajn proprajn matenmanĝojn en la komunaj kuirejoj. Tie estis gas-hejtiloj kaj kuriloj. Kiel kutime ni estis la unuaj elirantoj kaj ĝuis pacon antaŭ ol la junuloj alvenis.

Iom nevolonte, ni lasis tiun belan konstruaĵon kaj marŝis unu mejlon por trafi buson. Ĝi iris laŭ la bordo de Lago Lomond al Loss. Defie, ni devis marŝi 3 1/2 mejlojn al loko kie malgranda pramo povos transirigi nin al Rowendennan Gastejo. Ni lasis la buson je 9.30. La foriro de la pramo estas je 10.20 kaj mi iom dubis, sed ni marŝis kiel eble plej rapide kaj finfine rimarkis, tra la arboj, motorboaton. La gvidisto vidis nin kaj atendis. Do, kun plenaj pakaĵoj ni marŝis la 3 1/2 mejlojn en 55 minutoj. Ni ja estis sanegaj. La boatisto bonvenigis nin, liajn nurajn pasaĝerojn.

Ĉe la nova gastejo ni lasis la plej-

multon de niaj pakaĵoj. Mi surportis la pakaĵon de Vena kun tagmez-manĝo kaj pluv-kovriloj. Ni komencis grimpi la ne tre krutan vojeton. Duonvoje, ni renkontis nekonatan homon kaj salutis lin. Li balbutis: "Zorgu, estas danĝera ŝafo tie". Ni aspektis solenvizaĝaj kaj dankis lin, poste ni povis ridi. Dum ni marŝadis tra Britio ni renkontis 3-4 similajn homojn. Venis la tempo kiam ni povis vidi ĝis la supro. Sed Vena laciĝis. Antaŭ kelkaj jaroj mi preskaŭ perdis Venan. Pro malbona ulcero, oni devis fortranĉi la plejgrandan parton de ŝia stomako. Nun ŝi estis tute sana, tamen ofte perdis energion. Kontraŭ tio mi ĉiam portis Kitkats kaj fruktonuksoĉokoladon. Post kvaronhora ripozo Vena saltis al siaj piedoj kaj mi sekvis ŝin, kantante, inter ekspiroj, "By yon bonnie banks and by yon bonnie braes, where the sun shines bright on Loch Lomond". Ni estis feliĉaj kiel veraj junuloj.

Finfine ni atingis la supron kie ni trovis belan pejzaĝon ĉie. Kelkaj aliaj lagoj; unu, "Lago Long", estis tre proksima al Lomond. Oni diras ke la vikingoj trenis siajn boatojn al Lomond por ataki la ĉirkaŭajn loĝantojn. Ma varma vento blovis kaj, post fot grafado, ni malsupreniris iom al gran roko kiu ŝirmis nin. Kun la roko ĉe ni dorsoj, kaj tuko sur niaj kruroj, mi eltir nian termoson. Ĉiam, en la mateno, n plenigis ĝin per bolanta akvo kaj trov ke ĝi faras bonan teon.

Ĉe niaj piedoj la deklivo falis al lago kaj nia gastejo estis tre eta ĉe rando. Kiom ni ĝuis tiun tagmanĝon Dum tio, du nuboj venis kaj nin traf mallonga falo de "sagua" neĝo. Ni esti bone kovritaj kaj ŝirmataj de la roko, d la falo ne ĝenis nin.

Ben Lomond ne estas tre kruta laŭ l altaĵrando kie ni grimpis kaj ni esti kontentaj iri malrapide al la Rowen dennan Gastejo, tute kontentaj pri l tago.

Ni ĝuis vespermanĝon kun rigardo al la tre apuda lago Lomond. Sentante min iom varma, mi malfermis fenestron apud ni, sed la nekonata viro venis dekontraŭe kaj fermis ĝin ion murmurante. Ni diris nenion sed ridetis.

Ni ofte diris dum niaj vagoj: "Kiel bonŝancaj ni estas". ❑

FAVORPREZA FLUGO AL LA UK EN VIENO 1992

Lufthansa akceptis doni tre favoran flugprezon por grupo da partoprenontoj en la Universala Kongreso en Vieno, Julio 1992. La prezo el Brisbano, Sidnejo, Melburno, kaj Adelajdo estos $2390 por ir-reven-bileto por persono en grupo ironta al la Kongreso. Speciala aranĝo kun Qantas ebligos ankaŭ favoran prezon por flugontoj el Perto kaj Hobarto. Se la grupo konsistos el almenaŭ 20 personoj, senpaga bileto haveblos por la grupgvidanto. Post la Kongreso, flugo al Londono aŭ pluraj aliaj eŭropaj adresoj estos havebla sen ekstra pago. Kiu interesiĝas pri la speciale favora flugprezo, tiu bonvolu kontakti la sekretarion de AEA. Espereble estos ankaŭ oportuno dum la AEA-NZEA kongreso en januaro diskuti la formiĝon de grupo. ❑

KIU DIRIS TION?

CITAĴKVIZO 7

kompilita de RALPH HARRY

Jen kelkaj eminentuloj, kiuj diris ion pri regnoj kaj respublikoj, reĝoj kaj prezidentoj. Penu parigi la personon kun la citaĵo. La solvo aperas sur paĝo 27.

(a) Dante Alighieri
(b) D.W. Brogan
(c) Edmund Burke
Sir William Blackstone
(d) Reĝino Elizabeta la Unua
(e) Bertrand de Jouvenal
(f) Napoleono la Unua
(g) Thomas Jones
(ĝ) Georgo la Kvina de Anglio
(h) H.S. Truman, Prezidento de Usono
(ĥ) Jonathan Swift
(i) Sofoklo
(j) L.L. Zamenhof
(ĵ) Thomas Paine

1. Nia ŝtata ŝipo, al kiu pasintaj ŝtormoj minacis detruon, fine alvenis sekure al la haveno.

2. Princo, la momenton kiam li estas kronita, estas malavara, kuraĝa, justa kaj saĝa, kaj tia restas ĝis sia morto.

3. Mi havas la korpon de malforta kaj febla virino, sed mi havas la koron kaj stomakon de reĝo.

4. La homa familio pli proksimiĝas al Dio se ĝin regas unu princo.

5. Malnovaj institucioj same kiel malnovaj botoj estas pli komfortaj ol novaj.

6. La angla monarko havas povon esprimi kaj reprezenti la nacian emocion, kiu estas eble super racia klarigo.

7. Por ke ia regno estu forta estas necese, ke ĉiu regnano sciu, ke li neniam dependas de la kapricoj de tiu aŭ alia persono.

8. Hereda reganto estas same malkonsekvenca kiel hereda aŭtoro.

9. Monarkioj, kvankam egoistaj laŭ naturo, akiras socian karakteron; demokratioj, kvankam sociaj laŭ naturo, stimulas memservadon.

10. Konante la malfacilaĵojn de limigita monarko, mi dankas al la Ĉielo, ke mi ne estas monarko kun absoluta povo.

11. La monarkio estas iluzio kiu bone funkcias.

12. Kiam oni diras, ke la reĝo estas bonulo, lia regperiodo estas malsukceso.

13. Esti Prezidento similas rajdi tigron. Oni devas daŭre rajdi aŭ oni estos glutita.

14. Ke la reĝo ne povas malbone fari estas necesa kaj fundamenta principo de la angla konstitucio.

Retrokomente

Parolas N. P. STEPANOV (MOSKVO)

Reage al la artikolo de Bernard Golden*: "Ĉu Zamenhof estis pola kuracisto"* (TAE *Nº 366, Marto-Aprilo 1991).*

Laŭ mi, en la demando pravas kaj Cresswell kaj Hartley, kaj Wells, kaj A.A. Saĥarov (aŭtoro de *La Tuta Esperanto*) kaj P.G. Forster, kaj eĉ — parte — Bernard Golden mem. Certe, kaj sendube, L. Zamenhof estis judo laŭ naskiĝo, tamen lia naskiĝloko estis Pollando (do pro tio oni povas lin nomi polo), kiu tiam estis parto de la konsisto de Rusio, aŭ la Rusia Imperio (do li ankaŭ estis rusiano). La plej taŭga maniero, ekzemple, kiam mi rakontas pri lia deveno en diversaj aŭditorioj, estas nome tiu supremenciita. Tamen (mi ne scias, kiel oni kutime faras en aliaj kulturoj) en nia (rusa, ruslanda) kulturo estas maldece marki/nomi/signi ies profesion laŭ lia/ŝia genta deveno. Kutime, kaj tute konvene, en nia kulturo estas signi la profesion de iu homo laŭ ties loĝ- aŭ laborloko. Do, en niaj kondiĉoj, mi preferas signi L. Zamenhof-on kiel "varsovia okulisto" aŭ "varsovia kuracisto" ĉar li ja vivis kaj praktikis ĉefe en Varsovio. Pro tio, laŭ mi, tute pravas kaj Cresswell & Hartley, kaj Wells, k.a., kiam ili nomas lin "pola okulisto", ne detalante pri lia preciza loĝloko, aŭ eble kunigante lian nask- kaj loĝlokon. A.A. Saĥarov speciale klarigis, pro kio li nomis lin "rusa doktoro" — unue pro tio, ke tio estas por eksterlandanoj, kiuj kutime ne diferencigas diversajn popolojn en nia lando (tiam: Ruslando) kaj kutime nomas ĉiujn per komuna termino "rusoj". Ankaŭ same li faris en ruslingvaj artikoloj: unue pro tio, ke lia plej ŝatata ideo estis disvastigi la lingvon tra la tuta lando kaj por tio li volis uzi tutnacian fieron pri la fakto, ke tiu ĉi grava kreitaĵo — Lingvo Internacia Esperanto — ja estis kreita en *nia* lando — Rusio, Ruslando, kio en antaŭrevolucia Rusio estis grava faktoro por subteno de ĉiuj movadoj, kreitaĵoj, inventaĵoj. Kaj sendube la adjektivon "rusa" li uzis anstataŭ pli ĝustan "rusiano" (ruse: *rosijanin*). Krome, mi ne estas tiom klera en ekleziaj temoj, ŝajnas, ke kaj L. Zamenhof kaj lia patro M. Zamenhof estis t.n. *kreŝ-ĉjonyje jevrej* ("baptitaj judoj"), t.e. baptita en ortodoksan eklezion, kaj tiujn ĉi judojn oni (ĉu oficiale?) kalkulis kiel rusojn. Mi ripetas, ke pri tio lasta mi ne estas tiom certa.

Tamen, laŭ mi, S-ro B. Golden tute malpravas, kiam li opinias, ke "ĝi estas artifiko por kaŝi la veron, por prisilenti lian judecon". Ĉi tie li faras tre disvastigitan eraron. Eĉ riskante esti kulpigita je antisemitismo, mi ne povas ne diri, ke ankoraŭ ekzistantan (jes) en nia lando antisemitismon oni povas klarigi per la fakto, ke hebreoj strebas ĉien enŝovi sian judecon. Kaj tiu ĉi trajto kiel reakcion ekvekas la malagrablan sintenon. Certe, ankoraŭ pravis L. Zamenhof, kiam li korektis LKK-on en Krakovo pri sia deveno; ĉi tie temis ne pri "loko" sed pri nacieco. I.a., en nia lando, kiam oni volas priskribi *eksteraĵon* de iu persono, oni kutime uzas adjektivon, rilatantan ties naciecon. Do, ekzemple, kiam oni priskribus iun studenton Zhou Enlai el Parizo, en rusa lingvo oni verkus jenon: "pariza studento Zh. Enlai" (kaj oni tuj komprenus, ke jen ĉindevena studento Zh. Enlai). Kaj se oni devus priskribi eksteraĵon de la studento, oni skribus tiam: "Antaŭ ni staris sufiĉe altstatura, juna ĉina studento kun okulvitroj" (ne grave, kie oni lin renkontis: ĉu en Parizo, ĉu en Londono). Jen kia estas diferenco pri uzo de naciec-nocioj en nia lando. (Ekzemplo: "Mi eniris apotekon; apotekisto estis malgranda malaltstatura maljuna hebreo en sterile pura blanka vesto...") ❑

CLARENCE STROCHNETTER 1938-1991 ✝

verkis Mac LeFevre

Clarence naskiĝis la 22an de septembro 1938 ĉe "Pyengana" en Tasmanio kaj pace mortis en Laŭncestono la 28an de aŭgusto 1991. Kripligate de muskol-distrofio ekde juneco li tamen vivis vere rimarkindan vivon, ĉiam donante grandan servon al la popolo.

Pro ĉi tiuj siaj servoj, li estis honorita per la OAM (Medalo Ordeno de Aŭstralio) en 1979.

Sininstruinta muzikisto, li ludis akordionon sed poste pro manko de fizikpovo li devis transiri al gitarludado. Li ankaŭ ludis buŝharmonikon kaj tamburon — speciale aranĝitajn por li por ke li estu unupersona radseĝul-muzikisto. Kiel kremon sur la kuko,* li bele kantis kaj en 1970 li registris sian propran diskon, sur kiu estis, kun aliaj, lia propra kantverko "'Neath the Old Willow Tree". Dum siaj lastaj ĉ. dek jaroj li ne plu povis ludi kaj kanti.

Je sia morto li estis Prezidanto de la Internacia Asocio de Kripligitoj (Aŭstralia sekcio) (Disabled Peoples International [Australia]). Li ankaŭ estis ĉiala startigisto en la sporto Lignohakado, en nordorienta Tasmanio — al tiu posteno li donis siajn servojn dum 24 jaroj.

Clarence estis lerta kaj entuziasma Esperantisto. Leginte pri Esperanto en 1973, li tuj komencis kaj sukcesis ĝin lerni. Gajninte la Superan Diplomon Kun Honoroj en 1976, li instruis kaj ankaŭ ekzamenis por la Elementa Diplomo. Li ĉeestis Kongresojn —Melburnan 1976, Laŭncestonan 1978 (LKK-ano), kaj Sidnejan (1980). Post tiam li fizike ne kapablis ĉeesti Kongresojn, sed li ĉiam restis lojala klubano en Laŭncestono kaj regule partoprenis en la semajn-kunvenoj — eĉ ĝis unu semajno antaŭ sia morto.

Clarence neniam plendis, sed anstataŭe estis ĉiam gaja, multe ĝuis ŝercojn, kaj pro ĉiuj liaj bonegaj trajtoj li estis tre honorita per granda nombro da personoj kiuj ĉeestis la funebroceremonion. Samkiel lia bonega edzino, Barbara, ni devas esti tre dankemaj pro lia amdonanta vivo kaj pro liaj servoj al ni ĉiuj. ❑

*Anglalingva esprimo = speciale plaĉa kvazaŭaldono. — Red.

LIBROKATALOGO 1992

La nova *Librokatalogo 1992a* de la Libroservo de AEA estas jam dissendita, kun akompananta abonfolio. Se vi ne ricevis ekzempleron de la Librokatalogo sed deziras ĝin, vi povas ricevi ĝin senpage de la Libroservo de AEA, PO Box 230, Matraville NSW 2036. Se vi ja ricevis ĝin sed deziras ekstra(j)n ekzemplero(j)n, vi povas mendi ilin de la Libroservo po $2.00 plus $1.00 por poŝtkosto. Atentu ke la eldono por Nov-Zelando iomete varias disde la aŭstralia eldono. ❑

LA SEPTAGA MURDENIGMO

RECENZAS DONALD BROADRIBB

La Septaga Murdenigmo, de Ronald Cecil Gates. Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo kunlabore kun Aŭstralia Esperanto-Asocio, 1991. 75p. $8.40 de la AEA Libroservo.

Jam de pluraj jaroj aperas en la Esperanto-literatura merkato abundaj ...mroman(et)oj, preskaŭ ekskluzive de eŭropanoj. Sed se mi ne mismemoras, ĉi tiu estas la unua detektiv-romaneto en la aŭstralia originala Esperanto-literaturo. Ĝi pli ol bone kontrastas kun la eŭrop-esperantaj verkoj rilate al kvalito ĉiuspeca. Oni trovas ĝin bonaspekta, bele kvankam modeste presita, kun nur manpleno da komposteraroj kaj ĝenerale bone korektita lingouzo. Mi rimarkis aron da anglismoj kiuj iom agacas, tamen ili ne malfaciligas la komprenon — kaj, krome, estas multe malpli abundaj ol en la verkoj de neanglaparolantaj verkantoj aktualaj en la Esperanto-movado!

...ĉi tiu modesta verko estas distra, sen pretendo esti juvelo en la krono de la monda literaturo...

La rakonto mem estas relative simpla. Sur la tereno de aŭstralia universitato, situanta en la kamparo apud vilaĝo, oni ektrovas la kadavron de junulino, pri kiu unue nenio estas sciata. Sekurecoficisto de la universitato kun la manpleno da policanoj de la vilaĝo sukcesas iom post iom trovi kiu estis la junulino, kial ŝi estis en la loko kie ŝia kadavro estis trovita, kaj, fine, la murdinton.

Kun facila stilo, la aŭtoro rapide movas la rakonton de la komenco ĝis la neevitebla fino — kio estas kaj bona, kaj nebona, laŭ la prefero de la leganto. Mi mem trovis ĝin iom nekontentiga. La karakteroj de la rolantoj neniam klare distingiĝas, kaj ili sekve restas kvazaŭ paperaj figuroj sen propra vivo. Parte tio ŝuldiĝas al la longo de la verko: ĝi estas tro mallonga por havi karakteron de vera romano, sed iom tro longa kaj multcela por havi la karakteron de novelo. Tamen mi devas agnoski ke por multaj legantoj la enhavo de la "murdenigmo" estas pli grava ol la literatureco de la verko.

Por mia gustumo la neevitebleco de la klimaksa sceno en la fino de la libro estas tro antaŭvidebla, kaj tro sekvas la tradicion de "laŭformula verkado" — kvankam, mi supozas, tio donas familiarecan senton al la rakonto, kaj certe ne trostrecas la imagon de la leganto.

Mi devas protesti pri la kontraŭfundamenta uzo de la supersigno ´ en la frazo "kiujn ili káj kondukas kiel produktivajn entreprenojn, káj uzas por instruado kaj reserĉoj", kiu malagrable trafas la okulon de la leganto jam sur paĝo 3. Mi ankaŭ, malpli forte, protestas kontraŭ la anglisma trouzo de "tiam" kun la signifo "poste", kaj kontraŭ la ofta uzado de "plua" anstataŭ "plia" (verŝajne pro inklino trokorekti la anglalingvan konfuzon inter "further" kaj "farther"). ❑

KONKURSO

Kiu verkis la sekvantan liston kaj kie ĝi troviĝas? Al ĉiu ĝuste respondinta leganto estos donita libr(et)o esperanta elektota el listo provizota de la redaktoro.

Sano, sana, sane, sani, sanu, saniga, saneco, sanilo, sanigi, saniĝi, sanejo, sanisto, sanulo, malsano, malsana, malsane, malsani, malsanulo, malsaniga, malsaniĝi, malsaneta, malsanema, malsanulejo, malsanulisto, malsanero, malsaneraro, sanigebla, sanigisto, sanigilo, resanigi, resaniĝanto, sanigilejo, sanigejo, malsanemulo, sanilaro, malsanaro, malsanulido, nesana, malsanado, sanulaĵo, malsaneco, malsanemeco, saniginda, sanilujo, sanigilujo, remalsano, remalsaniĝo, malsanulino, sanigista, sanigilista, sanilista, malsanulista k. t. p.

Se akompanos vian ĝustan respondon ankaŭ bone preparita listo de anglalingvaj ekvivalentoj de ĉiuj vortoj en la listo, vi ricevos duan libr(et)opremion.

Ĝustaj respondoj devas atingi la redaktoron antaŭ la 25a de decembro 1991. ❑

IMITINDA IDEO

En nº 6 de *esperanto/usa* oni legas pri nova telefonservo en Usono, organizita de la tiea Esperanto-asocio ELNA. Ĝi utiligas telefonsistemon analogan al niaj 008- telefonnumeroj por fari informservon. Ĉu estos dezirinde dum nia venonta kongreso diskuti ion similan por Aŭstralio? La 008- numero povus aperi en ĉiuj telefonlibroj en Aŭstralio kaj varbi por Esperanto, kaj informpetantoj povus ricevi aktualajn informojn pri Esperanto. ❑

NOVA RUSLANDA ESPERANTO-GAZETO

Monata gazeto modesta sed tre bone redaktata komenciĝis en la Ruslanda Respubliko (≠ USSR). Ĝia titolo: *Rusl*[illegible] *landa Esperantisto*. Ĝi estas abonebla je 15 nederlandaj guldenoj (≈ $A10.50) de UEA.

Estas neklare ĉu la aperintaj Esperanto-gazetoj de aliaj respublikoj, ekz. *Sovetia Esperantisto* eld. en Azerbajĵano, plu aperas. Estas sciate ke pro la financa kaozo en USSR pluraj Esperanto-eldonaĵoj devis ĉesi pro manko de mono. ❑

NORDA PRISMO DENOVE ELDONOTA!

Ankaŭ en la gazeto *esperanto/usa* nº 6, 1991, aperas anonco ke la iama prestiĝa literatura gazeto *Norda Prismo* reviviĝas kaj la unua numero de la nova serio aperos antaŭ la fino de ĉi tiu jaro. Por aranĝi abonon kontaktu la eldoniston, Oy Mendoservo Ak, Kivistöntie, SF-05510, Hyvinkää, Finnlando. La redaktoro estas Jukka Pietiläinen, ĉe la adreso Puutarhakatu 12 B 18, SF-40200 Jyväskylä, Finnlando.

Norda Prismo estis kreita de la sveđiĝinta hungaro Ferenc Szilágyi, unu el la plej emintentaj prozistoj de Esperanto. ❑

28a A.E.A. KAJ 57a N.Z.E.A. ESPERANTO-KONGRESO

11-19 Januaro 1992. Temo: *Ekologio*

5-a Listo de ĉeestontoj

[43 Betty Fripp (NSW) nuligita]
43 Bernie Heinze (Vic)
52 Alan Towsey (NSW)
53 Eileen Olsen (NZ)
Bill Olsen (NZ)
55 Rita Aagaard (NZ)
56 Brian Fox (NZ)
57 Jackie Fox (NZ)
58 Lydia Greig (NZ)
59 Ken Greig (NZ)
60 Derrick Knight (NZ)
61 Jo Knight (NZ)
62 Ellen Lymburn (NZ)
63 Gwenda Sutton (NZ)
64 Brad McDonald (NZ)
65 Marieke Bax (NZ)
66 Dulcie Sawkins (WA)
67 Lucien Giloteaux (Francio)
68 Romana Ruig de Vries (Nederlando)
69 Franziska Reisel (Germanio)
70 Harry Twyford (Vic)
71 Brian Currie (NSW)
72 Frank Braham (Vic)
73 Len Eddington (WA)

Ĝis la 25a de Oktobro: NSW—28, Vic—11, Qld—7, WA—7, SA—2, ACT—1, NZ—13, Francio—1, Germanio—1, Nederlando—1, Usono—1 = 73.

KONGRESNOVAĴOJ

Junulara Kongres-Fonduso: Nur Rosalie Schultz, el Perto, ĝis nun.

Transporto: Flughavena aŭtobuso de Mascot al la Sidneja Centra Stacidomo. Trajnservo de la Centra Stacidomo al la Richmond Stacidomo. LKK transportos kongresanojn de Richmond al la kongresloko. Bonvolu peti gvidilon de la sekretario de la LKK se vi ne jam havas ĝin.

Loĝado: Ĉambroj jam asignitaj — pluraj aliaj ĉambroj haveblaj.

Oficiala Inaŭguro: Vic-Prezidanto Kep Enderby malfermos.

Aferkunvenoj: Prezidanto Trevor Steele aŭ Ralph Harry malfermos kaj prezentos la kongrestemon "Ekologio (La Alia Verda Movado)".

Kongrestema sesio: Gvidos Trevor Steele aŭ Ralph Harry.

Ekskurso nº 4: Featherston Natura Rezervejo anstataŭos la Leonparkon.

Ekskurso nº 2: Ekskursanoj bonvolu noti — tiuj kiuj elektis viziti la Power House Muzeon nun pagos aldonan $5 por eniri la Muzeon.

***Programo**, Taga* Multaj interesaj parolantoj en ĉiuj sesioj. Lingvaj Seminarioj Famaj Ray Ross, Vera Payne, Alan Towsey, Marcel Leereveld.

Vespera: Interkona — Max Wearing gvidos — diversaj kaj kantado.

Ekumena — Margaret Chaldecott gvidos. ➜

Distraĵa — Pupoj kaj variaj.
Drama Konkurso — Herbert Koppel gvidos — Brisbana, Manlia kaj Perta Grupoj konkursos.
Kantada Konkurso — Nur Brisbana Grupo partoprenos/kantado/ muziko.
Sapskatola — Kep Enderby aŭ Tom Elliott gvidos.
Internacia — Diversaj.
Bankedo — Prof. Robbie Robertson gvidos.

La LKK bonvenigas pliajn aliĝilojn aŭ demandojn.

Sekretario de la LKK: Les Scott, 34 Ocean Road, Manly NSW 2095 (☎ [02] 977 3338).

EL LA REGIONOJ

Kvinslando: Dum la semajnfino 5-6 Oktobro okazis la dua konferenco en 1991, kiam 20 anoj veturis al Esk en la Brisbanvalo. La konferenco sukcesis ĉar nia movado gajnis du novajn anojn, kaj la ĉeestintoj ege ĝuis la kutiman Esperanto-etoson. Ni ŝuldas dankon al Jim kaj Jenny Dimo pro la motelaranĝoj kaj la dimanĉa veturado ĉirkaŭ la vidindaĵoj de la Digo Wivenhoe. Nova estraro elektiĝis: Prez. Gaye Phillips, Vic-Prez. Peter Keates, Sekr. Kay Andersen. Kas. Merv Schramm, Red. de *La Voĉo* Ray Ross.

NSK: La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo anoncis sian novan estraron: Prez. Margaret Chaldecott, Vic-Prez. Betty Cleminson, Sek. Brian Currie, Kas. James Harwood.

La grupo havos labortagon la 23an de Novembro, por plibeligi la Esperanto-Domon antaŭ la Zamenhofa Vespero.

Esperantista amikino el Amsterdamo, Netti den Hagen, ĉeestis en *Manly* kaj partoprenis en la klubkunvenoj dum la dumonata periodo antaŭ 19 Oktobro, kiam ŝi ekflugis hejmen. Intervjuitaj por artikolo en la *Manly Daily* estis Betty Cleminson kaj Eunice Graham k[a]l Netti.

Tasmanio: Nova gazeto eldonata de la Esperanta Klubo de Hobarto kaj redaktata de David Brewer komencis aperi. Ĝia titolo: *El Dormo*. Ĝis nun aperis du numeroj, en Julio kaj Oktobro, 4-paĝaj kun teksto en paralelaj Esperantaj kaj anglalingvaj kolumnoj. Pri la nomo de la gazeto David komentas: "Ĝi fontas de komenca sugesto de nova klubano kiu diris, ke la nomo devus aludi al Pegasus, la fluganta ĉevalo. Mi konfuzis Pegasus kun Phoenix, la mitan birdon, kiu renaskiĝis de siaj cindroj. Mi pensis, ke la sugesto aludis al la 'renaskiĝo' de la klubo 'de siaj cindroj'. Do unue, mi pensis pri la nomo *El Cindroj*. Tamen, mi tiam ŝanĝis miajn pensojn. Miaopinie, la klubo ne tute estingiĝis, sed nur fariĝis neaktiv[a] alivorte ĝi dormis. Do, la nomo *El Dormo*."

Viktorio: Fine de Septembro okazis malgranda krizo en la vivo de la Melburna Esperanto-Societo — iu senzorgulo ĵetis neestingitan cigaredon en paperkorbon. Kaŭze de fajro, akvoŝprucado ruinigis tapiŝon, kaj nova estis kuŝigenda.

MALNOVA BJALISTOKO SUR POŜTKARTOJ

La plej multaj esperantistoj ĝis nun ne havis okazon viziti la naskiĝurbon de Ludoviko Zamenhof — Bjalistokon. Multaj eĉ ne vidis bildojn el tiu urbo.

Por forigi tiun mankon, laŭ la inciato de la bjalistoka historiisto—Tomasz Wisniewski (aŭtoro de la libro *Zamenhof 1887* kaj *Bjalistoko sur la malnovaj poŝtkartoj* 1991), kiu kunlaboris kun bjalistoka esperantisto Jaroslaw Perzyszek, aperis serio da ok poŝtkartoj, kiu prezentas la naskiĝurbon de la aŭtoro de la Internacia Lingvo en la antaŭmilita epoko.

Sur la poŝtkartoj troviĝas: la foto el 1912 de la naskiĝdomo de Ludoviko Zamenhof, detruita en la jaro 1957; la naskiĝatesto el la registrolibro en la lingvoj jida kaj rusa, kie estis enskribita Ludoviko Zamenhof post la naskiĝo, kaj ankaŭ sinagogo "Ĥorŝul", en kiu preĝis la familio de Zamenhof. Tiu ĉi sinagogo estis detruita dum la Dua Mondmilito. En la serio troviĝas ankaŭ dokumentoj pri bjalistoka Esperantoaktivado. Pruvas tion i.a. la poŝtkarto kun la kopioj de la reklamoj en Esperanto, kiuj aperis en la kongreslibro de "Internacia Postkongreso Esperantista", okazinta en Bjalistoko post la UK en 1927. La lastaj tri kartoj ligiĝas al la agado de Jakub Ŝapiro, fondinto kaj ĉefaktivulo de Zamenhofa EsperantoSocieto (ZES), nelacigebla instruanto kaj propagandanto de la Internacia Lingvo, aŭtoro de pluraj artikoloj kaj de kelkaj libroj, i.a.: la unua gvidlibro de Bjalistoko en Esperanto kaj "Babiladoj de bonhumora Zamenhofano", ĉefmotoro de la postkongresoj en 1927 kaj 1931, kaj de multaj aliaj Esperantoaranĝoj en Bjalistoko. El la tri menciitaj kartoj unu prezentas la straton Lipowa, ĉe kiu troviĝis la sidejo de ZES, kaj ĉe kiu loĝis Ŝapiro. Sur la dua videblas Jakub Ŝapiro kun sia amiko, esperantisto kaj eldonisto Abraham Zbar, elrigardantaj el la fenestro de la domo de Ŝapiro; la lasta prezentas grupon de la bjalistokaj esperantistoj, fotitaj antaŭ la domo de Zamenhof en 1929. Sur la foto rekoneblas apud Ŝapiro aliaj aktivuloj: Gerlin, Giladi, Kurianski kaj Osowicki.

La tuta serio baziĝas sur malnovaj fotoj kaj dokumentoj. Ĉiu poŝtkarto estas laŭvice numerita. La eldonkvanto de ĉiu karto estas nur 500 ekzempleroj. La priskribo de ĉiu karto estas en la lingvo Esperanto. Ni ofertas ankaŭ rarajn, nuntempajn, judtemajn poŝtkartojn en malgrandaj serioj. Estonte ni planas eldoni aliajn, rarajn, interesajn poŝtkartojn kaj ankaŭ ilustritan, novan gvidlibron de Bjalistoko en Esperanto.

Detalajn informojn petu ĉe: Tomasz Wisniewski, PO Box 351, 15001 Bjalistok 1, Pollando. ❑

Respondoj por la Citaĵkvizo

1i, 2ĥ, 3d, 4a, 5c, 6b, 7j, 8ĵ, 9e, 10ĝ, 11g 12f, 13h, 14ĉ

Wholly printed in Australia. Computer typeset by Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562; printed by SNAP, 921 Albany Highway, Victoria Park East WA 6101, Australia.